# JURAJ VORTOJ KAJ ESPRIMOJ

Redaktoro: Tom Arbo Høeg

Oslo 1990

ISBN 82-7000-161-9

# FORORD

Hensikten med dette registret er å vise hvordan juridiske, og enkelte andre, ord og uttrykk på Esperanto brukes i praksis. Det innsamlete materialet vil forhåpentlig være til nytte for redaktører av juridiske ordbøker på Esperanto og et nasjonalspråk.

De viktigste kildene (se særskilt liste) har vært Internacia Jura Revuo 1966–1987, Plena Ilustrita Vortaro, Monato kaj Scienca Mondo. Registret omfatter ikke L. Dubravszkys verk "Sugestoj por Kompletigo de la Jura/Diplomatia Terminaro", 1987, og ordboken "Proveldono de Komerca Terminaro, 1989". Man har heller ikke tatt med juridiske uttrykk i litteratur utgitt etter 1989.

En hjertelig takk rettes til Universitetsbiblioteket i Oslo som atter en gang har påtatt seg å trykke og utgi faglitteratur utarbeidet av dets ansatte.

Jeg vil også takke Alice Pettersen som energisk og tålmodig i de tre siste årene har satt følgende verk: "Mineralnavn" (Mineralnomoj), 1988, "Geologia Vortaro", 1989 og nå "Juraj Vortoj kaj Esprimoj".

Redaktøren

# ANTAŬPAROLO

La celo de tiu ĉi registro estas montri kiel juraj, kaj kelkaj aliaj, vortoj kaj esprimoj estas uzataj en la praktiko. La kolektita materialo esperеble estos utila por redaktoroj de juraj vortaroj en Esperanto kaj iu nacia lingvo.

La ĉefaj fontoj (vidu apartan liston) estis Internacia Jura Revuo 1966–1987, Plena Ilustrita Vortaro, Monato kaj Scienca Mondo. La registro ne ampleksas la verkon de L. Dubravszky: "Sugestoj por Kompletigo de la Jura/Diplomatia Terminaro" kaj ne la "Proveldono de Komerca Terminaro", 1989. Ne estas registritaj juraj esprimoj en literaturo eldonita post 1989.

Koran dankon al la Universitata Biblioteko en Oslo, kiu ankoraŭfoje prenis sur sin la taskon presi kaj eldoni fakliteraturon ellaboritan de unu el ĝiaj dungitoj.

Mi dankas ankaŭ Alice Pettersen, kiu energie kaj pacience dum la lastaj tri jaroj kompostis tri verkojn. Temas pri: "Mineralnavn" (Mineralnomoj), 1988, "Geologia Vortaro", 1989, kaj nun "Juraj Vortoj kaj Esprimoj".

La redaktoro

# LISTO PRI MENCIITA LITERATURO


Aktualaj = Lapenna, Ivo: Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo. Roterdamo 1952.

Biblio.

Bulgario = Bulgario. Mallonga Skizo. Sofia 1968.

Esperanto (UEA)

Espero el Koreio, La

Eŭropa Dokumentaro

Fina Akto = Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, Helsinki 1975. Fina Akto. Bratislava 1976.

Heroldo = Heroldo de Esperanto.

IJR = Internacia Jura Revuo.

Konst. Bul. = Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario. Sofia 1950.

Konstitucio 1937 = Konstitucio (Fundamenta Leĝo) de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj. Moskvo 1937.

Kontrakto = Kontrakto de la Ligo de Nacioj. Paris [s.j.]

Monato.

Nederlando 1980 = Nederlando Koncize. 's-Gravenhage 1980.

PIV = Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Paris 1970.

Scienca Mondo.

Scienca Revuo.

UN = Unuiĝintaj Nacioj, Novjorko: Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj Statuto de la Internacia Kortumo. N.Y. 1979.


Aliaj mallongigoj:

| | | |
|---|---|---|
| (L) | = | Ivo Lapenna |
| (n) | = | neologismo |
| (ntr) | = | netransitiva |
| (r) | = | radiko |
| (tr) | = | transitiva |
| (Z) | = | L.L. Zamenhof |
| [ ] | = | noto de la redaktoro |

# A

**abandon/** (PIV 1)

abandono (r): ago, per kiu oni cedas al la asekuristo la asekuritan objekton aŭ tion, kio restis el ĝi post difektiĝo, kaj anstataŭe postulas la plenan asekuritan sumon (PIV 1)

**abdik/** (PIV 2)

abdiki (r) (tr): 1) formale demeti ĉiujn rajtojn pri reĝeco, imperiestreco ks., 2) memvole forlasi altan oficon aŭ rangon (PIV 2)

abdiko: ago, de tiu, kiu abdikas (PIV 2)

abdiki la prezidantecon (PIV 2)

kaŭzi la abdikon de diktatoro (PIV 2)

**aberaci/** (PIV 2)

aberacio (r): 4) deflankiĝo disde la normala stato (PIV 2)

aberacio de la juĝokapablo (PIV 2)

**abĵur/** (PIV 2)

abĵuri (r) (tr): malagnoski per juĝa decido (PIV 2)

**abol/** (PIV 3)

aboli = abolicii (PIV 3)

**abolici/** (PIV 3)

abolicii (r) (tr): jure nuligi leĝon aŭ malpermesi kutimon (PIV 3)

abolicio: ago de registaro, kiu abolicias (PIV 3)

abolicio de la mortpuno en Francio (Monato 1985: 9:13)

sklaveco estis aboliciita en Usono nur en 1865 (PIV 3)

**abrogaci/** (PIV 3)

abrogacio (r): nuligo de leĝo aŭ dekreto, decidita de la rajtigitaj instancoj (PIV 3)

abrogacii (tr): laŭjure nuligi (PIV 3)

**absolv/** (PIV 4)

absolvi (r) (tr): 1) pardoni kaj nuligi la pekojn de iu (= pekliberigi), 2) deklari iun senkulpa (= malkondamni) (PIV 4)

la sekretarion de la Prezidanto absolvis la juĝisto (Monato 1989:6:12)

**aĉet/** (PIV 6)

aĉeti (r) (tr): akiri kiel propraĵon per pago de mono (PIV 6)

aĉetado: unuopa ago de tiu, kiu aĉetas (PIV 6)

aĉetanto: tiu, kiu aĉetas (PIV 6)

aĉetisto: tiu, kiu profesie aĉetadas por iu firmo (PIV 6)

elaĉeti (tr): pagi, por liberigi iun el kaptiteco (PIV 6)

elaĉeto: ago de tiu, kiu elaĉetas, kaj ofero tiucele farita (PIV 6)

foraĉeti = akapari (PIV 6)

subaĉeti (tr): delogi per mondonaco kaŝita (PIV 6)

aĉeti teon por unu franko (Z) (PIV 6)

aĉetjuro (IJR 1967:4/5(5):14)

aĉetkondiĉo (Scienca Mondo 1986:4:25), aĉetokondiĉoj (IJR 1977:1:39)

aĉetkontrakto (IJR 1967:4/5(5):16)

aĉetodokumento (IJR 1977:1:40), dokumento de aĉeto (PIV 201)

aĉetoprezo (IJR 1977:1:39)

aĉetpovo (PIV 856)

aĉetsumo (N-Esp 159)

ĉe la Romanoj la sklavoj povis sin elaĉeti (PIV 6)

dum ŝi faris siajn aĉetojn (Z) (en butiko) (PIV 6)

frato ne donos elaĉeton por li (PIV 6)

la Filo de homo venis ... por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj (PIV 6)

partopaga aĉeto (IJR 1967:1(2):19)

perdi sian prioritaton de aĉeto (IJR 1977:1:40)

uzi sian prioritaton aceti (IJR 1977:1:39)

**adekvat/** (PIV 7)

adekvata (r): 1) klare kaj tute ampleksanta ĉiujn karakterojn de la objekto, 2) ĝuste konforma al la cirkonstancoj (PIV 7)

adekvata difino (PIV 7)

adekvataj preskriboj (PIV 7)

neniu el la edukaj rimedoj estas adekvata (L) (IJR 1982:1:16)

**adjudik/** (PIV 8)

adjudiki (r) (tr): proponi laboron, liveron ks al konkurencantoj, ordinare kun la antaŭa kondiĉo, ke la akiranto estos tiu, kies prezoj estos la plej favoraj (PIV 8)

**administr/** (PIV 8). Vidu ankaŭ: administraci/

administri (r) (tr): 1) prizorgi la aferojn de persono aŭ de organismo precipe pri financoj kaj havaĵoj. 2) plenumi administracion (en la 3a signifo) (PIV 8)

administraj aŭtoritatoj (IJR 1981:1:30)

de administra karaktero (IJR 1983:1:35)

Komitato pri Juraj kaj Administraj Demandoj (IJR 1981:2:3)

kuratoro administras la proprietaĵojn de orfo (PIV 8)

la administra konsilantaro de ŝipkompanio (PIV 8)

la kanceliero estis unu el la ĉefaj administraj oficistoj de la reĝo (IJR 1969:1(9):7)

leĝaj kaj administraj dispozicioj (Fina Akto 43)

li administradis la malgrandan terposedaĵon (Z) (PIV 8)

ŝtatadministrada juro (IJR 1968:1(6):3)

**administraci/** (PIV 9). Vidu ankaŭ: administr/

administracio (r): 1) administrejo. 2) administriaro. 3) ŝtata aŭ ŝtatkaraktera funkcio, konsistanta en la aplikado de la leĝoj kaj en la ĉiutaga plenumado de publikaj servoj konforme al juraj preskriboj kaj direktivoj de la registraro, pri kiuj la funkciulo estas rajtigita (PIV 9)
administracia akto (IJR 1984:2:32)
administracia instanco (IJR 1981:2:12)
administracia juro (L) (IJR 1982:1:4)
la Administracia Kortumo en Vieno (IJR 1980:2:23)
administracia reskripto (IJR 1981:2:16)
la administracio de la justico (PIV 9)
la justico estas apartigita de la administracio (IJR 1980:2:20)
la Reagan-administracio (Scienca Mondo 1984:2:18)
leĝdonado, administracio kaj justico (IJR 1985:1:2)
Provizora Ŝtata Registaro, kiu posedis ĉiujn administraciajn kaj ankaŭ leĝdonajn kompetentecojn (IJR 1980:1:29)
reskripto de administracia instanco (IJR 1981:2:12)
ŝtata administracio (IJR 1985:1:6)

**adopt/** (PIV 9)
adopti (r) (tr): 1) alpreni, per oficala laŭleĝa akto, iun kiel sian propran filon aŭ filinon, 2) (f) alproprigi al si ion spiritan (PIV 9)
adopto: ago de tiu, kiu adoptas, kaj kontrakto, kiu tion sankcias (PIV 9)
adopti opinion, metodon, konduton, lingvon, kostumon, modon, vivaranĝon (PIV 9)
adopti rezolucion (Monato 1986:6:12)
adopto (internacia juro) (IJR 1978:2:14, dif.)
ĉe la kompleta adoptado, inter la adoptinto kaj liaj parencoj unuflanke, la adoptito kaj liaj descendaj parencoj aliflanke, estiĝas rajtoj kaj devigitecoj (IJR 1969: 1(9): 18)
ĉu vi volas fariĝi mia adoptita filino? (Z) (PIV 9)
en majo 1914 estis adoptita la leĝo pri aŭtonomio (Scienca Mondo 1983:3:20)
estis adoptitaj jenaj deklaroj ... (Scienca Mondo 1984:2:4)
la adoptaj leĝoj (PIV 9)
la adopto estas submetata al diversaj kondiĉoj de aĝo ks. (PIV 9)
la rilatoj inter adoptito kaj adoptinto (PIV 9)
oni permesas nur du specojn de adoptado: kompleta kaj nekompleta (IJR 1969:1(9):18)

**adult/** (PIV 10)
adulti (r) (ntr): 1) rompi la geedzan fidelecon (PIV 10)
adultulo: iu, kulpa je adulto (PIV 10)
idoj de adultulo kaj malĉastulino (PIV 10)
sangadulto = incesto (PIV 10)
se iu adultis kun la edzino de sia proksimulo, estu mortigitaj la adultinto kaj la adultintino (PIV 10)

**advokat/** (PIV 10)
advokato (r): persono oficiale rajtigita defendi en juĝejo la interesojn de procesanto aŭ de akuzito (PIV 10)
advokataro: korporacio de la advokatoj ĉe unu juĝocentro (PIV 10)
advokateco: ofico aŭ profesio de advokato (PIV 10)
ĉe ĉiu unuainstanca kortumo ekzistas advokataro (IJR 1967:3(4):10)
defenda advokato (Monato 1985:5:12)
ekzerciĝi kiel advokata rajtigito (IJR 1977:2:39)
konsulti advokaton (PIV 557)
la jurstato de la advokatoj (IJR 1968:2(7):7)
pastro vivas de preĝoj, advokato de leĝoj (Z) (PIV 10)
sendependaj profesiuloj (advokatoj, kuracistoj, arkitektoj) (IJR 1968:3(8):11)
vi ne trovos advokaton por pledi en tia afero (PIV 835)

**afer/** (PIV 12)
afero (r): 4) tio, kio estas diskutata antaŭ juĝisto(j) (PIV 12)
havi aferon kun iu (Z) (PIV 12)
kiam oni estas maljusta kontraŭ homo en lia juĝa afero (Z) (PIV 12)
mi esperas, ke mia afero venos baldaŭ antaŭ la tribunalo (PIV 12)

**ag/** (PIV 13). Vidu ankaŭ: pov/
"ag-modelo", agbildo, ag-preskribo (germanlingve: Tatbestand aŭ Tatbild) (IJR 1981:2:24)
agnekapabla pro mensaj difektoj (L) (IJR 1976:2:21
civiljuraj normoj pri agokapablo (IJR 1984:2:25)
havi civilan agokapablon (L) (IJR 1984:2:10)
jura agpovo (IJR 1967:4/5(5):18)
jurago (IJR 1967:1(2):6)
konformi al leĝa agmodelo (IJR 1981:2:27)
la ago devis esti kontraŭjura (IJR 1976:2:35)
la leĝo ne koncernas demandon pri la jura agpovo (IJR 1967:4/5(5):18)
neago (IJR 1982:2:3)
preterlaso agi, nefaro (L) (IJR 1982:1:9)
pro difinitaj krimaj agoj (IJR 1967:4/5(5):3)
punebla ago (IJR 1981:2:24)
testamenta agokapableco (IJR 1975:1:16)

**agent/** (PIV 15)
agento (r): 1) persono, komisiita de iu, por konstante fari ion, 2) tiu, kiu reprezentas personon aŭ firmon en komercaj aferoj (PIV 15)
patentagentejo (PIV 15)

**agentur/** (PIV 15)
agenturo (r): rajto pri komerca reprezentado de unu aŭ pluraj specoj de varo (PIV 15)
li havas agenturojn en sukero, en Portovino, en libropapero (PIV 15)
**agnat/** (PIV 15)
agnato (r): familiano el la vira devenlinio (PIV 15)
**agnosk/** (PIV 15)
agnoski (r) (tr): deklari (ion) oficiale rajtigita (PIV 15)
agnoski rajton (PIV 15)
nur kiam Esperanto estos formale agnoskita de plej multaj registaroj, ni povos ekpensi pri ŝanĝoj (PIV 15)
**aĝ/** (PIV 17)
atingi sian jaraĝon 23-an (IJR 1968:2(7):11)
filoj jam 18-jaraj plenrajtas laborkontrakti (IJR 1966:1:21)
junaĝaj krimuloj (IJR 1976:1:26)
junaĝo estas vivperiodo ĝis la kompletiĝo de la 18-a jaro (L) (IJR 1982:1:16)
kun la plenumo de la 14-a vivojaro estiĝas la persona punebleco (IJR 1981:2:27)
la aĝo por geedziĝo kongruas kun la plenaĝeco - 18 jaroj (PIV 1966:1:11)
la konsento de la neplenaĝuloj estas necesa, se ili jam plenumis la 14-an vivojaron (IJR 1968:2(7):9)
la kriminaljuro respondeco komenciĝas per kompletiĝo de la 14-a jaro (L) (IJR 1982:1:16)
ne plenaĝa infano (IJR 1967:4/5(5):10)
neplenaĝulo (L) (IJR 1982:1:16)
post la plenumo de sia 18-a vivojaro (IJR 1967:3(4):23)
sub krim-aĝo (IJR 1981:2:24)
**akapar/** (PIV 19)
akapari (r) (tr): 1) aĉeti kiel eble plej multajn varojn, kaj poste per reteno maloftigi ilin sur la merkato, por povi vendi ilin pli kare, 2) (f) proprigi al si, kaŭzante al aliaj malutilon (PIV 19)
la romia imperiestro iom post iom akaparis ĉiujn povojn (PIV 19)
**akcept/** (PIV 20). Vidu ankaŭ: aprob/
akcepti (r) (tr): 4) konsenti pri io, aprobe allasi, 6) devontigi sin pagi (PIV 20)
akceptanto (IJR 1967:3(4):16)
akcepti amendojn al Artikoloj 23, 27, kaj 61 (UN 2)
akcepti kambion (PIV 20)
akcepti la jurisdikcion de la Kortumo (Aktualaj 62)
akcepti la programon (IJR 1976:1:6)
akcepti leĝon pri ... (L) (IJR 1983:1:43)
akcepti novan statuton (Heroldo 1983:3:1)
akcepti proponon (Z) (PIV 20)
akcepti rezolucion (Aktualaj 85)
akcepti ŝanĝojn en la statuto de la Eŭropa Klubo (Eŭropa Dokumentaro 1983:3:53)
akcepto de kambio (ago, per kiu la tratato subskribas sur la kambio deklaron, ke li plenumos la pagordonon faritan de la tratanto (PIV 20)
akcepto de la deviga jurisdikcio de la Internacia Kortumo (UN 29)
akcepto de la Jara Raporto (L) (IJR 1980:2:48)
akcepto de oferto (IJR 1967:3(4):16)
blanka akcepto (de kambio, sur kiu la sumo estas ankoraŭ ne menciita) (PIV 20)
decidoj akceptitaj en la Konferenco (Fina Akto 30)
fondiĝis Internacia Kooperativa Esperanto-Organizo, kiu laboros laŭ tie akceptita statuto (Monato 1988:2:6)
garantio, ke ĝiaj decidoj estos sendispute akceptitaj de ĉiuj (Z) (PIV 20)
ili postulis, ke tiuj decidoj estu akceptataj tuj (Z) (PIV 20)
kutimo, tio estas "ĝenerala praktiko akceptita kiel juro" (IJR 1985:2:7)
la akceptebleco aŭ neakceptebleco de via nobla propono dependos de tio, ĉu ... (Z) (PIV 20)
la akcepto de la Atlantika Ĉarto fare de ... (L) (IJR 1976:1:6)
La Civila Kodo estis akceptita la 11-an de junio 1964 (L) (IJR 1984:2:8)
la Deklaracio estis unuanime akceptita en la Bulonja Kongreso (Z) (PIV 20)
la Ĝenerala Asemblo de Unuiĝintaj Nacioj unuanime akceptis la Konvencion pri Genocido (L) (IJR 1968:3(8):2)
la konferenco akceptis la projekton de la statuto (Heroldo 1989:9:2)
la konferenco ne akceptis tian amendon (IJR 1984:2:39)
la membroj konsentas akcepti kaj efektivigi la decidojn (UN 8)
la nova parlamento redaktis novan konstitucion, kiu estis akceptita per referendumo la 6an de decembro 1978 (Monato 1989:2:12)
la popolparlamento akceptis leĝon pri la ŝtataneco (IJR 1968:2(7):9)
la programon akceptis ne nur ĉiuj ŝtatoj de la kontraŭaksa koalicio, sed ... (L) (IJR 1976:1:6)
la teksto, akceptita de la Konferanco la 30-an de Aprilo, 1982, ... (IJR 1985:2:6)
laborplano akceptita en Ystad, 1962 (Esperanto 1988:12:211)

limdatoj por livero kaj akcepto (L) (IJR 1984:2:9)
malakcepti (tr) = rifuzi (PIV 20)
mi atentigis lin, ke li ne havas la rajton ion akcepti en la nomoj de la Esperantistoj (Z) (PIV 20)
neakceptebla kondiĉo (PIV 20)
per skriba voĉdono la membroj unuanime akceptis la decidojn (L) (IJR 1985:1:47)
por akceptantaj kaj elsendantaj landoj (Fina Akto 48)
proponita leĝo estis akceptita per absolutaj plimultoj de ambaŭ ĉambroj (IJR 1980:1:24)
revoko de malakcepto ekvalidas kiam ricevita laŭ la regulo en §7 (IJR 1967:1(2):20)
se la akcepto atingas la ofertanton post la fino de la koncerna tempospaco, ... (IJR 1967:1(2):20)
UN akceptis unuanime rezolucion (Monato 1986:1:8)
Usono kaj Britio deklaris, ke ili ne postulas teritoriajn pligrandigojn, sed ke ili ankaŭ ne akceptos kiun ajn teritorian ŝanĝon, kiu ne estus farita kun la aprobo de la koncernaj popoloj (L) (IJR 1976:1:5)

**akces/** (Ne en PIV)
akceso: 1) akiro de titolo al aldona teritorio rezulte de naturaj kaŭzoj, 2) ekvivalento de aliĝo (L) (IJR 1978:2:13)

**akcesor/** (PIV 20)
akcesora (r): 1) akompananta, sed ne necesa; neĉefa, kroma (PIV 20)
akcesora aĵo, se aneksita al ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa aĵo (L) (IJR 1978:2:13)
akcesoraĵoj (IJR 1967:4/5(5):18)
moveblaĵoj vendataj kiel akcesoraĵoj al bieno (IJR 1967:4/5(5):18)

**akci/** (PIV 20)
akcio (r): 1) frakcio de la kapitalo de financa societo aŭ industria entrepreno, kies posedo rajtigas partopreni en ĝiaj proprietaĵoj kaj en ĝiaj profitoj, 2) atesto pri tia partopreno, valorpapero (PIV 20)
akciano (Z), akciulo: posedanto de unu aŭ pluraj akcioj en akcia kompanio (PIV 20)
akcia kompanio (L) (IJR 1980:2:13)
fondinta akcio (Z) (subskribita jam ĉe la fondo de la kompanio kaj rajtiganta je apartaj avantaĝoj) (PIV 20)
ordinara akcio (PIV 20)
prefera, privilegia (Z) akcio (donanta privilegion aŭ en la decidoj, aŭ en la elektoj aŭ en la profitoj) (PIV 20)

**akcident/** (PIV 20)
akcidento (r): malfeliĉa okazaĵo, kaŭzanta materiajn aŭ korpajn damaĝojn (PIV 20)
asekuro kontraŭ la akcidentoj (PIV 20)
aŭtomobila akcidento (IJR 1976:2:22)
aviadila akcidento (IJR 1976:2:19)
fervoja akcidento (PIV 20)
imputi la akcidenton al la mallerteco de la kondukisto (PIV 420)
laborakcidento: ĉia vundo aŭ korpodifekto, ricevita dum la laborhoroj aŭ dum la irado inter la hejmo kaj la laborloko (PIV 20)
suferi akcidenton sur la strato (PIV 20)
tio estis ĉe li nur akcidenta (ne kutima) preteratento (PIV 20)
vojiro-akcidento (IJR 1976:2:15)

**akciz/** (PIV 20)
akcizo (r): imposto, kiun oni devas pagi pri manĝaĵoj, trinkaĵoj aŭ materialoj, kiam ili eniras en urbon aŭ eliras el la fabriko aŭ deponejo (PIV 20)
akcizo je benzino (Monato 1989:5:8)
akcizopaga varo (PIV 20)

**akir/** (PIV 21)
akiri (r) (tr): 1) fariĝi posedanto de io konkreta per aĉeto, interŝanĝo aŭ alie (PIV 21)
akir-formoj (IJR 1977:2:33)
la akir-aktoj estas enskribitaj en teren-aŭ domregistroj (IJR 1977:2:33)
oni enkondukis la principon de la posedkomuneco de la geedzoj pri la havaĵo akirita dum la periodo de la geedzeco (IJR 1969:1(9):17)
tiun akirkapablon havas ĉiu homo kaj jura persono, se ĝi havas rajtkapablon (IJR 1967:1(2):3)

**akord/** (PIV 22)
akordo inter sinjoroj (angle: gentlemen's agreement) (IJR 1968:1(6):10)
en akordo kun la internacia juro (Fina Akto 8)
en malakordo kun ĉi tiu principo (Fina Akto 8)
esti neakordigebla kun la Konstitucio (IJR 1984:1:23
la plimulto de la partoprenintoj estis en akordo pri tio, ke ... (IJR 1967:2(3):20)
la tuta jura sistemo devas esti akorda kun la nunaj realoj de nia socio (IJR 1968:3(8):16)
likvido de ŝuldo per pagakordiĝo inter ŝuldanto kaj liaj kreditoroj validas (IJR 1967:3(4):18)
neakordigebla konflikto (PIV 22)
neakordigebla kun la celoj de UN (Fina Akto 8)
tio pri kio la partioj akordiĝis (IJR 1981:1:27)

**akredit/** (PIV 23)
akrediti (r) (tr): 1) oficiale akceptigi iun, provizante lin per tiucelaj rajtigiloj, 2) komisii al banko, ke ĝi pagu el la kredito de la akreditanto difinitajn sumojn ĝis difinita limo al tria persono, la akreditato (PIV 23)
akreditita ĵurnalisto (Fina Akto 63)

ambasadoro akreditita apud la papo (PIV 23)
la diplomatoj prezentas siajn akreditilojn (IJR 1984:2:38)
la lando, kie li akreditiĝis (IJR 1981:1:32)
traktato inter la akreditinta Ŝtato kaj la Ŝtato al kiu ili estas akredititaj (IJR 1969:1(9):20)

**akreditiv/** (PIV 23)
akreditivo = kreditletero (PIV 23)

**akt/** (PIV 24)
aktaro: kolekto da aktoj, rilataj al difinita afero (PIV 24)
administracia akto (IJR 1984:2:32)
ĉiuj aktoj de la pun-proceso devas esti plenumitaj en la itala lingvo (IJR 1977:2:21)
Fina Akto de la Konferenco (L) (IJR 1977:1:19)
forigi la mankojn el la ekzistanta juro kaj eviti ilin en estontaj juraj aktoj (L) (IJR 1983:2:5)
havi la rajton de enrigardado en la aktojn (IJR 1978:1:39)
hipoteka akto (PIV 393)
jura valoro de la Fina Akto de Helsinki (L) (IJR 1977:1:19)
la akto de akuzado (difinanta la faktojn, pri kiuj la akuzito estos juĝata) (PIV 25)
La Kopirajta Akto de 1956 kun la postaj aldonoj (IJR 1968:2(3):10)
la skribaj aktoj (memorando, kontraŭmemorando, repliko) estas inter la samaj limdatoj transdonataj al la Kortumo (Aktualaj 63)
oficiala akto, dokumento (PIV 757)
subskribita, sigelita vendakto (IJR 1977:1:31)
testamento estas leĝa akto (PIV 24)

**akuz/** (PIV 25)
akuzi (r) (tr): aserti iun kulpa (PIV 25)
akuzo: tio, pri kio oni akuzas (PIV 25)
akuzi iun, ke la faris ion (PIV 25)
akuzi iun pri io (PIV 25)
akuzi la membrojn de la federacia registaro ĉe la Konstitucia Kortumo pro malobservo de leĝoj (IJR 1980:2:21)
akuzinto (IJR 1978:2:34)
akuzita pri la murdo de knabineto (Monato 1985:9:13)
akuzito (IJR 1978:2:34)
akuzpunkto (Monato 1986:7:7)
en la akuza akto estis dirite laŭvorte: (Aktualaj 133)
esti akuzita antaŭ la Konstitucia Kortumo (IJR 1981:1:44)
ĝis nun vi mokis miajn akuzojn (Z) (PIV 25)
la akto de akuzado (difinanta la faktojn, pri kiuj la akuzito juĝanta) (PIV 25)
la akuzita partio (Aktualaj 133)
la akuzo pri instigo al ribelo baziĝis sur letero, en kiu prezidanto Sokomanu laŭakuze minacis la kvazaŭmilitistaron (Monato 1989:6:12)
levi akuzon kontraŭ registarano ĉe la Konstitucia Kortumo pro malobservo de leĝoj (IJR 1980:2:20)
li povas esti akuzata de la federacia registaro antaŭ la Konstitucia Kortumo (IJR 1980:2:22)
malveraj akuzoj (Z) (PIV 25)
oni akuzis ilin pri konspiro murdi la britan ministron (Monato 1989:3:14)
persona akuzrajto (IJR 1978:2:14)
pri unu akuzo mi decidis nun doni klarigon (Z) (PIV 25)
publika akuzisto (PIV 885)
senpruve akuzi iun (PIV 883)
Sokrato estis akuzita, ke li koruptis la junularon (PIV 25)
usonaj deputitoj akuzas Japanion ke tiu ĉi ne pagas por nacia sekureco (Monato 1989:1:10)

**alianc/** (PIV 31)
alianco (r): interligo inter ŝtatoj (PIV 31)
alianci (tr): ligi per alianco (PIV 31)
la Aliancitaj kaj Asociitaj Potencoj (= Entento) (PIV 31)
la triopa alianco (PIV 31)
nealiancitaj landoj (Scienca Mondo 1988:2:15)
sin alianci kun najbara regno (PIV 31)

**aliment/** (PIV 32)
alimento (r): devo liveri al parenco aŭ boparenco, precipe al nelegitimaj infanoj aŭ al senkulpe separita edzino, la vivrimedojn necesajn al ties situacio (PIV 32)
doni alimenton al siaj infanoj (IJR 1979:1:16)
la sumo de la alimento ne kaŭzas apartajn embarasojn al la gepatroj (IJR 1969:1(9):18)
leĝaj alimentodevoj (IJR 1968:1(6):11)

**aline/** (PIV 32)
laŭ art. 8 alineo 2 de la Konstitucio (IJR 1968:3(8):11)

**alkad/** (PIV 32)
alkado (r): juĝisto en hispana, portugala aŭ hispanamerika urbo (PIV 32)

**alod/** (PIV 34)
alodo (r): unu el la tri formoj de proprieto en la mezepoko: senkondiĉa posedo de bieno (PIV 34)

**alonĝ/** (PIV 34)
alonĝo (r): 1) papera folio, kiun oni algluas al kambio, kiam sur ties dorsa flanko ne plu estas loko por ĝiroj (PIV 34)

**altern/** (PIV 35)
alternado (IJR 1981:1:28, dif.9)
ordinare alternado estas farata nur en subskriba

stadio, tamen alternado okazas ankaŭ jam en la parafada stadio (IJR 1981:1:29)

**ambasad/** (PIV 38)

ambasado (r): 1) ambasadoro kun ties sekvantaro, konsilantaro ktp., 2) ambasadorejo (PIV 38)

la Usona ambasado ampleksis pli ol 200 membrojn (PIV 38)

**ambasador/** (PIV 38)

ambasadoro (r): oficiala, plej alta reprezentanto, konstanta aŭ ne, de unu ŝtato ĉe alia (PIV 38)

ambasadoreco: rango aŭ ofico de ambasadoro (PIV 38)

ambasadorejo: 1) domo, kie loĝas ambasadoro kaj liaj servoj, 2) administracio estrata de ambasadoro (PIV 38)

la ambasadorejoj havas rajton de eksterteritorieco (PIV 38)

revoki ambasadoron (PIV 38)

**amend/** (PIV 39)

amendi (r) (tr): 1) fari oficiale plibonigajn modifojn en leĝo aŭ leĝoprojekto, 2) ĝustigi eraron en leĝa dokumento (PIV 39)

amendo: ago de tiu, kiu amendas kaj rezulto de tiu ago (PIV 39)

amendi principon de neŭtraleco (Esperanto 1971:9:150)

amendita en 1947 (Esperanto 1971:9:150)

amendo kaj modifo de traktatoj (IJR 1969:2(10):27)

krome neklaras kion fari pri amendanta leĝo subskribita en unu lingvo, dum la amenditan leĝon oni oficialigis en la alia (IJR 1985:1:12)

la konstitucio de la Respubliko Aŭstrujo estis plurfoje amendita (IJR 1977:1:9)

oni amendis la tri lastajn dispoziciojn (PIV 39)

**amnesti/** (PIV 41)

amnestio (r): ĝenerala nuligo de punoj el difinitaj kategorioj (ofte pri politikaj deliktoj), promulgata okaze de ia grava okazaĵo (PIV 41)

amnestii (tr): nuligi tiamaniere ies punon, forigante eĉ la registritajn atestojn (PIV 41)

ĝenerala amnestio (PIV 365)

la nova reĝo amnestiis ĉiujn kondamnitajn je malpli ol du jaroj da malliberigo (PIV 41)

**analog/** (PIV 44)

analoga (r): simila, laŭ kelkaj rilatoj, al alia afero de malsama speco; nur parte simila (PIV 44)

**analogi/** (PIV 44)

analogio (r): 1) procedo de rezonado per analogaj kazoj (PIV 44)

**anatem/** (PIV 44)

anatemo (r): 1) tabuo, per kiu homon aŭ objekton oni konsekris al Javeo, kun la devigo lin mortigi aŭ ĝin detrui, 2) solena malbeno, per kiu la eklezio apartigas de si kulpan membron (PIV 45)

anatemi (tr): ĵeti anatemon sur iun aŭ ion (PIV 45)

al ĉiu, kiu ne venos tien, estos anatemita lia tuta havo (PIV 45)

la urbo estu sub anatemo de la Eternulo, ĝi kaj ĉio, kio estas en ĝi, nur la malĉastulistino Raĥab restu viva (PIV 45)

**aneks/** (PIV 46)

aneksi (r) (tr): 1) oficiale enpreni fremdan teritorion en sian ŝtaton (PIV 46)

Ĉeĥoslovakio estis aneksita de Germanio (Monato 1985:9:18)

formala aneksago, antaŭe aprobita aŭ poste ratifita (ratifikita) de la registaro (IJR 1968:1(6):7)

post plebiscito Savojo estis aneksita al Francujo en 1860 (PIV 46)

Prusujo kaj Rusujo perforte aneksis parton de Polujo (PIV 46)

**angl/** (PIV 46)

anglosaksa juro (IJR 1984:2:17)

**antecedent/** (PIV 53)

antedecentoj (r): 1) tuto de la antaŭa konduto de persono; ies pasinta vivhistorio (PIV 53)

la akuzito havas tre bonajn antecedentojn (PIV 53)

la registaro petis de siaj funkciuloj resumon de iliaj antecedentoj (PIV 53)

**apart/** (PIV 56). Vidu ankaŭ: special/

apartigo de la eklezio disde la ŝtato (L) (IJR 1982:1:10)

art. 5 havas apartan regulon por tiu kazo ke la vendoobjekto devas esti ekspertizata (IJR 1967:4/5(5):18)

el vidpunkto de la Homaj Rajtoj apartan gravecon havas la krimo kontraŭ la homeco (L) (IJR 1969:2(10):3)

la justico estas apartigita de la administracio (IJR 1980:2:20)

okazigo de la 7-a, aparte sukcesa, Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado (Esperanto 1989:6:108)

pro apartaj kaŭzoj (Aktualaj 16)

ricevi apartan permeson de la Asemblo [Asembleo] (Aktualaj 62)

**apelaci/** (PIV 57)

apelacii (r) (ntr): 1) alvoki al supera tribunalo, kontraŭ verdikto de pli malsupera juĝistaro (PIV 57)

apelacia kortumo (IJR 1978:2:34)

apelacia proceso (IJR 1977:2:23)

apelacia sistemo (IJR 1978:2:34)

apelacii kontraŭ tiaj decidoj al supera instanco (IJR 1985:1:4)
fari pluan apelacion al la Lordoĉambro (IJR 1978:2:34)
ĝiaj juĝoj kaj decidoj estas neapelacieblaj kaj definitivaj (IJR 1980:2:24)
kontraŭ la decido de la Interkonsentiga Oficejo ne ekzistas apelacio (IJR 1975:2:38)
tribunalo de apelacia instanco (PIV 431)

aplik/ (PIV 59)

art. 1 limigas la aplikkampon al moveblaĵoj (IJR 1967:4/5(5):18)
gravega krimo, por kiu eĉ la mortpuno povas esti aplikita (L) (IJR 1969:1(9):2)
ili ne aplikiĝas al ofendoj, kiuj ... (IJR 1982:1:24)
la aŭtoro distingas tri etapojn de la jurapliko (IJR 1967:1(2):23)
la utiligo de kibernetiko por juraplika agado (L) (IJR 1983:2:6)
neaplikebla pro politikaj kaŭzoj (IJR 1981:1:3)
tiu regulo ne estas aplikebla al rifuĝintoj (IJR 1967:3(4):24)
vastigo de la aplikokampoj (L) (IJR 1983:2:3)
zorgi pri la korekta aplikado de la leĝoj (IJR 1969:2(10):23)

aprob/ (PIV 60). Vidu ankaŭ: akcept/

aprobi (r) (tr): 1) opinii kaj deklari bona kaj akceptinda, 2) deklari oficiale taŭga por difinita funkcio aŭ uzo (PIV 60)
aprobi leĝon (Monato 1986:7:12)
aprobi proponon de rezolucio por malpermesi kruelajn agadojn kontraŭ bestoj (Monato 1989:4:18)
ekzameni kaj aprobi la buĝeton de la Organizaĵo (UN 7)
kiam oni aprobas peton pri akiro de finna ŝtataneco ... (IJR 1967:4/5(5):6)
la ekzamenkomisiono aprobis N. kiel doktoron (PIV 60)
la rezolucio estis aprobita je la 13a de marto 1987 (Monato 1988:5:23)
la sanmarina parlamento aprobis per 34 kontraŭ 21 voĉoj kaj 1 sindenteno la kadran leĝon pri universitatnivelaj studoj en ... (Monato 1985:12:21)
malaprobi (IJR 1978:2:35)
nur ekde la fino de la jaro 1969 estas aprobita leĝo, per kiu estas devige, ke ... (IJR 1976:2:34)
oni aprobis statuton kaj agadprogramon (Monato 1986:2:22)
oni konjektas, ke leĝpropono limigi la importkvanton de varoj japanfabrikitaj baldaŭ estos aprobita en la usona parlamento (Monato 1985:11:14)
silenta aprobo (IJR 1985:1:30)
Soveta Unio deklaris sian aprobon de la Ĉarto (L) (IJR 1985:2:2)
submeti sian statuton por aprobo de la Internacia Plenuma Komisiono (IJR 1979:2:28)

arbitraci/ (PIV 63)

arbitracio (r): decido pri ia grava diskutaĵo, farita ne de juĝisto, sed de flanka(j) persono(j), interkonsente elektita(j) de la diskutantoj (PIV 63)
90 arbitraciaj kazoj (Aktualaj 56)
arbitracia juĝisto (PIV 455)
arbitracia kontrakto (Aktualaj 56)
arbitraciaj juĝistoj (Aktualaj 56)
ĉiu internacia malkonsento devus esti finita per arbitracio (PIV 63)
enigi arbitraciajn klaŭzojn en komercajn kontraktojn (Fina Akto 33)
inkluzivi arbitraciajn klaŭzojn en komercajn kontraktojn (L) (IJR 1977:1:23)
la decido de la arbitraciantoj devos esti farita dum konvena limtempo (Kontrakto 13)
La Konstanta Arbitracia Kortumo (L) (IJR 1976:1:2)
serĉi solvon per traktado, enketo, mediacio, konciliacio, arbitracio (UN 9)

Aeropag/ (PIV 64)

Aeropago (r): 1) antikva supera tribunalo en Ateno, 2) aŭtoritata juĝantaro (PIV 64)

arest/ (PIV 64)

Aresti (r) (tr): per leĝa aŭ polica aŭtoritato kapti iun, por tiun malliberigi kaj eventuale transdoni al juĝado (PIV 64)
arestejo: malliberejo, kie arestitoj estas provizore tenataj, antaŭ ilia apero antaŭ tribunalo (PIV 64)
arestisto: polica aŭ juĝeja funkciulo, komisiita por la arestoj (PIV 64)
antaŭaresto de la akuzito (IJR 1984:2:35)
arbitra aresto (Aktualaj 87)
aresti suspektaton (PIV 64)
eldonado de la arestleteroj, persekutleteroj kaj similaj aktoj (IJR 1968:2(7):6)
li estis arestita de la Gestapo (PIV 64)
malpermeso de arbitraj arestoj, malliberigoj kaj ekziloj (L) (IJR 1968:3(8):2)
oni liberigis la arestitojn (PIV 64)
post dutaga arestado, li fariĝis denove libera (PIV 632)
protekto kontraŭ arbitraj arestigoj (IJR 1967:3(4):24)
se oni ne trovas la kondamniton, anstataŭ la polico nun eldonas la arestleteron la tribunalo (IJR 1969:1(9):14)

armistic/ (PIV 68)

armistico (r): militpaŭzo, difinita per detala skriba konvencio, kaj pli grava ol la simpla batalhalto (PIV 68)
ĉiu el la subskribintaj ŝtatoj devigis sin ne konkludi apartan armisticon aŭ pacon kun kiu ajn el la malamikaj ŝtatoj (Aktualaj 103, dif.)

**artikol/** (PIV 70)
artikolo (r): 3) ĉiu el la apartaj sekcioj, je kiuj estas dividita leĝo, traktato, statuto ks. (PIV 70)
artikolo 35 paragrafo 2 (UN 6)
§4, unua artiko [= alineo] (IJR 1967:4/5(5):17)

**asekur/** (PIV 72). Vidu ankaŭ: polis/, premium/
asekuri (r) (tr): 1) protekti kontraŭ riskoj, per la pagado de ĉiujara monsumo tiucela al asocio, kiu promesas monan kompenson por la eventuala perdo aŭ difektiĝo (PIV 72)
asekuraĵo: la objekto, pro kies eventuala difektiĝo aŭ perdo oni devas ricevi kompenson (PIV 72)
asekurato: tiu, kies riskoj estas kompensotaj (PIV 72)
asekuristo: agento, kiu sin okupas pri asekuroj (PIV 72)
asekuro: kontrakto por asekuri kaj la protekto, kiun ĝi liveras (PIV 72)
kontraŭasekuri (tr): sekundare asekuri ies riskon ĉe alia asekura kompanio, garantiante tiel sian propran kompanion kontraŭ eventuale tro altaj kompensopagoj (PIV 72)
reasekuri (tr): renovigi asekuron (PIV 72)
asekura agento (PIV 72)
asekura juro (IJR 1979:1:25)
asekura kompanio (IJR 1976:2:18), asekurkompanio (Monato 1989:1:12)
asekura kontrakto (PIV 72)
asekura sumo (IJR 1979:1:25), asekursumo (IJR 1979:1:25)
asekurdevo (IJR 1976:1:33)
asekuri aŭtomobiliston kontraŭ korpodifektiĝo (PIV 72)
asekuri domon kontraŭ incendio (PIV 72)
asekurinto (IJR 1979:1:24)
asekurito (IJR 1979:1:25)
asekurkondiĉoj (IJR 1979:1:24)
asekurkontrakto (IJR 1976:2:38)
asekuro por dombestoj (IJR 1979:1:26)
asekurprenanto (IJR 1979:1:25)
brul-asekuro (IJR 1979:1:26)
deviga asekuro (IJR 1976:2:19)
grup-asekuro (IJR 1979:1:25)
grupviva asekuro (IJR 1979:1:25)
la leĝo mencias la faritajn asekurkontraktojn kaj asekureblecojn (IJR 1976:2:38)
leĝo pri asekuro (IJR 1979:1:26)
negeedziĝintaj asekuritoj (IJR 1979:1:25)
popolasekuro (IJR 1979:1:24)
porvivrenta asekuro (IJR 1979:1:25)
post certaj akcidentoj iaj kompanioj sisteme rifuzas reasekuri la asekuriton (PIV 72)
premioj (asekurkotizoj) (L) (IJR 1976:2:22)
preni libervolan kompletigan asekuron pri propraj damaĝoj (IJR 1976:2:18)
sociaasekurado (IJR 1968:3(8):8)
sociala asekurado pri akcidentoj (IJR 1976:2:12)
sociala asekuro (Fina Akto 49)
speciala asekura tribunalo (IJR 1976:2:19)
subskribi asekuron kontraŭ fajro (PIV 72)
subskribi asekuron pri vivo (PIV 72)
trafikasekuro (IJR 1976:2:17)
vivasekuro (IJR 1979:1:24)

**asemble/** (PIV 72)
asembleo (r): interkonsiliĝa aŭ leĝofaranta organizaĵo, kontraste al la ekzekutiva responda instanco (PIV 72)
ĝenerala asembleo (Monato 1986:3:8), Ĝenerala Asembleo (L) (IJR 1976:1:10)
Konsulta Asembleo (Esperanto 1971:5:82)
la Asembleo de Unesko (PIV 72)

**asert/** (PIV 72)
aserti (r) (tr): firme esprimi sian opinion, ke io estas vera (PIV 72)
aserto: opiniesprimo, prezentata kiel vera (PIV 72)
aserti sian senkulpecon (PIV 72)
ĉiuj atestantoj asertas, ke la aŭtisto estis ebria (PIV 72)
ili asertas, ke nur ilia propono estas bona (PIV 72)
liaj asertoj ne konvinkis min (PIV 72)
mi asertas al vi, ke li mensogas (PIV 72)
senbaza aserto (PIV 72)
tio estas tre diskutebla aserto (PIV 196 sub diskut/

**asesor/** (PIV 72)
asesoro (r): kunsidanto de juĝisto, de prezidanto, ks. (PIV 72)
la partopreno de la popolaj asesoroj en la juĝado estas signifa ankaŭ pro tio, ĉar ... (IJR 1968:2(7): 11)

**asign/** (PIV 72)
asigni (r) (tr): 1) difini kaj disponigi sumon da mono por aparta celo, 2) oficiale alvoki antaŭ tribunalon (PIV 72)
asignisto: jura oficisto, kiu transdonas la formulon de asigno al la asignito (PIV 72)
asigno: dokumento, per kiu oni asignas ion aŭ

iun (PIV 72)
bankasigno: skriba komisio kaj rajtigo al banko pagi, por la konto de la komisiinto, al la montrita persono la difinitan sumon skribitan en la dokumento (PIV 72)
en edzprocesoj la asignita partio havas advokaton (IJR 1967:1(2):13)
la asignito ne aperis antaŭ la kortumo (PIV 72)
la registaro asignis milionojn al la batalo kontraŭ tuberkulozo (PIV 72)

## asiz/ (PIV 73)

asizo (r): kunsido de kriminala tribunalo (PIV 73)
asiza advokato (PIV 73)
asiza tribunalo ne estas konstanta, sed laŭ bezone kunvokata (PIV 73)

## ataŝe/ (PIV 76)

ataŝeo (r): 1) diplomato, ĵus enirinta en la karieron kaj donita kiel asistanto al ambasadoro, 2) nediplomato, aldonita al la personaro de ambasadorejo por aparta servofako, 3) ĉe administracio, kabineto aŭ stabo de granda administracio, eksterhierarkia persono, komisiita pri aparta funkcio (PIV 76)
armea ataŝeo (PIV 76)
gazetara ataŝeo (PIV 76)
komerca ataŝeo (PIV 76)
kulturataŝeo (PIV 76)

## atenc/ (PIV 77)

atenci (r) (tr): 1) provi mortigi iun, kiun oni devus respekti, 2) provi detrui aŭ difekti ion, garantiitan de la leĝoj (PIV 77)
atenco: ago de tiu, kiu atencas (PIV 77)
atenci ies vivon (PIV 77)
atenci la liberecon de la civitanoj (PIV 77)
atenci la rajtojn de advokato (PIV 77)
atenci reĝon (PIV 77), atenci kontraŭ la reĝo (Z) (PIV 77)
atenco (evolustadio de kriminala agado) (L) (IJR 1983:2:8)
atencojn kontraŭ la cititaj leĝoj punas tribunalo (IJR 1968:3(8):9)
bombatenco (Monato 1989:1:12)
ĉio, kio krime atencas kontraŭ la homa ekzisto (Monato 1989:4:4)
ĵus okazis atenco kontraŭ la caro (PIV 77)
pudoratenco (IJR 1982:1:27)
seksatenco (IJR 1983:1:37), seksatenco = perforto (PIV 77)

## atest/ (PIV 78)

aserti (r) (tr): 1) (iu) certigi, garantii fakton vera el sia propra sperto, 2) (iu) antaŭ tribunalo konfirmi aŭ malkonformi aserton aŭ fakton, kiel vidinto aŭ aŭdinto, 3) (io) esti la signo, la pruvo de io (PIV 78)
atestaĵoj: tuto de la atestoj en proceso (PIV 78)
atestanto: persono, kiu, vidinte aŭ aŭdinte okazaĵon, povas atesti pri ĝi (PIV 78)
atestigi: alvoki iun kiel atestanton (PIV 78)
atesto: 1) ago, vortoj aŭ skriboj de iu, kiu atestas, 2) signo, pruvo de io, 3) dokumento, per kiu respondeculo atestas pri io (PIV 78)
alvoki la ateston de ĉiu, kiu partoprenis (Z) (PIV 78)
ambaŭ procesantoj devas prezenti siajn atestojn (IJR 1986:1:6)
atesti la subskribon de iu (PIV 78)
atestilo (Heroldo 1989:8:2)
deponatesto (PIV 78)
ekzamenado de atestantoj kaj ekspertoj (IJR 1977:2:15)
elmeti atestojn kontraŭ iu (Z) (PIV 78)
fari ĉe la juĝejo sensacian ateston (PIV 78)
fari falsan ateston (IJR 1978:2:25)
li ne estu mortigita laŭ la akuzo de unu atestanto (PIV 78)
mankis sufiĉa atestaĵo kaj certa pruvo (Monato 1989:6:12)
mi atestas, ke la akuzito ĉeestis la kunvenon (PIV 78)
mi atestigas al vi hodiaŭ la ĉielon, ke vi rapide pereos (PIV 78)
naskiĝatesto (PIV 78)
ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston (PIV 78)
post aŭskultado de la atestantoj (IJR 1976:2:10)
prezenti atestantojn (Monato 1985:5:12)
sanatesto (PIV 78)
se montriĝos, ke la atestanto estas atestanto malvera, ke li akuzis malvere sian fraton, tiam ... (Biblio. Readmono 19:18)
ŝuldatesto (PIV 78)
testamentatestanto (IJR 1975:1:25)
trovi atestojn de la arbarmorta fenomeno (Monato 1989:1:14)
vi estas atestantoj, ke mi aĉetis (Z) (PIV 78)

## aŭkci/ (PIV 82)

aŭkcio (r): procedo de vendo per publika konkuro, ĉe kiu la proponanto de la plej alta prezo akiras la vendataĵon (PIV 82)
aŭkcii (tr): vendi per aŭkcio (PIV 82)
aŭkciisto: komisiito, kiu direktas la aŭkcian konkuron (PIV 82)
aŭkcia oferto (PIV 82)
aŭkcia vendo (IJR 1977:1:33)
la vendo okazas ekzekucie per publika aŭkcio

(IJR 1977:1:39)
aŭskult/ (PIV 82)
aŭzkulto, aŭskultado (r): 2) ago de la juĝisto, kiu aŭskultas atestantojn (PIV 83)
la defendanto havas rajton asisti ĉe ĉiu priaŭskultado de la suspektito-kulpito (IJR 1968:2(7):6)
post aŭskultado de la atestantoj (IJR 1976:2:10)
aŭtentik/ (PIV 83)
aŭtentika (r): nedubeble vera, orginala, ne falsita (PIV 83)
aŭtentikeco: eco de io aŭtentika (PIV 83)
aŭtentikigi: oficiale certigi la aŭtentikeon (PIV 83)
aŭtentika subskribo (PIV 83)
jen la aŭtentika teksto de la kontrakto (PIV 83)
kemia esplorado aŭtentikigis tiun pentraĵon (PIV 83)
la sigelo garantias la aŭtentikon de dokumentoj (IJR 1986:2:4)
mi garantias la aŭtentikecon de lia deklaracio (PIV 83)
aŭtonom/ (PIV 84)
aŭtonoma (r): politike aŭekonomie sendependa, memstara, rilate al la tutaĵo, al kiu ĝi apartenas (PIV 84)
aŭtonomeco: rajto fari siajn proprajn legojn kaj decidojn (PIV 84)
aŭtonoma regiono, teritorio (PIV 84)
politika, ekonomika aŭtonomeco (PIV 84)
aŭtor/ (PIV 84)
aŭtoro (r): verkinto (PIV 84)
aŭtora rajto (IJR 1967:2(3):3)
aŭtoro de artikolo, de desegno, de skulptaĵo, de simfonio (PIV 84)
aŭtorrajta juro aŭ, mallonge, aŭtora juro (L) (IJR 1967:2(3):4, dif. p. 5)
jurisprudenco pri aŭtora proprieto (PIV 458)
leĝo pri aŭtorrajto (L) (IJR 1967:2(3):10)
protekto de aŭtoraj rajtoj (IJR 1967:2(3):3)
rajto de aŭtoreco (Z) (ekskluziva rajto, garantiita de la leĝo al unu aŭtoro por difinita tempo, presi, publikigi kaj vendi reproduktojn de originala verko (PIV 84)
aŭtoritat/ (PIV 84)
aŭtoritato (r): 2) povo, rajtigita postuli obeadon, 3) (plej ofte plurale) tiuj, kiuj disponas aŭtoritaton (PIV 84)
dogana aŭtoritato (Monato 1989:1:8)
juĝa aŭtoritato (Monato 1989:1:8)
la Deklaracio povos esti rigardata kiel aŭtoritata interpreto de la Ĉarto (L) (IJR 1968:3(8):3)
la justicaj aŭtoritatoj (PIV 84)
la teksto estas egale aŭtoritata en ĉiu lingvo, krom se ... (IJR 1969:2(10):27)
misuzo de aŭtoritato aŭ de oficiala pozicio (L) (IJR 1983:2:9)
polica aŭtoritato (Monato 1989:1:8)
ŝtataŭtoritatoj (IJR 1978:2:32)
aval/ (PIV 85)
avalo (r): garantio pri kambio donita de tria persono, kiu devontigas sin pagi la sumon, se ĝi ne estas pagita de la subskribinto (PIV 85)
avali (tr): surmeti sian avalon sur kambion (PIV 85)
avali traton (PIV 85)
averi/ (PIV 85)
averio (r): 1) difekto, okazinta al ŝipo aŭ al ĝia kargo, 2) difekto, okazinta al ĉiuspecaj varoj (PIV 85)
averii (ntr): suferi averiojn (PIV 85)
aserkuro kontraŭ averioj de fervoje transportataj nutrovaroj (PIV 85)
la ŝipo grave averiis dum la ŝtormo (PIV 85)
aviz/ (PIV 86)
post antaŭavizo de du jaroj (Kontrakto 6)
azil/ (PIV 87)
azilo (r): 1) loko, kie persekutata homo estis, laŭ kutimo aŭ leĝo, sekura kontraŭ siaj persekutantoj (PIV 87)
azilpetanto (Monato 1989:2:16)
ĝui la rajton de azilo (Konst. Bul. 19)
libervola reirado, integrado en azil-lando aŭ ekloĝado en tria lando (Monato 1989:5:7)

# B

Babilon/ (PIV 88)
Babilono: ĉefurbo de Babilonio, fama pro siaj muregoj, sia zigurato kaj la pendĝardenoj (PIV 88)
la ampleksa leĝaro de la babilona reĝo Hamurabi (ĉ. 1700 a.K.) (Monato 1988:2:15)
la Babilona Imperio (IJR 1986:2:3)
Babiloni/ (PIV 88)
Babilonio: antikva regno semida, proksimume responda al la nuna Irako (PIV 88)
bagn/ (PIV 89)
bagno: punlaborejo (PIV 89)
balot/ (PIV 91)
baloti (r) (ntr): voĉdoni per balotilo, kontraste kun la ceteraj manieroj de voĉdonado (PIV 91)
balotado: ago de tiuj, kiuj balotas (PIV 91)
baloto: ago de tiu, kiu balotas (PIV 91)
balotrajta: havanta laŭstatute, laŭkonstitucie la

rajton baloti (PIV 91)
rebaloto: dua baloto, aranĝita, kiam la unua ne donis validan rezulton (PIV 91)
balotujo = urno (PIV 91)
balota sistemo (IJR 1983:1:43), balotsistemo (Konstitucio 1937, p. 22)
balotdistrikto (Konstitucio 1937, p. 8)
balotu kontraŭ leĝpropono (PIV 91)
balot-instanco (Monato 1985:12:19)
balotoj al parlamento (Monato 1985:12:18), balotoj por parlamento (Bulgario 34)
ĉiu civitano havas unu balotvoĉon (Konstitucio 1937, p. 22)
decido estis atingita nur ĉe la tria balotado (PIV 91)
enurnigi balotilojn (Monato 1985:5:18)
ĝenerala, egala kaj rekta balotrajto per sekreta voĉdonado (Konstitucio 1937, p. 22)
kondamnita de la juĝo kun senigo de balotrajto (Konstitucio 1937, p. 22)
kontrolantaoj de balotado (PIV 91)
krombaloto (Monato 1989:5:13)
la 46 membrojn de la centra estraro de la nova asocio elektis en sekreta balotado 170 delegitoj (Esperanto 1981:7/8:130)
la prezidanto estis elektita en la unua balotado (Monato 1985:8:13)
li anoncis krombaloton por la 12a de decembro por 18 seĝoj tenitaj de la UMP (Monato 1989:5:12)
li rajtas publikigi nur entutan rezulton kaj estas malpermesite publikigi rezulton laŭ unuopaj balotejoj (Monato 1989:6:8)
okazigi balotojn por nova estraro (Konst. Bul. 16)
publika balotado (PIV 91)
rekta balotrajto kun sekreta balotado (Bulgario 38)

## bankrot/ (PIV 94)

bankroti (r) (ntr): 1) ĉesigi la pagon de siaj ŝuldoj pro nepagipovo leĝe konstatita (PIV 94)
bankrotaranĝo: kompromiso inter la bankrotinto kaj ties kreditoroj (PIV 94)
bankroto: 1) stato de bankrotinto, 2) leĝa agnosko kaj reguligo de la nepagipovo de ŝuldanto, kies aktivojn oni metas sub tribunalan kontrolon, por posta likvido favore al la kreditoroj (PIV 94)
bankrotulo: iu bankrotinta (PIV 94)
bankrotinto (PIV 94), bankrotulo (Z) (PIV 94)
deklari bankroton (PIV 94)

## barateri/ (PIV 95)

baraterio (r): fraŭdo aŭ grava senzorgo de ŝipestro aŭ ŝipanaro malutile al la proprietulo de la ŝipo, al la kargoposedanto aŭ al la asekurinto (PIV 95)

## barier/ (PIV 96)

bariero (r): 3) ligna balustrado aŭ duonvando, kiu en tribunalo apartigas la juĝistojn (en kelkaj landoj ankaŭ la advokatojn) disde la publiko (PIV 96)

## bastard/ (PIV 97)

bastardo (r): 1) infano naskita ekster laŭleĝa edziĝo (PIV 97)
Luizo de XIVa leĝigis siajn bastardojn (PIV 216)

## baz/ (PIV 100)

bazo (r): 2) tio, sur kio estas konstruita io spirita; la esenca principo, ĉefa deirpunkto (PIV 100)
ankaŭ la aliaj riproĉoj estas senbazaj (Aktualaj 72)
havi solidan juran bazon por siaj postuloj (IJR 1981:1:32)
la baza leĝo pri germana ŝtataneco datiĝas de la jaro 1913 (IJR 1967:4/5(5):7)
la bazo de teorio (PIV 100)
la postulo estas bone bazita laŭ faktoj kaj juro (UN 32)
la reguloj pri respondeco pro la damaĝo estas bazitaj sur kutimojuro (IJR 1976:2:24)
li faris sian promeson surbaze de certaj antaŭsupozoj (IJR 1967:1(2):20)
mensa malsano estas la alia bazo por ekskludo de respondeco (L) (IJR 1982:1:17)
pruvi la kaŭzon, sur kiun li bazas sian postulon al kompenspago (IJR 1976:2:25)
senbaza aserto (PIV 72)
servi kiel diskutbazo de nova konferenco (Aktualaj 106)
surbaze de specialaj cirkonstancoj la juĝisto rajtas malpliigi la respondecon de la kaŭzinto (IJR 1976:2:28)

## bigami/ (PIV 109)

bigamio (r): kontraŭleĝa stato de viro havanta samtempe du edzinojn, aŭ de virino havanta samtempe du edzojn (PIV 109)
bigamiulo: tiu, kiu vivas bigamie (PIV 109)

## bil/ (PIV 109)

bilo (r): 1) kambio, per kiu la subskribinto devigas sin pagi ĉe fiksita tago sumon al persono en ĝi nomita, aŭ, laŭ ties ordono, al alia persono, 2) leĝprojekto en la brita parlamento (PIV 109) trato, valorpapero, ĉeko
bilmakleristo: tiu, kiu makleras bilojn ĉe borso (PIV 661)

## bojkot/ (PIV 116)

bojkoti (r) (tr): puni aŭ eldevigi iun (personon,

klason, nacion) per sistema kolektiva rifuzo de sociaj aŭ komercaj rilatoj kun tiu (PIV 116)
anonci bojkoton (Monato 1985:5:18)
bojkoti firmon (PIV 116)

**bors/** (PIV 120)
borso (r): 1) ejo, destinita por regule okazantaj kunvenoj de komercistoj, makleristoj, kasistoj ktp., kiuj tie vendas aŭ aĉetas neĉeestantajn objektojn, precipe valorpaperojn aŭ krudmaterialojn, je kurzo rezultanta el la proporcio de la mendoj rilate al la ofertoj, 2) tiuj vendoj aŭ aĉetoj mem (PIV 120)
borsisto: tiu, kiu profesie operacias ĉe borso (PIV 120)
akcioj kvotitaj ĉe la borso (PIV 120)
borsa kurzo (PIV 120)
borso pri lano (PIV 120)

**brevet/** (PIV 124)
breveto (r): dokumento, subskribita de suvereno, aŭ de ministro, donanta personan privilegion, ekz. nobelan titolon, oficiran gradon (sen salajro) ks. (PIV 124)
brevetita duko (PIV 124)

**brit/** (PIV 125)
British Commonwealth of Nations (angle): Brita Nacikomunumo (IJR 1978:2:36), Brita Naciaro (IJR 1968:1(6):8), la brita komunumo (IJR 1967:2(3):19)

**brokant/** (PIV 126)
brokanti (r) (ntr): profesie aĉeti kaj vendi jam uzitajn, ordinare malmulte valorajn objektojn (PIV 126)
brokantisto: tiu, kiu faras komercon (vidu: brokanti) (PIV 126)
brokanto, brokantado: tia komerco, pli-malpli leĝe permesata (PIV 126)
brokanti per mebloj (PIV 126)

**brul/** (PIV 127)
brulstampo (Monato 1985:9:18)

# C

**ced/** (PIV 135)
cedi II (r) (tr): 2) laŭjure transdoni rajton al alia persono (PIV 135)
cedaĵo: rajto, posedaĵo ktp cedita (PIV 135)
forcedi: 2) (tr) plene transdoni (PIV 135)
li sub trudo forcedis sian tutan heredaĵon (PIV 135)
necedebla: tia, ke oni ne povas cedi ĝin al iu alia (PIV 135)
necedebla bieno (PIV 135)

**cirkonstanc/** (PIV 147)
cirkonstancoj ekskludantaj krimojn (IJR 1981:2:25)
cirkonstancoj, kiuj ekskludas la puneblecon de ago (IJR 1981:2:25)
ĉe tiaj cirkonstancoj mi estus iĝinta kunkulpulo (Scienca Mondo 1983:1:25)
dola homicido sub gravigaj cirkonstancoj (L) (IJR 1983:2:11)
en normalaj cirkonstancoj (IJR 1977:1:32)
malpligravigaj cirkonstancoj (de la krimo) (PIV 147)
pligravigaj cirkonstancoj (de la krimo) (PIV 147)
pravigaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
se estas speciale gravaj cirkonstancoj, ... (IJR 1981:2:19)
se la transpaso estas perpetrita sub speciale mildigaj cirkonstancoj, li povas esti eĉ liberigita de puno (L) (1982:1:12)
senkulpigaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
specialaj laŭ-aferaj aŭ laŭ-personaj pun-ekskludaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
surbaze de specialaj cirkonstancoj la juĝisto rajtas malpliigi la respondecon de la kaŭzinto (IJR 1976:2:28)

**civil/** (PIV 149)
civila (r): propra al la simpla civitano, ekster ĉiuj aliaj eblaj karakterizoj sociaj, sekve 1) ne militista, 2) ne eklezia, 3) ne ŝtata, 4) ne kriminala (PIV 149)
civila edziĝo (PIV 149)
civila juro (L) (IJR 1983:2:5), civiljuro (IJR 1976:2:9)
civila kortumo (IJR 1978:2:32)
civila malobeado (pro politika agitado) (PIV 149)
civiljura (IJR 1982:1:30)
civilprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
civilprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), civilprocesa kodo (IJR 1977:2:21)
havi civilan agokapablon (L) (IJR 1984:2:10)
senigo je civilaj rajtoj (IJR 1984:2:35)

**civilizaci/** (PIV 149)
civilzacio (r): 1) kolektiva orda organizo, bazita sur moroj aŭ leĝoj, celanta pli-malpli konscie moralajn idealojn kaj prezentanta unu etapon sur la vojo de evoluado de la socioj, 2) la plej alta, ĝis nun atingita etapo en tiu soci-evoluo, kiam la homaj kapabloj povas noble kaj liberale disvolviĝi (PIV 149)
barbara restaĵo el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo (PIV 149)
la sumera civilizacio (PIV 149)

**civit/** (PIV 149)

civito (r): 1) aŭtonoma urbo, rigardata kiel politika organismo, 2) tuto de la urbanoj, posedantaj la politikajn rajtojn, 3) tuto de la ŝtatanoj, posedantaj la politikajn rajtojn (PIV 149)
civitano: homo, ĝuanta la politikajn rajtojn aŭ en urbo sendependa, aŭ en ŝtato (PIV 149)
civitana, familia statuso (PIV 1030)
ĉiu civitano en ĉiu regno havu plenan rajton paroli tiun lingvon, kiun li volas (Z) (PIV 149)
esti fremdlanda civitano (IJR 1967:4/5(5):9)
intercivitana milito (PIV 149)
korporacio senigita je ĉiuj civitanaj rajtoj (PIV 149)

# Ĉ

**ĉambr/** (PIV 150)
ĉambro (r): 2) (ordinare majuskle) ejo, en kiu regule kunvenas por interkonsiliĝi diversaj institucioj; kaj, pli vastasence, tiuj institucioj mem (PIV 150)
juĝoĉambro: tiu ĉambro, en kiu sidas aparta sekcio de tribunalo (PIV 150)
punĉambro = arestejo (PIV 150)
ĉambro de la deputitoj (PIV 178)
Ĉambro de lordoj (PIV 150), Lordoĉambro (IJR 1978:2:34)
Ĉambro de reprezentantoj (Monato 1987:9:21)
malsupera ĉambro de parlamento (PIV 150)
unuĉambra, duĉambra parlamenta sistemo (PIV 150), unuĉambra kaj plurĉambra sistemoj (IJR 1969:2(10):18)
**ĉantaĝ/** (PIV 151)
ĉantaĝi (r) (tr): devigi iun per skandalminaco pagi monon aŭ doni avantaĝon (PIV 151)
ĉantaĝgazeto (PIV 151)
ĉantaĝisto (PIV 151)
lia iama amdonantino ĉantaĝis la ministron (PIV 151)
neniam cedu al ĉantaĝo (PIV 151)
**ĉart/** (PIV 153)
ĉarto (r): 2) akto de suvereno, sur kiu baziĝas la konstitucio de lando, 3) kontrakto inter la luanto kaj la luiganto de ŝipo aŭ aviadilo, por transporto de varoj aŭ pasaĝeroj (PIV 153)
ĉilia ŝipo ĉartita de la hispana armeo (Monato 1989:12:21)
ĉarti (tr): lupreni ŝipon aŭ aviadilon per ĉarto (PIV 153)
ĉartigi: ludoni ŝipon aŭ aviadilon per ĉarto (PIV 153)
ĉilia ŝipo ĉartita de la hispana armeo (Monato 1989:12:21)
la Atlantika Ĉarto de la 14-a de Aŭgusto 1941 (Aktualaj 80)
la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (L) (IJR 1976:1:1)
la Granda Ĉarto de Anglujo (1215) (PIV 153)
portempa ĉarto (PIV 153)
povojaĝa ĉarto (PIV 153)
**ĉek/** (PIV 155)
ĉeko (r): pagordono, per kiu la subskribanto ordonas al sia banko, ĉe kiu li havas bonhavan konton, ke ĝi pagu ĉe vido la tie skribitan sumon al la nomita profitanto aŭ al ties ordono (PIV 155)
nekovrita, senvalora ĉeko: ĉeko, por kies pago ne estas bonhavo (PIV 155)
postĉeko: ĉeko, per kiu la subskribanto ordonas al la poŝtoficejo, ĉe kiu li havas bonhavan konton, ke ĝi pagu la skribitan sumon per poŝtmandato al la nomita profitanto (PIV 155)
trastrekita ĉeko: ĉeko, kiu, surhavanta du oblikvajn strekojn, estas pagebla ne per mono en la manojn de la profitanto, sed nur en la konton de la profitanto ĉe ties propra banko (PIV 155)
havi sur si sian ĉekaron (PIV 155)
pagi per ĉeko (PIV 155)
vian ĉekon mi ne enspezis (PIV 1020 sub spez/)
**ĉikan/** (PIV 159)
ĉikani (r) (tr): 1) intence fari al iu maljustajn ĝenojn, malagrablaĵojn, malhelpojn, por sentigi al li sian superecon, 2) subtilaĉi, pedante diskutaĉi, por venkigi sian malpravan vidpunkton (PIV 159)
la advokato ĉikanis la tamen evidentan akuzon (PIV 159)
la malnovaj anoj de milita lernejo kutimas ĉikani la nove alvenintajn (PIV 159)

# D

**daktiloskopi/** (PIV 164)
daktiloskopio (r): procedo, per kiu oni identigas personojn per la observado de la haŭtlinioj sur la polma flanko de la fingroprintoj (PIV 164)
fotografado kaj prenado de daktiloskopio (IJR 1968:2(7):6)
**damaĝ/** (PIV 164). Vidu ankaŭ: kompens/, lez/
damaĝi (r) (tr): malutili al iu, kaŭzante materian aŭ moralan perdon (PIV 164)
damaĝo: malprofito kaŭzita al iu per ies agado

(PIV 164)
Ĉu per tio estis kaŭzita damaĝo al persona proprieto de civitanoj? (L) (IJR 1983:2:9)
damaĝaj sekvoj (L) (IJR 1982:1:7)
damaĝi ies reputacion (PIV 164)
damaĝinto kaj damaĝito (IJR 1976:1:32)
damaĝita partio (L) (IJR 1981:2:6)
damaĝkaŭzinta aĵo (IJR 1976:2:36)
damaĝkaŭzinto (IJR 1976:1:35)
damaĝkompensa juro (IJR 1976:2:17)
damaĝkompensoj pro laborakcidentoj (IJR 1976:1:39)
damaĝsuferinto (IJR 1976:1:38)
dola grava korpa damaĝo (L) (IJR 1983:2:11)
havi regresrajton kontraŭ la damaĝinto (IJR 1976:2:38)
havi tre damaĝan efikon sur nian medion (Monato 1989:1:24)
kaŭzi materialan damaĝiĝon al aliaj (IJR 1982:2:10)
kompensi la faritajn damaĝojn (PIV 164)
kompenso pro eksterkontraktaj damaĝoj (IJR 1976:2:34)
kompenso pro neekonomia damaĝo (IJR 1976:2:39)
kontribuado (kunkaŭzado) fare de la damaĝito (IJR 1976:1:36)
korpodamaĝo kun gravaj sekvoj (L) (IJR 1982:1:16)
kvalifiki la krimon kiel dolan gravan korpan damaĝon kaŭzintan morton (L) (IJR 1984:2:11)
la alteco de la kaŭzitaj damaĝoj (L) (IJR 1983:2:13)
la damaĝinto devas kompensi materian kaj nematerian damaĝon (IJR 1976:2:31)
la damaĝita partio ne estas la ŝtato, sed la individuo (L) (IJR 1981:2:6)
la damaĝo devas esti plene kompensita (L) (IJR 1984:2:11)
la damaĝo estas farita pro ekstrema neglekto (IJR 1976:2:30)
la fifarinto tute kompensu la materian kaj nematerian damaĝojn (Monato 1989:11:20)
la imposta fraŭdo multe damaĝas la ŝtaton (PIV 164)
la korpaj domaĝoj (damaĝoj) kaŭzantaj kripliĝon aŭ senfruktecon (Aktualaj 85)
la persono suferinta damaĝon povas prezenti juĝpretendon pri kompenso (IJR 1976:1:38)
la respondeculo pro damaĝo (IJR 1976:2:28)
la striko damaĝis la najbarajn industriojn (PIV 164)
lia imputebla konduto kunefikas al la estigo de la damaĝo (IJR 1976:2:26)
okaze de laborakcidento la kompensendaj damaĝoj estas ... (IJR 1976:2:29)
redukti la kompenson, se la damaĝito agis nur iomete neglekte (IJR 1976:2:39)
respondeco pro nepermesata damaĝigo (IJR 1976:1:3
se ankaŭ la laborulo kulpis, estas eble dividi la damaĝon (IJR 1976:2:28)
se la damaĝito kulpe kontribuis al la damaĝo (IJR 1976:2:39)
sensignifeco aŭ foresto de damaĝaj sekvoj (L) (IJR 1982:1:7)

**danĝer/** (PIV 165)
danĝera entrepreno (Scienca Mondo 1985:3:30)
"fontoj de pli granda danĝero" (L) (IJR 1976:2:21)

**dat/** (PIV 166)
dato de subskribo (IJR 1981:1:27)
la baza leĝo pri germana ŝtataneco datiĝas de la jaro 1913 (IJR 1967:4/5(5):7)
la komenciĝoj de jura kibernetiko en Soveta Unio datumas de marto 1965 (L) (IJR 1983:2:3)
la leĝo datiĝas de Aprilo 1963 (IJR 1968:1(6):11)
la Leĝo pri la Personoj kaj la Familio kaj la Leĝo pri la Heredeco - ambaŭ datiĝantaj de ja jaro 1949 (IJR 1966:1:11)

**debat/** (PIV 168)
antaŭ la komenciĝo de la debatoj (UN 31)
dum la debatoj (UN 32)
la debatojn direktas la Prezidanto (UN 31)
la Prezidanto deklaras la debatojn finitaj (UN 32)
levi debaton (Eŭropa Dokumentaro 1983:3:45)

**debitor/** (PIV 168)
debitoro (r): ŝuldanto, debetulo (PIV 168)

**dec/** (PIV 169)
kruda maldeco (IJR 1982:1:25)

**decemvir/** (PIV 169)
decemviro (r): ano de dekpersona estraro, kun konsilaj aŭ regaj povoj, unue en Romo, poste en la Venecia Respubliko (PIV 169)

**decid/** (PIV 169)
alpreni decidon (Esperanto 1982:3:43)
decidiĝintaj plene utiligi la rezultojn de la konferenco (Fina Akto 3)
deklari, ke ili estas deciditaj respekti ĉi tiujn decidojn (Fina Akto 15)
en ambaŭ kazoj la partioj rajtas apelacii al la Tribunalo, kies decido estas definita (IJR 1969: 2(10):23)
deklari sian decidemon respekti la principojn (Fina Akto 14), deklari sian decidiĝon respekti sekvantajn principojn (Fina Akto 7)
fari decidon (Esperanto 1972:11:202)
instanco, kies decido estas fina (L) (IJR 1984:2:9)
juĝista decido (verdikto) (PIV 169)
kortumaj decidoj (Aktualaj 91)
la ĉefa decidorgano de la Asocio (Esperanto 1982: 3:43)

la decidpovo de la konsiliaj sesioj (IJR 1968:3(8):7)
la decidrajtaj korporacioj (IJR 1968:3(8):6)
la estraro estas decidkapabla, se pli ol la duono ĉeestas (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:3)
la Komitato rifuzis la proponon, ke la decidoj estu unuanimaj (Heroldo 1983:12:3)
la parlamento de Eŭropa Komuno (EK) ne havas veran decidopovon (Monato 1986:8/9:6)
parlamenta leĝo-decido (IJR 1979:1:31)
post ioma hezito la juĝkomisiono alprenis sian decidon (Heroldo 1988:13:1)
se la kondiĉoj ne estas plenumitaj, la peto estas malakceptata per motivita decido (IJR 1969:2(10):12)
tribunala decido (IJR 1984:2:32)
verdiktoj kaj decidoj (IJR 1984:2:32, dif.)

## defend/ (PIV 170)

defendi (r) (tr): 3) helpi iun antaŭ tribunalo (PIV 170)
eksceso de necesa defendo estas krimo (L) (IJR 1982:1:11, 1982:1:21, dif.)
justa sindefendo (IJR 1982:2:12)
la juĝoto havas rajton pri jurdefendo (Konst. Bul. 19)
la limoj de la necesa defendo ne estu evidente transpasitaj (L) (1982:1:11)
laŭrajta defendo de si mem aŭ de aliaj (IJR 1976:2:33)
necesa defendo (L) (IJR 1982:1:11)
preterlasi defendi sian starpunkton (UN 32)
pro laŭrajta defendo de si mem aŭ de aliaj (IJR 1976:2:33)
rajto je memdefendo (IJR 1984:1:10)

## definitiv/ (PIV 171). Vidu ankaŭ: fin/

definitiva (r): tia, ke oni ne plu povas ion ŝanĝi en ĝi (PIV 171)
definitivan respondon mi sendos post 10 tagoj (PIV 171)
definitiva decido (PIV 171)
definitivigo de la programo (Esperanto 1975:5:84)
en ambaŭ kazoj la partioj rajtas apelacii al la Tribunalo, kies decido estas definitiva (IJR 1969:2:(10):23)

## deklar/ (PIV 172)

deklari (r) (tr): 1) oficiale, publike, formale sciigi, 2) solene aserti, ke iu estas tia aŭ tia, 3) parole aŭ skribe sciigi, kun la konscio, ke tiu sciigo kreas, aliigas aŭ nuligas rajtojn, devojn aŭ jurajn rilatojn, 4) ... 5) sciigi al la koncerna administracio, ke oni havas impostodevajn objektojn (PIV 172)
deklari al iu militon (PIV 172)
deklari amnestion (PIV 172)
deklari cigarojn ĉe la dogano (PIV 172)
deklari sian nomon antaŭ policisto (PIV 172)
deklaro pri la homaj rajtoj (PIV 172)
deklaro pri heredigo (PIV 172)
deklaro pri hipoteko (PIV 172)
fari deklaron ĉe la dogano (PIV 172)

## deklaraci/ (PIV 172)

deklaracio (r): deklaro (PIV 172)
deklaracio de la ĵurio (PIV 172)
Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj (subskribita la 1-an de januaro 1942) (L) (IJR 1976:1:16)
Deklaracio pri Elimino de Rasa Diskriminacio (L) (IJR 1976:1:11)
Deklaracio pri la Donado de Sendependeco al Koloniaj Landoj kaj Popoloj (IJR 1977:1:45)
Deklaracio pri Sendependigo de Koloniaj landoj kaj Popoloj (L) (IJR 1976:1:11)
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (IJR 1983:1:32)

## deklarativ/ (Ne en PIV)

deklarativa (IJR 1984:2:31, dif.)
konstitutivaj kaj deklarativaj normoj (IJR 1984:2:31, dif.)

## dekret/ (PIV 173)

dekreto (r): 1) akto, eldonita de konstitucie aŭ leĝe rajtigita plenuma organo, kaj enhavanta ĝeneralajn normojn, 2) en kelkaj landoj, iu ajn skriba decido de la ŝtatestro, 3) oficiala ordono de iu ajn organo de plenuma aŭtoritato (PIV 173)
dekreti (tr): ordoni per dekreto (PIV 173)
doni dekreton (IJR 1984:2:31), eldoni dekreton (Monato 1986:8/9:8), elirigi dekreton (PIV 173)
kontrolo pri dekretoj rilate al alia konformeco al la leĝoj (IJR 1981:2:14)
la reĝo Dario subskribis la dekreton (PIV 173)
per dekreto povas esti detaligitaj la preskriboj de leĝo (PIV 173)
post nuligo de tia dekreto aŭ leĝo la Kortumo kasacias ankaŭ la koncernan reskripton (IJR 1981:2:20)
Reĝa Dekreto (IJR 1981:1:33)

## deleg/ (PIV 173)

delegi (r) (tr): sendi iun, kiel reprezentanton (PIV 173)
delegitaro: 1) tuto de la delegitoj, 2) nomo de la Idista Delegacio (PIV 173)
delegito: persono, kiun iu delegis (PIV 173)
komisiaj (delegaj) normoj (IJR 1984:2:25)
nia societo delegis tri membrojn al la kongreso (PIV 173)
rajtigitaj delegitoj (Z) (PIV 173)

**delegaci/** (PIV 173)
delegacio(r) = delegitaro 1) aŭ 2) (PIV 173)
gvidanto de fiksaj delegacioj al internaciaj organizaĵoj (IJR 1981:1:36)
traktada delegacio (IJR 1981:1:34)

**delikt/** (PIV 174)
delikto (r): kontraŭleĝa puninda ago, malpli grava ol krimo (ekz. ŝteleto, fraŭdo, insultoj ks) (PIV 174)
deliktulo (IJR 1982:2:11)
la knabaj deliktoj (PIV 174)

**delkreder/** (PIV 174)
delkredero (r): garantio, kiun agento aŭ makleristo donas al sia komisianto pri la solventeco de la persono, al kiu li vendas varojn aŭ bienojn (PIV 174)

**demand/** (PIV 175)
pridemandi (tr): per demandoj, peni malkovri, kion iu scias pri io (PIV 175)
detrui la reziston de la pridemandato (IJR 1986:1:11)
la gravaj fazoj de jura proceduro pri demandato, juĝado kaj ekzekucio (IJR 1986:1:4)
meti la demandon pri konfido (= demandi, ĉu la Parlamento ankoraŭ plu apogas la politikon de la registaro) (PIV 175)
pridemandi kulpigiton (PIV 175)

**demarkaci/** (PIV 175)
demarkacio (r): oficiala fiksado de politika landlimo aŭ regionlimo (PIV 175)

**demarŝ/** (PIV 175)
demarŝo (r): diplomata paŝo, ago (noto, buŝa deklaro ks), por atingi iun difinitan celon (PIV 175)
la fiance malforta registaro faris demarŝojn por atingi novan eksterlandan prunton (PIV 175)

**demisi/** (PIV 175)
demisii (r) (ntr): abdiki (pp elektitaj regantoj, aŭ nomitaj oficistoj (PIV 175)
la kabineto demisiis (PIV 175)
la ministro pri justico estis devigita demisii (Monato 1989:5:20)
la reĝo demisiigis la parlamenton (Monato 1985:9:8)
mi demisiis kiel membro (La Espero el Koreio 1989:5:9)
post unu jaro de vana enketado la enketestro estis demisiigita pro diversaj fuŝoj (Monato 1989:5:19)
rifuzi la demision de policestro (PIV 175)
tri ministroj sentis sin devigitaj demisii (Monato 1989:2:15)

**demokrat/** (PIV 175). Vidu ankaŭ: demokrati/
demokrata elekto (IJR 1969:1(9):15)
demokrata jura sistemo (L) (IJR 1981:2:9)
demokrata partio (PIV 175)
demokrata ŝtato (L) (IJR 1979:1:1)
demokrataj decidoj (IJR 1978:1:39)
detruo de la fundamentoj de la libereca demokrata ordo (IJR 1968:3(8):11)
estas spaco por diskutadoj kaj demokrataj decidoj (IJR 1978:1:39)
kies organoj estas demokrate elektitaj (IJR 1978:1:39)
laŭ demokrataj principoj (Esperanto 1986:5:92)
neniu demokrata jura sistemo povas ... (L) (IJR 1981:2:9)
surbaze de demokrataj principoj (IJR 1968:3(8):6)
tiu ĉi nova demokrata sistemo (L) (IJR 1980:2:3)

**demokrati/** (PIV 176). Vidu ankaŭ: demokrat/
demokratio (r): 1) reĝimo, en kiu la politika povo apartenas, jen pere, jen senpere al la popolo kaj en kiu estas plej fortaj la sendistinge egaligaj tendencoj, 2) demokrataro (PIV 176)
demokratiaj organizaĵoj (Scienca Mondo 1988:1:6)
la ŝtataj organoj estu firme ligitaj al la demokratie deciditaj leĝoj (IJR 1978:1:39)
MFSL estas demokratia organizaĵo (Scienca Mondo 1983:3:30)
Unuiĝo de la demokratiaj gesciencistoj en FRG (Scienca Mondo 1988:3:7)

**denunc/** (PIV 178)
denunci (r) (tr): pro ia persona intereso, sciigi al estro, policano, juĝisto ktp. ies kulpon aŭ krimon (PIV 178)
denunci iun al la polico (PIV 844)
denunci iun pri ŝtelo (PIV 178)
denunci diajn komplicojn (PIV 536)
denunci ŝtelon al la oficestro (PIV 178)
la kulpulo estas denuncinda por esti ekzekutita je la postulo de la publiko (IJR 1986:1:3)
la kulpulo ne volis denunci sin (Monato 1985:6:7)
li denuncis sian kamaradon al la instruisto (PIV 178)

**depon/** (PIV 178)
deponi (r) (tr): 1) lasi ĉe iu valoraĵojn gardotan, 2) konfidi (monon) al financa organizo, ordinare kontraŭ interezo kaj sub la kondiĉo, ke oni ne reprenos ĝin sen antaŭavizo (PIV 178)
deponatesto: papero, dokumento donata al deponanto, por ebligi al li poste depreni la deponaĵon (PIV 178)
deponprenanto: tiu, kiu ricevas kaj gardas la deponaĵojn (PIV 178)
deponaĵo, deponitaĵo: tio, kion oni deponis (PIV 178)
deponanto: tiu, kiu deponas (PIV 178)

ĉiu traktado devas esti deponita en la Sekretariejo de la Ligo (PIV 178)
deponanta ŝtato (IJR 1981:2:33)
ili deponos por mi la sumon de 250 mil frankoj (Z) (PIV 178)
la deponaĵoj ĉe la Ŝtata Ŝparkaso superis la deprenaĵojn dum la pasinta jaro (PIV 178)
li redonu la deponitaĵon, kiu estis deponita ĉe li (PIV 178)

**deport/** (PIV 178)
deporti (r) (tr): pune transporti eksterlanden, por tie enfermi en koncentrejon aŭ submeti al trudlaboro

**depozici/** (PIV 178)
depozicio (r): deklaraĵo, farita de persono, vokita doni ateston antaŭ juĝa aŭ polica instanco (PIV 178)
depozicii (tr): fari depozicion (PIV 178)
oni venigis lin al la polica stacio, kie oni protokolis lian depozicion en la germana lingvo (IJR 1985:2:35, kp. PIV 178)

**deput/** (PIV 178)
deputi (r) (tr): elekti kaj sendi kiel reprezentanton en parlamenton (PIV 178)
ĉambro de la deputitoj (PIV 178)
ĉiu moderna demokratio havas deputitaron (PIV 178)
la deputito ne povas esti tirata al la juĝa respondeco aŭ esti arestita sen konsento de ... (Konstitucio 1937, p. 10)
la deputitoj ne respondecas pune pri la esprimitaj de ili opinioj (Konst. Bul. 8)
la parlamento devis decidi pri nuligo de lia deputitonetuŝebleco (Monato 1989:4:12)
la profesia imuneco de deputitoj (IJR 1981:2:25)
la urba deputitaro (Esperanto 1972:5:94)
leĝo pri la elekto de la deputitoj (IJR 1984:2:29)
parlamentaj deputitoj (IJR 1976:1:14)

**derog/** (Ne en PIV)
derogado estas la forigo (neniigo) aŭ ŝanĝo de normo pere de alia normo (IJR 1984:2:29)
hierarkio laŭ la deroga povo (IJR 1984:2:29)

**descend/** (PIV 179)
descendi (r) (ntr) (n): malsupreniri, malsupreniflugi (PIV 179)
descendaj parencoj (IJR 1969:1(9):18)

**detektiv/** (PIV 180)
detektivo (r): ano de sekreta polico, eĉ privata; kaŝpolicano (PIV 180)

**dev/** (PIV 181)
devi (r) (tr): 1) ne povi ne fari ion pro la materia neceseco, praktika bezono, morala leĝo aŭ fremda sintrudanta volo (PIV 181)
cedodevo: jura preskribo, ke veturilo, alvenanta en vojkruciĝon, devas lasi pasi antaŭ si veturilojn, kiuj venas de alia difinita direkto aŭ de alia vojspeco (PIV 182)
eldevigi: akiri de iu per trudo (PIV 182)
nedeviga: ne prezentanta devon; lasanta eblon de rifuzo (PIV 182)
servodevo: servo, kiu estas leĝe aŭ laŭkutime trudata al unu bieno profite al alia bieno, apartenanta al alia proprietulo (PIV 182)
anticipe devigi sin plenumi la eldirotan verdikton (Aktualaj 56)
deviga asekuro (IJR 1976:2:19)
deviga militservo (Monato 1987:12:9), deviga soldatservo (IJR 1984:1:17), devo de militistara servo (IJR 1968:1(6):5)
deviga parto (IJR 1975:1:28)
deviga servado en la defendofortoj (L) (IJR 1983:2:7)
deviga soldatservo (L) (IJR 1984:1:17)
devigaj juraj normoj (L) (IJR 1983:2:4)
devo de lerneja vizito (IJR 1977:1:14)
devontiga ago (PIV 1981:1:26)
doni al la Fina Akto la forton de jure deviga interkonsento (L) (IJR 1977:1:21)
du monatoj post la ekdevigeco de la kontrakto (Kontrakto 6)
ekektiva sistemo de devontigaj normoj (IJR 1984:2:24)
eldevigi de iu konsento (PIV 182)
esti devigata de tempo al tempo raporti al ... (IJR 1969:2(10):14)
estiĝas rajtoj kaj devigitecoj (IJR 1969:1(9):18)
ĝenerala militserva devo (Konstitucio 1937, p. 22)
jura devo (IJR 1983:1:38)
kion la kompensodevo inkluzivas? (Monato 1988:12:12)
koncerne la devigitecon de la eksaj geedzoj zorgi pri sia reciproka vivtenado ... (IJR 1969:1(9):18)
konfirmante sian devligon konservi la pacon (Fina Akto 7)
la decido de la Kortumo estas jure deviga nur por la partioj en la proceso kaj rilate al la afero pridecidita (UN 32)
la devigita forto de la traktado (IJR 1981:1:27)
la gepatroj ne estas devigataj sendi siajn infanojn al la etullernejon (Nederlando 1980, p. 14)
la internaciaj sindevigoj de Germanio (Aktualaj 96)
la Konsilo devas apliki kontraŭ ili devigajn mezurojn, kiuj povas konsisti el diversaj perfortaj rimedoj sen la utiligo de la militaj fortoj (Aktualaj

114)
la membroj estas jure devigataj observi tiun alvokon (Aktualaj 115)
la nomo de traktado havas neniun internacijuran signifon rilate al ĝia deviga forto (IJR 1981:1:27)
la Organizaĵo estas devigata entreprenadi kolektivajn mezurojn (Aktualaj 109)
la partioj devigas sin ekstradicii akuzitojn pro genocido (L) (IJR 1969:2(10):5)
la prezidanto estas devigata de tempo al tempo raporti pri la funkciado de la tribunalo (IJR 1969:2(10):14)
la rajtoj kaj devigitecoj transiras sur la adoptinton (IJR 1969:1(9):18)
la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kiel tia estas nur simpla rekomendo, do nedeviga deziresprimo (L) (IJR 1968:3(8):3)
la Universala deklaracio ne havos devigan karakteron (L) (IJR 1968:3(8):3)
laŭleĝa devo havi asekuron (IJR 1976:1:37), deviga asekurado (IJR 1976:1:37)
lerneja devo (IJR 1978:2:43), lernodevo (IJR 1978:2:43)
lernodeva (Nederlando 1980, p. 14)
li timis devontigi sin al pagado de grandaj sumoj (Z) (PIV 182)
mi devis puni (kaj mi vin efektive punis) (PIV 181)
mi devus vin puni (sed mi vin ne punas) (PIV 181)
mi estus devinta vin puni (sed ne punis vin) (PIV 181)
nedeviga kurso (PIV 182)
neplenumo de la devoj (L) (IJR 1968:3(8):5)
neplenumo de leĝaj alimentodevoj (IJR 1968: 1(6):11)
plendo pro la neplenumo de la devoj konforme al la Pakto (L) (IJR 1968:3(8):5)
plenumadi siajn devojn fiksitajn en internaciaj deklaracioj kaj interkonsentoj (Fina Akto 12)
premdevigi iun krimi (IJR 1982:1:21)
rilego (elpelo kun deviga loĝigo en alia loko) (IJR 1980:1:40)
sen deviga jura forto (L) (IJR 1968:3(8):3)
servi kiel bazo de la tezo pri deviga kompetenteco de la Kortumo (Aktualaj 133)
servodevo pri trapaso (PIV 182)
sindevigoj (L) (IJR 1979:2:36)
subskribo aŭ alia devontiga ago (IJR 1981:1:26)
surhavigi devigitecojn (IJR 1967:3(4):3)
tiu grava Konvencio estas deviga por plia ŝtato en Eŭropo (L) (IJR 1983:1:44)

validas lernodevo ĝis la aĝo de 16 jaroj (Nederlando 1980, p. 4)

**difekt/** (PIV 187)
difekti (r) (tr): 1) fari ion neuzebla, ne taŭga, senvalora per fizika mistraktado, 2) fari, ke membro, organo de plu funkciu sane, 3) meti en malbonan staton, malplivalorigi, malbonigi (PIV 187)
difekti ies rajtojn (Z) (PIV 187)
difektito (IJR 1976:2:19)
korpa difekto (IJR 1983:2:21), korpodifekto (IJR 1976:2:27)

**diferenc/** (PIV 187)
diference de la sovetia difino, la jugoslavia eksplicite postulas ... (L) (IJR 1982:1:13)
diferenci disde (Esperanto 1973:5:81)
diferencigi ĝin de la momenta freneziĝo (IJR 1982:2:7)
diferencigi inter federaciaj kaj landaj lernejoj (IJR 1977:1:14)
diferencigi ion de io (IJR 1982:2:7)
en la leĝofarada procezo mem ni devas diferencigi la teritorion de leĝofarado kiu ..., de la leĝprepara laborprocezo, kiu ... (IJR 1968:3(8):6)
estas necese diferencigi la ordalon disde torturo (IJR 1986:1:11)
la leĝo de 1888 diferencigas inter enloĝantoj kaj ŝtatanoj (IJR 1968:1(6):4)
oni povas diferencigi inter federaciaj kaj landaj lernejoj (IJR 1977:1:14)

**difin/** (PIV 187)
al kiu estas testamentitaj difinitaj objektoj (IJR 1975:1:22)
difini jurajn sankciojn en konkretajn individuaj kazoj (L) (IJR 1983:2:4)
difino de tio, kion la Konstitucio komprenas sub "demokratio" (IJR 1980:1:34)
escepte se en la leĝo mem ne estas difinita alia limtempo (Konst. Bul. 7)
ĝi nek difinas ilin, nek tutnombras ilin (Aktualaj 90)
kaŭzoj difinitaj en la leĝo (IJR 1982:2:12)
konstanta vivado dum difinita tempo sur la teritorio de Soveta Unio (L) (IJR 1968:2(7):2)
la jura doktrino difinas kiel juran personon (IJR 1985:1:2)
la Ministra konsilio difinas la kompetentecon de la ministerioj (Scienca Mondo 1983:1:26)
la salajrojn de la juĝistoj difinas la asembleoj, kiuj elektis ilin (L) (IJR 1983:2:29)
multaj krimoj kontraŭ la homeco restis nepunitaj, ĉar ili ne estis ampleksitaj per la difino (Aktualaj 81)

sub difinitaj kondiĉoj (L) (IJR 1967:2(7):3)
surbaze de la supre eksponitaj ni povus difini: spaca krimo estas ... (IJR 1969:2(10):8)

**diplom/** (PIV 192)
diplomo (r): 1) oficiala dokumento atestanta rajton, privilegion aŭ rangan titolon, 2) skribita aŭ presita atesto, donita de lernejo, universitato ks, ke la ricevinto sukcese plenumis ekzamenon kaj rajtas porti iun titolon (PIV 192)
diplomo pri doktoreco (PIV 192)
diplomo pri nobeligo (PIV 192)

**diplomat/** (PIV 192). Vidu ankaŭ: diplomati/
diplomato (r): 1) supera ŝtata oficisto, ricevinta diplomatian komision (PIV 192)
diplomataro: la tuto de la diplomatoj akredititaj ĉe unu ŝtatestro (PIV 192)
diplomateco: 1) rango kaj titolo de diplomato (PIV 192)
diplomata kvartalo (Monato 1987:3:23)
revoki diplomaton (Konst. Bul. 9)

**diplomati/** (PIV 192). Vidu ankaŭ: diplomat/
diplomatio: 1) tiu branĉo de la politiko, kiu koncernas la internaciajn rilatojn, 2) kariero, administracio kaj tuto de la diplomatoj (PIV 192)
diplomatia agento (PIV 15 sub agent/)
diplomatia depeŝo (PIV 192)
diplomatia kaj konsulara interrilato (IJR 1981:1:40)
diplomatia kanalo (IJR 1981:1:36)
diplomatia noto (IJR 1981:2:33)
diplomatia privilego (IJR 1984:2:40)
diplomatia reprezentanto (IJR 81:1:27)
diplomatia sendito (IJR 1981:1:27)
diplomatia stacio (IJR 1981:1:32)
diplomatiaj reguloj (PIV 192)
la limoj de diplomatia imuneco (IJR 1984:2:37)
la nova hungara kabineto forte vigligis diplomatiajn kontaktojn, ekzemple kun Israelo (Monato 1989:2:14)
plena interrompo de la diplomatiaj rilatoj (Aktualaj 114)

**direktiv/** (PIV 194)
direktivo (r): ĝenerala indiko de la atingenda celo kaj de la ĉefaj uzendaj rimedoj, donita de iu ordonanto al la plenumontaj subuloj (PIV 194)
ordono, direktivo, instrukcio (IJR 1984:2:31)

**disip/** (PIV 195)
disipi (r) (tr): malŝpari, forneniigi (PIV 195)
li disipis post patro heredon (PIV 195)

**diskreci/** (PIV 195)
diskrecio (r): libereco fari decidon laŭ sia propra juĝo, absolute aŭ en certaj limoj (PIV 195)
la diskrecia povo de la Ministerio de Internaj Aferoj (PIV 195)

**diskriminaci/** (PIV 196)
diskriminacio (r): oficiala aŭ efektiva apliko de tia distingo inter la ŝtatanoj de unu ŝtato, per kiu oni rifuzas al parto el ili kelkajn el la homaj rajtoj (PIV 196)
diskriminacii (ntr): fari diskriminacion (PIV 196)
rasa diskriminacio (PIV 196)

**dispon/** (PIV 196)
disponi (r) (ntr): 1)decidi, laŭ sia bontrovo, kio fariĝos pri iu aŭ io, 3) (juro): per deklaro senpere krei, aliigi, cedi aŭ nuligi rajton (PIV 196)
disponrajto pri komuna propraĵo (IJR 1976:1:45)
ekskluziva disponrajto super la naturaj riĉaĵoj de la ekonomia zono (IJR 1980:2:35)
havi la rajton disponi je (= pri) sia propra persono (Z) (PIV 196)
la Societo disponas nur super (= pri) la uzado de la kapitaloj de la Societo mem (Z) (PIV 196)
leĝo disponas nur por la estonteco (PIV 196)
testamente disponi pri siaj havaĵoj (PIV 196)

**dispozici/** (PIV 196)
dispozicio (r): 3) (ordinare plurale) kio estas difinita, kiel esprimo de ies volo; plano, preparoj (PIV 196)
la diversaj dispozicioj de la leĝo (PIV 196)
li povas dispozicii per testamento pri sia tuta havaĵo (IJR 1975:1:13)
testamenta dispozicio (IJR 1975:1:16)

**disput/** (PIV 197)
civilaj disputoj (IJR 1968:1(6):11), civiljuraj disputoj (IJR 1968:1(6):11)
disputafero (UN 34)
hereddisputo (IJR 1977:2:42)
jura disputo (UN 10)
kategorioj de disputoj (L) (IJR 1976:1:9)
la du homoj, kiuj havas inter si juĝan disputon, starigu antaŭ la Eternulo, antaŭ la pastroj kaj la juĝistoj (Biblio. Readmono 19:17)
por solvado de difinitaj kategorioj de interŝtataj disputoj (L) (IJR 1976:1:3)
solvi siajn disputojn (UN 4)

**disting/** (PIV 197)
distingi amikojn de malamikoj (Esperanto 1984: 3:41)
distingi inter uzantoj kaj agantoj (Esperanto 1972:10:167)
en tiu grupo estas klare distingeblaj du subgrupoj (Aktualaj 19)
estas, do, necese distingi la diversajn tipojn de kunmetitaj ŝtatoj (Aktualaj 22), estas, do, necese klare distingi inter la juraj reguloj kaj

ĉiuj aliaj kondutreguloj (Aktualaj 25)
la aŭtoro distingas tri etapojn de la jurapliko (IJR 1967:1(2):23)
per tio la federacio distingiĝas de konfederacio (Aktualaj 43)
sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio (UN 6)

**divid/** (PIV 199)
dividi (r) (tr): 2) disigi (en plurajn partojn) a) destinante al ĉiu lian havotaĵon, b) ĉiu prenante sian havotaĵon (PIV 199)
ĉiuj ĉi teorioj estas, tamen, divideblaj je tri ĉefaj grupoj (Aktualaj 19)
disdivido de kostoj (Fina Akto 81)
dividi heredon kun fratoj (Z) (PIV 199)
dividi la problemojn en du gravajn partojn (Esperanto 1971:9:156)
dividi la proprieton (IJR 1977:2:34), interdivido dum procedo de partigo (IJR 1976:1:46), la rajto pluvivi kun nepartigita heredaĵo (IJR 1979:1:15), avantaĝoj, kiujn la postvivanta partnero havas dum la dispartigo (IJR 1979:1:15), procedo de (hered)partigo (N-Esp 275), tribunalo de (hered)partigo (N-Esp 275)
divido de la heredaĵo (IJR 1975:1:17), interdivido de la heredaĵo (IJR 1975:1:14)
dividu la prenitaĵon po duono inter tiuj, kiuj partoprenis en la milito kaj iris batali, kaj inter la tuta komunumo (Biblio. Nombroj 31:27)
interdivido dum procedo de partigo (IJR 1976:1:46)
la diversaj aferoj estas dividitaj inter la federacio kaj la federalaj unuoj (Aktualaj 43)
la divido de ŝtato kaj eklezio (IJR 1967:4/5(5):24)
la klasika divido en dolo kaj neglekto (IJR 1981:2:26, dif.)
la komunaj havaĵoj estas dividitaj en du samajn partojn (IJR 1966:1:17)
la leĝo pri la heredado kaj pri la interdivido de la posedaĵo (IJR 1969:1(9):17)
la menciitaj 16 konvencioj de UN estas divideblaj en du grupojn (L) (IJR 1968:3(8):4)
la punindaj agoj dividiĝas en krimoj kaj deliktoj (IJR 1982:2:10)
la ŝtata funkcio estas dividita je leĝdonado, administracio kaj justico (IJR 1980:1:25)
ordaloj estas divideblaj en du grupojn (IJR 1986:1:12)
postuli interdividon de la heredaĵo (IJR 1975:1:14)
principo pri divido de la potenco (IJR 1968:2(7):14)
restis inter la Izraelidoj ankoraŭ sep triboj, al kiuj ankoraŭ ne estis disdividita ilia hereda posedaĵo (Biblio. Josuo 18:2)

**divorc/** (PIV 200)
divorco (r): rompo de edziĝo, decidita de jura instanco laŭ la postulo de unu aŭ de ambaŭ geedzoj, pro la motivoj kaj en la formoj difinitaj de la leĝo (PIV 200)
la du divorcitoj (IJR 1979:1:22)

**doktrin/** (PIV 201)
doktrino (r): aro da principoj kaj sistemaj teorioj, kiujn iu religio, filozofio aŭ scienco instruas (PIV 201)
la jura doktrino difinas kiel juran personon ... (IJR 1985:1:2)

**dokument/** (PIV 201
dokumento (r): skribaĵo aŭ signifa objekto, kiu servas kiel pruvo kaj atesto (PIV 201)
dokumentaro: 1) dosiero, 2) dokumentoj, uzitaj por verkado de tezo (PIV 201)
dokumenti (tr): 1) pruvi per dokumentoj, 2) provizi per dokumentoj (PIV 201)
ŝipdokumentoj: dokumentoj, kiujn ĉiu ŝipo devas posedi, por obei la administraciajn preskribojn (PIV 201)
aĉetodokumento (IJR 1977:1:40), dokumento de aĉeto (PIV 201)
dokumentoj de transdono (PIV 201)
fondiĝa dokumento (Eŭrpoa Dokumentaro 1983:3, Statuto:4), fondiĝ-dokumento (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:2)
ĝi povas prokrasti la decidon, se ĝi trovas la proponon ne sufiĉe dokumentita (PIV 201)
la sigelo garantias la aŭtentikon de dokumentoj (IJR 1986:2:4)
plenrajta dokumento (IJR 1981:2:33)
pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento (Z) (PIV 201)

**dol/** (PIV 201)
dolo (r): volo direktita al plenumo de delikta ago, precipe en kriminala kaj civila juro (PIV 201)
dola hommortigo estas murdo (PIV 201)
dolo (L) (IJR 1982:1:13, dif.; 1982:2:5, dif.)
la klasika divido en dolo kaj neglekto (IJR 1981:2:26 dif.)

**domaĝ/** (PIV 202). Vidu ankaŭ: damaĝ/
neniu povas uzi la posedrajton en domaĝo al la socia intereso (Konst. Bul. 4)

**domicil/** (PIV 203)
domicilo (r): loko, kie one havas siajn ĉefaferojn aŭ sian okupon, kaj kiu estas rigardata kiel la kutima laŭleĝa restadejo (PIV 203)
konforme al la domicilprincipo (IJR 1967:4/5:17)

**domini/** (PIV 203)
dominio (r): titolo de kelkaj pli-malpli sendependaj partoj de la Brita Konfederacio (PIV 203)

**don/** (PIV 203)

al la sciigo devas esti aldonitaj ĉiuj dokumentoj (UN 33)
doni dekreton (IJR 1984:2:31), eldoni dekreton (Monato 1986:8/9:8), elirigi dekreton (PIV 173)
simpla plimulto de la donitaj voĉoj (IJR 1980:2:17)

**donaci/** (PIV 204)
donacio (r): granda monsumo, donacita al instituto, al grava institucio ks por difinita celo (PIV 204)

**dosier/** (PIV 205)
dosiero (r): 1) kolekto da aktoj, dokumentaoj, notoj ks, rilataj al unu afero aŭ unu persono, kaj ordinare entenataj en unu kovertego, 2) ĉe la polico, aparta registro de ies antaŭaj agoj, kondamnoj ktp. (PIV 205)
la tribunalo transdonis la dosieron al la Konstitucia Kortumo (IJR 1977:2:23)

**drakon/** (PIV 206)
Drakono (r): atena leĝdonato (PIV 206)
drakona (Z) (f): severega (PIV 206)
la emfazo sur la morala elemento en krimo provizas humanisman ingrediencon en fako de juro, kiu alie estus drakona (IJR 1982:1:26)

**drog/** (PIV 208)
cirkuliganto de stuporigaj drogoj (IJR 1982:1:28)

**dub/** (PIV 210)
pridubi (tr): dubi pri io (PIV 210)
en okazo de dubo pri iu jura regulo (Aktualaj 91)
jurdubo (IJR 1978:2:34)
mi pridubas ĉiujn liajn asertojn (PIV 210)
ne estas spaco por racia dubo (IJR 1985:1:17)
ne povas esti dubo, ke (Aktualaj 91)
okaze de dubo tiurilate, la Kortumo decidas ... (UN 26)
ŝajnas al mi, ke estas tre dubinde, ĉe (Aktualaj 20)
ŝia kulpeco ne plu estas duba (PIV 210)

**duel/** (PIV 210)
duelo (r): antaŭkonsentita batalo inter du personoj pro privata malpaco (PIV 210)
dueli (ntr): batali en duelo (PIV 210)
elvoki iun al duelo (Z) (PIV 210)
juĝ-cela duelo (IJR 1986:1:10)
oni arestis la duelantojn (PIV 210)

**dung/** (PIV 211)
dungi (r) (tr): interkonsenti kun laborist(in)o, servist(in)o aŭ oficist(in)o, por havigi al si ties servadon laŭ difinita salajro (PIV 211)
dunganto: tiu, kiu dungas (PIV 211)
dungato: persono dungata (PIV 211)
dungiĝi: fariĝi dungito (PIV 211)
dungitaro: tuto de la dungitoj en sinjordomo, kampodomo, entrepreno ktp. (PIV 211)
dungito: laboristo dungita (PIV 211)
dungoficejo: oficejo, kie dungotoj enskribiĝas kaj la dungontoj elektas (PIV 211)
maldunga mono: kompenso, kiun la dunginto ŝuldas leĝe pro la maldungo (PIV 211)
maldungi (tr): ĉesigi ies dungitecon (PIV 211)
asekuri siajn dungitojn kontraŭ la akcidentoj (PIV 211)
dungigi sin (PIV 211)
dungokontrakto (PIV 559)
Hungara E-Asocio aktuale havas 7 plentempajn kaj 2 parttempajn dungitojn (Esperanto 1989: 7/8:138)
la dunganto devas pagi duonon de la sociala asekurado (PIV 211)
la dungatoj devas subskribi laborkontrakton (PIV 211)
la laborjuro de GDR agnoskas nur tri pravigojn por maldungo (IJR 1976:1:21)
laŭjara dungito (Z) (PIV 211)
prezenti sian maldungiĝon (Monato 1985:10:9)
tri pravigoj por maldungo (IJR 1976:1:21)

# E

**edikt/** (PIV 215)
edikto (r): 1) en Romo, dekreto de pretoro aŭ de la imperiestro, 2) en Francujo, leĝa ordono de reĝo (PIV 215)
la naciaj aŭtoritatoj edikas leĝojn kaj regularojn (Eŭropa Dokumentaro 1976:11:18)
la Nanta edikto (per kiu Henriko la Kvara unuafoje proklamis religian toleremon, 1598) (PIV 215)
reĝa edikto [ne: rezolucio] (IJR 1978:2:43-44)

**edil/** (PIV 215)
edilo (r): roma magistratano (PIV 215)

**eduk/** (PIV 215)
reedukado: 2) jura kaj sociala sistemo, per kiu oni provas, anstataŭ puni, redoni al kondamnitoj, precipe al la pli junaj, senton pri sia persona digno kaj siaj sociaj devoj (PIV 215)
kompulsaj (devigaj) edukaj rimedoj povas esti aplikitaj por reeduki ilin sen puno (L) (IJR 1982:1:16)

**edz/** (PIV 216)
edzo (r): viro laŭleĝe ligita kun virino por kunvivado kaj fondo de familio (PIV 216)
boedziĝi: edziĝi al la edzino de seninfane mortinta frato (PIV 216)

edzeco: stato de geedzoj (PIV 216)
edzigi: fari iun edzo (PIV 216)
edzigo = geedziĝo (PIV 216)
edziĝi: fariĝi edzo (PIV 216)
edziĝo: 1) laŭleĝa ligo de viro kun virino, 2) sakramento, kiu sanktigas la unuiĝon de viro kaj virino, kaj havigas al ili dian helpon por kristana vivo (PIV 216)
edziĝovojaĝo (= nupto) (PIV 216)
edzinigi: fari el iu edzinon (PIV 216)
edziniĝi: fariĝi ies edzino (PIV 216)
edzino: virino laŭleĝe ligita kun viro, por fondi kun li familion (PIV 216)
eksedziĝi: rompi la edziĝon (PIV 216)
eksedziĝo: rompo de la edziĝo (PIV 216)
eksteredzeca: okazanta, naskita ekster edzeco (PIV 216)
geedziĝi: fariĝi geedza paro (PIV 216)
geedzoj: edzo kaj edzino (PIV 216)
interedzigi: kunigi per edzoligo (PIV 216)
kromedzino: en poligamia sistemo, ĉiu el la edzinoj, edzinigitaj post la unua (PIV 216)
novedzino: virino, kiu ĵus edziniĝis (PIV 216)
novedzo: viro, kiu ĵus edziĝis (PIV 216)
provedziĝo: en certaj civilizoj, provtempo de seksa kunvivado antaŭ la edziĝo (PIV 216)
senedzineco = fraŭleco (PIV 216)
ĉesas la geedziĝo, sed la eksedziĝintaj edzoj povas regeedziĝi (IJR 1966:1:30)
ĉi tiu bazo estas certa sume potage, aparte fiksita por edziĝintaj viroj, needziĝintoj kun infanoj pli junaj ol 18 jaroj ... (Nederlando 1980, p. 32)
ĉiu el la geedzoj posedas la rajton ... (IJR 1966: 1:12)
dum la geedzeco (IJR 1976:1:45), dum la periodo de la geedzeco (IJR 1969:1(9):17)
edzeca infano (PIV 216)
edzeca juro (PIV 216)
edziga ceremonio (PIV 216)
edziga promeso (PIV 216)
edzigi sian filon al riĉa fraŭlino (PIV 216)
edziĝa kontrakto (IJR 1975:1:25), geedziĝa kontrakto (IJR 1976:1:44)
edziĝdonaco (IJR 1986:1:33)
edziĝopova (PIV 216)
edziĝotaŭga aĝo (Z) (PIV 216)
edziĝrompa afero (IJR 1967:2(4):8)
edziniĝinta virino (IJR 1976:1:20)
edziniĝopova knabino (PIV 216)
edzpreni iun (Esperanto 1975:12:206)
egaligi jure la faktan kunloĝadon kun la registrita geedziĝo (L) (IJR 1978:2:15)
eksaj geedzoj (IJR 1969:1(9):18)
eksedziĝa tribunalo (IJR 1976:1:41)
eksedziĝi kun (Z), je, disde iu (PIV 216)
eksteredzeca filo (PIV 216), ekstergeedza infano (L) (IJR 1966:1:24), eksterleĝa infano (Esperanto 1975:6:103), geedzecaj kaj ekstergeedzecaj infanoj (IJR 1975:1:12), infano naskita dum la geedzeco aŭ ekster la geedzeco (L) (IJR 1966:1:24), laŭleĝa infano (L) (IJR 1966:1:24), legitima infano (IJR 1967:3(4):21), leĝa infano (PIV 624), needzeca infano (IJR 1967:4/5(5):7), nelegitima infano (IJR 1979:1:16)
eksterlanda persono, kiu konkludis geedziĝon kun persono havanta jugoslavian ŝtatanecon, povas akiri ŝtatanecon per civitaniĝo (L) (IJR 1968:2(7):3)
eksterlandanino, kiu geedziĝas kun finnlandano (IJR 1967:4/5(5):5)
en 1909 ŝi edziĝas la vienan baronon Schlosser (Monato 1985:12:18)
en edziĝrompaj aferoj (IJR 1967:3(4):8)
en edzprocesoj la asignita partio havas advokaton (IJR 1967:1(2):13)
en kazo de nuligo de la geedzeco, la infanoj estas konsiderataj kiel laŭlegaj (IJR 1966:1:24)
en la verdikto pri disedziĝo (IJR 1966:1:28)
en reciproka testamento la geedzoj deklaras, ke ... (IJR 1975:1:9)
fari geedzan kontrakton (IJR 1966:1:17)
formalaĵoj de geedziĝo (IJR 1966:1:7)
geedza paro (IJR 1979:1:26)
geedzeca partnero (IJR 1979:1:25)
geedzeco (IJR 1969:1(9):17)
geedziĝa atesto (IJR 1979:1:26)
geedziĝa ceremonio (PIV 216)
geedziĝa kontrakto (IJR 1976:1:44)
geedziĝinto (unu partio de la geedzoj nedeklarinta la sekson). Vidu ankaŭ: spoz/ (IJR 1967: 2(3):24)
geedziĝo antaŭ la organoj de la magistratoj (IJR 1969:1(9):17)
geedziĝo inter civitanoj de diversaj ŝtatoj (Fina Akto 56)
geedziĝo inter duongefratoj (L) (IJR 1966:1:23)
geedziĝparoj (Monato 1987:12:9)
grup-edziĝo (IJR 1966:1:5)
havaĵo, kiun ŝi estas akirinta je sia nomo antaŭ la geedziĝo kaj dum la periodo de la geedzeco (IJR 1966:1:12)
ili estas nun gefianĉoj kaj baldaŭ interedzigotaj (Z) (PIV 216)
ili geedziĝis sekrete (PIV 216)
ili ne povis geedziĝi (Monato 1987:12:9)

ili vivas kune ne geedziĝinte (IJR 1979:1:14)
inter la eksaj geedzoj (IJR 1966:1:14)
kiam la restinta viva edzo (aŭ edzino) heredas kune kun infanoj de la mortinta edzo (aŭ edzino) (IJR 1969:1(9):17)
koncerne la devigitecon de la eksaj geedzoj zorgi pri sia reciproka vivtenado ... (IJR 1969:1(9):18)
kondiĉoj pri la geedziĝo (IJR 1966:1:20)
kontrakti geedziĝon (IJR 1966:1:11)
kontrakto pri edziĝo (PIV 559)
kun la konsento de la alia el la geedzoj (IJR 1966: 1:17)
la aĝo por geedziĝo kungruas kun la plenaĝo - 18 jaroj (IJR 1966:1:11)
la eksedziĝa leĝo ankaŭ validas rilate al porviva rento inter la eksedziĝitaj partioj (IJR 1968: 3(8):21)
la eksedzino celas kondamnigi la eksedzon al pagado de porviva rento (IJR 1968:3(8):21)
la filoj de ĉi tiu mondo edziĝas kaj estas edzigataj (PIV 216)
la fraŭlino, kiu estis edzinigota de mia frato (PIV 216)
la geedza partnero (IJR 1979.1:12)
la geedzoj respondecas solidare (IJR 1966:1:13)
la komunaj aĵoj ne povas esti persekutataj de persona kreditoro de unu de la geedzoj (IJR 1966:1:30)
la kunvivo inter la du negeedziĝintoj rompiĝis (IJR 1979:1:27)
la leĝo ne opinias la edzumon alia, ol civila kontrakto (IJR 1966:1:7)
la minimuma aĝo por geedziĝi estas 16 jaroj (IJR 1966:1:8)
la nuleco de la geedziĝo devas esti konstata pere de juĝista verdikto (IJR 1966:1:29)
la paciento (26-jara, edziĝinta, kun unu filino) suferas pro osto-kancero (Heroldo 1982:3:4)
la vendoprezo estu partigita inter la geedzoj (IJR 1976:1:42)
la virino rajtas reedziniĝi nur 10 monatojn post la fino de la antaŭa geedzeco (IJR 1966:1:17)
laŭ la postuloj de paragrafo 5 de la Familia Kodo, la geedziĝontoj devas nepre prezenti sanitaran ateston (IJR 1969:1(9):17)
leĝo pri edziĝo (IJR 1966:1:25)
li edziĝis kun la langobarda reĝidino (Monato 1987:9:15)
li edzinigis ŝin al si kontraŭ la volo de ŝia patro (Z) (PIV 216)
li ne povas edziĝi kun judino (Monato 1986:3:11)
li plenumis la interedzigan ceremonion (Z) (PIV 216)
li skribu al ŝi eksedziĝan leteron (PIV 216)
lia leĝa edzino (Z) (PIV 624)
malebligi al virinoj, edziniĝintaj al eksterlandanoj, forlasi la landon (L) (IJR 1968:3(8):4)
mi edzinigas mian filinon ne kun ia simpla nobelo (Z) (PIV 216)
mi jam estas tre maljuna, por edziniĝi kun viro Miĥal, kiun mi edzinigis al mi (PIV 216)
negeedziĝintaj kunvivantoj (IJR 1979:1:27)
neniu el ni donos sian filinon edzinige al Benjamenido (PIV 216)
neregistrita geedzeco (IJR 1983:1:32)
ni ambaŭ estas geedzoj (Z) (PIV 216)
obstakloj por geedziĝo (IJR 1966:1:11)
obstakloj por kontraktado de geedziĝo (IJR 1966: 1:12)
oni enkondukis la principon de la posedkomuneco de la geedzoj pri la havaĵo akirita dum la periodo de la geedzeco (IJR 1969:1(9):17)
onklo kaj nevino ne rajtas geedziĝi (IJR 1966:1:9)
peti pri eksedziĝo (PIV 216)
petoj de jam geedziĝintaj geedzoj (Fina Akto 56)
post eksedziniĝo pro iu ajn kaŭzo virino rajtas reedziniĝi (IJR 1966:1:17)
poste li eksedziĝis disde Carmen kaj edziĝis al Marta (Scienca Mondo 1983:1:22)
proceso pri eksedziĝo (PIV 216)
registrita geedziĝo (IJR 1978:2:15), neregistrita geedzeco (IJR 1970:1:11)
rekoni faktan geedziĝon bazitan sur kunloĝado (L) (IJR 1978:1:47)
se du homoj vivas kune ne geedziĝinte (IJR 1979: 1:14)
se edziniĝinta virino havas infanon - ne de sia edzo - la naskiĝanta infano fariĝas "bastardo" (Monato 1986:3:11)
se la alia el la geedzoj (IJR 1967:4/5(5):6)
se la fremdulo estas needziĝita ... (IJR 1967:3(4) :21)
se la geedzoj ne faris geedzan kontrakton, regas la t.n. komuneco de gajno (IJR 1966:1:17)
se oni scias pri seksaj rilatoj inter la fraŭlino kaj aliaj viroj, la edzin-pago, kiun estonta edzo donos por ŝi, estos malpli alta (Monato 1989:4:23)
se unu partio de la geedzoj estas fremdlanda civitano ... (IJR 1967:4/5(5):9)
solvi la problemojn pri la geedzeco kaj la familio (IJR 1969:1(9):17)
ŝi geedziĝas kun finnlandano (IJR 1967:4/5(5):5), ŝi edziniĝas kun germano (IJR 1967:4/5(5):7)
unu el la geedzoj (IJR 1969:1(9):17)
vi povus tion fari, se vi estus edzigita kun per-

sono de via klaso (Z) (PIV 216)
virino rajtas reedziniĝi nur 10 monatojn post la fino de la antaŭa geedzeco (IJR 1966:1:17)
virinoj, edziniĝintaj al eksterlandanoj (IJR 1968: 3(8):4)

**efektiv/** (PIV 216)
efektivigi: fari, ke io estu efektiva (PIV 216)
efektiva sistemo de pozitivaj devontigaj normoj (IJR 1984:2:24)
efektivigi intencon (PIV 216)
efektivigi planon (PIV 216)
efektivigo de la sankcioj (IJR 1984:2:26)
en jaro 1966 estos publikigita[j] la rezultoj de esploroj efektivigitaj per UNESKO (IJR 1967: 1(2):8)
la Ĉarto estos la komenciĝo de efika kaj efektiva internacia protekto de la homaj rajtoj ĉie en la mondo (IJR 1968:3(8):6)
mankas ankoraŭ efektivigaj preskriboj (Monato 1987:9:6)
tiaj juraj eblecoj de antaŭ longa tempo efektive malaktualiĝas (IJR 1981:1:3)

**efik/** (PIV 217)
ekefiki (ntr): komenci efiki (PIV 217)
retroefiki (ntr): havi efikon en la tempo antaŭa al la publikigo (PIV 217)
kvankam tribunalaj juĝoj ne havas normigan efikon trans la koncernan deciditan kazon, ... (IJR 1981:2:24)
leĝo ne retroefikas (PIV 217)
lia imputebla konduto kunefikis al la estigo de la damaĝo (IJR 1976:2:26)
lia konduto havis plej malbonan efikon sur la juĝantaron (PIV 217)
pri internaciaj traktatoj kaj ilia interna jurefiko en Norvegio (IJR 1981:1:25)
tiu preskribo ekefikas de hodiaŭ meznokte (PIV 217)

**egal/** (PIV 218)
bazita sur la respekto al la principoj de egalaj rajtoj de la popoloj (UN 4)
egale certe la areo ne haltis tie (IJR 1985:2:11)
egaleco de ĉiuj civitanoj fronte al la leĝo (IJR 1977:2:23)
egaligita kun (IJR 1977:2:53)
egalrajteco de la virino kaj viro en la familiaj rilatoj (IJR 1968:3(8):20)
egalrajteco de seksoj (IJR 1983:1:31)
enkonduki teorian egalecon de la seksoj (IJR 1966:1:10)
enloĝantoj ordinare estas egaligitaj kun ŝtatanoj (IJR 1968:1(6):4)
estis rekonita plena jura egaleco de la suverenaj ŝtatoj (L) (IJR 1976:1:7)
la civitanoj de ĉiuj aliaj ŝtatoj-partioj de la Konvencio estas egaligitaj rilate la aŭtorajn rajtojn (IJR 1967:2(3):14)
la egaleco de ĉiuj civitanoj antaŭ la leĝo (PIV 218)
plena egaleco antaŭ la leĝo (Aktualaj 87)
rajto al egala kompenso por egala laboro (L) (IJR 1968:3(8):3)
rilate al ekonomiaj rajtoj, enloĝantoj ordinare estas egaligitaj kun ŝtatanoj (IJR 1968:1(6):4)
UN devas neniel limigi al viroj kaj virinoj la eblecojn egalkondiĉe partopreni en iu ajn funkcio (UN 5)

**eklezi/** (PIV 220)
apartigo de la eklezio disde la ŝtato (L) (IJR 1982:1:10)
eklezia juro (IJR 1977:2:3)
eklezijura parto de leĝo (IJR 1977:1:2)
koncerne la disiĝon de la eklezio disde la ŝtato (L) (IJR 1969:1(9):2)
la potenca ekleziularo en Tebo (IJR 1978:2:19)

**eks/** (PIV 221)
eksigi: senigi iun je lia ofico, funkcio, rango (PIV 221)
eksiĝi: memvole aŭ kontraŭvole forlasi sian oficon (PIV 221)
neeksigebla: tia, ke oni ne povas lin eksigi (PIV 221)
eksedzino (Z) (PIV 217)
eksigi la federacian registaron (IJR 1980:1:29)
krom la maldungo la Laborkodo enhavas la eblecon de tuja eksigo el la entrepreno (IJR 1976: 1:22)
la juĝistoj estas ofte neeksigeblaj (PIV 221)
ne-eksigebleco (IJR 1981:2:12)

**ekscepci/** (PIV 222)
ekscepcio (r): defenda rimedo por prokrasti la finon de la proceso aŭ por kritiki ĝian formon (PIV 222)

**eksces/** (PIV 222)
eksceso (r): 1) ago transpasanta la limojn de modereco, sobreco, justeco, humaneco (PIV 222)
ekceso de necesa defendo estas krimo (L) (IJR 1982:1:11)
la ago ekscesas la necesajn limojn (IJR 1983:1:37)

**ekscit/** (PIV 222)
se li perpetris la transpason pro forta ekscitiĝo (L) (IJR 1982:1:11)

**eksklud/** (PIV 222)
ekskludi (r) = ekskluzivi (PIV 222)
cirkonstancoj ekskludantaj krimon (IJR 1982:2:5)

cirkonstancoj, kiuj ekskludas la puneblecon de ago (IJR 1981:2:25)
mensa malsano estas la alia bazo por ekskludo de respondeco (L) (IJR 1982:1:17)
specialaj laŭ-aferaj aŭ laŭ-personaj pun-ekskludaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
tiuj eraraj scioj ne ekskludas kulpon (IJR 1982:2:5)

**ekskluziv/** (PIV 222)
ekskluziva havaĵo (IJR 1979:1:12)
ekskluziva rajto de kopio (PIV 222)
havi ekskluzivan povon fari leĝojn (IJR 1980:1:21)

**ekskomunik/** (PIV 222)
ekskomuniki (r) (tr): 1) forpeli el la eklezio, 2) (f) solene forpeli el iu partio (PIV 222)
ekskomuniko: ago de tiu, kiu ekskomunikas (PIV 222)

**ekspert/** (PIV 223)
ekzamenado de ekspertoj (IJR 1977:2:15)

**ekspertiz/** (PIV 223). Vidu ankaŭ: ekzamen/, enket/, esplor/
ekspertizi (r) (tr): komisie esplori aŭ taksi iun aferon, kiel faka spertulo (PIV 223)
ekspertizisto: faka spertulo, komisiita proponi decidon pri iu duba afero aŭ taksi la valoron de io (PIV 223)
ekspertizi bienon (por difini ĝian vendvaloron (PIV 223)
la tribunalo petis ekspertizon de medicinistoj pri la mensa stato de la akuzito (PIV 223)
la vendoobjekto devas esti ekspertizata (IJR 1967:4/5(5):18)

**eksplicit/** (PIV 223)
eksplicita (r): 1) esprimita per precizaj detalaj vortoj, lasantaj nenion subkomprenata; malimplicita (PIV 223)
la ĉarto eksplicite permesas la ekziston de regionaj kontraktoj (PIV 223)
tiu kazo estas eksplicite antaŭvidita en la leĝo (PIV 223)

**ekspres/** (PIV 224)
ekspresе permesi (Aktualaj 120, dif.)

**ekstradici/** (PIV 225)
ekstradicii (r) (tr): transdoni fuĝintan kriminton al la kompetentaj juraj instancoj de alia lando (PIV 225)
ĉar multaj ŝtatoj malpermesas ekstradicion pro la t.n. politikaj krimoj, ... (L) (IJR 1969:2(10):5)
la partioj devigas sin ekstradicii akuzitojn pro genocido (L) (IJR 1969:2(10):5)
nepermesitaj ekstradicioj de politikaj malliberigitoj al aliaj landoj (IJR 1985:1:30)
traktato pri ekstradicio (PIV 225)

**ekstrakt/** (PIV 225)
ekstrakti (tr): 3) (f) eltiri konsekvencon el io (PIV 225)
el tiuj ekzemploj oni povas ekstrakti ĝeneralan regulon (PIV 225)

**ekvit/** (Ne en PIV)
la vorto "equity" antaŭe signifis tutsimple justeco (IJR 1969:1(9):7)

**ekzamen/** (PIV 227). Vidu ankaŭ: ekspertiz/, enket/, esplor/
ekzameni (r) (tr): 1) zorgeme rigardi, detale esplori, 2) provi per demandoj la sciojn de kandidato, 3) pridemandi (akuziton) (PIV 227)
ekzamenado de atestantoj (Aktualaj 63)
mi ĉiun bonorde ekzamenatan lak leĝe voĉdonitan decidon akceptos (PIV 227)

**ekzekuci/** (PIV 227)
ekzekucio (r): juĝa aŭ administra ago, per kiu oni devigas ŝuldanton aŭ kondamniton plenumi la decidon entenantan en la juĝo, verdikto aŭ administracia akto jure plenvalidaj (PIV 227)
ekzekucii (tr): plenumi tian agon (vidu: ekzekucio) (PIV 227)
ekzekuciisto: juĝa aŭ administra oficisto, komisiita plenumi ekzekucion (PIV 227)
ekzekucii verdikton per aŭkcia vendo de domo, per konfisko de parto de la salajro, per forpreno de la ŝuldata objekto (PIV 227)
ekzekucio de la juĝoj de la Konstitucia Kortumo (IJR 1981:2:21)
ekzekucio de la kriminalaj juĝoj (IJR 1969:1(9):14)
ekzekucio de la kriminalaj sankcioj (IJR 1969:1(9):14)
kondiĉo por la ekzekucio (IJR 1984:2:32)
la prokraston de la ekzekucio rajtas fari la prezidanto de la tribunalo (IJR 1969:1(9):14)
la vendo okazas ekzekucie per publika aŭkcio (IJR 1977:1:39)
novaj principoj ĉe la ekzekucio de la kriminalaj juĝoj en Jugoslavio (IJR 1969:1(9):14)

**ekzekut/** (PIV 227)
ekzekut (r) (tr): leĝe mortigi krimulon (PIV 227)
ekzekutejo: loko de ekzekuto (PIV 227)
ekzekutisto: tiu, kiu metie ekzekutas (PIV 227)
ekzekuto: ago de ekzekutanto (PIV 227)
elektroekzekuti (tr): ekzekuti per tre forta elektra kurento (PIV 227)
ekzekuta ŝtipo (sur kiu oni senkapigis la kondamnitojn) (PIV 1071 sub ŝtip/)
ekzekuti garantiulojn (PIV 332)
esti ekzekutita je la postulo de la publiko (IJR 1986:1:3)
mortigoto estu ekzekutita (PIV 227)

senkapigisto (Monato 1985:9:13), ekzekutisto (Monato 1985:9:13)

**ekzekutiv/** (PIV 227)

ekzekutivo (r): la tria povo de ŝtato, laŭ la doktrino de Montesquieu, konsistanta el regado kaj administrado, kontraste al la leĝodona kaj al la jurisdikcia povoj (PIV 227)

ekzekutivaj kaj direktantaj organoj (Konst. Bul. 13)

ekzekutivo (IJR 1984:1:24)

**ekzekv/** (PIV 227)

ekzekvi (r) = ekzekucii (pp. aŭkcia vendado profite al la kreditoroj) (PIV 227)

**ekzekvatur/** (PIV 227)

ekzekvaturo (r): 1) decido de kompetenta enlanda tribunalo, per kiu ĝi permesas la ekzekucion en sia lando de eksterlanda juĝo aŭ verdikto, 2) akto, per kiu unu ŝtato aprobas, ke alilanda konsulo plenumu siajn funkciojn sur ĝia teritorio (PIV 227)

**ekzil/** (PIV 228)

ekzili (r) (tr): forsendi definitive iun el lia partrujo per juĝa dekreto aŭ per ordono de la regnestro (PIV 228)

ekzilejo: loko, kie loĝas ekzilito (PIV 228)

ekzilo: forpelo el la patrujo (PIV 228)

ekziligo el la lando aŭ ekziligo nur el la vivloko de la kondamnito (IJR 1984:2:35)

kondamni al ekzilo (PIV 228)

la senlaboreco trudpelis 700000 urugvajanojn al ekzilo (Scienca Mondo 1983:1:23)

malpermeso de arbitraj arestoj, malliberigoj kaj ekziloj (L) (IJR 1968:3(8):2)

vi certe rememoras, ke li, ekzilita en Montevideo, publikigis ... (Scienca Mondo 1983:1:22)

vi punis lin per ekzilo (PIV 228)

**elekt/** (PIV 231). Vidu ankaŭ: balot/

elekti (r) (tr): 1) el du aŭ pluraj preni pro prefero, 2) montri per voĉdonado preferon por kandidato. (Rimarko: povas iafoje okazi konfuzo inter la sencoj 1 kaj 2, kiam temas pri personoj; oni tiam nepriguu la duan sencon per "balote" aŭ "voĉdone".) 3) elektado (PIV 231)

elektado: kolektiva ago de tiuj, kiuj voĉdone elektas reprezentantojn ks. (PIV 231)

elektantaro: tuto de la laŭrajtaj elektantoj (PIV 231)

elektanto: tiu, kiu elektas aŭ povas elekti (PIV 231)

elektebla: 2) havanta la rajton esti elektita (PIV 231)

elektejo: loko, kie oni faras elektadon (PIV 231)

elektito: tiu, kiu estis elektita (PIV 231)

elekto: 1) ago de iu, kiu elektas, 2) ago de iu, kiu povas elekti (PIV 231)

neelektebla: ne rajtanta esti elektita (PIV 231)

Centra Komitato, kiu estas ĉiujare elektata en la kongresoj (Z) (PIV 231)

ĉiu plenaĝa civitano havas aktivan kaj pasivan elektorajton, nome se li rajtas elekti kaj estas elektebla (IJR 1969:1(9):15)

dum la parlamenta elektokampanjo (Esperanto 1984:3:40)

elekta juro (IJR 1983:1:31)

elekti aŭ nomi la membrojn de la aliaj organoj (Aktualaj 124)

elekto-distrikto (IJR 1976:1:16), elektodistrikto (L) (IJR 1980:2:3)

elekto-jaro (Esperanto 1971:9:141)

elektokomisiono (Esperanto 1989:10:161)

elekto-procedo (IJR 1978:1:41)

elekto-sistemo (IJR 1978:1:41)

en ĉiu ŝtato la senatanoj estas elektataj el unu listo por la tuta ŝtato (IJR 1980:1:20)

en parlamentaj elektoj (Monato 1985:3:6)

estas konsiderataj kiel elektitaj tiuj kandidatoj kiuj ... (UN 25)

frenezuloj estas neelekteblaj (PIV 231)

ĝi prezentas la nomon de tiuj elektitoj al la Kongreso (Z) (PIV 231)

je la unua elekto (UN 8)

konsistigo de la elektaj organoj (IJR 1969:1(9):15)

kontroli la regulecon de la elektoj (PIV 231)

kun escepto ĉe la elekto de la estraro la ĉefkunveno rajtas akiri decidojn ankaŭ per cirkuleroj (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:4)

la ĉiujara elektado de la Akademio (PIV 231)

la elekto de kvar pliaj vicprezidantoj okazas plej frue unu monaton post la fondo-kunveno (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:4)

la elektokampanjo rezultigas lian elektiĝon al la prezidenteco (L) (IJR 1982:1:26)

la juĝistoj estas elektataj por la daŭro de naŭ jaroj (Aktualaj 61)

la malnovaj juĝistoj estas reelekteblaj (Aktualaj 61)

la maniero elekti sian Prezidanton (UN 19)

la membroj de la komisionoj estas elektataj por daŭro de kvar jaroj (IJR 1969:2(10):11)

la membroj estas elektataj por naŭ jaroj kaj ili estas reelekteblaj (UN 26)

la nekonstantajn membrojn elektas la Ĝenerala Asembleo (Aktualaj 115)

la nove elektita Supera Soveto de USSR estas kunvokata de la Prezidantaro de Supera Soveta de USSR de antaŭa konsisto ne pli malfrue

ol je unu monato post la elektoj (Konstitucio 1937, p. 11)
la societo elektis prof. d-ron Fabrizio Pennacchietti kiel sian prezidanton (Monato 1985:12:21)
la socitribunalaj membroj mem elektas el inter si la prezidanton de la tribunalo (IJR 1969:2(10):14)
la unuopaj fazoj de la elekta procedo estas preparo de nomlisto de la elektantoj, la kandidatigo ... (IJR 1969:1(9):15)
li elektiĝis kiel la unua prezidanto de ... (Esperanto 1974:11:189)
li estis elektita sekretario de la societo (L) (IJR 1969:2(10):1)
mi elektis lin kiel prezidanton (Z) (PIV 231)
mi elektis lin prezidanto (Z) (PIV 231)
nombro de la voĉdonintaj elektantoj (PIV 231)
oficiala listo de la elektantoj (PIV 231)
oni reelektis s-ron X al la posteno de prezidanto (PIV 231)
parlamenta elektado (PIV 792)
partopreno en la elektoj de minimume 95% de ĉiuj elektorajtigitoj (L) (IJR 1980:2:3)
por esti elektebla, oni devas havi la aĝon de ... (PIV 231)
porelekta kunveno (UN 25)
postulo de demokrata elektrajto estas ankaŭ la senpereco de la elektoj (IJR 1969:1(9):15)
preparo de nomlisto de la elektantoj (IJR 1969: 1(9):15)
raporti pri la konfirmo aŭ malkonfirmo de la elekto (Konst. Bul. 7)
reelekti (tr) (pp personoj) denove komisii per balotelekto unu saman funkcion al iu, 2) (pp komitato ks) renovigi, elektante la samajn aŭ aliajn membrojn (PIV 231)
reelektiĝo eblas (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:3)
rekta, nerekta elekto (PIV 231)
unua, dua elektado (PIV 231)
venko, malvenko de partio ĉe la elektado (PIV 231)

## emancip/ (PIV 234)

emancipi (r) (tr): 1) liberigi el la patra aŭ kuratora povo, 2) (f) liberigi iun el la dependo de supera aŭtoritato (PIV 234)
emancipado: ago de iu emancipanta (PIV 234)
emancipiĝo: ago fariĝi emancipita (PIV 234)
dediĉi sin al la emancipado de la sklavoj (PIV 234)
grupo por virinemancipado (IJR 1980:2:40)
"Marta" estas ekzemplo de la sensukcesa penado de virino al emancipiĝo (PIV 234)

## embarg/ (PIV 234)

embargi (r) (tr): malpermesi provizore al ŝipo la elveturon el la haveno aŭ ĝian malŝarĝadon (PIV 234)
meti embargon sur ŝipon (PIV 234)

## emerit/ (PIV 235)

emerito (r): oficisto, kiu post difinita tempo de servado, forlasas honore la oficon kaj ricevadas pension (PIV 235)
emerita: 1) estanta emerita, 2) rilata al emerito (PIV 235)
emeriteco: stato de emerito (PIV 235)
emerita profesoro (PIV 235)
emerita salajro (Z) = pensio (PIV 235)
li ĝuas sian emeritecon (PIV 235)

## enket/ (PIV 239). Vidu ankaŭ: ekspertiz/, ekzamen/, esplor/

enketo (r): 1) juĝa aŭ oficiala esploro, 2) metoda esploro pri ia okazaĵo aŭ opinio (PIV 239)
enketi (ntr): fari enketon pri (PIV 239)
enketa juĝisto (PIV 239), esplorjuĝisto (IJR 1968: 2(7):6)
enketa komisiono (PIV 239), enketkomisiono (PIV 533)
enketi pri la proceduroj de voĉdonado en la diversaj landoj (PIV 870)
esti submetata je enketado (IJR 1979:2:6)
fari enketon pri iu afero (PIV 239)
juĝa enketo (IJR 1979:2:6)
la advokato estas nomata ankaŭ ĉe la antaŭesploro kaj povas ĉeesti la enketojn (IJR 1967:1(2):14)
la policistoj enketas pri la malapero de la pordistino (PIV 239)
polica enketo (PIV 843)

## er/ (PIV 244)

aldona ero (ekzemple nova punkto 7.6 post punkto 7.5) (Eŭropa Dokumentaro 1983:3:53)

## erar/ (PIV 244)

eraro pri faktoj (IJR 1981:2:27, 1983:1:38, dif.)
eraro pri juraj normoj (IJR 1981:2:27, 1983:1:38, dif.)
juĝeraro: juĝdecido, kiun poste malkovritaj faktoj pruvas erara (PIV 244)
reala kaj leĝa erariĝo (IJR 1969:2(10):8)

## escept/ (PIV 247)

ĉiuj estos punitaj kun escepto de vi (PIV 247)
en esceptaj kazoj (IJR 1976:2:38), escepte en ekstremaj okazoj [devus eble esti: kazoj] (IJR 1986:1:27)
escepte de: kun escepto de; ekskluzive de (PIV 247)
escepte se: krom se; sed ne se (PIV 247)
escepti iun el komuna leĝo (PIV 247)
escepto el la regulo (IJR 1982:1:22)

ili tute ne prezentas ian escepton (PIV 247)
kun escepto ĉe la elekto de la estraro la ĉefkunveno rajtas akiri decidojn ankaŭ per cirkuleroj (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:4)
kun escepto de rimedoj kontraŭ iu malamika ŝtato (UN 13)
la itala juro akceptis tiun escepton en precizigitaj kazoj (IJR 1976:2:33)
la mortigistojn oni esceptis el la amnestio (PIV 247)
li pardonis al ĉiuj, escepte de sia filo (PIV 247)
ne ekzistas regulo sen escepto (Z) (PIV 911)
por damaĝoj senkulpe kaŭzitaj oni respondecas nur en jenaj esceptaj kazoj (IJR 1976:1:32)
por tia kunvoko validas la samaj eroj kiel cititaj en paragrafo 10, escepte erojn 1 kaj 4 (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:3)
se tiuj leĝoj ne fiksas escepton (IJR 1977:1:12)
tiu ĉi formo estas ne tre necesa escepto el regulo (Z) (PIV 247)
tiu regulo ne suferas esceptojn (PIV 1043)

eskap/ (PIV 248)
eskapi (r) (ntr): 1) liberigi sin de tio, kio katenas (PIV 248)
eskapi el malliberejo (PIV 248)

esplor/ (PIV 36). Vidu ankaŭ: ekspertiz/, ekzamen/, enket/
esplori (r) (tr): 5) fari la necesajn pridemandojn kaj enketojn, por ke afero povu esti juĝata (PIV 249)
esploristo: 2) enketjuĝisto (PIV 249)
antaŭesploro (IJR 1967:1(2):14)
en la antaŭprocesa esplorprocedo kaj dum la kortuma proceso (L) (IJR 1983:2:12)
en la tempo de la esplor-procedo (L) (IJR 1982:1:9)
enketa juĝisto (PIV 239), esplorjuĝisto (IJR 1968:2(7):6)
esplori akuziton (PIV 249)
esplorprocedo (L) (IJR 1982:1:9)
kriminaljura esploro (L) (IJR 1983:2:8)
la advokato estas nomata ankaŭ ĉe la antaŭesploro kaj povas ĉeesti la enketojn (IJR 1967:1(2):14)
la juĝistoj bone esploru, kaj, se montriĝos, ke la atestanto estas malvera ... (PIV 249)

establ/ (PIV 251)
establi (r) (tr): fondi kaj aranĝi organizon, por ke ĝi povu funkcii kaj daŭri (PIV 251)
establi firmon (PIV 251)
establi komisionojn (IJR 1976:1:18)
establi negocon (PIV 251)

estr/ (PIV 251)
estraro: organo, kun limigita nombro da anoj, elektita de la konsilantaro aŭ de la asembleo de ia organizaĵo, kun plenumaj taskoj (PIV 252)
la estrarano de Uno [UN] (PIV 252)
la studentoj eniris en la elektitajn estradorganojn (Nederlando 1980, p. 15)
malŝarĝo de la Estraro pro la financa gvidado (Esperanto 1971:7/8:125)
plivastigi la estraron (Esperanto 1969:9:139)
ŝtatestro (Nederlando 1980, p. 4)

evikci/ (PIV 256)
evikcii (r) (tr): senigi je la posedo de bonafide akirita havo (PIV 256)
konfisko de tuta aŭ aparta havaĵo de la evikciito de ŝtataneco (IJR 1967:4(5):11)
perdo de la ŝtataneco povas esti ankaŭ per evikcio, se la persono restas kontraŭjure en eksterlando (IJR 1967:4(5):10)

# F

fakt/ (PIV 261)
oni devas antaŭe ekkoni ĉiujn faktojn de la afero (PIV 261)
se la faktaro estas komplete klarigita (IJR 1969:2(10):11)

fakultat/ (PIV 262)
fakultato pri juro (PIV 262)

fakultativ/ (PIV 262)
fakultativa, libervola (Aktualaj 62)
fakultativa protokolo (IJR 1976:1:11)

fals/ (PIV 265)
falsofari: elfari falsan dokumenton, subskribon, daton, ciferojn ks (PIV 265)
falsado (IJR 1982:1:25)
falsigado de pruvdokumentoj (Monato 1987:9:7)

famili/ (PIV 265)
familia juro (L) (IJR 1982:1:4)
pagi certan sumon resp. renton al la postrestintaj familianoj (IJR 1976:2:13)

far/ (PIV 267)
dolo estas donita, se la farinto agis kun scio kaj volo (IJR 1981:2:26)

favor/ (PIV 271)
fari testamenton favore al ... (Esperanto 1973:12:216)
favorigito (en asekura juro) (IJR 1979:1:25)

federaci/ (PIV 273)
federacio (r): 1) grupiĝo de ŝtatoj, konsistiganta apartan internacian unuon, kiu supermetiĝas al la anoj-ŝtatoj, kaj ekskluzive posedas la eksteran suverenecon, 2) daŭra kungrupiĝo de

pluraj sindikatoj, sportaj asocioj ktp. (PIV 273)
federacia: rilata al tia politika sistemo, kiu rezervas al la superŝtato la ĉefajn eksterajn aferojn (PIV 273)
federaciismo: politika sistemo aŭ doktrino, favoranta la formadon de federacioj (PIV 273)
federaciisto: ano de federaciismo (PIV 273)
ĉiuj justicaj organoj (t.e. la kortumoj) estas federaciaj (IJR 1977:1:10)
federacia polico (PIV 273)
federacia respublika (PIV 919)
la federacia parlamento sole povas fari leĝojn pri ... (IJR 1981:1:3)
Usono, Svislando, Kanado estas federacioj (PIV 273)

federal/ (PIV 273)
federala (r): 2) en Usono, tia, ke ĝi koncernas la centran registaron kaj ne dependas de la administracioj de ĉiu unuopa ŝtato (PIV 273)
federala leĝo (PIV 273)
federala policio (PIV 273)

ferm/ (PIV 277)
fermi la landlimojn al la trafiko (PIV 277)
li lin fermis en karceron (PIV)
pasintece la popolaj kongresoj de Ĉinio pritraktis siajn aferojn grandparte ferme, sed en 1988 la Sepa Popola Kongreso malfermis al ĵurnalistoj preskaŭ siajn tutajn programojn escepte de elektado de ŝtatgvidistoj (Monato 1989:5:19)
persekutate li enfermiĝis en la kelo (PIV 277)
traktado de la enfermitoj (IJR 1985:1:30)

feŭd/ (PIV 279)
feŭdo (r): unu el la tri formoj, la plej ofta, de la mezepoka proprieto: bieno, kies uzufrukto estis koncedita al vasalo, kaj kiu estas ŝarĝita de servoŝuldo al la koncedinta nobelo (PIV 279)
enfeŭdigi: provizi per feŭdo (PIV 279)
feŭda: rilata al feŭdo (PIV 279)
feŭdeco: aparta karaktero de feŭda proprieto (PIV 279)
feŭdestro: nobelo koncedinta feŭdon (PIV 279)
feŭdi (tr): doni kiel feŭdon (PIV 279)
feŭdismo: politika kaj ekonomika sistemo, bazita sur la rilatoj inter vasaloj kaj feŭdestroj, estigataj de feŭda terposedo (PIV 279)
feŭdmastro: feŭdestro (PIV 279)
feŭdrajto: rajto de nobelo disponi feŭde pri terpeco (PIV 279)
feŭdulo: vasalo ricevinta feŭdon (PIV 279)
en realaĵo ĉiu feŭda bieno estis vera malgranda sendependa ŝtato (Aktualaj 14)
feŭda bieno (PIV 279)
feŭda juro (PIV 279)
feŭda sinjoro (PIV 279)

fianĉ/ (PIV 280)
fianĉaj ringoj (IJR 1983:1:31)

fid/ (PIV 280)
ĉiu traktato efikanta ligas la partiojn kaj estas plenumenda de ili bonfide (IJR 1969:2(10):26)

fideikomis/ (PIV 281)
fideikomiso (r): posedaĵo, bieno, monsumo ks, kiun oni transdonas, heredigas ks al unu fidinda persono, por ke tiu uzu ĝin profite nur al alia difinita persono (PIV 281)
fideikomisulo: persono, kiu nominale proprietas fideikomison (PIV 281)
fideikomisa substituto (IJR 1975:1:14), fideikomisaria substitucio (IJR 1975:1:5)
fideikomiso estas malpermesita (IJR 1975:1:22)

fidel/ (PIV 281)
malfidela: ne plenumanta siajn promesojn (PIV 281)

fiks/
gvidantoj de fiksaj delegacioj al internaciaj organizaĵoj (IJR 1981:1:36)
la konstitucio fiksas en artikolo 92, ke ... (IJR 1969:2(10):10)
la limo estas facile fiksebla (Aktualaj 25)
sub la kondiĉoj fiksitaj de la Asembleo de UN (Aktualaj 62)

fin/ (PIV 285). Vidu ankaŭ: definitiv/
Fina Akto de Helsinki (L) (IJR 1977:1:19)
finfarita krimo (IJR 1982:2:4)
instanco, kies decido estas fina (L) (IJR 1984:2:9)
la projekto, publikigita tuj post la finiĝo de la konferenco, ... (L) (IJR 1985:2:3)

fingr/ (PIV 286)
fingropremaĵo (Monato 1985:6:6)
lasi fingrospurojn (Monato 1987:9:6)

firm/ (PIV 288)
firmo (r): 1) komerca entrepreno, 2) nomo, sub kiu tia entrepreno estas leĝe registrita (PIV 288)
erolivera (subkontrakta) firmao (Monato 1988:12:12)
kontraktaj firmaoj (Heroldo 1982:3:3)

firma/ (PIV 288), vidu: firm/

fisk/ (PIV 288)
fisko (r): 1) ŝtata trezorejo, 2) ŝtata administracio, kies tasko estas la enkasigo de la impostoj (PIV 288)
por la bono de la fisko (IJR 1968:1(6):13)

flank/ (PIV 291)
la klaso de la ordinaraj apudflankuloj estas la onkloj, onklinoj kaj unugradaj kuzoj (IJR 1966:1:31)

**fond/** (PIV 301)
fondi (r) (tr): 3) krei kaj aranĝi (institucion) (PIV 301)
fondaĵo: establejo kreita por speciala, ordinare socia, celo, kaj provizita per sufiĉa kapitalo aŭ rento por povi daŭre funkciadi (PIV 301)
fondi lernejojn (Z) (PIV 301)
fondi societon (PIV 301)
fondiĝa dokumento (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:4), fondiĝ-dokumento (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:2)
fondkunveno (IJR 1967:1(2), kovrilo p.2), fondo-kunveno (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:4)
fondotago (Eŭropa Dokumentaro 1983:3, Statuto:1)
la elekto de kvar pliaj vicprezidantoj okazas plej frue unu monaton post la fondo-kunveno (Eŭropa Dokumentara 1983:3, Statuto:4)
rezerva fondaĵo (Esperanto 1975:6:105)

**fondus/** (PIV 302)
fonduso (r): kapitalo destinita por aparta, difinita celo (PIV 302)
strikfonduso: kapitalo, amasigita de sindikato, por ebligi al ties anoj vivteni sin dum strikado (PIV 302)
amortiza fonduso (PIV 302)
li testamentis fonduson por subtenado de la E-a movado (PIV 302)
starigi fonduson por la donaco de lernolibroj al lokaj bibliotekoj (Esperanto 1989:5(1001):98)

**font/** (PIV 302)
jura fonto (IJR 1984:2:26), fonto de juro (IJR 1967:1(2):23)
la leĝofontoj rilate al la sociaj tribunaloj (IJR 1969:2(10):10)

**form/** (PIV 304)
kontraktformo (IJR 1967:4/5(5): 18)
per verdikto la testamento povas esti nuligata, se ĝi ne estas farita en laŭlega formo (IJR 1975:1:11)

**formal/** (PIV 306)
formala (r): 3) farita laŭ ceremonia formo, 4) plenprecize esprimita, en preciza formo, plenforma, nepra (PIV 306)
el formale-jura vidpunkto (L) (IJR 1981:2:8)
juraj formalaĵoj (IJR 1977:1:34)
leĝo en formala senco (IJR 1984:2:29)
pro formalaj kaŭzoj (IJR 1978:1:36)
pro manko de aliaj formalaĵoj iu ajn interesulo rajtas nevalidigi la testamenton (IJR 1975:1:18)

**fort/** (PIV 307)
doni al la leĝoj retroaktivan forton (IJR 1968:1(6):4)
eksterhoma forto: superforto, kiu neebligas la plenumon de kontrakto) (PIV 307)
kiam forto ordonas, leĝo pardonas (Z) (PIV 307)
kiu havas la forton, havas la rajton (Z) (PIV 307)
la deviga forto de la traktato (IJR 1981:1:27)
la kondamnitaj perfortintoj, post nur okmonata karcero, estas jam denove liberaj (Monato 1989:1:15)
la verdikto fariĝis leĝoforta (IJR 1968: 1(6):12)
neperforta solvado de konfliktoj (Esperanto :6:111)
perforta retenado (IJR 1983:2:19)
perfortoj kontraŭ policoj (IJR 1982:1:27)
perfortoj sekvitaj de morto (IJR 1982:1:27)
por tiu, kiu rekomendas la perfortan renverson de la registaro de Usono, aŭ kiu estis kondamnita pro perforta krimo (IJR 1978:3(8):15)
sed post du monatoj, kiam la verdikto fariĝis leĝoforta, ... (IJR 1968:1(6):11)
seksa perforto (L) (IJR 1982:1:16), seksperforto (IJR 1982:1:20)
supera forto (vis major) (IJR 1976:2:26)
vendo dum perforta plenumado (IJR 1967:4/5(5):18)

**forum/** (PIV 309)
Forumo (r): 1) placo de antikva Romo, kie la popolo pritraktis la publikajn aferojn (PIV 309)

**frajt/** (PIV 312)
internaciaj frajtleteroj (Monato 1987: 10:20)

**frat/** (PIV 314)
geedziĝo inter duongefratoj (L) (IJR 1966:1:23)

**fraŭd/** (PIV 315)
fraŭdi (r) (tr): trompoŝteli iun, ne pagante al li tion, kio estas leĝe ŝuldata, aŭ ne donante tion, al kio li leĝe havas rajton (PIV 315)
defraŭdi, prifraŭdi (tr): ruze, ŝtelume forpreni ion, kion oni ne rajtas preni (PIV 315)
de la heredaĵo la konkubino defraŭdis la juvelojn (PIV 315)
defraŭdi konfiditan monsumon (PIV 315)
fraŭdi la ŝtaton pri siaj impostoj (PIV 315)
la notario fraŭdis lin je parto el liaj rentoj (PIV 315)
oni kulpigis la filon pro valutodefraŭdo kaj enkarcerigis lin en koncentrejo (Monato 1988:2:23)

**frenez/** (PIV 317)
freneza (r): 1) (iu) perdinta la prudenton pro mensa malsano (PIV 317)
frenezeco ekzistis en la momento de la krimo (IJR 1982:1:21)

**frukt/** (PIV 321), vidu: uz/ (fruktus/)

**fuzi/** (PIV 327)
fuzio (r): 2) kunfandiĝo de asocioj, societoj, kompanioj ktp. (PIV 327)

## G

**garanti/** (PIV 332)
garantii (r): 1) (ntr) preni sur sin la respondecon de alia persono pri io aŭ iu (PIV 332)
garantiaĵo: objekto aŭ monsumo, asignita por konformi la akceptitan respondecon, kaj akirota de la kontraŭulo en okazo de neplenumiĝo de la promeso (PIV 332)
garantianto: tiu, kiu garantias (PIV 332)
garantidoni (tr): doni kiel garantiaĵon (PIV 332)
garantipruntisto: tiu, kiu profesie pruntas monon kontraŭ garantiaĵoj (PIV 332)
garantiulo: persono transdonita al iu, por garantii per sia vivo la plenumon de kontrakto ktp. (PIV 332)
artikolo 8. en la Konstitucio garantias la rajton pri heredo (IJR 1967:1(2):2)
ekzekuti garantiulojn (PIV 332)
la garantioj montriĝis poste senefikaj (Aktualaj 100)
la individuaj garantioj (pri la sekureco de ĉiu civitano) (PIV 332)
la konstituciaj garantioj (pri la rajtoj de nacio) (PIV 332)
li havos la rajton ĉesigi la garantiadon, avertinte min 2 jarojn antaŭe (Z) (PIV 332)
meti kiel garantiaĵon (PIV 332)
ne prenu garantiaĵe veston de vidvino (PIV 332)
ni pruntas monon, donante garantiaĵe niajn kampojn (PIV 332)
oni prenos kiel garantiaĵon la bovon de la vidvino (PIV 333)
preni de iu garantiaĵon (PIV 861)
preni garantiulojn (PIV 332)
redoni garantiaĵon (Z) (PIV 332)
sur garantidonitaj vestoj ili kuŝas (PIV 332)

**genocid/** (PIV 339)
genocido (r): sistema ekstermo de tuta gento (PIV 339)
genocido estas difinita unufojon por ĉiam kiel krimo de internacia juro (L) (IJR 1969:2(10):6)
la kultura genicide estis forĵetita per 25 voĉoj kontraŭ 16 favoroj (L) (IJR 1969:2(10):4)

**glos/** (PIV 347)
gloso (r): klarigo de la senco de neklara, arkaika aŭ nova vorto (PIV 347)
glosatoroj aŭ glosfarantoj kaj postglosatoroj aŭ postglosfaranto (IJR 1982:1:31)

**grav/** (PIV 355)
grava (r): 2) plena de danĝero aŭ doloro (PIV 355)
dola homicido sub gravigaj cirkonstancoj (L) (IJR 1983:2:11)
esti grave vundita (PIV 355)
grava vundo (PIV 355)
gravaj ofendoj (IJR 1982:1:25)
la emociaj statoj konstituas nur malgravigon de la delikto (IJR 1982:2:6)
malpli gravaj ofendoj (IJR 1982:1:25)
negravaj lezoj (IJR 1982:2:4)

## Ĝ

**ĝeneral/** (PIV 365)
ĝenerala (r): rilatanta senescepte al tuto aŭ al la plej granda parto el personoj aŭ objektoj; neaparta, neindividua (PIV 365)
en ĝeneralo estas konstateble, ke ... (IJR 1968:2(7):14)
ĝenerala amnestio (PIV 365)
ĝenerala kunveno (PIV 365), Ĝenerala kunveno (Scienca Mondo 1983:1:27), ĝenerala kunsido (IJR 1968:3(8):12)
ĝeneralaj kaj specialaj kortumoj (IJR 1977:2:36)
ĝia supera organo estas la Ĝenerala kunveno, kiu elektas la prezidanton (Scienca Mondo 1983:1:27)
la plej supera organo de la societo estas la ĝenerala kunsido (IJR 1968:3(8):12)

**ĝir/** (PIV 367)
ĝiri (r) (tr): 1) meti sur la dorsa flanko de bilo, kambio aŭ ĉeko, subskribon per kiu oni cedas ĝin kaj ĝian valoron al citita persono aŭ al ĝia prezentonto, 2) transpagi iun sumon el sia konto en la konton de iu alia (PIV 367)
ĝiraĵo: la ĝirita papero aŭ sumo (PIV 367)
ĝiranto: tiu, kiu ĝiras (PIV 367)
ĝirato: la havonto de ĝirita papero aŭ sumo (PIV 367)
ĝirilo: formulpapero por transpagi sumon aŭ ĉekon (PIV 367)
ĝiri al iu kambion (= endosi) (PIV 367)

## H

**hav/** (PIV 376)
havi (r) (tr): 2) posedi, disponi kiel propraĵon ion konkretan (PIV 376)
agoj kontraŭ la havaĵaj rajtoj (IJR 1983:2:21)
akiri havaĵajn rajtojn (IJR 1984:2:7)
domo kaj havo estas heredataj post gepatroj (PIV 800 sub patr/)

ekskluziva havaĵo (IJR 1979:1:12)
geedzeca havaĵkomuneco (IJR 1966:1:18), geedzeca havaĵ-komuneco (IJR 1966:1:19)
konfisko de la tuta bonhavo (Monato 1985:9:19)
oni enkondukis la principon de la posedkomuneco de la geedzoj pri la havaĵo akirita dum la periodo de la geedzeco (IJR 1969:1(9):17)
posedhavo (Kontrakto 1937, p.22)
regas dum la geedzeco strikta aparteco de havaĵo (IJR 1966:1:17)
sur la tereno de la geedzeca havaĵrajto (IJR 1966: 1:18)

**hered/** (PIV 385). Vidu ankaŭ: testament/
heredi (r) (tr): 1: laŭleĝe ricevi propraĵon post mortinto (PIV 385)
hereda: 1) akirita per heredo, 2) rilata al heredaĵo (PIV 385)
heredaĵo: tio, kion oni heredas (PIV 385)
heredanto: tiu, kiu heredas (PIV 385)
herede: per, por, kiel heredaĵo (PIV 385)
heredeco: 1) kapablo fariĝi heredanto (PIV 385)
heredigi: 1) (ion al iu) transdoni herede, 2) (iun pri io) fari, ke iu heredu (PIV 385)
kunheredi (tr): heredi divide kun iu, aŭ iuj (PIV 385)
senheredigi: senigi iun je la atendita heredaĵo (PIV 385)
universala heredanto: tiu, al kiu estas testamentita la tuto de la heredaĵo (PIV 385)
antaŭ la morto de la heredigranto (IJR 1975:1:6)
bonulo heredigas la nepojn (PIV 385)
deviga parto de la heredaĵo (L) (IJR 1975:1:28), devigita parto (IJR 1967:1(2):5), laŭleĝa heredkvoto (IJR 1975:1:17), leĝa minimumo (IJR 1975:1:23), leĝoparto (IJR 1975:1:6), minimuma kvanto (IJR 1975:1:6), minimuma kvoto (IJR 1975:1:17), rezervita parto (IJR 1966:1:16)
dividi heredon kun fratoj (Z) (PIV 199)
divido de la heredaĵo (IJR 1975:1:17), interdivido de la heredaĵo (IJR 1975:1:14)
ĝeneralaj reguloj de prihereda juro (IJR 1967:1(2): 2), juro de heredo (IJR 1967:1(2):2)
hereda bieno (Z) (PIV 385)
hereda domo (PIV 385)
hereda donaco (Z) (PIV 385)
hereda imposto (IJR 1979:1:24), heredimposto (IJR 1979:1:16)
hereda juro (IJR 1975:1:1)
hereda kontrakto (IJR 1975:1:6, dif.), heredokontrakto (IJR 1975:1:18), prihereda kontrakto (IJR 1967:1(2):5)
hereda leĝo (IJR 1975:1:9), leĝo pri la Heredo (IJR 1975:1:12), Leĝo pri Heredado (IJR 1966:1: 22)
heredaĵadministranto (IJR 1975:1:1), heredaĵplenumanto (IJR 1975:1:1), ekzekutoro (IJR 1975:1:1), testamentplenumanto (IJR 1975: 1:1)
heredaĵplenumanto (IJR 1975:1:1)
hereddisputo (IJR 1977:2:42)
herede aparteni al iu (Z) (PIV 385)
heredorajto (IJR 1977:1:34), rajto al heredo (Monato 1985:5:19), rajto pri heredo (IJR 1967:1(2):2)
Karolo estas jam senheredigita (Z) (PIV 385)
kodicilo estas deklaro pri la lasta volo, kiu ne enhavas nomigon de heredonto (IJR 1975:1:6)
kun sia tuta posedo kaj heredaĵo (Z) (PIV 385)
kunheredanto (IJR 1967:1(2):20)
kverelegi pri la disdivido de la heredaĵo (Esperanto 1975:11:185)
la hereda sekvado en la vira linio finiĝis per la morto de la Reĝo Vilhelmo III (Nederlando 1980, p. 5)
la validigo de priheredaj pretendoj okazas en la heredaĵa proceso (IJR 1967:1(2):7)
laŭleĝa heredanto (IJR 1975:1:17)
laŭleĝa heredokvoto (IJR 1975:1:17)
laŭleĝa heredordo (IJR 1977:2:26)
legitimi sian heredontecon pri la trono (PIV 624)
li diris sian opinion pri hereddisputoj (IJR 1977:2:42)
li disipis post patro heredon (PIV 195)
necesaj heredantoj havas la rajton je parto de heredaĵo pri kiu heredigranto ne povas disponi (IJR 1975:1:23)
nomigo de heredaĵ-administranto (IJR 1975:1:5), heredaĵadministranto (IJR 1975:1:1)
per sia testamento li heredigis monon al UEA (Heroldo 1986:1:4)
post la morto de la heredigranto, ... (IJR 1975:1:14)
postlasi heredaĵon (PIV 618)
postuli interdividon de la heredaĵo (IJR 1975:1:14)
pretendulo pri la heredaĵo (IJR 1967:1(2):7)
prihereda kapablo (IJR 1967:1(2):3)
prihereda kontrakto (IJR 1967:1(2):5)
rajto pluvivi kun nepartigita heredaĵo (IJR 1979: 1:15)
restis inter la Izraelidoj ankoraŭ sep triboj, al kiuj ankoraŭ ne estis disdividita ilia hereda posedaĵo (Biblio. Josuo 18:2)
rezervitaj posedaĵoj (kiujn homo ne rajtas forpreni de siaj heredontoj (PIV 923), rezervitaj heredaĵ-kvotoj (IJR 1975:1:20)
senigi la laŭlegajn heredantojn de heredaj rajtoj (L) (IJR 1975:1:27)
ŝi heredigis al la Asocio domon kaj akciaron (Esperanto 1989:4:61)
transdoni herede al iu (Z) (PIV 385)

tribunala proceso pri la heredaĵo (IJR 1977:2:26)
universala heredonta persono (IJR 1975:1:11)

**herez/** (PIV 385)
herezo (r): 1) doktrino aŭ opinio, kontraŭa al iu religia dogmo kaj tial kondamnita de iu eklezio (PIV 385)
ĉefherezulo: homo, kiu iniciatis herezon (PIV 385)
herezulo: homo, kiu kredas aŭ predikas herezon (PIV 385)
en la mezepoko oni brulmortigis la herezulojn (PIV 385)
la herezulojn oni portas sur ŝtiparon (PIV 1071 sub ŝtip/)

**hipotek/** (PIV 393)
hipoteko (r): garantia rajto, starigita laŭleĝe, super nemovebla havo kaj asimilitaj, por sekurigi al kreditoro repagon de sumo ŝuldata de la posedanto de tiu havo (PIV 393)
hipoteka: rilata al hipoteko (PIV 393)
hipoteki (tr): ŝarĝi ĝi nemoveblan havon per hipoteko (PIV 393)
doni hipotekon super io (PIV 393)
doni hipotekrajton por sekurigi la kreditorojn (IJR 1977:1:31)
hipoteka akto (PIV 393)
hipoteki sian loĝejon (IJR 1979:1:12)
hipoteko donas realan rajton super konstruaĵo, bieno ks. (PIV 905)
la plimulto de tiaj proprietuloj donis hipotekrajton por sekurigi la kreditoron (IJR 1977:1:31)
li hipotekis ĉiujn siajn domojn (PIV 393)
preni hipotekon super io (PIV 393)

**holding/** (PIV 396)
holdingo (r): anonima kompanio, kiu mastras, dank' al siaj financaj partoprenoj, difinitan grupon da samnaturaj entreprenoj (PIV 396)

**holograf/** (PIV 396)
holografo (r): testamento, skribita tuta de la mano de la testamentinto (PIV 396)

**honor/** (PIV 398)
krimo punita de la leĝoj per korpaj malhonorigaj punoj (IJR 1982:2:15)
malhonorigaj punoj (IJR 1982:2:15)
publika senhonorigo (IJR 1984:2:35)

**huligan/** (PIV 401)
huligano (r): ano de bando de junaj stratulaĉoj (PIV 401)
malica huliganismo (L) (IJR 1982:1:16)

# I

**ideal/** (PIV 408)
la tuta havaĵo aŭ ideala (frakcia) parto de ĝi (IJR 1975:1:13)
proprieto pri idealaj partoj (IJR 1977:2:25)

**impediment/** (Ne en PIV)
ĉi tiu impedimento rilatas al la leĝaj supozoj pri patreco (IJR 1966:1:17)
la impedimentoj trafas la du seksojn tute egale (IJR 1966:1:9)

**imperi/** (PIV 418)
imperio (r): 1) granda regno, kiu estas bazita sur militforto, entenas ordinare diversajn venkitajn popolojn, kaj kies estro sin rigardas kiel superan al la reĝoj, 2) la tuto de granda regno kun siaj kolonioj (PIV 418)
imperiestro: plej alta titolo inter la regnestroj (PIV 418)
akiri al si gravan kolonian imperion (PIV 418)
la Brita imperio (PIV 418)
la Reĝo de Granda Britujo kaj imperiestro de Hindujo (PIV 418)
la Roma, Japana, Germana, Aŭstra imperio (PIV 418)
la romana imperiado iam etendiĝis super Anglujo (PIV 418)

**imperium/** (Ne en PIV)
"Imperiumo", kompetenteco (IJR 1978:1:29, kaj 36, dif.)

**implic/** (PIV 418)
implici (r) (tr): logike enteni, enhavi en si ion ne formale esprimatan (PIV 418)
malimpliciti (tr): komplete kaj klare esprimi elementon de tuto (PIV 418)
en la koncepto de demokrateco estas implicitaj du ideoj (L) (Esperanto 1973:12:201)
estas prudente malimplici ĉiujn klaŭzojn de kontrakto (PIV 418)
implicita kondiĉo (PIV 418)
tio neniel implicis, ke ... (L) (IJR 1967:2(3):9)

**impost/** (PIV 419)
imposto (r): deviga kontribuo de regnanoj al la ĝeneralaj bezonoj de ŝtato, urbo ktp. (PIV 419)
imposteviti: ruze atingi, ke oni ne pagu imposton (PIV 419)
imposti (tr): leĝe meti imposton sur iun aŭ ion (PIV 419)
impostisto: kolektisto de impostoj (PIV 419)
laŭenspeza imposto: imposto, bazita sur la sumo de ies enspezoj dum difinita tempo (PIV 419)
limimposto: dogano 1)
nerektaj impostoj: impostoj enkalkulitaj en la

prezoj de varoj kaj sekve ne rekte pagataj de la konsumantoj (PIV 419)
rektaj impostoj: impostoj pagendaj senpere al la ŝtato, urbo ks. (PIV 419)
senimposta: ne submetata al imposto (PIV 419)
terimposto: imposto super la posedata tero (PIV 419)
enspezimposto (Monato 1988:2:8), enspez-imposto (IJR 1976:2:37)
hereda imposto (IJR 1979:1:24), heredimposto 1979:1:16)
heredimposta leĝo (Esperanto 1971:1:19)
imposta klaso 2 (IJR 1979:1:18)
imposta malobservo (IJR 1984:2:17)
impost-evitado (Monato 1989:4:12)
imposti alkoholaĵojn (PIV 419)
imposto super la aŭtomobiloj (PIV 419)
imposto sur la domposedantoj (PIV 419)
impostoj je enspecoj, profito kaj kapitalo (Nederlando 1980, p. 24)
imposto-paganto (Scienca Mondo 1983:1:9)
kompani-imposto (Monato 1988:2:8)
la imposto je varoj kaj servoj pliiĝos de 10% ĝis 33% ekde julio 1989 (Monato 1989:5:8)
la salajroj ne estas imposteblaj (UN 28)
oni devas pagi enspez-imposton koncerne kompenson por jam suferita perdo (IJR 1976:2:37)
Salomono prenis imposton de la tuta Izraelo (PIV 447 sub Izrael/)
valordona imposto (Nederlando 1980, p. 24)

**imput/** (PIV 420)
imputi (r) (tr): 1) atribui sumon al iu konto, 2) atribui ion al la dividoparto de iu, 3) atribui al iu la prirespondecon de io (PIV 420)
imputebleco (IJR 1983:1:35)
imputi al iu krimon (PIV 420)
imputi la akcidenton al la mallerteco de la kondukisto (PIV 420)
la imputebleco de tiu konduto (IJR 1983:1:35)
neimputebleco estas donita, se iu ne estas kapabla kompreni la kontraŭjurecon de sia ago aŭ konduti laŭ tiu kompreno: junaĝo, mensa malsano (IJR 1981:2:27)
sen imputo de la kaŭzo al ies konduto (IJR 1976: 2:33)

**imun/** (PIV 420)
imuna (r): 2) ne respondeca antaŭ la leĝo, ŝirmita per leĝa privilegio (PIV 420)
imuneco: 2) stato de imuna persono (PIV 420)
ĝui imunecon en alilandaj jurisdikcioj (L) (IJR 1984:2:11)
havi rajton je korpa imuneco (IJR 1981:1:16)
la juĝista imuneco (IJR 1968:2(7):12)
la profesia imuneco de deputitoj (IJR 1981:2:25)
levi la imunecon de parlamento (PIV 420)

**incendi/** (PIV 421)
incendio (r): granda brulo, kiu atakas konstruaĵon kaj minacas aliajn (PIV 421)
asekuro kontraŭ incendio (PIV 421)
intencaj incendioj (IJR 1982:1:27)
krima domincendio (L) (IJR 1982:1:14)

**incest/** (PIV 421)
incesto (r): seksrilatoj inter proksimaj samfamilianoj = sangadulto (PIV 421)
la malpermeso de la incesto estas unu el la plej malnovaj tabuoj de la homa genro (PIV 421)
malpermeso de incesto inter sinsekvaj generacioj (IJR 1966:1:5)

**indic/** (PIV 422)
indico (r): 1) konstatebla signo, kiu probabligas ion; = indikaĵo (PIV 422)
indicoj de kulpeco (PIV 422)

**indik/** (PIV 423)
indikaĵoj: konstatitaj faktoj, kiuj probabligas la realecon de la ĉefa fakto kaj estus malfacile klarigeblaj per alia supozo (PIV 423)

**indulg/** (PIV 424). Vidu ankaŭ: pardon/
indulgi (r) (tr): 1) ne severe trakti ies kulpon aŭ pekon; ne severe agi kontraŭ iu erarinta, 2) ne ofendi, montri simpatian respekton al iu, domaĝi (PIV 424)
indulgo: 1) malsevereco, pardonemo, 2) respekta konsidero, moderеco kontraŭ iu aŭ io (PIV 424)
forta kolero devas esti punata, ĉar se vi ĝin indulgos, ĝi fariĝos ankoraŭ pli granda (Z) (PIV 424)
la Federacia Prezidanto povas praktiki sian indulgan rajton nur je peto de la asembleo, kiu decidis la akuzon (IJR 1981:2:19)
oni devas lernigi la infanojn montri indulgon al la maljunuloj (PIV 424)
peti indulgon de la juĝistoj (PIV 424)
se malvirtulo estas indulgata, li ne lernas justecon (PIV 424)
senindulga kondamno (PIV 424)

**infan/** (PIV 425). Vidu ankaŭ: aĝ/
eksteredzeca filo (PIV 216), ekstergeedza infano (L) (IJR 1966:1:24), eksterleĝa infano (Esperanto 1975:6:103), geedzecaj kaj ekstergeedzecaj infanoj (IJR 1975:1:12), infano naskita dum la geedzeco aŭ ekster la geedzeco (L) (IJR 1966:1:24), laŭleĝa infano (L) (IJR 1966:1:24) legitima infano (IJR 1967:3(4):21), leĝa infano (PIV 624), needzeca infano (IJR 1967:4/5(5):7), nelegitima infano (IJR 1979:1:16)

infanjuro (IJR 1983:1:32)
Leĝo pri la Rilatoj inter la Gepatroj kaj Infanoj (L) (IJR 1966:1:22)

**inkluziv/** (PIV 429)
en ĉi tiu konekso la vorto "armeo" inkluzivas ... (Fina Akto 18)
entute 17 ŝtatoj, inkluzive Usonon, aliĝis al tiu Konvencio (IJR 1967:2(3):14)

**inkvizici/** (PIV 430)
Inkvizicio (r): 1) eklezia institucio kaj tribunalo, starigita por serĉi kaj juĝi herezulojn kaj sorĉistojn, kiujn ĝi punis helpe de la civila povo per brulmortigo, 2) inkvizicio: speco de proceduro, uzita de tiu tribunalo, kaj lasanta al la akuzito nek advokaton, nek eblon alvoki atestantojn (PIV 430)
esplora aŭ inkvizicia principo (Aktualaj 64)
Ĝiordano Bruno estis bruligita de inkvizicio pro sia teorio (Monato 1988:2:24)
inkviziciaj torturoj (PIV 430)

**inkvizitor/** (PIV 420)
inkvizitoro (r): membro de Inkvizicia tribunalo (PIV 430)

**insolvent/** (PIV 431)
insolventa (r): ne solventa (PIV 431)

**instal/** (PIV 431)
instali (r) (tr): 1) starigi, meti ion en la destinitan lokon kaj ĝin taŭge aranĝi, por ke ĝi bone funkciu, 2) solene enoficigi, enkonduki en funkcion (PIV 431)
La Konstitucia Kortumo estas instalita kiel ŝtata organo por garantii la konstitucion (IJR 1981:2:10)
la solena instalo de la nova prezidanto de Usono (Monato 1989:3:10)
sole kompetenta estas speciale instalita kortumo, la Administracia Kortumo (IJR 1980:2:24)

**instanc/** (PIV 431)
instanco (r): 1) grado de juĝa povo, 2) aŭtoritato posedanta juĝan aŭ decidan povon (PIV 431)
administracia instanco (IJR 1981:2:12)
apelacii kontraŭ tiaj decidoj al supera instanco (IJR 1985:1:4)
ĉe ĉiu unuainstanca kortumo ekzistas advokataro (IJR 1967:3(4):10)
ĉiuj ŝtataj organoj, kiuj ne estas leĝdonaj, ordinare estas dividitaj en justicajn kaj administraciajn instancojn (IJR 1984:2:31)
decida estis lastinstance, ke la sistemo de la konvencio donis praktikan solvon de la problemo (IJR 1967:4/5(5):15)
instanco, kies decido estas fina (L) (IJR 1984:2:9)
konduki aferon ĝis la plej alta instanco (PIV 431)
kontraŭ ĉiu unuainstanca juĝo krom de la Plej Supera Tribunalo ekzistas speciala apelacia rajto (IJR 1969:1(9):12)
la laŭleĝeco de la nuklea armilo estis traktita en oficiala juĝa instanco (Scienca Mondo 1983:3:18)
la magistrato kaj ĉiuj publikaj instancoj de la urbo akcelas la entreprenon (PIV 431)
la plej alta juĝa instanco (L) (IJR 1983:2:29)
reskripto de administracia instanco (IJR 1981:2:12)
tribunalo de apelacia instanco (PIV 431)
tribunala de unua instanco (PIV 431)

**instig/** (PIV 431)
instiganto: tiu, kiu instigas (PIV 431)
instiganto de ribelo (IJR 1979:2:5)
instigo al farado de krimo (Aktualaj 85)
la instiganto de la komploto (PIV 431)

**instituci/** (PIV 432)
institucio (r): daŭra publika aŭ privata organizo, fondaĵo (PIV 432)
esti infano dum tutelo de prizorga instituto [institucio] (IJR 1967:4/5(5):10)
jura institucio (IJR 1966:1:6)
la neŭtraleca juro estas memstara parto de la internacia juro, respektive institucio de la internacia juro (IJR 1969:1(9):9)
nacia institucio pri statistiko (PIV 432)
sendo de la perpetrinto en fermitan institucion por ne pli ol 5 jaroj (IJR 1982:1:17)
ŝtata institucio por junaj blinduloj (PIV 432)

**institut/** (PIV 432)
instituto (r): nomo de diversaj institucioj, precipe uzata pri altlernejoj, aŭ korporacioj sciencaj kaj artistaj (PIV 432)
instituto de kemio (PIV 432)

**instrukci/** (PIV 432)
instrukcio (r): tuto de la ordonoj kaj klarigoj, ordinare donitaj de superulo al subulo, pri agmaniero aŭ konduko de afero (PIV 432, kp. IJR 1984:2:31)
instrukcii (tr): doni instrukcion (PIV 432)
baldaŭ aperos la instrukcio pri la aplikado de tiu nova leĝo (PIV 432)
doni al ambasadoro sekretan instrukcion (PIV 432)
instrukcii ion al iu (Z) (PIV 432)
nepublikigita instrukcio (L) (IJR 1984:1:20)
ordono, direktivo, instrukcio (IJR 1984:2:31)
sekvi la instrukcion de la ĉefo (PIV 432)

**instrument/** (PIV 432, sed kun alia signifo)
la Konvencio ekvalidis la 12-an de januaro 1951, 90 tagojn post la depono de la 20-a instrumento pri ratifo [ratifiko] (L) (IJR 1969:2(10):4)

**insult/** (PIV 433)
insulti (r): 1) (tr) ofendi per malĝentilaj, maldecaj vortoj (PIV 433)
insulta: entenanta insulton (PIV 433)
insulto: vortoj, per kiuj oni insultas (PIV 433)
insultaj paroloj (PIV 433)
per insulto kaj kolero ne klariĝas afero (Z) (PIV 433)
**integr/** (PIV 434)
integra (r): materie tute kompleta; el kiu oni forprenis nenian parton (PIV 434)
integriĝi: eniĝi en tutaĵon, kiel ke oni komplete fandiĝas en ĝin (PIV 434)
integra parto de la Ĉarto (UN 2)
konservi la integrecon de la lando (PIV 434)
la integreco de deponaĵo (PIV 434)
oni devas antaŭ ĉio integriĝi al sia ĉirkaŭo (PIV 434)
respekti teritorian integrecon de ĉiu el la partoprenantaj ŝtatoj (Fina Akto 9)
**intelekt/** (PIV 434)
intelekto (r): kapablo pensi konceptaĵojn kaj estigi rilatojn inter ili (PIV 434)
intelekta debilulo (PIV 434)
intelekta malfruiĝinto (PIV 434)
intelektaj motivoj (kontraste kun la sentaj) (PIV 434)
la bestoj ne posedas intelekton (PIV 434)
normala intelektkapablo (IJR 1982:2:7)
**intenc/** (PIV 434)
intenci (r) (tr): konscie kaj klare ekvoli fari ion en nedifinita tempo (PIV 434)
intenco: konscia movo de la volo celanta ion (PIV 434)
senintenca: nekonscie, nevole farita (PIV 434)
ĉu vi intencas mortigi min? (PIV 434)
la intenco konstituas la krimon (PIV 556)
senintenca mortigo (PIV 434)
ŝi venis kun la intenco akiri por si postenon (Z) (PIV 434)
**interdikt/** (PIV 435)
interdikto (r): 1) eklezia puno, kiu malpermesas al difinitaj personoj aŭ en difinita loko ricevi la sakramentojn, aŭskulti la meson kaj esti rite enterigitaj, 2) eklezia puno, kiu malpermesas al pastro plenumi siajn sacerdotajn funkciojn (PIV 435)
**interez/** (PIV 436)
interezo (r): 1) kompenso, kalkulita en procentoj, kurante pagenda pro la fruktuzo de fremdaj valoroj, kies kapitalo estas ankaŭ repagenda je fiksita dato; = rentumo, 2) tiu kompenso, rigardata kiel parto de la plusvaloro (PIV 436)
kun interezo de 4 procentoj (PIV 436)
**intern/** (PIV 436)
interna juro (PIV 457)
internigi fremdajn civitanojn en koncentrejon dum milito (PIV 436)
internigo en edukan institucion (IJR 1983:1:36)
internigo en kampadejon (IJR 1985:1:31)
ministrejo pri internaj aferoj (enlandaj) (PIV 436)
nenia interveno al [ne: en] ies internaj aferoj (Monato 1985:5:8)
**interpelaci/** (PIV 437)
interpelacio (r): publika demando farita de deputito en parlamento al ministro, por ricevi klarigon pri la agoj de la registaro (PIV 437)
interpelacii (tr): direkti interpelacion al ministro (PIV 437)
adresi interpelaciojn al la Registaro (Konst. Bul. 12)
mi nun respondos al miaj interpelacintoj (PIV 437)
**interpret/** (PIV 437)
interpreti (r) (tr): 2) klarigi ion dubsencan kaj malfacile kompreneblan (PIV 437)
interpreto: vortoj, per kiuj oni interpretas (PIV 437)
analogia interpretado (IJR 1983:1:36)
ĉiu el la principoj estos interpretataj kuntekste kun la aliaj (Fina Akto 14)
en la interpretado de la Deklaracio (Aktualaj 89)
en la jurliteraturo troviĝis tia interpreto, ke ... (IJR 1968:2(7):5)
en tiaj kazoj de pluraj interpreteblecoj (IJR 1980:1:33)
la Deklaracio povos esti rigardata kiel aŭtoritata interpretado de la Ĉarto (L) (IJR 1968:3(8):3)
pluraj interpreteblecoj (IJR 1980:1:33)
strikta interpreto (IJR 1985:1:17), restrikta interpretado (L) (IJR 1977:2:14)
tio estas duba interpreto de tiu loko en la Biblio (PIV 437)
tiu fundamenta principo de restrikta interpretado en internacia juro (L) (IJR 1977:2:14)
vastiga interpretado (IJR 1985:1:17)
verŝajne la leĝo tie ĉi devas esti donata pli striktan interpreton (IJR 1967:4/5(5):18)
**invest/** (PIV 439)
investi (r) (tr): 1) solene enoficigi (PIV 439)
investi ambasadoron, episkopon, novan direktoron (PIV 439)
**investitur/** (PIV 439)
investituro (r): 1) ceremonio, dum kiu la feŭdestro, ricevinte la omaĝon, oficiale transdonis la feŭdon

al la vasalo, 2) rajto, kiun la mezepokaj reĝoj kaj imperiestroj pretendis, elekti kaj investi la episkopojn kiel en iliajn feŭdojn, tiel en ilian religian oficon (PIV 439)

**invok/** (PIV 440)

invoki (r) (tr): citi, por senkulpigi (PIV 440)
invoki ies ateston (PIV 440)

# J

**je/** (PIV 451)

esti ekzekutita je la postulo de la publiko (IJR 1986:1:3)
ili konfesis je la lasta minuto (IJR 1986:1:13)
la ŝtata funkcio estas dividita je leĝdonado, administracio kaj justico (IJR 1980:1:25)
permeso je komuna impostado (IJR 1979:1:18)
rajto je korpa imuneco (IJR 1981:1:16)
rajto je memdefendo (IJR 1984:1:10)
rompi sian ĵuron de fideleco je la Konstitucio (IJR 1984:1:16)
senkapigi: senigi je la kapo (PIV 480)
viroj atingas pensian rajton je atingo de la 60-a vivjaro (IJR 1983:2:6)

**juĝ/** (PIV 455). Vidu ankaŭ: verdikt/

juĝi (r) (tr): 1) laŭleĝe kaj jure decidi, ĉu iu estas kulpa aŭ ne, prava aŭ ne (PIV 455)
aljuĝi (tr): 1) atribui post juĝado, 2) atribui al tiu konkurencanto, kies prezoj estas plej favoraj, la plenumadon de adjudikita laboro, livero ks. (PIV 455)
juĝantaro: grupo da personoj, al kiu estas komisiita juĝi (PIV 455)
juĝanto: 1) persono, kiu esprimas juĝan opinion, 2) ĵuriano (PIV 455)
juĝdecido: verdikto (PIV 455). (L) (IJR 1978:2:15)
juĝejo: domo, ĉambro, kie oni juĝadas (PIV 455)
juĝistaro: 1) tuto de la juĝistoj en unu lando, provinco ktp., 2) tribunalo (PIV 455)
juĝisto: 1) persono, kies oficiala funkcio estas juĝadi (PIV 455)
juĝo: 1) laŭleĝa esploro de ies kulpeco aŭ praveco, 2) decido, kiu sekvas tian esploron, 3) tuto de la sistemo, per kiu la leĝo estas aplikata al la homoj; = justico (PIV 455)
juĝopovo: jurisdikcio (PIV 455)
aberacio de juĝokapablo (PIV 2 sub aberaci/)
aljuĝado de punsankcioj (IJR 1983:1:35)
arbitracia juĝisto (PIV 455)
ĉefjuĝisto de la plej alta tribunalo (IJR 1980:1:26)
distrikta juĝisto (L) (IJR 1982:1:33)
ekzekucio de la juĝoj de la Konstitucio Kortumo (IJR 1981:2:21)
ekzerigi kiel juĝista rajtigito (IJR 1977:2:39)
enketa juĝisto (PIV 239), esplorjuĝisto (IJR 1968: 2(7):6)
estas nenecese, ke la sumoj troviĝas en la juĝkonkludo, sufiĉas se oni povas trovi ilin en la juĝmotivoj (IJR 1976:2:37)
ili konfidis la solvon de la problemo al la juĝopovo de l'Internacia Kortumo en Hago (Monato 1986:4:7)
juĝa enketo (IJR 1979:2:6)
juĝeja oficisto (Z) (PIV 455)
juĝejdistrikto (IJR 1967:4/5(5):14)
juĝista decido (verdikto) (PIV 169)
juĝista praktiko (IJR 1976:2:25), kortuma praktiko (IJR 1982:2:3)
juĝista testamento (IJR 1975:1:1)
juĝisto, prokuroro, esplorjuĝisto aŭ jura konsultisto (L) (IJR 1967:4/5(5):4)
juĝkomisiono (Esperanto 1975:5:83)
juĝodistrikto: jurisdikcio (PIV 455)
ĵura juĝantaro (ĉe asizo, = ĵurio) (PIV 455)
kiel specialaj juĝejoj funkcias nun nur la militistaj juĝejoj (IJR 1968:2(7):10)
kiujn la Konsilantaro juĝos necesaj (Kontrakto 20)
kondamna juĝo (IJR 1981:2:19)
kondiĉe, ke la partioj libervole submetiĝu al ĝia juĝo (L) (IJR 1976:1:3)
kriminala juĝisto (PIV 582)
la 3 povoj (leĝdona, plenuma kaj juĝa) (Aktualaj 76)
la distriktaj juĝejoj procedas ĉiam kiel unuagrada instanco (IJR 1968:2(7):10)
la financaj rajtoj tute submetiĝas al la libera bonjuĝo de la juĝisto (IJR 1966:1:10)
la juĝista imuneco (IJR 1968:2(7):12)
la juĝista neakordigebleco (= ne rajtas fari alian salajratan laboron) ... por ke estu garantiita eĉ lia tiuflanka nealirebleco (IJR 1968:2(7):12)
la juĝistoj estas krome neeksigeblaj kaj netranslokigeblaj (IJR 1980:1:32)
la juĝpretendo estas prezentita laŭ ĉiuj postuloj de la leĝo (IJR 1969:1(9):18)
la laŭleĝe tiel koncipita principo de la juĝista sendependeco rilatas samtiel al la profesiaj juĝistoj, kiel al la popolaj asesoroj (IJR 1968: 2(7):11)
la nova, ĵus elektita juĝkomisiono konsistas el ... (Esperanto 1989:6:101)
la ordinaraj (ĝeneralaj) juĝejoj havas jurisdikcion en ĉiuj civilaj kaj (escepte la militistajn afer-

ojn) kriminalaj aferoj (IJR 1968:2(7):10)
la perssono suferinta damaĝon povas prezenti juĝpretendon pri kompenso (IJR 1976:1:38)
la plej alta juĝa instanco (L) (IJR 1983:2:29)
la tribunalo aljuĝis al li la bienon, sed ne la urban domon (PIV 455)
la tribunalo aljuĝas la proprieton pri nedividebla domo al unu el la proprietuloj (IJR 1977:1:35)
la tribunalo taksis la juĝokostojn je dek dolaroj (PIV 1081)
la tribunalo volis lin juĝalvoki pro akcepto de ŝmirmono (Monato 1989:4:12)
laŭ prijuĝo de la tribunalo (IJR 1969:1(9):18)
li estis membro de juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj (Esperanto 1984:11:183)
liberiga juĝo (L) (IJR 1978:1:25)
membro de la decida juĝantaro (Z) (PIV 455)
memjuĝado (IJR 1969:2(10):14)
militista juĝejo (IJR 1968:2(7):10)
multestimata juĝistaro (PIV 455)
ne eniru en juĝon kun via sklavo (PIV 455)
oni povas nur admiri la konstantan senpartiecon de liaj juĝdecidoj (PIV 795)
paciga juĝisto (PIV 455)
partia juĝisto (PIV 795)
per tiu efektiviĝas la partopreno de la loĝantaro en la juĝada potenco (IJR 1968:2(7):11)
plene dediĉi al sia juĝista profesio (IJR 1968:2(7): 12)
profesia juĝisto (IJR 1968:2(7):11)
punaljuĝado (IJR 1979:2:5)
senpartieco de la juĝistaro (Aktualaj 88)
senrajta uzado kaj memjuĝado (IJR 1969:2(10):14)
specialaj juĝejoj (IJR 1968:2(7):10)
submetiĝi al juĝista ekzameno (IJR 1967:4/5(5):4)
supera juĝinstanco (IJR 1978:2:35)
tiu juĝo estas aprobita de la Budapeŝta ĉefurba Tribunalo, kiel duainstanca Tribunalo (IJR 1968:3(8):21)
tiukaze la vivtenado povas esti daŭrigata eĉ pli ol tri jarojn laŭ prijuĝo de la tribunalo (IJR 1969:1(9):18)
tri irlandanoj, kiuj en duba kaj debatebla proceso estis juĝita pro terorismo (Monato 1989:3:14)

jur/ (PIV 457)
juro (r): tuto de devigaj reguloj (normoj) kun sankcioj, ordigantaj la rilatojn inter homoj kaj homkolektivoj, kaj difinantaj iliajn rajtojn kaj devojn (PIV 457)
jura: rilata al juro (PIV 457)
juristo: specialisto en la juraj kaj juĝaj aferoj (PIV 457)
kutimjuro: juro bazita sur tradiciaj kutimoj, ne sur skribitaj leĝoj (PIV 457)
administracia juro (L) (IJR 1982:1:4)
aĉetjuro (IJR 1967:4/5(5):14)
anglosaksa juro (IJR 1984:2:17)
ankaŭ sur ceteraj jurterenoj (IJR 1967:1(2):22)
armea kriminala juro (IJR 1982:2:10)
asekura juro (IJR 1979:1:25)
aŭtomatigo de la jura informaserĉa servo (L) (IJR 1983:2:3)
aŭtorrajta juro aŭ, mallonge, aŭtora juro (L) (IJR 1967:2(3):4, dif., p. 5)
civila juro (L) (IJR 1983:2:5), civiljuro (IJR 1976:2:9)
civiljura (IJR 1982:1:30)
civilprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
ĉiu membro de la Eŭropa Konsilantaro devas akcepti la principojn de jurregado (L) (IJR 1981:2:2)
ĉiu natura kaj jura persono (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:2)
civilprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
damaĝkompensa juro (IJR 1976:2:17)
demokrata jura sistemo (L) (IJR 1981:2:9)
difini jurajn sankciojn en konkretaj individuaj kazoj (L) (IJR 1983:2:4)
doni kontentigan eksplikon pri la vera naturo de juro (L) (IJR 1984:1:5)
edzeca juro (PIV 216)
eklezia juro (IJR 1977:2:34)
eklezijura parto de leĝo (IJR 1977:1:2)
el formale-jura vidpunkto (L) (IJR 1981:2:8)
el ĝeneraljura terminologia vidpunkto (IJR 1978: 2:1)
el jur-teknika vidpunkto (L) (Esperanto 1975:5:88)
el teknika-jura vidpunkto (L) (IJR 1982:1:11)
elekta juro (IJR 1983:1:31)
en la jurliteraturo troviĝis tia interpreto, ke ... (IJR 1968:2(7):5)
estas direktodona la patrolanda juro de la testamentinto (IJR 1967:1(2):7)
esti jurvalide kondamnita (IJR 1967:4/5(5):10)
faka-jura periodaĵo (IJR 1984:2:1)
feŭda juro (PIV 279)
financa juro (IJR 1968:1(6):3)
ĝeneralaj juraj principoj (L) (IJR 1978:2:7), ĝeneralaj jurprincipoj (IJR 1967:3(4):4)
ĝeneralaj reguloj de prihereda juro (IJR 1967:1(2):2)
havi la bezonatan spiritkapablon por kompreni la kontraŭjurecon de la ago (IJR 1983:1:38)
havi la saman juran pozicion kiel ... (IJR 1981:2:13)
havi solidan juran bazon por siaj postuloj (IJR 1981:1:32)
hereda juro (IJR 1975:1:1)
hungara juro de heredo (IJR 1967:1(2):2)

infanjuro (IJR 1983:1:32)
interna juro (PIV 457)
internacia juro (Aktualaj 27, dif.)
internacia kriminala juro (Aktualaj 86)
internacia kutimojuro (IJR 1967:3(4):4)
internacia privatjuro (IJR 1983:1:33)
internaciaj privatjuraj demandoj (IJR 1967:4/5(5): 14)
internacijuraj normoj (Scienca Mondo 1983:3:18)
interŝtata juro (IJR 1977:2:34)
islama juro (L) (IJR 1966:1:22)
jura agpovo (IJR 1967:4/5(5):18)
jura branĉo (L) (IJR 1982:1:4)
jura disputo (UN 10)
jura efiko (IJR 1977:2:53), jurefiko (IJR 1981:1:25)
jura fonto (IJR 1984:2:26), fonto de juro (IJR 1967:1(2):23)
jura institucio (IJR 1977:1:6)
jura kibernetiko (L) (IJR 1983:2:2)
jura konsultisto (L) (IJR 1984:2:11)
jura normo (IJR 1984:2:23)
jura persono (IJR 1984:2:15)
jura postulo (IJR 1975:1:18)
jura signifo (L) (IJR 1979:1:7)
jura sistemo (IJR 1984:2:25), jur-sistemo (IJR 1984:1:24)
jura subjekto (IJR 1985:1:2)
jura teorio (IJR 1984:2:23)
jura terminaro (IJR 1983:1:32)
jura terminologio (IJR 1982:1:3)
jurago (IJR 1967:1(2):6)
juraj aspektoj de la multlingveco de EEK (L) (IJR 1977:2:11)
juraj formalaĵoj (IJR 1977:1:34)
juraj studoj (PIV 457)
jurapliko (IJR 1979:2:3)
jurdubo (IJR 1978:2:34)
jurfilozofio (IJR 1983:1:32)
jurhistorio (IJR 1983:1:32)
juristaj profesioj (IJR 1977:2:39)
jurkompara materialo (L) (IJR 1976:2:1)
jurkreaj traktatoj (IJR 1981:1:25)
jurliteraturo (IJR 1968:2(7):5), prijura literaturo (IJR 1968:2(7):10)
jurmedicina scienca (L) (IJR 1986:1:44)
jurnormaj materialoj (IJR 1983:2:3)
jurnormoj (IJR 1981:1:25)
juro de kosma spaco (IJR 1967:3(4):4, dif.)
juro de la maro (IJR 1985:2:5), marjuro (IJR 1985:2:5)
juro de traktatoj (L) (IJR 1976:1:12), traktata juro (IJR 1981:1:40), traktatjuro (IJR 1983:1:34)
juro pri naturmedia antaŭzorgo (Monato 1988:2:13)
jurofendo (IJR 1968:1(6):14)
juro-kemiisto (Monato 1985:11:15)
jurokrea normo estas normo, kiu fiksas la kondiĉojn por la estiĝo de la juraj normoj (IJR 1984:2:26)
juroplenuma normo estas normo, kiu regulas la cirkonstancojn de la efektivigo de sankcioj (IJR 1984:2:26)
juro-principo (IJR 1978:2:40)
jurordo (IJR 1967:4/5(5):16)
jurpraktiko (IJR 1967:4/5(5):14), la praktikado de juro (PIV 857)
jurscienca branĉo (IJR 1975:2:3)
jursciencisto (IJR 1977:2:39), jurscienculo (IJR 1981:2:45)
jursubjekto (IJR 1976:1:46)
jurteoriaj problemoj (IJR 1981:2:12)
kaj la jurkreaj kaj la juroplenumaj normoj estas proceduraj normoj en pli vasta senco (IJR 1984:2:26)
karakterizaĵo de la liberalkapitalisma jurfarado (IJR 1982:2:9)
kodifita [kodifikita] juro (IJR 1968:1(6):3)
komerca juro (IJR 1977:2:34)
komparaj juraj studoj (L) (IJR 1978:1:45)
konstitucia juro (L) (IJR 1982:1:4)
kontraktjuro (IJR 1983:1:32)
kontraŭjura sinteno (IJR 1976:2:25)
kontraŭjureco (IJR 1983:1:35)
konvencioj pri marjuro (L) (IJR 1976:1:12)
kopirajta juro (IJR 1967:2(3):10)
kosma juro (IJR 1983:1:32)
kriminala internacia juro (L) (IJR 1969:2(10):2), internacia kriminala juro (L) (IJR 1969:2(10):3)
kriminala juro (L) (IJR 1983:2:5), kriminaljuro (IJR 1982:2:2)
kriminaljura esploro (L) (IJR 1983:2:8)
kriminaljura normo (L) (IJR 1983:2:8)
kriminaljura scienco (L) (IJR 1983:2:8)
kriminaljura teorio (IJR 1982:2:3)
kriminalprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
krimjura kodo (IJR 1982:2:8)
kutim-juro (IJR 1968:1(6):3), kutimojuro (IJR 1968:1(6):2), kutimjuro (IJR 1968:1(6):2), jura kutimo (Aktualaj 32, dif.)
la ago devis esti kontraŭjura (IJR 1976:2:35)
la apelacia kortumo de Lieĝo tamen rimarkis la Eŭropan aŭ pli ĝuste la EK-juran dimension de la kazo (PIV 1985:2:36)
la artikolo estas aktuala ne nur el ĝeneralejura terminologia vidpunkto (L) (IJR 1978:2:1)
la artikoloj prezentas valoran jurkomparan materialon (L) (IJR 1976:2:1)
la aŭtoro distingas tri etapojn de la jurapliko

(IJR 1967:1(2):23)
la ĉefaj jurrilataj nocioj (Scienca Mondo 1986:1:3)
la evoluo de kanonjuro en la X. jarcento (IJR 1966:1:6)
la fundamentaj homaj rajtoj kaj ilia jura protekto (Aktualaj 73)
la jura doktrino difinas kiel juran personon ĉiun portanton de rajtoj kaj devoj (t.e. ĉiun juran subjekton), kiu ne estas fizikita persono (IJR 1985:1:2)
la jurstato de la advokatoj (IJR 1968:2(7):7)
la Kodo reglamentas unuece la tutan materialon de la kriminala juro (IJR 1982:2:10)
la leĝo ne koncernas demandon pri la jura agpovo (IJR 1967:4/5(5):18)
la liberalkapitalisma jurfarado (IJR 1982:2:9)
la neŭtraleca juro estas memstara parto de la internacia juro, respektive institucio de la internacia paca juro (IJR 1969:1(9):9)
la normverko sur la kampo de kriminala juro estas ... (IJR 1982:1:19)
la plej grava fonto de la neŭtraleca juro estas ... (IJR 1969:1(9):9)
la principoj estas konsista parta de la ekzistanta juro (L) (IJR 1977:1:23)
la reguloj estas de publikjura karaktero (IJR 1967:4/5(5):16)
la reguloj pri respondeco pro la damaĝo estas bazitaj sur kutimojuro (IJR 1976:2:24)
la utiligo de kibernetiko por juraplika agado (L) (IJR 1983:2:6)
laborafera juro (IJR 1968:1(6):3), laborjuro (IJR 1975:2:40), laborrilata juro (L) (IJR 1982:1:4)
laŭ la difino larĝe disvastigita en la prijura literaturo (IJR 1968:2(7):10)
leĝo koncerne nur internaciajn privatjurajn demandojn (IJR 1967:4/5(5):14)
marjura konferenco (IJR 1981:1:33)
marjuro (IJR 1985:2:5), juro de la maro (IJR 1985:2:5)
materiala juro (IJR 1968:1(6):2)
milita juro (IJR 1983:1:33)
minimumaj elementoj de jur-sistemo (IJR 1986: 1:2)
natura juro (IJR 1984:1:10)
nova jurbranĉo (IJR 1967:3(4):4)
obligacia juro (PIV 753)
pensia juro (L) (IJR 1983:2:6)
personjuro (IJR 1983:1:33)
personoj respondecaj pri la kontraŭleĝeco de la koncerna jura sistemo, devas esti konsiderataj kiel rompantoj de la internacia jura orda (Aktualaj 86)
plendi ĉe la Administracia Tribunalo pro kontraŭjureco de reskripto (IJR 1977:1:14)
pli bona el teknika-jura vidpunkto (L) (IJR 1982: 1:11)
pri internaciaj traktatoj kaj ilia interna jurefiko en Norvegio (IJR 1981:1:25)
primateria juro (IJR 1980:1:36)
privata juro (IJR 1980:1:28), privatjuro (IJR 1983:1:33)
pro siaj juraj obligacioj (L) (IJR 1979:1:10)
procesa juro (IJR 1977:2:34)
profana juro (IJR 1977:1:2)
proprietjuro (IJR 1982:2:6)
publika juro (IJR 1980:1:28), publik-juro (IJR 1981:2:13)
publikigi la jurmaterialon (IJR 1982:2:10)
publikjura rajto pri pensio (IJR 1976:2:9)
puna juro (IJR 1977:2:34), punjuro (IJR 1983:1:33)
registrado de jurnormaj materialoj (L) (IJR 1983: 2:3)
romia juro (IJR 1977:2:34), Romia juro (IJR 1968:1(6):13), romana juro (PIV 457)
scienca-faka jura literaturo (L) (IJR 1983:1:41)
senkosta helpo en juraj aferoj (IJR 1967:1(2):12)
socialisma juro (IJR 1983:1:33)
solvo de la jurobreĉo (IJR 1967:1(2):23)
sovetia juro (L) (IJR 1983:1:41)
spac-juro (IJR 1983:1:33), spacjuro (L) (IJR 1976:1:12)
sur la kampo de la aĉetjuro (IJR 1967:4/5(5):14)
sur la kampo de terjuro (L) (IJR 1978:1:46)
sur la koncerna jurkampo (IJR 1967:4/5(5):14)
ŝanĝi la jurstaton de la advokatoj (IJR 1968:2(7):7)
ŝtatadministrada juro (IJR 1968:1(6):3)
ŝtatjura teorio (IJR 1981:1:30)
ŝtatjuraj garantioj (IJR 1968:3(8):6)
temas pri konflikto inter la du juro-principoj (IJR 1978:2:40)
testamenta juro (IJR 1975:1:1)
tia estis la ĝenerala opinio de internacijura doktrino (L) (IJR 1977:1:25)
trovi la ĝustan laŭjuran solvon (IJR 1984:2:4)
unuecigi la juran terminaron (L) (IJR 1979:1:1)
via edzo estas posedanto en rilato jura (Z) (PIV 457)
virin-juro (IJR 1975:2:3), virinjuro (IJR 1980:2:39)

**jurisdikci/** (PIV 458)
jurisdikcio (r): 1) rajto juĝi, 2) teritorio, sur kiu sin etendas la rajto de iu jurisdikcia instanco (PIV 458)
en la kadro de sia jurisdikcio (L) (IJR 1981: 2:2)
fakultativa (libervola) jurisdikcio (L) (IJR 1981:2:7)

ĝui imunecon en alilandaj jurisdikcioj (L) (IJR 1984:2:11)
la Alta Tribunalo havas orginalan jurisdikcion rilate aferojn kiuj fontas en traktatoj (IJR 1980:1:22)
la jurisdikcio de la kazacia kortumo sin etendas sur la tuta teritorio de la ŝtato (PIV 458)
la kunlaboro de civitanoj rilate la jurisdikcion grandskale evoluiĝis (IJR 1969:1(9):12)
la leĝdona jurisdikcio estas dividita inter ... (L) (IJR 1982:1:8)
la limo de nacia jurisdikcio super la mara fundo (IJR 1985:2:17)
la ordinaraj (ĝeneralaj) juĝejoj, kiuj havas jurisdikcion en ĉiuj civilaj kaj kriminalaj aferoj (IJR 1968:2(7):10)

**jurisprudenc/** (PIV 458)
jurisprudenco (r): 1) jurosciencio, filozofio pri juro, 2) interpretado de la juro fare de la tribunaloj, 3) tuto de tribunalaj decidoj pri unu jurpunkto (PIV 458)
jurisprudenco pri aŭtora proprieto (PIV 458)

**just/** (PIV 458)
justa (r): 1) respektanta egale kaj senpartie la rajtojn de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartaĵon, 2) konforma al la interna juĝo de la konscienco, 3) bazita sur la realo, 4) virta (PIV 458)
ili deklaris, ke ĉiuj militkrimuloj estos juste punitaj post la milito (L) (IJR 1969:2(10):2)
justa kompenso (Aktualaj 76)
la devo de juĝisto estas diri la juston (PIV 458)
la intima ligo inter malarmado, sekureco, ekonomio kaj socia justeco (Scienca Mondo 1988:3:25)
la justeco postulas, ke la krimuloj estu punitaj (Aktualaj 72)
la maljusteco de partia tribunalo (PIV 458)
la paco estas fragila sen ekonomia kaj socia justeco (Scienca Mondo 1988:3:26)
li juĝu la popolon per juĝo justa (PIV 458)
li ricevu justan punon por lia krueleco kontraŭ mi (Z) (PIV 458)
maljusta pretendo (PIV 458)
maljusta puno (PIV 458)
mi promesas esti vera helpanto de la justeco (IJR 1967:3:14)
nia provincestro estas severa, sed justa (Z) (PIV 458)
viaj gepatroj konvinkiĝos pri la justeco de miaj plendoj (Z) (PIV 458)
viaj justaj postuloj (Z) (PIV 458)

**justic/** (PIV 458)
justico (r): ŝtata organismo, kiu zorgas pri elekto de juĝistoj, kontrolo de ilia agado, plenumo de difinitaj punoj ktp. (PIV 458)
ĉiuj justicicaj organoj (t.e. la kortumoj) estas federaciaj (IJR 1977:1:10)
justicaj sigeloj (PIV 985)
justiceraro (L) (IJR 1986:2:11)
justicministro (PIV 458)
justico kaj polico (Nederlando 1980, p. 24)
justicordo en la Germana Demokratia Respubliko (IJR 1968:1(6):11)
justic-organo (L) (IJR 1983:2:13)
kariero en la justico: jugisto aŭ prokuroro (IJR 1977:2:35)
kortumo (t.e. justica organo) estas ... (IJR 1977: 1:15)
la justico estas apartigita de la administracio (IJR 1980:2:20)
la nombro de amnestitoj, "sidintaj" pro politikaj deliktoj, restis sekreto de la justic-instancoj (Monato 1988:2:6)
ministrejo pri justico (PIV 458)

# Ĵ

**ĵur/** (PIV 461)
ĵuri (r) (tr): 1) preni Dion aŭ ion sanktan, kiel atestanton, 2) atestante iun aŭ ion sanktan, promesi ion, 3) atestante iun aŭ ion sanktan, devontigi sin al ia ago (PIV 461), 4) solene aserti, ke io estas vera (PIV 461)
ĵura: 1) konfirmita per ĵuro, 2) promesinta per ĵuro, ke li agos juste (PIV 461)
ĵurinto: 1) persono, kiu faris solenan ĵurpromeson, ekz. en ordeno, en monaĥejo ktp., 2) ĵuriano (PIV 461)
ĵuro: atesto aŭ promeso, pri kiu oni ĵuras (PIV 461)
atesti la ĵuradon de la novaj advokatoj (PIV 461)
falsa ĵuro (PIV 461)
fari ŝtatanecan ĵuron (IJR 1967:4/5(5):11)
ĵura advokata (PIV 461)
ĵura interkonsento (PIV 461)
ĵurintaj juĝantoj (Z) (= ĵurianoj) (PIV 461)
ĵurligiĝo de la novaj registaranoj (Monato 1989:3:10)
ĵurrompo (IJR 1982:1:25)
ĵurtagoj (IJR 1986:1:37)
la juĝistoj kaj geĵurianoj kune interkonsiliĝas kaj decidas pri la kulpeco kaj la aplikota puno (IJR 1982:2:15)
la tri monaĥaj ĵurpromesoj pri obeado, malriĉeco kaj ĉasteco (PIV 153 sub ĉast/)

nuligi ĵuron (Z) (PIV 461)
rompi sian ĵuron de fideleco je la Konstitucio (IJR 1984:1:16)
tiu, kiu malvere ĵuras per mia nomo (PIV 461)

ĵuri/ (PIV 462)
ĵurio (r): aro de simplaj civitanoj, elektitaj por verdikti en tribunalo pri la kulpeco de akuzito, apogante sin nur sur la decido de sia konscienco (PIV 462)
la ĉefajn premiojn aljuĝas la faka ĵurio (Esperanto 1975:11:191)
la juĝistoj kaj la geĵurianoj kune interkonsiliĝas kaj decidas pri la kulpeco kaj la aplikota puno (IJR 1982:2:15)
la ĵurio verdiktas nur pri la fakto, la juĝistoj decidas pri la leĝa puno (PIV 462)

# K

kabinet/ (PIV 463)
kabineto (r): 3) kolektiva aŭtoritato, konsistanta el la ministroj kunvenantaj sub la estreco de la ĉefo de la registaro (ĉefministro aŭ prezidento), kaj ricevanta la respondecon de la ekzekutivo antaŭ la parlamento aŭ antaŭ la ĉefo de la ŝtato (PIV 463)

kadavr/ (PIV 464)
kadavro (r): korpo de mortinta estaĵo (PIV 464)
malkovrata poste en kadavro-sekcadoj (Monato 1989:4:6)

kadi/ (PIV 464)
kadio (r): muzulmana ŝtatoficisto, komisiita precipe juĝadi laŭ la Korano kaj Sunao, aŭ laŭ la konsultoj de muftio (PIV 464)

kaid/ (PIV 466)
kaido (r): en Alĝerio kaj Tunizio, ŝtatfunkciulo (ordinare ankaŭ tribestro), komisiita por justico, impostkolektado ktp. (PIV 466)

kalumni/ (PIV 472)
kalumnii (r) (tr): malutili al ies honoro aŭ reputacio, komunikante mensogajn sciigojn pri ties karaktero, konduto ktp. (PIV 472)
kalumnia: prezentanta kalumnion aŭ rilata al kalumnio (PIV 472)
kalumnio: vortoj de tiu, kiu kalumnias (PIV 472)
kalumnianto, kalumniulo: tiu, kiu kalumnias (PIV 472)
kalumnia informo (PIV 472)
kalumnianto disigas amikojn (PIV 472)
la distingo inter la civiljura kaj la kriminala kalumnio (L) (IJR 1982:1:30)
ne kalumniu sklavon antaŭ lia sinjoro (PIV 472)

kambi/ (PIV 473)
kambio (r): komerca valorpapero, cedebla kaj negocebla laŭ la komercaj leĝoj kaj kutimoj sen tribunala aŭ borsa proceduro, kaj plej ofte ĝirebla (PIV 473)
proksimdata kambio (PIV 473)

kancelier/ (PIV 477)
kanceliero (r): ministro, ĉefministro aŭ alia altrangulo en administracio, justico aŭ eklezio. Rim.: la signifo tre varias laŭ la landoj (PIV 477)
la kanceliero de la Respubliko de Hago (IJR 1984:1:6)
lordokanceliero: plej altranga juĝisto en Anglujo (PIV 477)

kanon/ (PIV 478)
kanono (r): 1a) eklezia regulo, koncernanta la kredon kaj disciplinon, 2b) ekleziaj katalogoj de la sanktuloj aŭ de la Testamentaj libroj (PIV 478)
kanoneco: eco de io (precipe teksto, libro ks) entenata en la katolika kanono (PIV 478)
kanona kodo (PIV 478)
la evoluo de kanonjuro en la X. jarcento (IJR 1966:1:6)

kap/ (PIV 480)
senkapigi: senigi je la kapo (PIV 480)
senkapigi mortkondamniton (PIV 480)
senkapigisto (Monato 1985:9:13), ekzekutisto (Monato 1985:9:13)
senkapigo (IJR 1979:2:4)

kapabl/ (PIV 481). Vidu ankaŭ: ag/
kapablo: eco, forto aŭ lerto aŭ scio, necesa por ion fari (PIV 481)
labornekapablo: provizora aŭ definitiva nekapablo normale labori (PIV 609)
ĉiu ajn negockapabla civitano povis esti ĉu akuzanto, ĉu defendanto antaŭ la kortumoj (L) (IJR 1967:4/5(5):2)
havi civilan agokapablon (L) (IJR 1984:2:10)
havi la bezonatan spiritkapablon por kompreni la kontraŭjurecon de la ago (IJR 1983:1:38)
normala intelektkapablo (IJR 1982:2:7)
priherda kapablo (IJR 1967:1(2):3)
pro la stato de siaj mensaj kapabloj (L) (IJR 1982:1:16)
testamenta agokapableco (IJR 1975:1:16)
tiun akirkapablon havas ĉiu homo kaj jura persono, se ĝi havas rajtkapablon (IJR 1967:1(2):3)

kapital/ (PIV 482)
asocia kapitalo (Esperanto 1985:1:1)
la kapitalo estas netuŝebla (Esperanto 1986:5:83)

**kapitulac/** (PIV 482)
kapitulaci (r) (ntr): 1) venkite transdoni sin kaj sian armeon aŭ fortikaĵon al la malamiko, sub precizaj kondiĉoj fiksitaj kune kun li, 2) (f) rezigni, forlasi entreprenon (PIV 482)
kapitulaco: ago de iu, kiu kapitulacas (PIV 482)
Italio subskribis la kondiĉojn de kapitulaco (Aktualaj 104)
la sieĝitoj kapitulacis post kvar monatoj (PIV 482)
senkondiĉa kapitulaco (L) (IJR 1976:1:5)
subskribi kapitulacon (PIV 482)

**karakter/** (PIV 486)
la Universala Deklaracio ne havos devigan karakteron (L) (IJR 1968:3(8):3)

**karakteriz/** (PIV 486)
karakterizoj de la epoko (Esperanto 1969:9:134)
unu el la specifaj karakterizoj de la bulgara familio juro estas ... (IJR 1966:1:14)

**karcer/** (PIV 488). Vidu ankaŭ: liber/, prizon/
karcero (r): 1) ĉambro en gimnazio, universitato, monaĥejo, kazerno ktp, kie oni restigas iun dum mallonga tempo, pro kulpo kontraŭ la disciplino, 2) ĉelo malgranda, ofte malluma, iafoje eĉ subtera en malliberejo, por puni ribelintan kondamniton per izoleco kaj pli severaj materialaj kondiĉoj, 3) arestejo (PIV 488)
enkarcerigi: meti en karceron (PIV 488)
karcerpuno: puno, konsistanta en unu aŭ pluraj tagoj en karcero (PIV 488)
kelkarcero: karcero konstruita sub la ternivelo (PIV 488)
antaŭtemplima elkarcerigo (IJR 1968:1(6):11)
dumviva aŭ portempa enkarcerigo (IJR 1983:1:36)
enkarcerigo de la kondamnitoj (IJR 1979:2:5)
enŝlosi en la karceron (Z) (PIV 488)
ili estis kondamnitaj al dumviva enkarcerigo pro bombatencoj (Monato 1989:1:12)
krimo punebla per enkarcerigo por periodo ĝis 5 jaroj (L) (IJR 1969:1(9):2)
la ĉefo devas pasigi 4 jarojn en karcero (Monato 1986:2:22)
la ege abomenaj karceroj de Tertullianum en Romo (IJR 1984:2:36)
li estis kondamnita je puno de karcero (L) (IJR 1968:2(7):3)
li lin fermis en karceron (PIV 277)
li tutsimple enkarcerigis tiun, kiu ne volas obei al liaj komandoj (IJR 1969:1(9):7)
li verkis artikolon en la malliberejo en la komenco de sia enkarcerigo (Scienca Mondo 1983:1:22)
liaj multaj parencoj estis enkarcerigitaj pro koruptadoj (La Espero el Koreio 1988:6:19)
minacante per enkarcerigo (Scienca Mondo 1982:4:6)
ricevi unu tagon da karcero (PIV 488)

**kasaci/** (PIV 494)
kasacio (r): leĝa nuligo de administracia aŭ tribunala decido, verdikto aŭ proceduro (PIV 494)
kasacii (tr): leĝe nuligi (PIV 494)
kasacii testamenton (PIV 494)
kasacii verdikton (PIV 494)
kortumo de kasacio (Monato 1986:8/9:7), la franca kasacia kortumo (IJR 1976:2:16), la Kasacia Kortumo (plejsupera tribunalo) (PIV 494), revizia (kasacia) kortumo (L) (IJR 1983:2:29)
la Konstitucia Tribunalo kasacias la reskripton pro formalaj kaŭzoj (IJR 1978:1:38)
post nuligo de tia dekreto aŭ leĝo la Kortumo kasacias ankaŭ la koncernan reskripton (IJR 1981:2:20)

**katastr/** (PIV 498)
katastro (r): mezura planaro de la bienoj, starigita por difini la teripostojn (PIV 498)
katastri (tr): registri en katastron (PIV 498)
katastrejo: administrejo kaj administrado de la katastro (PIV 498)
ĝenerale sub la nocio "katastro" oni komprenas registron de areoj, valoro kaj proprieto en difinita lando laŭ variaj juraj nocioj (Scienca Mondo 1988:4:5)
katastro, terenregistro (IJR 1977:1:37)

**kaŭz/** (PIV 500). Vidu ankaŭ: kial/
militkaŭzo: ago, kiu per si mem povas pravigi militproklamon (casus belli) (PIV 502)
devas esti iu rilato, laŭkaŭza konekso, inter la ago kaj la damaĝo (IJR 1976:2:35)
estas tre malfacile distingi la ĉefan kaŭzanton de la krimo (IJR 1984:2:15)
kaŭzi materialan damaĝiĝon al aliaj (IJR 1982:2:10)
kelkaj kaŭzoj de nekontentiga progreso (L) (Esperanto 1964:1:2)
Kiaj estas la ĉefaj kaŭzoj por malbona stato de la esploritaj arbaroj? (Scienca Mondo 1989:1:12)
kontribuado (kunkaŭzado) fare de la damaĝito (IJR 1976:1:36)
la enkonduko plue klarigas la kaŭzojn, pro kiuj estis necese proklami la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj (L) (IJR 1968:3(8):3)
la kaŭzo por liberiĝo de la respondeco povas esti supera forto (vis major) (IJR 1976:2:26)
la laborakcidento havas kaŭzan konekson al la laboro en la entrepreno (IJR 1975:2:44)
laŭkaŭza konekso inter la kontraŭjura sinteno kaj damaĝo (IJR 1976:2:25)

li havas motivitan kaŭzon supozi tion (IJR 1982: 2:12)
mortokaŭzo (IJR 1986:1:37)
ne gravas la kaŭzoj, pro kiuj la unuopaj ŝtatoj... (Aktualaj 30)
pro formalaj kaŭzoj (IJR 1978:1:38)
senpera kaŭzo (PIV 810)
unu el la kaŭzoj por la kreo de la flugilraketoj (Scienca Mondo 1983:1:18)

**kaz/** (PIV 502). Vidu ankaŭ: okaz/
kazo (r): 2) difinita, aparte studinda okazaĵo (PIV 502)
art. 5 havas apartan regulon por tiu kazo ke ... (IJR 1967:4/5(5):18)
art. 13/1b, kiu antaŭvidas por tiu kazo la formon de rekomendo (Aktualaj 89)
ĉiukaze (Esperanto 1963:5:92)
difini jurajn sankciojn en konkretaj individuaj kazoj (L) (IJR 1983:2:4)
en ambaŭ kazoj la partioj rajtas apelacii al la Tribunalo (IJR 1969:2(10):23)
en esceptaj kazoj (IJR 1976:2:38)
en kazo de milito (L) (IJR 1979:1:4)
en kazo de urĝeco (IJR 1980:1:29), en okazo de urĝeco (PIV 968 sub: sekretario)
en kazo de voĉ-egaleco la pliaĝa kandidato venkas (IJR 1978:1:42)
en kazoj kiam ... (IJR 1960:1(9):18)
en la plejmulto de la kazoj (IJR 1976:2:33)
en tiu konkreta kazo (L) (IJR 1967:4/5(5):2)
konforme al la Ĉarto kaj en kazoj speciale antaŭviditaj en ĝi (Aktualaj 89)
kriminalaj kazoj (IJR 1969:2(10):13)
krom en la kazoj antaŭviditaj en paragrafo 2 (IJR 1969:1(9):19)
la itala juro akceptis tiun escepton en precizigitaj kazoj (IJR 1976:2:33)
la leĝo ne antaŭvidis tiun kazon (PIV 502)
limkazo (Scienca Mondo 1983:1:15)
nur en la kazoj fiksitaj de la leĝo (Aktualaj 76)
por damaĝoj senkulpe kaŭzitaj oni respondecas nur en jenaj esceptaj kazoj (IJR 1976:1:32)
preskaŭ unu triono de ĉiuj kriminalaj kazoj estas transdonataj al la sociaj tribunaloj (IJR 1969:2(10):13)
tio estas kaŭzo de eksedziĝo (PIV 502)
tio tute ne estas la kazo (Esperanto 1963:5:86)
tiun ĉi rajton havas la parlamento ankaŭ en tiu kazo, se ĝia disiĝo okazis jam en pli frua tempo (IJR 1976:1:15)

**kial/** (PIV 506). Vidu ankaŭ: kaŭz/
kialo: kaŭzo, motivo (PIV 506)
jen la kialo de ilia decido (PIV 506)
la fundamenta kialo pri okazigo de tiu ĉi konferenco estas la rekono, ke ... (Scienca Mondo 1988:2:25)
se estas gravaj kialoj je tio (IJR 1967:4/5(5):6)

**kibernetik/** (Ne en PIV)
jura kibernetiko (L) (IJR 1983:2:2)

**klaŭz/** (PIV 514)
klaŭzo (r): speciala rezervo, kondiĉo, enskribita en kontrakto, traktato, interkonsento, leĝa akto (PIV 514)
inkluzive arbitraciajn klaŭzojn en komercajn kontraktojn (IJR 1977:1:23)
interkonsenti pri iu aŭ pluraj klaŭzoj de kontrakto (L) (IJR 1984:2:13)
konvencia klaŭzo (PIV 562)

**kloŝop/** (Ne en PIV)
kloŝopa (L) (IJR 1981:2:41)

**kod/** (PIV 521). Vidu ankaŭ: leĝ/
kodo (r): 1) leĝo aŭ kolekto de preskriboj, kiu enhavas normojn pri grava parto de juro (PIV 521)
kodigi: kolekti kaj sistemigi en unu sola dokumento la normojn pri grava parto de juro (PIV 521)
Armea Kriminala Kodo (IJR 1983:1:36)
civilprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), civil-procesa kodo (IJR 1977:2:21)
kanona kodo (PIV 478)
kodigi maran juron (PIV 521)
kodigo de kelkaj partoj el la internacia juro (PIV 521)
kodigo de parto de internacia juro (L) (IJR 1976: 1:12)
Kodo Napoleona (Esperanto 1971:1:19)
Kriminala Kodo (L) (IJR 1978:1:20), kriminala leĝo (L) (IJR 1978:1:26)
kriminala proceda kodo (IJR 1968:3(4):17), kriminala proceskodo (IJR 1969:1(9):11), kriminalprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), Punprocedura Kodo (IJR 1967:3(4):14), pun-procesa kodo (IJR 1977:2:21)
krimjura kodo (IJR 1982:2:8)
stimuli la laŭgradan evoluigon de internacia juro kaj ĝian kodigon (UN 6)
taŭgaj metodoj por kodigo de la internacia juro (Aktualaj 113)

**kodeks/** (PIV 521, sed kun alia signifo)
la kodekso civila de 1896 (IJR 1966:1:25), la kodekso civila de Napoleono de 1804 (IJR 1966:1:25)

**kodicil/** (PIV 521)
kodicilo estas deklaro pri la lasta volo, kiu ne enhavas nomigon de heredonto (IJR 1975:1:6)

**kodif/**, vidu kodifik/

**kodifik/** (Ne en PIV)
kodifita [kodifikita] juro (IJR 1968:1(6):3)

**kodifikator/** (Ne en PIV)
juristoj en strikta senco, t.e. juĝistoj, advokatoj, prokuroj, kodifikatoroj ktp. (IJR 1967:2(3):17)

**kognat/** (PIV 521)
kognato (r): familiano el la virina devenlinio (PIV 521)

**kolegi/** (PIV 525)
kolegia organo (IJR 1978:1:38)

**kolĥoz/** (PIV 526)
kolĥozo (r): en Sovet-Unio kaj popoldemokratioj, kampara kooperativo de produktado, kiu kolektive posedas la grundon kaj la laborilojn (PIV 526)
kolĥozaj kaj sociaj organizaĵoj (IJR 1967:4/5(5):13)

**kolport/** (PIV 530)
kolporti (r) (tr): disporti kun si etajn varojn, merceraĵojn, almanakojn ktp, por ilin detale vendi (PIV 530)
kolportisto: migranta etvendisto (PIV 530)

**koluzi/** (PIV 530)
koluzio: sekreta, plej ofte kondamninda interkonsento (PIV 530)
se la suspektito estas arestita pro danĝero de koluzio (kunluado) kun aliaj personoj (IJR 1967:1(2):17)

**komandit/** (PIV 531)
komandito (r): 1) komerca societo, en kiu parto de la anoj, ne partoprenante en la administrado, riskas nur sian monon kaj ne respondas pri la funkciado de la societo, 2) sumo, disponigita de ĉiu komanditanto (PIV 531)
komanditi (tr): investi monon en komandita societo, kiel komanditanto (PIV 531)

**komenc/** (PIV 532)
antaŭ la komenciĝo de la proceso (IJR 1978:1:25)
komenci proceson (Z) (PIV 532)
la veraj komenciĝoj de jura kibernetiko en Soveta Unio datumas de marto 1955 (L) (IJR 1983:2:3)

**komisar/** (PIV 533)
komisaro (r): 1) tiu, kiu estas komisiita de ŝtato aŭ privata organizo, plenumi specialan nedaŭran funkcion, 2) ŝtata oficisto kun administraj kaj justicaj funkcioj, 3) komisiito de revolucia registaro (PIV 533)
komisarejo: loko, kie funkcias komisaro, precipe polickomisaro (PIV 533)
kontrolkomisaro: komisaro, elektita de la ĝenerala asemblo, por kontroli la kontojn de la estraro (PIV 533)
en 1951 UN instalis la oficon de Alta Komisaro por Rifuĝintoj (Monato 1989:5:7)
komisaro de la registaro apud la Parlamento (por klarigi kaj apogi specialan leĝoprojekton) (PIV 533)
polica komisaro (Z) (PIV 533)

**komisariat/** (PIV 533)
komisariato (r): nomo de diversaj ŝtataj organismoj, kun administraj kaj iafoje justicaj funkcioj (PIV 533)
armea komisariato (PIV 533)
komisariato pri la kvinjara plano (PIV 533)

**komisi/** (PIV 533)
komisii (r) (tr): 1) konfidi al elektita persono plenumon de ago, laboro aŭ klopodo, kiun li devas zorgi kaj prirespondi, 2) transdoni kiel prizorgotaĵon (PIV 533)
komisianto: persono, laŭ kies ordono kaj je kies konto la komisiisto aĉetas aŭ vendas (PIV 533)
komisiisto: 1) tiu, kies metio estas plenumi la komisiojn de aliaj personoj, 2) iu, kiu profesie kontraktas laŭ la ordono kaj je la konto de alia persono, ricevante pro tio salajron aŭ provizion (PIV 533)
komisiito: tiu, kiun oni komisiis ion fari (PIV 533)
komisio: 1) ago, per kiu oni komisias ion al iu, 2) tio, per kio iu estas komisiita, 3) (arkaisme) komisiono (PIV 533)
komisiulo: komisiita peranto (PIV 533)
komisii al la sekretario publikigon de protokolo (PIV 533)
la plej multaj konstitucioj ne enhavas komision al la tribunaloj doni dekretojn (IJR 1984:2:31)
la senpera gvido de la scienc-teknika agado estas komisiita al la Ministra konsilio (Scienca Mondo 1983:1:26)
li estis komisiita porti la aĉetaĵojn sur la ŝipon (PIV 533)
strata komisiisto (PIV 533)

**komision/** (PIV 533)
komisiono (r): organo, komisiita esplori ian difinitan demandon aŭ plenumi ian difinitan taskon, kaj ĝuanta larĝan memstarecon en organizaĵo (PIV 533)
subkomisiono: aro de kelkaj membroj de komisiono, kunvenantaj por prepari la decidojn de la komisiono (PIV 533)
enketa komisiono (PIV 239), enketkomisiono (PIV 533)
establi komisionojn (IJR 1976:1:18)
komisiona raporto (Esperanto 1971:9:142)
komisiono por kontrolo de la balotoj (Konst. Bul. 7)

Komisiono pri Esploro de Kosma Spaco (IJR 1967:3(4):7)
Komisiono pri Internacia Juro (IJR 1977:2:53)
la Komisiono de la Eŭropa Ekonomia Komunumo en Bruselo (Esperanto 1972:2:21)
konfliktkomisiono (GDR) (IJR 1968:1(6):11)
konstantaj komisionoj (IJR 1976:1:17)
la Komisiono pri la Homaj Rajtoj formis subkomisionojn (Aktualaj 84)
la komisionoj de la parlamento (Hungario) estas: 1) jura, administracia kaj justica, b) eksterlanda, c) patrujdefenda, d) plana kaj budĝeta, e) agrokultura, f) industria, g) komerca, h) kultura, i) sociala kaj publik-higiena (IJR 1976:1:17)
la komisionoj en Parlamento (PIV 533)
la Konstanta Komisiono por Soci-ekonomiaj Problemoj de MFSL (Scienca Mondo 1983:3:29)
la provizoraj komisionoj estas formataj esplori pli rapide iun konkretan aferon (IJR 1976:1:18)
la Ŝtata Komisiono pri Scienca kaj Tekniko (ŜKST) (Scienca Mondo 1983:1:26)
la unua paŝo estas la instalo de komisiono (IJR 1984:2:41)

**komitat/** (PIV 533)
komitato (r): grupo da personoj, elektita en organizaĵo, por konsistigi specialan kunvenon, kiu havas difinitajn direktantajn kaj plenumantajn taskojn (PIV 533)
plenumkomitato: aro da personoj, kies tasko estas apliki la decidojn de kongreso, de superaj instancoj aŭ plenumadi la praktikajn taskojn de iu asocio (PIV 533)
strikkomitato: aro de la delegitoj de laboristoj, komisiitaj gvidi la strikon kaj diskuti kun la mastroj pri la kondiĉoj de ties ĉesigo (PIV 533)
Komitato de Ministroj (L) (IJR 1981:2:3)
Komitato pri Juraj kaj Administraj Demandoj (L) (IJR 1981:2:3)
konstanta komitato (Scienca Mondo 1984:2:3)
la komisionoj povas formi diversajn komitatojn por trastudi apartajn problemojn. Tiuj ĉi rajtas eventuale krei subkomitatojn (Aktualaj 113)
organiza komitato de 17 personoj (Eŭropa Dokumento 1983:3:49)
politikaj decidoj ... estas akceptataj de Respublika parlamento en kiu funkcias Komitato pri klerigo, kulturo kaj scienco (Scienca Mondo 1985:4:2)
prepara komitato (Scienca Revuo 1974:5/6:246)
provizoraj komitatoj (IJR 1976:1:17)

**komiz/** (PIV 533)
komizo (r): helpa salajrulo, kiu prizorgas la vendadon en komercfirmo, aŭ la kontoraferojn en banko (PIV 533)
migra, vojaĝa komizo: reprezentanto de komerca firmo, vizitanta eventualajn klientojn, per elmontri specimenojn kaj kolekti mendojn (PIV 533)
granda magazeno bezonas la servojn de armeo da komizoj (Z) (PIV 533)

**kompani/** (PIV 534)
kompanio (r): kuniĝo de personoj kune direktantaj komercan aŭ industrian aferon, 2) tiu komerca aŭ industria afero mem, 3) ... (PIV 534)
kompaniano: membro de kompanio 2) (PIV 534)
akcia kompanio (L) (IJR 1980:2:13)
asekura kompanio (IJR 1976:2:18), asekurkompanio (Monato 1989:1:12)
filia kompanio (jure memstara, sed ekonomia dependa de la trunkokompanio, kiu posedas la tuton aŭ plimulton de la kapitalo) (PIV 534)
transnaciaj kompanioj (Heroldo 1983:13:3)

**kompens/** (PIV 535)
kompensi (r) (tr): havigi al iu profiton, por anstataŭi kaj kontraŭpezi suferitan malprofiton aŭ penon (PIV 535)
kompenso: tio, kio estas donita por kompensi (PIV 535)
ambaŭ partioj devas kompensi la damaĝon laŭ proporcio de ilia imputebla sinteno (IJR 1976: 2:26)
damaĝkompensa juro (IJR 1976:2:17)
damaĝkompensoj pro laborakcidentoj (IJR 1976: 1:39)
en procesoj la kortumo decidas pri kompenso de la kostoj (IJR 1967:1(2):14)
havi kiel konsekvencon nur redukton de la kompenso (IJR 1976:1:36)
justa kompenso (Aktualaj 76)
kion la kompensodevo inkluzivas? (Monato 1988: 12:12)
kion li ricevis kiel kompenson pro tio, kion li suferis en malliberejo ? (Z) (PIV 535)
kompensi materian kaj nematerian damaĝon (IJR 1976:2:31)
kompenso por nemateriaj damaĝoj (Monato 1988: 12:12)
kompenso pro eksterkontraktaj damaĝoj (IJR 1976:2:34)
kompenso pro neekonomia damaĝo (IJR 1976:2:39)
la asekura kompanio kompensas la perdojn kaŭzitajn de la brulo (PIV 535)

la damaĝinto devas kompensi materian kaj nematerian damaĝon (IJR 1976:2:31)
la damaĝo devas esti plene kompensita (L) (IJR 1984:2:11)
la fifarinto tute kompensu la materian kaj nematerian damaĝojn (Monato 1989:11:20)
la inventinto povas pretendi pri perdokompenso (Scienca Mondo 1985:4:18)
la kompenso atingis mil frankojn (PIV 535)
la kompensodevo de la sociala asekuro estiĝas el la fakto, ke okazis laborakcidento (IJR 1976:2:13)
la persono suferinta damaĝon prezenti juĝpretendon pri kompenso (IJR 1976:1:38)
la viktimoj proponas 2,300,000,000 usonajn dolarojn da kompenso (La Espero el Koreio 1988:4:7)
li ne havas rajton pretendi kompenson (IJR 1976:2:28)
mona kompenso (IJR 1976:2:13), monkompenso (PIV 837)
ne redukti la kompenson se la damaĝito agis nur iomete neglekte (IJR 1976:2:39)
okaze de laborakcidento la kompensendaj damaĝoj estas ... (IJR 1976:2:29)
oni devas kompensi al li la elspezojn por kuracado, la malgrandigitan laborkapablon, suferitajn fizikajn kaj psikajn dolorojn, inkluzive timon, malbeligon ... (IJR 1976:2:31)
se suferinto de la damaĝo ankaŭ mem estis kulpa, kompenso al li povas esti modifita (IJR 1976:2:17)

## kompetent/ (PIV 535)

kompetenta (r): kapabla ĝuste solvi aferon aŭ plenumi tasskon aŭ oficon, pro sufiĉaj tiurilataj scioj (PIV 535)
en FR Germanio la unuopaj landoj kompetentas aŭtonome organizi la lernejan sistemon (Monato 1989:2:16)
en la kadroj de sia kompetenteco (Konst. Bul. 13)
instancoj kompetentaj por akcepti petojn pri ŝtatanecaj aferoj (IJR 1968:2(7):9)
kompetenta komitato (Z) (PIV 535)
la Ĉefurba Kortumo estas kompetenta pri la decido (IJR 1967:4/5(5):11)
la funkcio kaj la kompetenteco de la ŝtatorganoj (Bulgario 37)
la Kolegio estas kompetenta por la eldonado de dekretoj (IJR 1978:1:34)
la kompetenteco de la Kortumo etendiĝas al ĉiuj aferoj, kiujn la partioj submetas al ĝi (UN 29)
la Kortumo estas kompetenta ne nur por solvado de konfliktoj inter la partioj (kontraŭdira kompetenteco), sed ankaŭ por esti konsultita pri juraj demandoj (konsulta kompetenteco) (Aktualaj 139)
la Provizora Ŝtata Registaro posedis ĉiujn administraciajn kaj ankaŭ leĝdonajn kompetentecojn (IJR 1980:1:29)
limigita kompetenteco (L) (IJR 1976:1:3)
paŝo antaŭen estis farita per la kreo de la Internacia Kortumo de Justico, tamen kun limigita kompetenteco (L) (IJR 1976:1:3)
solvi kompetentecajn konfliktojn (IJR 1981:2:10)

## komplic/ (PIV 536)

komplico (r): kunpartoprenanto en malpermesita ago; krimhelpanto (PIV 536)
denunci siajn komplicojn (PIV 536)
li ne havis komplicon (L) (IJR 1983:2:13)
pruvi ies komplicecon (PIV 536)

## kompromis/ (PIV 538)

kompromiso (r): interkonsento, aranĝita dank' al reciprokaj cedoj de du kontraŭuloj pri la diskutitaĵo (PIV 538)
kompromiso (ntr): fari kompromison (PIV 538)
fari (Z), aranĝo, kontrakti kompromison (PIV 538)
oni akceptis kompromisan solvon (L) (IJR 1981:2:6)

## kompuls/ (Ne en PIV)

apliko de kompulsaj rimedoj kun medicina karaktero (L) (IJR 1982:1:17)
kompulsa (IJR 1976:2:41, dif.)
kompulso kaj minaco (IJR 1982:2:11)
la puno de kompulsa internigo en edukan institucion (IJR 1983:1:38)

## kon/ (PIV 539)

rekoni: 2) agnoski (PIV 539)
ŝanĝojn oni povas fari en nia lingvo, nur kiam ĝi estos rekonata de la regnoj (Z) (PIV 541)

## koncept/ (PIV 541). Vidu ankaŭ: noci/

koncepto (r): abstrakta kaj ĝenerala ideo (PIV 541)
agoj ampleksitaj de la koncepto genocido (Aktualaj 85)
en la koncepto de demokrateco estas implicitaj du ideoj (L) (Esperanto 1973:12:201)
la demokratio ne estas nur ŝtata, sed - koncerne la enhavon - ankaŭ ŝtatojura koncepto (IJR 1968:2(7):8)
la koncepto de neŭtraleco (L) (IJR 1979:1:2)
la koncepto pri nacio (Aktualaj 12)
"paca kunekzistado" kaj la kunligita koncepto de "socialisma internacia juro" (L) (IJR 1977:1:19)
pri la koncepto de diplomatio (Aktualaj 35)

## koncesi/ (PIV 541)

koncesio (r): 1) privilegia rajto, donita de ŝtato

al alia ŝtato, al kompanio aŭ al privata persono, ekspluati teritorion, komercan entreprenon ks, 2) koncedo (PIV 541)
koncesii (tr): oficiale tutcedi al iu la ekspluatadon de profitofonto (PIV 541)
doni koncesion je fervojo (PIV 541)
koncesianta oficejo (IJR 1967:3(4):22)
koncesii minejon en kolonio (PIV 541)
koncesio de ŝtataneco (IJR 1967:3(4):22)
koncesio pri la negoco de armiloj (PIV 541)
koncesita drinkejo (Z) (PIV 541)

## koncili/ (PIV 541)

koncilio (r): kunveno de episkopoj, kiun komence la imperiestro, poste la papo kunvokas, por solvi demandojn pri dogmo kaj disciplino (PIV 541)
la konciliaj dekretoj (PIV 541)
la Nicea koncilio (PIV 541)

## konciliaci/ (Ne en PIV)

konciliacio (L) (IJR 1976:2:41, dif.)

## kondamn/ (PIV 542)

kondamni (r) (tr): 1) juĝe deklari iun kulpa kaj difini la meritan punon, 2) jure deklari ion sufiĉa motivo, por ke la farinto estu leĝe punata, 3) deklari iun malprava, ion riproĉinda (PIV 542)
kondamnito: tiu, kiun oni kondamnis (PIV 542)
malkondamni (tr): absolvi (PIV 542)
estas agoj, kiujn la moralo kondamnas, sed kiujn ne kondamnas la leĝo (PIV 542)
esti jurvalide kondamnita (IJR 1967:4/5(5):10)
ili estis kondamnitaj al dumviva enkarcerigo pro bombatencoj (Monato 1989:1:12)
ili estis kondamnitaj al severaj punoj de malliberigo ĝis 7 jaroj kaj aldona relegacio de 2–5 jaroj (L) (IJR 1982:1:10)
iu kripulo estis kondamnita al morto (IJR 1979:2:6)
kondamna juĝo (IJR 1981:2:19)
kondamna verdikto (IJR 1984:2:35)
kondamni iun al monpuno, al morto (Z) , al la juĝokostoj (PIV 542)
kondamnita al pendigo (IJR 1979:2:6)
kondamnita al prizona puno dum unu jaro (IJR 1980:1:21)
la nova reĝo amnestiis ĉiujn kondamnitajn je malpli ol du jaroj da malliberigo (PIV 41 sub amnesti/)
li estis kondamnita al 10-jara malliberigo en punkampo (L) (IJR 1978:1:20)
li estis kondamnita al monpuno de 60 mil liroj (IJR 1977:2:23)
li estis kondamnita je la restituado de la uzurpita kampo (PIV 920)
li estas kondamnita je malliberigo de kvin jaroj aŭ pli (IJR 1967:3(4):23)
li estis kondamnita je puno de karcero (L) (IJR 1968:2(7):3)
politika kondamnito (PIV 542)
senindulga kondamno (PIV 424)
vi kondamnas vin mem per tiu konfeso (PIV 542)

## kondiĉ/ (PIV 542)

kondiĉo (r): 1) cirkonstanco, fakto, de kiu dependas la efektiviĝo de io, 2) deviga interkonsentita aranĝo, de kies respekto dependas la valideco de aranĝo, kontrakto, 3) (ordinare: plurale) ĉiu el la eksteraj cirkonstancoj, al kiuj persono aŭ objekto estas submetata, kaj de kiuj dependas lia aŭ ĝia stato (PIV 542)
aĉetkondiĉo (Scienca Mondo 1986:4:25), aĉetokondiĉo (IJR 1977:1:39)
antaŭkondiĉo por (IJR 1967:4/5(5):18)
asekurkondiĉoj (IJR 1979:1:24)
diskuti la kondiĉojn de packontraktato (PIV 542)
doni al la individua tiun rajton sub difinitaj kondiĉoj (L) (IJR 1981:2:6)
en la kontrakto devas esti klare fiksitaj ĉiuj kondiĉoj de la administrado (Aktualaj 117)
esti kondiĉo de membreco (IJR 1981:2:2)
fiksi la kondiĉojn por io (IJR 1984:2:26)
implicita kondiĉo (PIV 418)
Italio subskribis la kondiĉojn de la kapitulaco (Aktualaj 104)
kondiĉa promeso, aĉeto (PIV 542)
kondiĉe ke ĉiuj proceduraj reguloj estis observitaj (IJR 1980:2:24)
kondiĉe ke la limoj de la necesa defendo ne estu evidente transpasitaj (L) (IJR 1982:1:11)
kondiĉo por la ekzekucio (IJR 1984:2:32)
kondiĉoj de socia progreso (UN 13)
la interveno povas okazi nur sub certaj kondiĉoj (Aktualaj 114)
la kondiĉoj de bona regado (PIV 542)
la plejmulto estas nur kondiĉe kondamnata je malliberigo (IJR 1969:1(9):12)
la testamenta dispono povas esti submetata al solvigaj aŭ prokrastigaj kondiĉoj (IJR 1975:1:20)
mi pardonos, kondiĉe ke vi neniam plu kulpu tiun kulpon (PIV 542)
nacilingvaj tradukoj estas permesitaj sub la kondiĉo, ke la fonto kaj la aŭtoro estu indikitaj (L) (IJR 1983:2:2)
pagkondiĉoj (Fina Akto 66)
plenumi la kondiĉojn postulatajn de Artikoloj 2, 17, 20 kaj 24 (UN 28)
pro esceptaj kialoj naturalizo povas okazi se mankas iuj el la supre menciitaj antaŭkondiĉoj (IJR

1967:4/5(5):8)
samtempe estis kreitaj la antaŭkondiĉoj por la realigo de tiu ideo (L) (IJR 1977:1:19)
se ne estas konsiderataj la kondiĉoj antaŭviditaj en la leĝo (Konst. Bul. 19)
senkondiĉa kapitulaco (L) (IJR 1976:1:5)
sub difinitaj kondiĉoj (L) (IJR 1967:2(7):3)
sub la kondiĉo de alpago oni konsentis sendadi al ŝi tagmanĝojn (Z) (PIV 542)
sub la kondiĉoj fiksitaj de la Asembleo de UN (Aktualaj 62)
sub la samaj kondiĉoj (Fina Akto 50)
ŝi povas daŭrigi sian laboron sub la antaŭaj kondiĉoj (IJR 1975:2:47)
testamento farita en la formo kaj sub la kondiĉoj kiujn preskribas leĝo (IJR 1975:1:21)
tiaj kondiĉoj estas, ekzemple, ŝtataneco kaj nepunitеco (L) (IJR 1967:4/5(5):3)
tio estas kondiĉo de membreco (L) (IJR 1981:2:2)
tiu respondeco ne estas senkondiĉa (IJR 1976:2:25)

**koneks/** (PIV 544)
koneksa (r): interligita; proksime interrilata kun analoga afero (PIV 544)
aferoj, kiuj estis en konekso kun neglekto de la labordisciplino (IJR 1969:2(10):13)
dua bazfakto konekse kun la homa ekzistado estas, ke ... (IJR 1966:1:4)
en tiu ĉi konekso (IJR 1985:1:24)
oni povis presenti al tiuj sociaj tribunaloj aferojn, kiuj estis en konekso kun neglekto de la labordisciplino (IJR 1969:2(10):13)

**konfederaci/** (PIV 545)
konfederacio (r): 1) asocio de apartoj ŝtatoj, sendependaj interne kaj en la eksteraj rilatoj, sed kunigitaj por difinitaj komunaj celoj, 2) aro da statute ligitaj federacioj de sindikatoj aŭ similaj organizoj (PIV 545)
Internacia Konfederacio de la Liberaj Sindikatoj (PIV 545)
la Brita Konfederacio (nacie nomata: Commonwealth) (PIV 545)
la konfederaciitaj ŝtatoj de Amerika (seceiintaj de Usono) (PIV 545)

**konferenc/** (PIV 545)
konferenco (r): renkontiĝo de kompetentuloj, kiuj interkonsiliĝas pri kelkaj difinitaj gravaj aferoj; ĝi estas ofte diplomatia, jura, scienca ktp; la partoprenantoj estas ordinare invititaj de la organizanta instanco (PIV 545)
efektivigi Interregistaran konferencon pri la problemoj de edukado (Scienca Mondo 1982:4:26)
ĝenerala konferenco (Aktualaj 123)
Ĝenev-konferencoj pri la Internacia marjuro, 1958 kaj 1960 (IJR 1981:1:33)
Internacia Konferenco por la Preslibereco (Aktualaj 84)
Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo (IJR 1977:1:19)
la konferenco de Jalta (Aktualaj 105)
marjura konferenco (IJR 1981:1:33)

**konfes/** (PIV 545)
konfesi (r) (tr): 3) spontanee deklari ion malfavoran, malprofitan por si (PIV 545)
malkonfesi (tr): 3) nei, ke oni faris ion mallaŭdindan (PIV 545)
ĝis la fino de la proceso, la akuzito malkonfesis la krimon (PIV 545)
ili konfesis je la lasta minuto (IJR 1986:1:13)
konfesi preterlason, ŝuldon, krimon (PIV 545)
konfesi pri io (IJR 1986:1:11)
konfesinde, tamen, ke ... (Heroldo 1982:7:4)
Konfesu do, ke vi ŝtelis tiun poŝhorloĝon! (PIV 545)
ŝi konfesis sian grandan kulpon (Z) (PIV 545)

**konfid/** (PIV 546)
konfidi (r) (tr): 2) plenkrede transdoni al ies fidela prizorgo (PIV 546)
defraŭdi konfiditan monsumon (PIV 315)
ili konfidis la solvon de la problemo al la juĝopovo de l'Internacia Kortumo en Hago (Monato 1986:4:7)
la al mi konfiditan havon mi bone administris (PIV 546)

**konfirm/** (PIV 546)
konfirmi (r) (tr): 1) plicertigi la verecon, sendubecon de io (PIV 546)
konfirmado kaj parafado de la traktada rezulto (IJR 1981:1:37)
la Germana Popolkongreso en Majo 1949 konfirmis la konstitucion (IJR 1968:3(8):18)
submeti siajn konfliktojn al prijuĝo de la Kortumo kaj konfirmiĝi al ĝiaj verdiktoj (Aktualaj 65)

**konfisk/** (PIV 546)
konfiski (r) (tr): 1) atribui per dekreto al la Ŝtata Trezorejo la propraĵojn de iu, por tiun puni, 2) forpreni de iu laŭ rajtigita aŭtoritato ion malpermisitan (PIV 546)
konfisko: ago de tiu, kiu konfiskas (PIV 546)
konfiski kontrabandaĵojn (PIV 546)
konfiski la bienojn de elmigrantoj (PIV 546)
konfisko de lia tuta havaĵo (IJR 1984:2:35)
konfisko kaj ŝtatproprigo de la havaĵo de jura persono (IJR 1984:2:19)
la konfisko de nepermesataj libroj fare de la polico (PIV 546)

ordoni konfiskon (PIV 546)

**konform/** (PIV 547)

konforma (r): 1) tia, ke ĝia formo estas ĝuste simila al tiu de alia objekto, rigardata kiel modelo, 2) ĝuste respondanta al tio, kion iu volas aŭ io trudas, 3 ... (PIV 547)

ago nekonforma kun la Ĉarto de UN (L) (IJR 1977:1:44)

en okazo de ilia malkonformo al la leĝo (Konstitucio 1937, p. 9)

estis necese ellabori novan kriminalan kodon, kiu estu konvena, konforma al nuna stadio de la evoluo de nia lando (IJR 1968:3(8):16)

kontrolo pri dekretoj rilate al ilia konformeco al la leĝoj (IJR 1981:2:14)

mia konduto estis konforma al viaj ordonoj (PIV 547)

**konfront/** (PIV 547)

konfronti (r) (tr): venigi antaŭ enketa juĝisto aŭ komisiono du aŭ plurajn inter si neakordiĝantajn personojn samtempe, por kompari iliajn asertojn kaj provi malkovri, kiu el ili pravas (PIV 547)

**kongru/** (PIV 548)

kongrui (r) (ntr): 1) esti interkonforma kun (PIV 548)

ili diferencas en detaloj, sed en ĝeneraleco kongruas (IJR 1968:3(8):15)

la atesto kongruas kun la asertoj de la akuzito (PIV 548)

la faktoj ne kongruas kun tiu hipotezo (PIV 548)

**konklud/** (PIV 550). Vidu ankaŭ: kontrakt/

konkludi (r) (tr): tiri per rezono logikajn sekvojn el argumentoj, principoj aŭ faktoj (PIV 550)

ĉiu el la subskribintaj ŝtatoj sin devontigis ne konkludi apartan armisticon aŭ pacon kun kiu ajn al la malamikaj ŝtatoj (L) (IJR 1985:2:3)

inversokonkludo (IJR 1985:1:17)

**konosament/** (PIV 551)

konosamento (r): detala kvitanco de la ŝipestro al la ekspedanto pri la transportataj varoj; = ŝarĝatesto (PIV 551)

**konsci/** (PIV 551)

mensa malsano, imbecileco aŭ idioteco, gravaj konsciperturboj (IJR 1981:2:27)

**konsekvenc/** (PIV 552)

antaŭvidi la konsekvencojn de la ago (IJR 1982:2:13)

la aganto ne bezonas scii la juran konsekvencon (punon) (IJR 1982:2:5)

**konsent/** (PIV 552)

interkonsento: privata aranĝo inter personoj (PIV 552)

aliĝo al interkonsento (IJR 1977:2:52)

duflankaj kaj multflankaj interŝtataj kaj aliaj interkonsentoj (L) (IJR 1977:1:23)

komercinterkonsento (IJR 1981:1:33)

konsenti pri io (IJR 1977:2:52)

konsento de la Parlamento pri ratifiko (IJR 1981:2:34)

kontrakta interkonsento (IJR 1977:2:51)

la Kortumo, kies funkcio estas decidi konforme al internacia juro tiujn malkonsentojn, kiuj estas submetitaj al ĝi (L) (IJR 1978:2:14)

malkonsento (L) (IJR 1976:1:7)

multflanka interkonsento (L) (IJR 1977:1:23)

pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento (Z) (PIV 552)

tipo de interkonsento (IJR 1977:2:51)

usona juro baziĝas sur la interkonsenta teorio (IJR 1967:3(4):19)

**konsider/** (PIV 553)

ankaŭ tiu argumento devas esti konsiderata (PIV 553)

aro de aliaj juraj elementoj devas esti prenitaj en konsideron (L) (IJR 1983:2:7)

la du paktoj estas jure devigaj senkonsidere al la Fina Akto (L) (IJR 1977:1:26)

li fine konsentis post mallonga konsidero (PIV 553)

nun li devas konsideri rezignon de sia ofico (PIV 553)

preni en konsideron la novajn fortorilatojn (L) (IJR 1976:1:8), preni en konsidero (Scienca Mondo 1988:4:6)

senkonsidere al la Fina akto (IJR 1977:1:26)

senkonsidere ĉu (IJR 1981:1:34)

senkonsidero pri ilia nacieco (Esperanto:10:167)

**konsil/** (PIV 554)

konsili (r) (tr): diri al iu, kion oni opinias, ke tiu devas fari (PIV 554)

konsilano: konsiliano (PIV 554)

konsilantaro: konsilio (PIV 554)

konsilanto: tiu, kiu konsilas (PIV 554)

konsiliĝi: interparoli kun iu(j), por peti konsilon (PIV 554)

konsiliĝo: 1) interparolado de konsiliĝantoj, 2) kunveno, ĉe kiu oni diskutas aferojn, por atingi saĝan komunan decidon (PIV 554)

konsilisto: funkciulo, komisiita de la ŝtato aŭ de regnestro, por konsiladi pri difinitaj aferoj (PIV 554)

konsilo: indiko donita al iu pri tio, kion oni opinias, ke tiu devus fari (PIV 554)

Hispanio prezidas la ministerian konsilantaron de Eŭropa Komuno (Monato 1989:4:10)

jura konsilisto (PIV 554)
konsili al iu (Aktualaj 55)
la rezultoj de la interkonsiliĝo pri eŭropa sekureco (Eŭropa Dokumento 1976:11:7)

**konsili/** (PIV 554)
konsilio (r): administra organismo, jen kun decida, jen kun konsulta kompetenteco, plenumanta diversajn funkciojn en registara aparato aŭ grava privata entrepreno (PIV 554)
anstataŭ "Konsilo" de Sekureco estas enkondukita "Konsilio" Sekureca (L) (IJR 1981:1:45)
Ekonomia kaj Socia Konsilio (UN 5)
en la periodo inter la kunsidoj de la ĝenerala asembleo, la gvidadon de la Federacio realigas Plenumkonsilio (Scienca Mondo 1989:2:29)
Konsilio de la Ligo de Nacioj (PIV 554)
la Konsilio de Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj (PIV 554), la sekur-konsilio de Unuiĝinta Naciaro (Monato 1987:9:4), sekureca konsilio (Monato 1986:3:8), Sekureca Konsilio (UN 2)
Kuratoreca Konsilio (UN 5)
ministrar-konsilio (Monato 1986:2:11)
revolucia konsilio (IJR 1984:2:33)

**konsist/** (PIV 554). Vidu ankaŭ: part/
konsistaj elementoj (germane: Tatbestand, ruse: sostav) (L) (IJR 1983:2:4)
konsistiga parto de la unueca sistemo de socialisma justico (IJR 1969:2(10):10)
la principoj estas konsista parto de la ekzistanta juro (L) (IJR 1977:1:23)
la sociaj tribunaloj estas konsistiga parto de la socialisma justico (IJR 1969:2(10):10)
nur la intenco konsistigas la krimon (PIV 554)

**konskripci/** (PIV 554)
konskripcio (r): sistemo de militista rekrutado, per deviga servado en la nacia armeo (PIV 554)

**konsorci/** (PIV 555)
konsorcio (r): asociiĝo de komercistoj, precipe de bankoj, por efektivigi komunan entreprenon, kiu postulas multe da mono (ekz. por eldoni valorpaperojn aŭ por komuna kreditigo), kun la celo distribui la riskojn (PIV 555)

**konspir/** (PIV 555)
konspiri (r) (ntr): 1) komploti en politika afero (PIV 555)
konspiro: politika komploto (PIV 555)
konspiraj krimoj (IJR 1982:2:4)

**konstant/** (PIV 555)
konstanta (r): 1) (io) tia, ke ĝi ne ĉesas esti la sama kaj ne konas ŝanĝiĝon (PIV 555)
konstantaj membroj de organo (L) (IJR 1985:2:4)

**konstitu/** (PIV 556)
konstitui (r) (tr) (n): konstitigi, prezenti (PIV 556)
depost 1967 seksagoj, kiuj antaŭe konstituis la krimon de kruda meldeco, estas nekriminalaj (IJR 1982:1:24)
la intenco konstituas la krimon (PIV 556)
pro la nova konstituigita rolo de la Partio (L) (IJR 1980:2:11)
tuj post sia konstituiĝo la Parlamento elektas komisionon por kontrolo de la balotoj (Konst. Bul. 7)

**konstituci/** (PIV 556)
konstitucio (r): 1) tuto de bazaj normoj pri la ŝtatorganizo kaj tre ofte pri la fundamentaj liberecoj, rajtoj kaj devoj de la civitanoj, 2) la akto mem, kiu enhavas tiujn normojn (PIV 556)
konstitucia: 1) rilata al konstitucio, 2) regata laŭ konstitucio (PIV 556)
konstituciano: membro de konstitucianta kunveno (PIV 556)
konstitucii (ntr): redakti konstitucion (PIV 556)
konstitucirompo: atenco al konstitucio (PIV 556)
kontraŭkonstitucia: tia, ke la konstitucio tion ne permesas (PIV 556)
ankaŭ konstitucia leĝo povas esti kontraŭkonstitucia (IJR 1981:2:16)
Britujo havas ne skribitan konstitucion (PIV 556)
decidi, ĉu la dirita Art. 137 estas konstitucie valida (IJR 1977:2:24)
konstitucia akto de organizaĵo (UN 29)
konstitucia juro (L) (IJR 1982:1:4)
konstitucia plendo (germane: Verfassungsbeschwerde) (IJR 1984:1:22)
konstituciaj rajtoj (PIV 556)
konstitucianta kunveno (PIV 556)
konstitucie certigita rajto je protekto de etnaj minoritatoj (IJR 1977:2:23)
konstituciiga kunveno (IJR 1984:2:29)
kontraŭe al la Konstitucio de 1936 (L) (IJR 1980:2:9)
kontraŭkonstitucia (IJR 1981:2:16), kontraŭ-konstitucia (IJR 1981:2:16)
la kanada Konstitucio estas neŝanĝebla krom per la Parlamento en Londono (IJR 1981:1:5)
la Konstitucia Kortumo estas instalita kiel ŝtata organo por garantii la konstitucion (IJR 1981:2:10)
la konstituciaj leĝoj (PIV 556)
la kontrakto kontraŭdiras al la japana konstitucio (Scienca Mondo 1983:3:32)
la parlamento decidas la konstitucion de novaj ministerioj, ankaŭ ilian ferman, kunfandiĝon

aŭ ŝanĝon de la nomo de iuj el la jam ekzistantaj (Konst. Bul. 6)
la ŝtatformo estas konstitucia monarkio kun parlamenta sistemo (Nederlando 1980, p. 4)
laŭkonstitucia (IJR 1977:2:53)
monarkio konstitucia (PIV 556)
preni la necesajn internkonstituciajn paŝojn (IJR 1981:2:32)
rajto konstitucie certigita (IJR 1977:2:23)
submeti novan konstitucion al referendumo (PIV 556)

**konstitutiv/** (Ne en PIV)
juraj aktoj povas havi deklaran aŭ konstitutivan karakteron (Aktualaj 90)
konstitutivaj kaj deklarativaj normoj (IJR 1984:2:31, dif.)

**konsul/** (PIV 557)
konsulo (r): 1) ĉiu el la du unujaraj regnestroj de la antikva Roma Respubliko, 2) diplomatia agento, komisiita protekti en fremda lando la aferojn de la samregnanoj (PIV 557)
konsuleco: titolo kaj rango de konsulo (PIV 557)
konsulejo: loko, kie funkcias la servoj de konsulo (PIV 557)
duflanka praktiko de konsulservoj (Fina Akto 56)
konsula helpo (Fina Akto 56)
konsulkonvencioj (Fina Akto 57)
oficigi la diplomatajn kaj konsulejajn reprezentantojn (Konst. Bul. 9)

**konsult/** (PIV 557)
konsulti (r) (tr): 1) demandi specialiston, por ekscii lian opinion pri iu punkto, 2) serĉi informojn en tiucela, faka libro (PIV 557)
jura konsultisto (L) (IJR 1984:2:11)
konsulta opinio: respondo al demando farita al Internacia Kortumo fare de la organoj de Unuiĝintaj Nacioj aŭ Specialigitaj Organizaĵoj rajtigitaj starigi tian demandon (L) (IJR 1978:2:14)
konsulti advokaton (PIV 557)
li partoprenis la konsultojn, kiuj fine rezultigis, ke (IJR 1984:1:11)

**kontest/** (PIV 558)
kontesti (r) (tr): diskute malakcepti aserton aŭ postulon (PIV 558)
jen fakto, kiun vi povus malfacile kontesti (PIV 558)
nekontestebla pruvo (PIV 558)
nur en senpera kontakto kun la akuzitoj, viktimoj, atestantoj, ekspertoj, materiaj pruvoj kaj ĉiuj aliaj permesitaj rimedoj de pruvado kaj kontestado, tiuj organoj povas formi siajn pritaksojn kaj juĝojn (L) (IJR 1983:2:13)

**kontinu/** (PIV 559)
kontinua krimago (IJR 1982:2:11)

**kontra,** vidu sub: signatur/

**kontrakt/** (PIV 559). Vidu ankaŭ: traktat/
kontrakti (r) (ntr): interkonsenti per interŝanĝo de samcelaj deklaroj, por krei jurajn sekvojn (PIV 559)
aĉetkontrakto (IJR 1967:4/5(5):16)
Antarkta kontrakto (1959) (Scienca Mondo 1988:1:5)
asekurkontrakto (IJR 1976:2:38)
ĉiuj kontraktantoj devigas sin, konkorde kun la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro ... (Monato 1987:4:13)
dungokontrakto (PIV 559)
dupromesaj kontraktoj (IJR 1967:3(4):17, dif.)
edziĝa kontrakto (IJR 1975:1:25), geedziĝa kontrakto (IJR 1976:1:44)
en la aldono de tiu ĉi kontrakto (Kontrakto 6)
fari kontrakton (IJR 1981:2:13), konkludi kontrakton (IJR 1981:2:13)
fari ligantan kontrakton (IJR 1967:4/5(5):18)
hereda kontrakto (IJR 1975:1:6, dif.), heredokontrakto (IJR 1975:1:18), prihereda kontrakto (IJR 1967:1(2):5)
interkonsenti pri iu aŭ pluraj klaŭzoj de kontrakto (L) (IJR 1984:2:13)
internacia kontrakto (IJR 1969:1(9):19)
kiun efikon la aĉeto havas por aliaj ol la kontraktpartioj (IJR 1967:4/5(5):18)
komerca kontrakto (L) (IJR 1977:1:23), komercinterkonsento (IJR 1981:1:33)
kompenso pro eksterkontraktaj damaĝoj (IJR 1976:2:34)
kontraktaj firmaoj (Heroldo 1982:3:3)
kontraktantaj partioj (IJR 1981:1:27), kontraktpartioj (IJR 1967:4/5(5):18)
kontraktformo (IJR 1967:4/5(5):18)
kontrakti geedziĝon (IJR 1966:1:11)
kontrakti interkonsenton (UN 18)
kontrakti kun iu pri io (PIV 559)
kontrakti liveradon por la armeo (PIV 559)
kontrakti traktaton (PIV 559)
kontraktjuro (IJR 1983:1:32)
kontrakto estis finvortumata (Monato 1989:2:7)
kontrakto pri edziĝo (PIV 559)
kontrakto pri farmoluo (PIV 559)
Kontrakto pri la kosmo, 1967 (Scienca Mondo 1988:1:5)
Kontrakto pri la marfundo, 1971 (Scienca Mondo 1988:1:5)
Kontrakto pri la Persekutado kaj Punado de la Ĉefaj Militkrimuloj (L) (IJR 1969:2(10):3)

Kontrakto pri Malpermeso de nukleaj armiloj en Latinameriko, 1967 (Scienca Mondo 1988:1:5)
Kontrakto pri Sudpacifika nuklelibera zono, 1985 (Scienca Mondo 1988:1:5)
kontraktpartneroj (Fina Akto 13)
la 5an aŭgusto 1963 estis konkludita kontrakto por malpermeso de la nuklearmilaj provoj en la atmosfero (Scienca Mondo 1986:1:12)
la civitanoj de kiu ajn el la kontraktintaj partioj (IJR 1967:2(3):14)
la juro de la kontraktloko (IJR 1967:4/5(5):17)
la Prezidanto de la Parlamento ratifikas kaj denuncas la kontraktitajn de la registaro internaciajn konvenciojn (Konst. Bul. 9)
laborkontrakti (IJR 1966:1:21)
leĝo pri kontraktoj de 1917 (IJR 1967:1(2):19)
multflankaj kontraktoj (Fina Akto 22)
nuligi kontrakton (PIV 749)
prihereda kontrakto (IJR 1967:1(2):5)
skriba kontrakto (IJR 1977:1:31)
ŝuldoj kontraktitaj de la geedzoj je plenumigo de la ordinaraj ĉiutagaj bezonoj (IJR 1966:1:30)
tarifkontrakto (IJR 1976:1:20)
unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (Monato 1987:10:22)
vendokontrakto (IJR 1967:4/5(5):15)

**kontrasignatur/** (Ne en PIV)
kontrasignaturo (IJR 1982:1:37)

**kontraŭ/** (PIV 560)
kontraŭdireco: ĉiu partio havas la eblecon respondi al asertoj, argumentoj kaj postuloj de la alia (Aktualaj 64)
asekuro kontraŭ io (PIV 560)
diskuti la por kaj la kontraŭ (PIV 560)
eĉ negranda nombro da voĉoj kontraŭ estas jam sufiĉa (Z) (PIV 560)
fari juĝan proceson kontraŭ iu (PIV 560)
internaciaj kontraŭoj, kontraŭaj al la rajtoj de kiu ajn nacio (Aktualaj 17)
kontraŭe al la Konstitucio de 1936, la nova art. 1 preskribas, ... (L) (IJR 1980:2:9)
kontraŭjura sinteno (IJR 1976:2:25)
kontraŭjureco (IJR 1983:1:35)
kontraŭkonstitucia (IJR 1981:2:16), kontraŭ-konstitucia (IJR 1981:2:16)
kontraŭpruvo (L) (IJR 1983:2:12)
kontraŭulo (Aktualaj 63)
la ago devis esti kontraŭjura (IJR 1976:2:35)
la ago ne kontraŭas la bonajn morojn (IJR 1983: 1:37)
la konfliktkomisionoj estas kompetentaj, se la kulpigata civitano aŭ la kontraŭulo de la petanto estas laborulo en entrepreno kun konfliktkomisiono (IJR 1969:2(10):11)
la kontrakto kontraŭdiras al la japana konstitucio (Scienca Mondo 1983:3:32)
motivoj parolantaj kontraŭ la enkonduko de ... (Z) (PIV 560)
ne malofte la jura regulo estas kontraŭa al la morala (Aktualaj 25)
promeso sen kontraŭvaloro (IJR 1967:3(4):16)
sed same tiel kontraŭjure, kiel ĝi (Aktualaj 97)
voĉdoni por aŭ kontraŭ (Z) (PIV 560)

**kontribu/** (PIV 560)
kontribuado (kunkaŭzado) fare de la damaĝito (IJR 1976:1:36)
se la damaĝito kulpe kontribuis al la damaĝo, ... (IJR 1976:2:39)

**kontribuci/** (PIV 561)
kontribucio (r): sumo pagata de venkita popolo al la venkinto, kiel repago por la difektiĝoj kaj militaj elspezoj (PIV 561)
li punis la landon per kontribucio de cent kikaroj da arĝento (PIV 561)

**kontrol/** (PIV 561)
kontrolkomitato: en kompanio, tiu grupo da personoj, elektitaj pro sia riĉeco, lerteco aŭ prestiĝo, kiu kontrolas la agojn kaj administradon de la direktantaro (PIV 561)
la kontrolrajtoj super la uniaj respublikoj (L) (IJR 1980:1:14)

**kontumac/** (PIV 561)
kontumaca (r): ne obeanta ordonon de tribunalo, precipe alvokon al juĝateco (PIV 561)
kontumaco: vola foresto de krim-akuzito for de la juĝonta instanco (PIV 561)
juĝo pro kontumaco (PIV 561)

**konvenci/** (PIV 562). Vidu ankaŭ: konsent/ (interkonsento), kontrakt/, traktat/
konvencio (r): 1) interregna, internacia kontrakto, 2) tio, kio estas starigita per esprimita aŭ neesprimita konsento inter la homoj; interakceptitaj fiktivaĵoj, 3) usona kunveno de partidelegitoj, por elekti kandidaton al la prezidenteco (PIV 562)
Ĝenevaj Konvencioj 1925 kaj 1949 (Scienca Mondo 1983:3:18)
Hagaj Konvencioj 1899 kaj 1907 (Scienca Mondo 1983:3:18)
interŝtata konvencio (Esperanto 1969:10:158)
konvencia klaŭzo (PIV 562)
konvencio (IJR 1981:1:26, dif.)
konvencio gardanta la aŭtorajn rajtojn (PIV 562)
Konvencio pri Genocido de la 9-a de decembro 1948 (L) (IJR 1969:2(10):3)

konvencio pri la Alta Maro (IJR 1985:2:8)
konvencio pri la Kontinenta Breto (IJR 1985:2:8)
konvencio pri la Teritoria Maro kaj la Apuda Zono (IJR 1985:2:8)
konvencio pri la Vivantaj Riĉaĵoj de la Alta Maro (IJR 1985:2:8)
la Berna Konvencio pri aŭtorrajto (L) (IJR 1967: 2(3):13)
la "Brusela Konvencio" de 1948 (L) (IJR 1967: 2(3):13)
la Eŭropa Fiŝkaptada Konvencio, 1964 (IJR 1985: 2:13)
La Homrajto-Konvencio (IJR 1985:1:21)
la poŝta konvencio de Berno (PIV 562)
la Tutamerika Konvencio de 1910 (L) (IJR 1967: 2(3):14)
la Varsovia Konvencio pri Unuecigo de Certaj Reguloj Rilatantaj al Internacia Aertransporto (L) (IJR 1978:2:5)
partio de multflanka konvencio (L) (IJR 1969: 2(10):6)
sociaj konvencioj (PIV 562)
Soveta Unio subskribis kaj ratifis [ratifikis] nombron de konvencioj (IJR 1968:2(7):3)
Universala Konvencio de UNESKO (L) (IJR 1967:2(3):10)
Vienna Konvencio pri Diplomatia Interrilato, 1961 (IJR 1981:1:32)

**konvikt/** (PIV 563)
konvikti (r) (tr): pruvi per certaj montroj, ke iu estas kulpa (PIV 563)
konvikto: ago de tiu, kiu konviktas (PIV 563)
konviktaj montroj: objektoj, identigitaj de la akuzito, kiel pruvantaj la kulpecon de la akuzito (PIV 563)
konvikti iun pri krimo (PIV 563)
konvikto per cirkonstancoj estas tre malfirma (PIV 563)

**koopt/** (PIV 564)
koopti (r) (tr): elekti per kooptado (PIV 564)
kooptado: maniero de varbado, per kiu societo, komitato ktp elektas mem siajn novajn membrojn (= alelekti) (PIV 564)

**kopi/** (PIV 564)
kopirajta juro (IJR 1967:2(3):10)
kopi-rajto (Monato 1988:2:3)

**korp/** (PIV 569). Vidu ankaŭ: difekt/
apliko de korpa puno kiel disciplina rimedo (L) (IJR 1982:2:35)
ĉiu aĝulo havas la rajton je korpa imuneco (IJR 1981:1:16)
enkorpigi (IJR 1981:1:29)
enkorpigo de la akceptita proponteksto en la finprotokolon (IJR 1981:1:37)
faritaj traktatoj devas esti enkorpigitaj en la interna norvega juro por havi internan jurefikon (IJR 1981:1:29)
havi rajton je korpa imuneco (IJR 1981:1:16)
kalumnio aŭ leĝera korp-ofendo (IJR 1969:2(10):14)
korpodamaĝo kun gravaj sekvoj (L) (IJR 1982:1:16)
korpodifekto (IJR 1976:2:27)
leĝera korp-ofendo (IJR 1969:2(10):14)

**korporaci/** (PIV 570)
korporacio (r): 1) societo de sammetianoj aŭ samprofesianoj, posedanta la rajton de leĝa persono kaj submetanta siajn anojn al kolektiva disciplino, 2) unuiĝo de personoj, havantaj komunajn interesojn kaj organizitaj por ilin defendi (PIV 570)

**kort/** (kortumo) (PIV 570). Vidu ankaŭ: juĝ/, tribunal/
kortumo: nomo de kelkaj aparte gravaj tribunaloj (PIV 571)
alta kortumo (PIV 571)
apelacia kortumo (PIV 571)
ĉe ĉiu unuainstanca kortumo ekzistas advokataro (IJR 1967:3(4):10)
civila kortumo (IJR 1978:2:32)
distriktaj kortumoj (L) (IJR 1983:2:29)
duagradaj kortumoj (L) (IJR 1983:2:30)
Eŭropa Kortumo de Homaj Rajtoj (L) (IJR 1981: 2:2)
ĝeneralaj kaj specialaj kortumoj (IJR 1977:2:36)
kortuma libertempo (UN 27)
kortuma praktiko (IJR 1982:2:3), juĝista praktiko (IJR 1976:2:25)
kortumaj decidoj (Aktualaj 91)
kortumo de kasacio (Monato 1986:8/9:7), la franca kasacia kortumo (IJR 1976:2:16), la Kasacia Kortumo (plejsupera tribunalo) (PIV 494), revizia (kasacia) kortumo (L) (IJR 1983:2:29)
la Administracia Kortumo en Vieno (IJR 1980:2:23)
la antaŭmilita Konstanta Kortumo de Internacia Justico (L) (IJR 1976:1:9)
la interkonsiliĝo de la Kortumo okazas senpublike kaj restas sekreta (UN 32)
la Internacia Arbitracia Kortumo en Hago (Esperanto 1971:6:108)
la Internacia Kortumo de Justico (L) (IJR 1976:1:3)
la konstitucia Kortumo estas instalita kiel ŝtata organo por garantii la konstitucion (IJR 1981: 2:10)
la kortuma proceduro pri pruvado (IJR 1986:1:8)
la Kortumo devas certiĝi ke ĝi estas kompetenta (UN 32)
la Kortumo estas malfermita al la ŝtatoj kiuj es-

tas partioj de ĉi tiu Statuto (UN 29)
la Kortumo povas de tempo al tempo formi unu aŭ plurajn ĉambrojn konsistantajn el tri juĝistoj (UN 27)
la Kortumo retiriĝas por interkonsiliĝi (UN 32), la Kortumo retiriĝas por pridiskuto kaj konsiliĝo (Aktualaj 63)
la plej alta kortumo de Usono (Scienca Mondo 1988:1:21)
la Plej Supera Kortumo (IJR 1977:2:31)
La Superega Kortumo de Kanado (IJR 1982:1:24)
la tribunalo taksis la juĝokostojn je dek dolaroj (PIV 1081)
ne aperi antaŭ la Kortumo (UN 32)
pledi antaŭ kortumoj (IJR 1967:3/4:8)
puna kortumo (IJR 1978:2:32)
regiona (unugrada) kortumo (IJR 1977:2:37)
Sociasekura Kortumo (IJR 1979:1:22)
sole kompetenta estas speciale instalita kortumo, la Administracia Kortumo (IJR 1980:2:24)
specialaj kortumoj (IJR 1977:2:36)
supera kortumo (L) (IJR 1983:2:29)
unuagradaj kortumoj (L) (IJR 1983:2:29)

**kost/** (PIV 572)
en procesoj la kortumo decidas pri kompenso de la kostoj (IJR 1967:1(2):14)
ili ne havas sufiĉe da monrimedoj por pagi la proceskostojn (IJR 1967:3(4):14)
kondamni iun al la juĝokostoj (PIV 542)

**kotiz/** (PIV 573)
kotizi (r) (ntr): pagi sian parton en komunan kazon, por komuna celitaĵo (PIV 573)
kotizo: 3) la regula pago, kiun faras asekurito al sia mutuala aŭ sociala asekurado (PIV 573)

**kovr/** (PIV 573)
kovri (r): 7) kompensi (PIV 573)
bedaŭro kaj ĉagreno ŝuldon ne kovras (Z) (PIV 573)
li ne povas revi pri la kovro de la faritaj ŝuldoj (Z) (PIV 573)
tio ne sufiĉos por kovri la kostojn (PIV 573)

**kreditor/** (PIV 579)
kreditoro (r): tiu persono, al kiu oni ŝuldas ion (PIV 579)

**krim/** (PIV 582)
krimo (r): ago, per kiu morala aŭ civila leĝo estas plej grave malobservata (mortigo, dombruligo, seksatenco, infanŝtelo ktp) (PIV 582)
krima: 1) kulpa je krimo, 2) rilata al krimo (PIV 582)
daŭra krimo (IJR 1983:1:37), kontinua krimago (fari la saman krimagon en kurtaj intervaloj animate de la intenco ofendi la saman personon (IJR 1982:2:11)
depost 1967 seksagoj, kiuj antaŭe konstituis la krimon de kruda maldeco, estas nekriminalaj se faritaj inter du plenaĝuloj kiuj ambaŭ konsentas (IJR 1982:1:24)
finfarita krimo (IJR 1982:2:4)
ili deklaris, ke ĉiuj militkrimuloj estos juste punitaj post la milito (L) (IJR 1969:2(10):2)
konspiraj krimoj (IJR 1982:2:4)
krima junulo (PIV 582)
krimago kontraŭ la testamentinto (IJR 1967:1(2): 3)
krimagoj punataj per morto (PIV 1982:2:10)
krimeto = delikto (PIV 582)
krimfarado de la junaĝuloj (IJR 1969:2(10):24)
kriminalstatistiko (L) (IJR 1983:2:15)
kriminta homo (IJR 1979:2:4)
krimjura kodo (IJR 1982:2:8)
krimo kontraŭ la proprieto (IJR 1982:2:4)
krimo kontraŭ la sekureco (IJR 1982:2:4)
kumulo de krimagoj (IJR 1982:2:11)
la Kodo forigis la komunjuran distingon inter krimo (a. felony) kaj delikto (a. misdemeanour) (IJR 1982:1:25)
la krimulo respondecas kriminale (IJR 1982:2:4)
la plirapidiĝanta kresko de la krimfarado (IJR 1984:2:34)
li ekiras kriman vojon (IJR 1969:2(10):24)
malvastigi la rondon de la krimagoj punataj per morto (IJR 1982:2:10)
milita krimulo (IJR 1968:1(6):2), militkrimulo (IJR 1979:2:23)
momenta krimo (IJR 1983:1:37)
ne sukcesinta krimo (IJR 1982:2:4)
okupiĝi pri la demando de la militkrimuloj kaj de ilia punado (Aktualaj 67)
perdigi al la ago la karakteron de krimo (L) (IJR 1982:1:7)
plenumita kaj prova krimo (IJR 1983:1:37)
premdevigi iun krimi (IJR 1982:1:21)
pro via krimo vi pagos per la vivo (Z) (PIV 582)
prova krimo (IJR 1982:2:4)
publikigi statistikojn pri krimeco (L) (IJR 1986: 1:45)
reperpetrita krimo (IJR 1983:1:37)
se frenezeco ekzistis en la momento de la krimo /delikto (IJR 1982:1:21)
sensignifeco aŭ foresto de damaĝaj sekvoj senigis la agon de krima karaktero (L) (IJR 1982:1:7)
simpla (ununura) kaj aropa (multaj samaj) krimoj (IJR 1983:1:37)
spaca krimo (IJR 1969:2(10):8, dif.)
tiel multaj faroj, kiuj antaŭe estis krimigitaj

kiel malobeoj, estas eksigitaj el la kriminala kodo, dum aliaj estas deklarataj krimetoj (IJR 1968:3(8):17)
tio tamen ne senigas iliajn agojn de krima karaktero (L) (IJR 1969:2(10):6)
tutplenumita aŭ regula krimo (IJR 1983:1:35)
unuafoje perpetrita krimo kaj reperpetrita krimo (IJR 1983:1:37)
unupersona (unuaŭtora) krimo kaj multpersona krimo (IJR 1983:1:37)

kriminal/ (PIV 582)
kriminala (r): koncernanta la krimojn (PIV 582)
kriminaligi: transformi proceson civilan en kriminalan (PIV 582)
kriminalisto: 1) juristo, fakulo pri kriminala juro, 2) = kaŝpolicisto (PIV 582)
armea kriminala juro (IJR 1982:2:10)
Armea Kriminala Kodo (IJR 1983:1:36)
dekriminaligo (IJR 1983:1:41), senkrimigo (IJR 1980:2:38) (L)
depost 1967 seksagoj, kiuj antaŭe konstituis la krimon de kruda maldeco, estas nekriminalaj (IJR 1982:1:24)
en la sfero de la financa kriminala juro (IJR 1981:2:25)
esti kriminale respondeca (L) (IJR 1982:1:16)
esti submetataj al kriminala respondeco (PIV 1975:2:42)
evolustadioj de kriminala agado (preparlaboroj, atencoj, kompletigo de la krimo) (L) (IJR 1983:2:8)
ili ne povas esti kriminale respondecaj (L) (IJR 1982:1:16)
kodo de kriminala proceduro (PIV 870)
komenci kriminalproceduron kontraŭ iu (IJR 1968:2(7):12)
kriminala juĝisto (PIV 582)
kriminala juro (L) (IJR 1983:2:5), kriminaljuro (IJR 1982:2:2)
Kriminala Kodo (L) (IJR 1982:1:7), kriminala kodo (IJR 1966:1:21)
kriminala proceda kodo (IJR 1968:3(4):17), kriminala proceskodo (IJR 1969:1(9):11), kriminalprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), Punprocedura Kodo (IJR 1967:3(4):14)
kriminala proceduro (L) (IJR 1983:2:5)
kriminala proceso (PIV 582)
kriminala respondeco pro kontraŭjuraj agoj (L) (IJR 1969:2(10):2)
kriminala sistemo (IJR 1982:2:10)
kriminala tribunalo (IJR 1981:2:24)
kriminalaj kazoj (IJR 1969:2(10):13)
kriminaligo kaj dekriminaligo de la sovetia kriminaljura politiko (L) (IJR 1983:1:41)
kriminaljura esploro (L) (IJR 1983:2:8)
kriminaljura normo (L) (IJR 1983:2:8)
kriminaljura respondeco (IJR 1969:2(10):25)
kriminaljura scienco (L) (IJR 1983:2:18)
kriminaljura teorio (IJR 1982:2:3)
kriminalleĝo (IJR 1969:1(9):11)
kriminalprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
kriminalprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5)
kriminalstatistiko (L) (IJR 1983:2:4)
la kriminala juro estas unu el la plej gravaj kaj sensivaj branĉoj (L) (IJR 1982:1:4)
la kriminaljura respondeco komenciĝas per kompletiĝo de la 14-a jaro (L) (IJR 1982:1:16)
la krimulo respondecas kriminale (IJR 1982:2:4)
la nuntempa kriminaleco en Grekio (IJR 1983:2:18)
povas esti konsiderataj kiel kriminale respondecaj (Aktualaj 66)
preskribi kriminalan respondecon por malasidueco (L) (IJR 1980:2:6)
traduko de la kriminalaj kodoj kaj kriminalproceduraj kodoj (IJR 1967:2(3):17)

kriminalistik/ (Ne en PIV)
kriminalistiko (L) (IJR 1986:1:46, dif.)

kriminolog/ (Ne en PIV)
kriminologo (L) (IJR 1986:1:46, dif.)

kriminologi/ (Ne en PIV)
kriminologiaj esploroj (L) (IJR 1983:2:8)
kriminologio (IJR 1984:2:34, dif.), (L) (1986:1:46, dif.)

krom/ (PIV 585)
Rimarko: krom havas negativan sencon en pozitiva frazo, kaj pozitivan en negativa frazo. Cetere, en okazo de dubo, oni povas ĉiam akcenti la duan signifon per ankaŭ, aŭ precizigi la unuan per la uzo de escepte de (PIV 585)
krom en la kazoj antaŭviditaj en paragrafo 2 (IJR 1969:1(9):19)
krom se la reĝo volas faciligi ilian situacion (IJR 1986:1:29)
krom se la traktato alimaniere preskribas rezervo povas esti retirata iam ajn (IJR 1969:1(9):21)
la agentoj de la ricevanta ŝtato ne rajtas iri en la lokalojn de la misio, krom se la ĉefo de la misio konsentas pri tio (IJR 1984:2:38)
la kanada Konstitucio estas neŝanĝebla krom per la Parlamento en Londono (IJR 1981:1:5)
la kunsidoj estas publikaj, krom se la Kortumo decidas alimaniere (UN 31)
la teksto estas egale aŭtoritata en ĉiu lingvo, krom se ... (IJR 1969:2(10):27)
ŝtato rajtas formuli rezervon, krom se la rezervo estas malpermesita de la traktato (IJR

1969:1(9):21)

**kulp/** (PIV 593)

kulpa (r): intence aŭ konscie plenumita ion riproĉindan aŭ punindan (PIV 593)
kulpeco: eco de tiu, kiu estas kulpa (PIV 593)
kulpi (ntr): esti kulpa pri io (PIV 593)
kulpigi: akuzi (PIV 593)
kulpiĝi: fariĝi kulpa pri io (PIV 593)
kulpo: malrespekto de leĝo, de devo, de morala regulo (PIV 593)
kulpulo: homo kulpa (PIV 593)
kunkulpulo: tiu, kiu helpis kulpulon en lia malbonago (PIV 593)
rekulpiĝo: ripetita kulpiĝo (PIV 593)
senkulpa: ne kulpa (PIV 593)
senkulpigi: aserti iun ne kulpa (PIV 593)
sinmemkulpigo: akuzo de si mem (PIV 593)
ĉiu krimuloj povus sin senkulpigi per la argumento, ke (Aktualaj 72)
duono de la krimuloj aŭ deliktuloj iĝas rekulpiĝintoj (IJR 1982:2:17)
esti kulpa pri la damaĝo (IJR 1976:2:17)
esti kulpa pri militkrimoj (Aktualaj 68)
homo ne kritikanta, silenta havis eksenton de kunkulpinto en iu granda ekonomia krimo (Monato 1989:6:4)
ili estas malkulpaj (Monato 1985:12:11)
ili respondecas discipline, pune kaj civile pri siaj dumoficaj kulpofaroj (Konst. Bul. 12)
indicoj de kulpeco (PIV 422)
Kiu kulpas tiu ŝtelo? (PIV 593)
kiu per kulpa volo efektivigas fakton, kiu kaŭzas al aliaj maljustan damaĝon, tiu devas ripari la damaĝon (IJR 1976:2:33)
konfesi sian kulpecon (PIV 593)
konstati la kulpon de akuzito (IJR 1978:2:33)
kulpa pri krimo (PIV 593), kulpa pro krimo (IJR 1968:2(7):11)
kulpa volo (IJR 1976:2:33)
kulpigi iun pri io (PIV 593)
kulpigito (IJR 1967:4/5(5):2)
kulpulo pri krimo (L) (IJR 1969: 2(10):6)
kulpuloj pri la daŭriganta vetarmado (Scienca Mondo 1982:4:26)
kunkulpulo, komplico (Scienca Mondo 1983:1:25)
la ĉefaj kulpuloj pri tiu krimego (L) (IJR 1969: 2(10):6)
la damaĝito ne estas devigata pruvi la kulpon de la damaĝinto; kontraŭe, la lasta devas sin ekskulpigi (IJR 1976:2:24)
la fakto estis kaŭzita de kulpa konduto de respondeculo (IJR 1976:2:34)
la kulpo de la laborulo pri la akcidento (IJR 1975:2:44)
la kulpo pri la divorco (IJR 1966:1:14)
la laborulo mem kaŭzis la akcidenton per kulpa konduto (IJR 1975:2:45)
la leĝo do supozigas la kulpon de la kaŭzinto (L) (IJR 1976:2:21)
la malkovro de tiu nova fakto senkulpigas lin (PIV 593)
la registaro promesis ke la kulpantoj certe estos forte punataj (Monato 1985:9:6)
la rekulpiĝintoj estas pli grave punataj (PIV 593)
li povis senkulpigi sin antaŭ la tribunalo (PIV 593)
li senkulpigis sin per la plej pravaj motivoj (PIV 858)
malplia kulpebleco (IJR 1982:1:21)
objektiva respondeco (IJR 1976:2:35), senkulpa (objektiva) respondeco (IJR 1976:2:25)
oni kulpigis la filon pro valutodefraŭdo kaj enkarcerigis lin en koncentrejo (Monato 1988:2:23)
por damaĝoj senkulpe kaŭzitaj oni respondecas nur en jenaj esceptaj kazoj (IJR 1976:1:32)
principe oni devas kompensi nur tiun damaĝon, kiun oni kulpe (t.e. intence aŭ neglekte) kaŭzis (IJR 1976:1:32)
pruvi ies kulpecon (PIV 593)
pruvi sian senkulpecon (PIV 883)
proprietuloj respondecas pri damaĝoj kaŭzitaj de hejmaj bestoj laŭ la kriterio de supozita kulpo, kaj de sovaĝaj bestoj laŭ la objektiva kriterio (IJR 1976:2:32)
rekulpiĝintoj (recidivuloj) (IJR 1983:2:22)
se li proprakulpe konservis fremdan ŝtatanecon (IJR 1967:3(4):24)
senkulpa persekutato (PIV 593)
senkulpigaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
servi kiel senkulpigo pri minaco (Fina Akto 8)
supozo de senkulpeco antaŭ ol la krimo aŭ delikto estas pruvita (Aktualaj 88)
tiu malobeo okazis kulpe (IJR 1975:2:45)
trafik-kulpulo (Monato 1989:5:15)

**kumul/** (PIV 594)

kumuli (r) (tr): plenumi samtempe plurajn funkciojn, mamdatojn ktp (PIV 594)
kumulo de krimagoj (IJR 1982:2:11)
la kumulado de pensio civila kun pensio milista (PIV 594)
la kumulado de voĉoj (Z) (PIV 594)

**kuratel/** (PIV 599)

kuratelo (r) = kuratoreco (PIV 599)

**kurator/** (PIV 599)

kuratoro (r): 1) individuo, jure nomita por zorgi pri persono kaj havo de neplenaĝa orfo aŭ de

iu, kiu ne posedas la personajn rajtojn (PIV 599)
la romanaj institucioj submetis la edzinojn sub kontinua kuratoreco (PIV 599)
laŭleĝa kuratoro (IJR 1966:1:8)
Leĝo pri Kuratoreco (L) (IJR 1966:1:22)

**kutim/** (PIV 602)
kutimi (r) (ntr): akiri fortan emon al ia ago pro ofta ripetado (PIV 602)
kutimo: 2) agmaniero, starigita de longa uzado ĉe iu popolo (PIV 602)
internacia kutimojuro (IJR 1967:3(4):4)
kutim-juro (IJR 1968:1(6):3), kutimjuro (IJR 1968:1(6):2), kutimojuro (IJR 1968:1(6):2), jura kutimo (Aktualaj 32, dif.)
la kutimo ludas grandan rolon en la socia vivo (PIV 602)
la reguloj pri respondeco pro la damaĝo estas bazitaj sur kutimjuro (IJR 1976:2:24)
popola kutimo havas valoron de leĝo (Z) (PIV 602)

**kvalifik/** (PIV 603)
kvalifiki (r) (tr): 1) karakterizi, atribuante al iu ian econ (PIV 603)
agadoj, kiuj povas esti kvalifikitaj kiel "kontraŭsoveta propagando" (L) (IJR 1969:1(9):2)
la distrikta tribunalo de Tokio kvalifikas la atomajn bombardojn de Hiroŝima kaj Nagazaki kiel kontraŭajn al la internacia juro (Scienca Mondo 1983:3:18)
la trompan forprenon la kodo kvalifikas ŝtelo (PIV 603)

**kvestor/** (PIV 606)
kvestoro: 1) administranto de la ŝtata trezoro ĉe la antikvaj Romanoj, 2) persono, en kelkaj organismoj (ekz. la Ĉambro de Deputitoj, iaj Universitatoj ktp), estas komisiita zorgi pri la elspezoj, 3) itala policestro de provinco aŭ de granda urbo (PIV 606)

**kvorum/** (PIV 607)
kvorumo (r): difinita nombro da ĉeestantaj membroj en asembleo, komitato, senato ks, necesa, por ke ties decidoj estu plenrajtaj (PIV 607)
havi kvorumon (Esperanto 1981:9:149), la kvorumo ne estas atingita (PIV 607)
konsenta kvorumo (plimulto de du trionoj de la donitaj voĉoj) (IJR 1980:1:30)
kvorumo de konsentaj voĉoj kaj ĉeestantaj deputitoj en la parlamento (IJR 1977:1:17)
kvorumo de naŭ juĝistoj sufiĉas por konsistigi la Kortumon (UN 27)
la ĉefkunveno ne havis la necesan kvorumon (L) (IJR 1983:2:47)
la kvorumo ne estas atingita (PIV 607)
la kvorumoj de konsentaj voĉoj kaj de ĉeestantaj deputitoj (IJR 1977:1:17)
la ordinaraj kvorumoj por decido en ambaŭ ĉambroj estas unu triono por la ĉeesto kaj simpla plimulto de la donitaj voĉoj (IJR 1980:2:17)
laŭ la konstitucio, kvorumo konsistas en 24 seĝoj, unu pli ol duono (Monato 1989:5:12)
prezenca kvorumo (ĉeesto de minimume la duono de la deputitoj) (IJR 1980:1:30)
se mankis la necesa kvorumo en la parlamento (IJR 1981:2:16)

# L

**labor/** (PIV 608)
labordaŭro: la nombro de la horoj, dum kiuj la laboristoj laboras en unu tago (PIV 609)
labordonanto: duganto (PIV 609)
laborejo: 1) ĉia kovrita loko, kie oni laboradas (PIV 609)
laboristo: 1) homo, kiu sin dungas per laboro (PIV 609)
laborloko: loko, ordinare eksterdome, kie laboras laboristoj (PIV 609)
labornekapablo: provizora aŭ definitiva nekapablo normale labori (PIV 609)
laborperejo: ofico, kie oni proponas laboron al senlaboruloj, ordinare kontraŭ ia pago (PIV 609)
laborulo: laboranto (PIV 609)
punlaboro: devigata laboro, kiun kulpulo estas kondamnita fari (PIV 609)
senlaborulo: tiu, kiu ne povas trovi laboron (PIV 609)
templabori (ntr): labori kun tiu kondiĉo, ke oni estas pagata laŭ la daŭro kaj ne laŭ la produkto de la laborado (PIV 609)
kodo de la laboraferoj (IJR 1968:1(6):3)
la entreprenestro devas detale motivigi la neceson de kromhoraj laboroj (IJR 1976:1:20)
la laboro dum kromhoroj povas esti postulata nur, se ... (IJR 1976:1:20)
laborafera juro (IJR 1968:1(6):3), laborjuro (IJR 1975:2:40), laborrilata juro (L) (IJR 1982:1:4)
labordefenda leĝaro (IJR 1976:1:40)
laborkontrakti (IJR 1966:1:21)
laborprotekto laŭ la juro de Germana DR (IJR 1976:1:19)
laborkontrakti (IJR 1966:1:21)
labortribunalo por konfliktoj inter labordonantoj

kaj laborprenantoj (IJR 1967:1(2):16)
leĝo pri laborsekureco (IJR 1975:2:34), leĝo pri laborprotekto (IJR 1975:2:39)
minlaboristo (PIV 609)
monata labortempo (IJR 1976:1:19)
nigra laboro (ekster la leĝaj horoj aŭ la sindikataj kondiĉoj (PIV 737 sub nigr/)
posemajna labortempo (IJR 1976:1:19)
protekto kontraŭ laborakcidentoj (IJR 1976:1:23)
punlaboro (IJR 1984:2:35)
terlaboristo (PIV 609)

## land/ (PIV 614)

ellandigo de fremduloj (IJR 1984:2:35)

## las/ (PIV 618)

forlasito: vaganta aŭ grundinta ŝipo, forlasita de sia ŝipanaro (PIV 618)
postlasi (tr): restigi post si (PIV 618)
ago aŭ preterlaso kontraŭjura (IJR 1983:1:36)
agoj aŭ forlasoj (IJR 1968:1(6):9)
la repreno estas allasebla en la tempospaco de kvin jaroj post la dono de la ŝtataneco (IJR 1968:2(7):9)
postlasi heredaĵon (PIV 618)
testamenta postlasaĵo (PIV 618)
testamenti pri 1/3 de siaj postlasaĵoj (IJR 1979: 1:15)

## legac/ (PIV 624). Vidu ankaŭ: legator/

legaco (r): legacio 3) (PIV 624)
fari legacon pri io (PIV 624)
la legacato ne estas heredanto (IJR 1975:1:13)
la legacitoj akiras obligacian postulrajton ne kontraŭ la heredaĵon, sed kontraŭ la ŝarĝitan heredanton (L) (IJR 1975:1:28)
la testamentanto rajtas fari legacon deklarante, ke ... (IJR 1975:1:9)
legacato (IJR 1975:1:13)
legacoj, t.e. transirigo de unuopaj objektoj al certaj personoj (IJR 1975:1:5)
legaco-ricevanto aŭ legaco-celito (IJR 1975:1:19)

## legaci/ (PIV 624)

legacio (r): 1) diplomatia misio, sendita de unu registaro en ŝtaton, kie ĝi ne havas ambasadoron, 2) domo, kie loĝas tiu misio, 3) havaĵo aŭ rajto, kiun iu donas el sia heredaĵo per testamento aŭ kodicilo al difinita persono (PIV 624)
legacioj povas elĉerpi la tutan heredaĵon (PIV 624)

## legaliz/ (PIV 624)

legalizi (r) (tr): fari, ke io estu laŭleĝa, estu leĝe valida (PIV 624)
legalizi revolucian ordonon (PIV 624)
testamento subskribita persone de la testamentanto kaj legalizita de notario (L) (IJR 1975: 1:27)

## legat/ (PIV 624)

legato (r): altranga eklezio komisiita por reprezenti la papon en ia difinita okazo (PIV 624)

## legator/ (Ne en PIV). Vidu ankaŭ: legac/

legatoro (IJR 1975:1:6)

## legislativ/ (Ne en PIV)

legislativo (IJR 1984:1:23)

## legitim/ (PIV 624)

legitimi (r) (tr): 1) pruvi per dokumento la identecon, individuecon de iu, 2) rajtigi postulon, pretendon per dokumento, 3) konfirmi la aŭtentikecon de dokumento (PIV 624)
eksteredzeca filo (PIV 216), ekstergeedza infano (L) (IJR 1966:1:24), eksterleĝa infano (Esperanto 1975:6:103), geedzecaj kaj ekstergeedzecaj infanoj (IJR 1975:1:12), infano naskita dum la geedzeco aŭ ekster la geedzeco (L) (IJR 1966:1:24), laŭleĝa infano (L) (IJR 1966:1:24), legitima infano (IJR 1967:3(4):21), leĝa infano (PIV 624), needzeca infano (IJR 1967:4/5(5):7), nelegitima infano (IJR 1979:1:16)
legitimaĵoj: paperoj, dokumentoj, per kiuj oni povas legitimi iun aŭ ion (PIV 624)
legitimisto: partiano de reĝo aŭ tronpretendanto, kies rajtoj baziĝas sur la rekta heredeco (PIV 624)
la aŭstra konstitucio entenas i.a. ankaŭ la funkci-disigan kaj la legitimecan principojn (IJR 1977:1:9)
legitimi ies subskribon (PIV 624)
legitimi sian heredontecon pri la trono (PIV 624)
legitimi sian posedrajton (PIV 624)
legitimi testamenton ĉe la tribunalo (PIV 624)
li akiras per la legitimigo la ŝtatanecon, se ... (IJR 1967:3(4):21)
sin legitimi per pasporto (PIV 624)

## leĝ/ (PIV 624). Vidu ankaŭ: kod/

leĝo (r): 1) akto entenanta ĝeneralajn normojn kaj kreanta juron, farita de leĝodona aŭtoritato (normale de parlamento aŭ ekvivalenta instanco) kaj promulgita en laŭjura formo, 2) en formala senco, decido, kiu nur laŭ sia formo, sed ne laŭ sia enhavo, estas leĝo 1) (ekzemple decido de la parlamento pri budĝeto, en iaj landoj), 3) ... (PIV 624)
eksterleĝulo: homo, kiu, rompinte la leĝon, ne plu ĝuas ties garantiojn (PIV 624)
kadroleĝo: leĝo, kiu difinas la principojn kaj lasas al la plenum-instancoj precizigi la aplikdetalojn per dekretoj (PIV 624)
kontraŭleĝa: kontraŭa al unu difinita leĝo, aŭ al

unu difinita regulo de la skribita juro, de la konstitucio ks (PIV 624)
leĝdoni, leĝfari (ntr): redakti kaj proklami leĝojn (PIV 624)
leĝigi: fari ion leĝa (PIV 624)
leĝisto: profesiulo sperta pri la leĝoj kaj iliaj aplikoj (PIV 624)
militleĝo: regado de la milit-instancoj, dum kiu la civilaj leĝoj estas interrompitaj (PIV 624)
adopta leĝo (PIV 9), leĝo pri adopto (IJR 1966:1:22)
akcepti leĝon pri ... (L) (IJR 1983:1:43)
balot-leĝo (Monato 1985:9:9)
ĉi tiu impedimento rilatas al la leĝaj supozoj pri patreco (IJR 1966:1:17)
ĉiu alia jura regulo laŭ esenco de sia enhavo devas retromontri al la leĝo (IJR 1968:3(8):6)
ĉiu konstitucio regulas [reguligas] la leĝofarantan, plenumadan kaj juĝistan potencojn (IJR 1967:4/5(5):24)
doni al la leĝoj retroaktivan forton (IJR 1968:1(6):4)
doni, fari, proponi, voĉdoni, nuligi leĝon (PIV 624)
doni nur kadrajn leĝojn (IJR 1977:1:16)
edikti leĝojn (Eŭropa Dokumento 1976:11:18)
edziĝoleĝaro (Monato 1986:3:11)
egaleco antaŭ la leĝo (L) (IJR 1968:3(8):2)
en Bukureŝto estis farita packontrakto, kiu leĝigis la rabon de bulgaraj teritoriaj fare de la najbaraj landoj (Bulgario 28)
en kazo de nuligo de la geedzeco, la infanoj estas konsiderataj kiel laŭleĝaj (L) (IJR 1966:1:24)
en la leĝofarado procezo (IJR 1968:3(8):6)
fari leĝojn pri komerco, ktp. (IJR 1981:1:3)
fari leĝproponon pri io (Eŭropa Dokumento 1983:3:50)
federala leĝo (PIV 273)
havi leĝpravigon por nei redukton (IJR 1979:1:19)
hereda leĝo (IJR 1975:1:9), Leĝo pri la Heredo (IJR 1975:1:12), Leĝo pri Heredado (IJR 1966:1:22)
heredimposta leĝo (Esperanto 1971:1:19)
internacia leĝofaro do necesas (Eŭropa Dokumento 1976:11:18)
italaj leĝoj de divorco kaj abortigo (Monato 1985:9:14)
juĝi pri la kontraŭleĝeco de dekretoj (IJR 1981:2:14)
Ĵurnalo de la leĝoj (IJR 1966:1:26), Leĝa Gazeto (IJR 1981:2:24)
kadra leĝo (Monato 1985:12:21)
konstitucia leĝo (IJR 1980:1:30)
kontraŭalkoholisma leĝo (Monato 1986:2:5)
kontraŭleĝa propono (PIV 624)
kontraŭleĝeco (L) (IJR 1978:1:18)
kriminaljura leĝaro (L) (IJR 1982:1:18)
kriminalleĝo (IJR 1969:1(9):11)
la 3 povoj (leĝdona, plenuma kaj juĝa) (Aktualaj 76)
la du komisionoj faras leĝdonajn proponojn (Scienca Mondo 1983:1:26)
la ekzistantaj leĝoj (Scienca Mondo 1983:3:18)
la federacia parlamento sole povas fari leĝojn pri ... (IJR 1981:1:3)
la hispana registaro publikigis leĝon, kiu ... (Monato 1987:12:23)
la internacia leĝo estas supera al la interna jura ordo (Aktualaj 71)
la iom primitivaj leĝokolektoj de la diversaj skandinavaj provincoj (IJR 1967:1(2):18)
la konstitucio regulas la leĝofarantan, plenumadan kaj juĝistan potencojn (Samloke: plenuma potenco) (IJR 1967:4/5(5):24)
la laŭleĝeco de la uzo de la nuklea armilo (Scienca Mondo 1983:3:18)
la leĝdona potenco de USSR estas efektivigata de la Supera Soveto (Konstitucio 1937, p. 7)
la leĝdona povo (PIV 624)
la leĝdoninto trovis, ke ... (IJR 1976:1:44)
la leĝmodifo de 1973 (IJR 1982:2:10)
la leĝo datiĝas de Aprilo 1963 (IJR 1968:1(6):11)
la leĝo estis promulgita la 8-an de decembro 1951 (L) (IJR 1984:2:8)
la Leĝo pri ŝtataneco datiĝas de la jaro 1913 (IJR 1967:4/5(5):7)
la nun valida leĝa reguligo (IJR 1981:2:12)
La Pakto Briand-Kellog deklaris la militon eksterleĝa (L) (IJR 1976:1:4)
la parlamento alprenis la leĝproponon, ke la sindha lingvo estu la sola oficiala lingvo (Esperanto 1972:10:162)
la starpunktoj de la leĝdona potenco (IJR 1984:2:15)
la Supera Soveto de la Unia respubliko estas sola leĝdona organo de la respubliko (Konstitucio 1937, p. 11)
la ŝtata funkcio estas dividita je leĝdonado, administracio kaj justico (IJR 1980:1:25)
la verdikto fariĝis leĝoforta (IJR 1968:1(6):12)
la volo de la leĝdonanto estas malklare esprimita (PIV 624)
laŭ la nun valida leĝaro (IJR 1984:2:9)
laŭleĝa heredanto (IJR 1975:1:17)
laŭleĝa heredokvoto (IJR 1975:1:17)
leĝa protekto (Esperanto 1984:12:208)
leĝaj premisoj (IJR 1969:2(10):16)
leĝaj ŝanĝiĝoj (Monato 1989:5:24)
leĝ-decido (IJR 1980:2:18), leĝo-decido (IJR 1979:1:31)
leĝdona funkcio (Aktualaj 42)
leĝdona kompetenteco (IJR 1967:3(4):21)
leĝdonado, administracio kaj justico (IJR 1985:

1:12)
leĝdonaj organoj (L) (IJR 1976:2:20)
leĝdoninto (IJR 1976:1:44)
leĝelekto (IJR 1967:4/5(5):14)
leĝfaristo (IJR 1982:2:4), leĝdonanto (IJR 1982: 2:6)
leĝigi infanon naskitan ekster edzeco (PIV 624)
leĝigo de la instruado de Esperanto (Esperanto 1975:6:106)
leĝigo kaj envalidigo de internacia juro (Fina Akto 44)
leĝlibro (IJR 1975:2:28)
leĝo en formala senco (IJR 1984:2:29)
leĝo en materia senco (IJR 1984:2:29, dif.)
leĝo pri asekuro (IJR 1979:1:26)
leĝo pri aŭtorrajto (L) (IJR 1967:2(3):10)
leĝo pri domluo (IJR 1979:1:27)
leĝo pri edziĝo (IJR 1966:1:25)
leĝo pri kontraktoj de 1917 (IJR 1967:1(2):19)
Leĝo pri Kuratoreco (L) (IJR 1966:1:22)
leĝo pri la elekto de la deputitoj (IJR 1984:2:29)
Leĝo pri la Rilatoj inter la Gepatroj kaj Infanoj (L) (IJR 1966:1:22)
leĝo pri laborsekureco (IJR 1975:2:34), leĝo pri laborprotekto (IJR 1975:2:39)
leĝo pri malliberejoj (IJR 1982:2:3)
leĝobeanta klaso (IJR 1983:2:22)
leĝofaraj kaj politikaj iniciatoj (Esperanto 1985: 9:148)
leĝofaranta laboro (IJR 1968:1(6):2)
leĝoj estas promulgataj per edikto, dekreto aŭ ukazo (PIV 876)
leĝoj konstituciaj, civilaj, kriminalaj (PIV 624)
leĝoprojekto (IJR 1969:1(9):14), leĝprojekto (L) (IJR 1984:1:19), leĝ-projekto (IJR 1975:1:6)
leĝoŝanĝo (IJR 1975:2:35), leĝŝanĝo (IJR 1977: 2:52)
leĝpreparaj dokumentoj (IJR 1979:1:28)
leĝpropono (Monato 1989:1:10)
leĝ-publikigilo (IJR 1977:1:16)
li neniam faris iun ajn neleĝaĵon (Monato 1987: 12:13)
li prezentis al la parlamento novan leĝproponon (Esperanto 1982:7/8:129)
li submetis al la regiona parlamento leĝproponon (Esperanto 1989:4:78)
lia leĝa edzino (Z) (PIV 624)
lia leĝa posteularo (PIV 624)
malobservo de la leĝo (IJR 1982:2:2)
mi ne kredas, ke tio povas laŭa al la leĝo (Scienca Mondo 1987:1:3)
Mosea-leĝaro (Monato 1986:8/9:23)
nelaŭleĝeco (Scienca Mondo 1983:3:18)
nesciado de leĝo neniun pravigas (Z) (PIV 858)
ni ne plenumis la ordonojn kaj la leĝojn kaj la decidojn, kiujn Vi ordonis al Moseo (Biblio. Neĥemja 1:7)
nuligi leĝojn kontraŭkonstituciajn (IJR 1980:1:33)
nun ankaŭ tiaj krimaj agoj estas leĝe difinitaj kiel krimoj (Aktualaj 85)
nur la plej malgranda parto de la leĝrompintoj estas malliberigataj (IJR 1969:1(9):12)
obeo al leĝa regularo pri polucio (Monato 1989: 6:20)
oni fine submetis por diskutado tiurilatan leĝ-projekton (Monato 1987:9:8)
"ordinara" aŭ "simpla" leĝo (IJR 1980:1:30)
parlamenta leĝo-decido (IJR 1979:1:31)
part-leĝoj de la kriminala juro (IJR 1968:1(6):3)
per verdikto la testamento povas esti nuligata, se ĝi ne estas farita en laŭleĝa formo (IJR 1975:1:11)
plena egaleco antaŭ la leĝo (Aktualaj 87)
poste okazis pluraj revizioj de la leĝo (Monato 1987:12:9)
postuli alproprigon de la loĝdomo al sia laŭleĝa porcio (IJR 1977:1:32)
prezenti en la parlamento tri leĝ-projektojn (Monato 1989:3:18)
prezenti leĝprojekton (Nederlando 1980, p. 7)
pri la leĝdonado sur ĉi tiu tereno (Nederlando 1980, p. 37)
pruvo de daŭra posedado dum laŭleĝa tempo (IJR 1977:2:33)
retroaktiva leĝo (IJR 1982:2:3)
rompo de la leĝo (Z) (PIV 624)
se oni ne havas rektan leĝpravigon por nei (IJR 1979:1:19)
sed post du monatoj, kiam la verdikto fariĝis leĝoforta, ... (IJR 1968:1(6):11)
simile kiel ĉe la konstituciaj leĝoj, ankaŭ ĉe la "ordinaraj" leĝoj povas ekzisti pluraj rangoj (IJR 1984:2:30)
speciala leĝo aranĝas pli detale la regulojn pri la respondecoj de la membroj de la Registaro, same tiel pri la proceduro de ilia juĝado (Konst. Bul. 12)
specialaj kriminalaj leĝoj (IJR 1983:2:20)
specialaj leĝoj (IJR 1983:1:36)
starigo de fundamentaj principoj por leĝdonado pri la laboro (Konstitucio 1937, p. 5)
tiel ekzistas neniu perleĝa garantio pri la ĝeneralaj homaj rajtoj (IJR 1968:3(8):8)
vico da leĝoj (IJR 1982:2:10)
viktimoj de kontraŭleĝeco kaj de psikiatria misuzo (L) (IJR 1978:1:18)

**lev/** (PIV 629)
la kresko de la kriminaleco montriĝas per leviĝaj tendencoj precipe en la jenaj krimaj agoj (IJR 1983:2:22)

**levirat/** (PIV 631)
levirato (r): kutimo ĉe la Hebroj kaj aliaj popoloj, laŭ kiu la frato aŭ plej proksima parenco de viro seninfane mortinta devas edziĝi al ties vidvino (PIV 631)

**lez/** (PIV 631). Vidu ankaŭ: damaĝ/, korp/
lezo (r): difektiĝo de histo aŭ de organo, estigita de traŭmato aŭ de patogena agento (PIV 631)
negrava lezo (IJR 1982:2:4)

**liber/** (PIV 632). Tie ĉi: malliber/. Vidu ankaŭ: karcer/, prizon/
liberulo: 1) homo, kiu ne estas sklavo aŭ servutulo, 2) homo, politike libera, 3) homo, socie libera (PIV 632)
penslibereco: rajto de civitano libere pensi pri politikaj aŭ religiaj aferoj (PIV 632)
agoj kontraŭ la persona libereco (IJR 1983:2:21)
akcepto de leĝo rajtiganta liberiĝon de soldatservo (Monato 1987:12:9)
al la civitanoj estas garantiata la libero de la preso, la parolo, la kunvenoj, la mitingoj kaj la manifestadoj (Konst. Bul. 19)
batali por la libereco (Z) (PIV 632)
bazaj liberecoj (Fina Akto 11)
ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo (samloke: rajto de) (L) (IJR 1977:1:28)
doni la liberecon al sklavo (PIV 632)
doni liberecon al (kondamnito) (Z) (PIV 632)
fundamentaj liberecoj (L) (IJR 1977:1:25)
garantii la liberecon de konscienco (IJR 1969:1(9):16), konsciencolibereco (IJR 1969:1(9):16)
garantii la liberecon pri esprimo, preso kaj kunveno (IJR 1969:1(9):16)
ili estis kondamnitaj al severaj punoj de malliberigo ĝis 7 jaroj kaj aldona relegacio de 2-5 jaroj (L) (IJR 1982:1:10)
la individua libereco estas garantiita al ĉiuj regnanoj (PIV sub individu/)
la klasikaj liberecoj de pensado, konscienco, religio, opinio kaj esprimado, organiziĝo kaj kunvenado (Aktualaj 88)
la libereco de la maroj (garantianta al la ŝipoj de ĉiuj nacioj la rajton navigi sur ĉiuj maroj) (PIV 632)
laŭ la Eŭropa Komisiono ŝi estis maljuste malliberigita sen ia ajn proceso (Monato 1989:6:13)
li, arestita en 1975, nun estas liberigita (Scienca Mondo 1984:2:24)
li povas esti liberigita de puno (L) (IJR 1982:1:11)
libereco de asociiĝo (L) (IJR 1981:2:3)
libereco de gazetaro (forigo de ĉia cenzuro) (PIV 632)
libereco de konceptado (Fina Akto 11)
libereco de kredo kaj konscienco (IJR 1967:3(4):24), libereco de la kredo (PIV 632)
libereco de kunveno (PIV 632), libereco de kunvenado (L) (IJR 1981:2:3), libereco pri kunvenado (IJR 1969:1(9):16)
libereco de la penso (se oni agnoskas nenian alian aŭtoritaton, ol de la prudento) (PIV 632)
libereco de opinio kaj opiniesprimado (L) (IJR 1981:2:3)
libereco de parolo, preso, kunvenoj kaj mitingoj, stratoj procesioj kaj demonstracioj (Konstitucio 1937, p. 21)
libereco de preso (Aktualaj 76)
libereco de religia aparteno (Aktualaj 76)
libereco plenumi religiajn ritojn (Bulgario 43)
libereco pri esprimo, preso kaj kunvenado (IJR 1969:1(9):16)
liberiga juĝo (L) (IJR 1978:1:25)
liberiga ordono (PIV 632)
liberigi iun el sklaveco (Z) (PIV 632)
liberigita de ĉiu respondeco (Z) (PIV 632)
liberigita je siaj ŝuldoj (PIV 632)
mi dezirus liberigi min de edzino, kiu min malhonoras (Z) (PIV 632)
milito de liberigado (PIV 632)
politika libereco (certiganta al la civitanoj partoprenon en la regado) (PIV 632)
post dutaga arestado, li fariĝis denove libera (PIV 632)
rajto donita al ĉiu presi kaj publikigi siajn opiniojn, sen antaŭa permesso de la registaro (PIV 632)
senigo de la libereco, kiu kelkfoje povas daŭri dum multaj jaroj (IJR 1969:1(9):14)
varo libera je doganpagoj (PIV 632)

malliber/:
malliberejo: domo, aŭ parto de domo, kie estas enŝlosita arestitoj aŭ kondamnitoj (PIV 632)
malliberigi: 1) meti en malliberejon (PIV 632)
la plejmulto estas nur kondiĉe kondamnata je malliberigo (IJR 1969:1(9):12)
la puno ne povas esti pli granda ol 10 jaroj da malliberigo (L) (IJR 1982:1:16)
leĝo pri malliberejoj (IJR 1982:2:3)
li estis kondamnita al 10-jara malliberigo en punkampo (L) (IJR 1978:1:20)
li estas kondamnita je malliberigo de kvin jaroj aŭ pli (IJR 1967:3(4):23)

mallibereja puno (IJR 1968:1(6):11), prizona puno (IJR 1980:1:21)
malliberigita (IJR 1984:2:35)
malliberigo sen juĝa proceduro (L) (IJR 1981:2:7)
malpermeso de arbitraj arestoj, malliberigoj kaj ekziloj (L) (IJR 1968:3(8):2)
nur la plej malgranda parto de la leĝrompintoj estas malliberigataj (IJR 1969:1(9):12)
oni ĵetis min en malliberejon (Z) (PIV 632)
politikaj malliberigitoj (IJR 1985:1:30)
vestoj de malliberejo (Biblio. 2. Reĝoj 25-29)

**licenc/** (PIV 634)
licenco (r): 2) permeso, donita de de registaro al ŝtatano plenumi difinitan socian agadon (presi, instrui, prediki, vendi tian aŭ tian varon ktp) (PIV 634)
licenco pri alkoholvendado (PIV 634)
nelicencita vendado (PIV 624)

**licit/** (Ne en PIV)
licito, proponi sumon en aŭkcio (Esperanto 1987: 4:74)

**lig/** (PIV 635)
ĵurligi (tr): ligi per ĵuro (PIV 635)
fari ligantan kontrakton (IJR 1967:4/5(5):18)
interkonsentoj, kiuj ne postulas ratifikon, fariĝas plenligantaj por la koncerna ŝtato ĉe la subskribo (IJR 1981:1:38)
la estinta Ligo de Nacioj (Aktualaj 106)
la konsento de Ŝtato esti ligita de traktato estas esprimita per la subskribo de ĝia reprezentanto (IJR 1969:1(9):20)
liganta kontrakto (IJR 1967:4/5(5):18)
sen iu ajn kunligiteco kun la ceteraj krimoj (Aktualaj 85)
verkoj teme ligitaj kun difinita artikolo (Scienca Mondo 1982:4:1)

**likvid/** (PIV 637)
likvidi (r) (tr): 1) (pp konto, ŝuldo) reguligi, pagante la sumon, kiun montras la definitiva kalkulo, 2) (pp firmo ktp) realigi la aktivon kaj la pasivon, por pagi la ŝuldojn, tiel metante finon al la koncerna negoco, 3) finreguligi la templimajn transakciojn en biloborso, 4) (f) meti finon al, forigi (ordinare abrupte aŭ perforte) (PIV 637)
la likvidiĝon de la societo povas decidi nur la membrokunveno kun 75 % de la donitaj voĉoj (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:2)
likvidanto, likvidisto: fidinda specialisto, kiu estas komisiita likvidi societon, negocon ks (PIV 637)
likvidi entreprenon (PIV 637)
likvidi la kontraŭulojn de la reĝimo (PIV 637)

**lim/** (PIV 638). Vidu ankaŭ: temp/ (limtempo)
limo (r): 1) linio, kie finiĝas kampo, ordinare markita de enterigitaj ŝtonoj, 2) linio, kie finiĝas teritorio, ordinare difinita laŭ oficiala mapo, 3) ... (PIV 638)
limŝtono: ŝtono, plantita en grundo, por difini la limojn de kampo, bieno ks (PIV 1071 sub ŝton/)
tempolimo: difinita momento, antaŭ kiu io devas finiĝi (PIV 638)
antaŭ fiksita tempolimo (UN 24)
delegito kun limigitaj povoj (PIV 638)
disponigi pri sia havaĵo en la limoj establitaj de leĝo (IJR 1975:1:21)
elektas komisiono, kiu plej malfrue dum trimonata limtempo raportas pri ... (Konst. Bul. 7)
la komitato ne finis (sian laboron) al la difinita tempo (Z) (PIV 638)
la kunvokado al ĉefkunveno okazas skribe kun limtempo de minimume 4 semajnoj (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)
la plenumkomitato faras siajn decidojn en la limoj de la statuto de la ĝenerala organizaĵo (Aktualaj 124)
la Registaro ... estas devigata ne pli malfrue ol dum tritaga limtempo prezenti buŝan aŭ skriban respondon (Konstitucio 1937, p. 13)
la statuto limigas strikte la povojn de la direktoro (PIV 638)
la templimo de la akcepto de la kontrakto falas en Oktobro (PIV 638)
malbenita estu, kiu forŝovas la limŝtonojn de sia proksimulo, diris Moseo (PIV 1071)
nova limdato por la konkursoj pri jubilea afiŝo (Esperanto 1983:1:6)
translimaj kunaĵoj (Esperanto 1972:5:82)

**linĉ/** (PIV 640)
linĉi (r) (tr): punmortigi laŭ decido de memstariĝinta neleĝa tribunalo, laŭ la maniero, kiun la sudistaj usonanoj uzadis kontraŭ la negroj (PIV 640)

**lingv/** (PIV 640)
procedura lingvo (L) (IJR 1977:2:15)

**lini/** (PIV 641)
bazlinio (IJR 1980:2:34)
meza linio (IJR 1985:2:21)

**log/** (PIV 645)
delogi (tr): logi al malbona faro (PIV 645)
delogado (IJR 1982:1:25)
delogi ies edzinon (PIV 645)

**loĝ/** (PIV 646)
fakta kunloĝado (L) (IJR 1978:2:15)
havi sian daŭran loĝlokon sur la teritorio de la

Respubliko (IJR 1967:3(4):22)

**lok/** (PIV 647)

kontraktloko (IJR 1967:4/5(5):17)

kunvenloko (IJR 1981:1:35)

la jarkunveno havos lokon en ... (Heroldo 1983:9:1)

la juro de la kontraktloko (IJR 1967:4/5(5):17)

loko de subskribo (IJR 1981:1:27), loko por subskribo (IJR 1981:1:39)

plenumloko (IJR 1967:4/5(5):16)

translokigi la laborulon (IJR 1969:2(10):16)

**lombard/** (PIV 648)

lombardi (r) (tr): deponi ĉe tiucela oficejo garantiaĵon kontraŭ mona alprunto (PIV 648)

lombardejo: pruntodeponejo (PIV 648)

lombardisto: tiu, kiu pruntedonas monon kun interezo, kontraŭ la garantio de persona posedaĵo deponita ĉe li (PIV 648)

lombardi sian poŝhorloĝon (PIV 648)

**lot/** (PIV 649)

en Ateno, oni elektadis la juĝistojn per lotado (PIV 649)

lote dividi la teron (PIV 649)

la estraro estis lote elektita (PIV 649)

oni lotumis la heredaĵon inter la filoj (PIV 649)

**lu/** (PIV 650)

lui (r) (tr): ricevi ion, por ĝin uzi dum difinita tempo, pagante interkonsentitan prezon (PIV 650)

luanto: tiu, kiu luas (PIV 650)

luiganto: tiu, kiu luigas (PIV 650)

luigi: doni ion al iu, por lia uzo dum difinita tempo, ricevante interkonsentitan prezon = ludoni (PIV 650)

vicluigi: luigi parton de domo aŭ loĝejo, kiun oni mem luas (PIV 650)

dometo, kiun ili luis pro kvin spesmiloj por jaro (Z) (PIV 650)

eligo de luinto (IJR 1977:1:31)

la instancoj respondas per devidaj lupaglimigoj (Esperanto 1987:11:189)

la luanto devas pagi la luprezon je la unua de ĉiu trimestro (PIV 650)

la luiganto rezervas al si la rajton repreni por sia uzo la ludomon, en la okazo, se ... (PIV 650)

la luprezo de tia domo estas relative granda (IJR 1977:1:31)

leĝo pri domluo (IJR 1979:1:27)

leĝoj rigore limigas la luprezon riceveblan de la luintoj, kaj malpermesas la eligon de luinto post la fino de lia kontrakto (IJR 1977:1:31)

luado de aŭtomobilo por unu monato (PIV 650)

ludoni aŭtojn kun aŭ sen ŝoforo (Bulgario 111)

luprezo (IJR 1977:1:31)

mi amas, ke oni pagu akurate la luan pagon (Z) (PIV 25 sub akurat/)

mi luigis mian apartementon por la daŭro de mia forestado (PIV 650)

transpreni la lu-rajton post la morto de la luanto (IJR 1979:1:27)

# M

**magistrat/** (PIV 658)

magistrato (r): administranto de urbo (PIV 658)

la alte estimata magistrato anoncigas ... (PIV 658)

**majorat/** (PIV 660)

majorato (r): hereda ordo, laŭ kiu la plej maljuna filo heredas la familian bienon kaj certajn rajtojn (PIV 660)

**majoritat/** (PIV 660)

majoritato (r): 1) aĝo, ĉe kiu la leĝo agnoskas la kapablon de unu persono plenumi siajn rajtojn, respondeci pri siaj agoj ktp., 2) plimulto (vidu sub: mult/) (PIV 660)

la estraro decidas per simpla majoritato de voĉoj (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)

la membrojn de la estraro elektas la jarĉefkunveno per simpla majoritato por la daŭro de 2 jaroj (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)

por statutŝanĝo kaj la ekskludo de membroj majoritato de 75% de la ĉeestantoj membroj estas necesa (Eŭropa Dokumento 1983:2, Statuto:4)

**makler/** (PIV 661)

makleri (r) (ntr): profesie servi kiel peranto pri kontraktofarado aŭ eblecoj de kontraktofarado, ekzemple pri aĉetoj, frajtoj, kreditoj ks (PIV 661)

bilomakleristo: tiu, kiu makleras bilojn ĉe borso (PIV 661)

maklerаĵo: profito, kiun enspezas makleranto (PIV 661)

makleristo: persono, kiu, havante mem nenian financan riskon, agas en la nomo de komisianto, kunigas du partiojn kaj prizorgas la interesojn de ambaŭ (PIV 661)

makleri pri teksaĵoj (PIV 661)

**malversaci/** (PIV 663)

malversacio (r): ŝtelalproprigo de mono, en la administrado de privata aŭ publika funkcio (PIV 663)

**mandat/** (PIV 665)

mandato (r): 1) rajtiga komisio al iu, reprezenti la rajtiganton kaj agi en lia nomo, 2) doku-

mento, per kiu oni donas tian komision, 3) dokumento, per kiu oni ordonas pagi difinitan sumon al difinita persono (PIV 665)
elektataj de la loka loĝantaro por trijara mandato (Konst. Bul. 13)
kolonia mandato kontrolata de la Ligo de Nacioj (PIV 665)
la mandato de la juĝistoj en la Internacia Kortumo (Aktualaj 60)
la mandato de la Parlamento daŭras kvar jarojn (Konst. Bul. 6), la mandato de la parlamento estas valida por kvar jaroj (IJR 1976:1:15)
la plej granda grupo de mandatuloj estas instruistoj (Monato 1985:9:8)
mandato de deputito (PIV 665)
poŝtmandato (PIV 665)

manifest/ (PIV 667)
manifesto (r): solena skriba deklaro de registaro, partio, skolo kc, por sciigi kaj klarigi al publiko sian opinion (PIV 667)
ŝipmanifesto: listo, specifanta la kargon de ŝipo kaj mencianta la nomojn de ĝiaj sendintoj (PIV 667)
deteni sin de ĉiu ajn manifestado de forto (Fina Akto 15)
la Komunista Manifesta (1848) (PIV 667)

mar/ (PIV 669)
juro de la maro (IJR 1985:2:5), marjuro (IJR 1985:2:5)
marborda ŝtato (IJR 1985:2:9)
marjuro (IJR 1985:2:5), juro de la maro (IJR 1985:2:5)

marĉand/ (PIV 670)
marĉandi (r) (ntr): diskuti pri la prezo de io, por aĉeti ĝin pli malkare (PIV 670)
marĉandaĵo: io, kion oni aĉetis je favora prezo, post marĉando (PIV 670)
marĉando, marĉandado: ago de tiuj, kiuj marĉandas (PIV 670)
la teksto estis voĉdonita post longegaj marĉandoj (PIV 670)
oni ne marĉandas ĉe mi, la prezoj estas fiksitaj (PIV 670)

mark/ (PIV 671)
brulmarki (tr): stampi la ŝultron de krimulo, la dorson de ŝafo, bovo ktp, por povi ilin rekoni (PIV 671)
marki la boacidojn (Heroldo 1969:3/4:5)

marod/ (PIV 672)
marodi (r) (tr): ŝteli, por sia propra uzo kaj malgrandkvante, terproduktojn en la kamparo aŭ kortobestojn en farmodomo (PIV 672)
li marodis sakon da terpomoj (PIV 672)

mas/ (PIV 673)
maso (r): 5) tuto de la posedaĵoj de ŝuldanto aŭ herediganto (PIV 673)

mastr/ (PIV 675)
mastro (r): 1) posedanto kaj ĉefo de domo, loĝejo, bieno (PIV 675)
iliaj mastroj donis al ili la liberecon (IJR 1979:2:19)
kie sklav' regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas (Z) (PIV 675)
la servutuloj ricevis novan mastron (Aktualaj 13)

materi/ (PIV 676). Vidu ankaŭ: material/
Ĉu la materia damaĝo estas grava? (L) (IJR 1983:2:10)
Ĉu tiu damaĝo konsistigas rektan materian perdon al la ŝtato? (L) (IJR 1983:2:9)
fari similajn materiajn regulojn sur la koncerna jurkampo (IJR 1967:4/5(5):14)
forestas la materiaj rimedoj necesaj por la efektiva realigo de tiuj liberecoj (L) (IJR 1968:3(8):3)
kelkaj interkonsentoj enhavas nur la materiajn preskribojn (IJR 1981:1:27)
kompenso por nemateriaj damaĝoj (Monato 1988:12:12)
la damaĝinto devas kompensi materian kaj nematerian damaĝon (IJR 1976:2:31)
la fifarinto tute kompensu la materian kaj nematerian damaĝojn (Monato 1989:11:20)
la materiaj kondiĉoj kaj antaŭnecesaĵoj por socialisma revolucio (L) (IJR 1980:1:8)
la materiaj kondiĉoj por ilia ekzisto (L) (IJR 1984:1:3)
lasi ilin sen materia helpo (IJR 1968:3(8):17)
leĝo en materia senco (IJR 1984:2:29)
materiaj kondiĉoj kaj antaŭnecesaĵoj (L) (IJR 1980:1:8)
materiaj preskriboj (IJR 1981:1:27)
nemateria, senobjekta proprieto je kreita verko (IJR 1967:2(3):4)
plua evoluigo de ĝia spirita kaj materia kulturo (L) (IJR 1967:2:4)
por la plua evoluigo de ĝia spirita kaj materia kulturo (IJR 1967:2(3):4)
primateria juro (IJR 1980:1:36)

material/ (PIV 677). Vidu ankaŭ: materi/
ili ne kunkonduku militmaterialon (IJR 1969:1(9):9)
kaŭzi materialan damaĝigon al aliaj (IJR 1982:2:10)
la hungara ŝtato zorgas pri la materialaj bezonoj (IJR 1969:1(9):16)
la socialisma juro kreis la materialan koncepton de la leĝo (IJR 1969:1(9):5)
materiala juro (IJR 1968:1(6):2)
persiste kreskas la materiala bonstato de la civitanoj (IJR 1968:3():20)

registrado de jurnormaj materialoj (L) (IJR 1983: 2:3)

medi/ (PIV 679)

juro pri naturmedia antaŭzorgo (Monato 1988:2:13)
protekto de la medio (Scienca Mondo 1982:4:8)

mediaci/ (PIV 679)

mediacio (r): procedo en internacia aŭ laborista juro, laŭ kiu persono aŭ registaro proponas solvon al la neakordantoj, ne trudante ĝin al li (PIV 679)
solvado de malkonsentoj unuavice per traktado, mediacio kaj konciliacio (L) (IJR 1976:1:2)

medicin/ (PIV 679)

jurmedicino: medicina fako, kiu studas la solvon de problemoj estigitaj de la apliko de la leĝoj (PIV 679)
jurmedicina scienco (L) (IJR 1986:1:44)

membr/ (PIV 683)

ĝui plenajn membrorajtojn (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:2)
Membroj-Fondintoj (L) (IJR 1976:1:1), membroj-fondintoj (L) (IJR 1985:2:4)
membroj-ŝtatoj (Monato 1989:5:7), Ŝtatoj-Membroj (L) (IJR 1976:1:1)
membrokunveno (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)
organizaĵo-membro de MFSL (Scienca Mondo 1986:1:1)

memorand/ (PIV 684)

memorando (r): 1) mallongigita raporto, aldonita al diplomata noto, 2) kolekto da memornotoj pri proceso, kontrakto, eventoj ktp, (PIV 684)
komunreferaĵo, memorando, interŝanĝo de notoj (PIV 1981:1:26)

mend/ (PIV 684)

mendi (r) (tr): postuli, ke iu faru ian poste pagotan servon aŭ liveru ian poste pagotan komercaĵon (PIV 684)
malmendi: nuligi mendon (PIV 684)
la loko, kie la vendinto havas loĝejon aŭ negocejon je la mendotempo (IJR 1967:4/5(5):16)

mens/ (PIV 684)

mensa malsano (L) (IJR 1982:1:17)
perturbo de mensaj funkcioj (IJR 1983:1:38)
pri la stato de siaj mensaj kapabloj (L) (IJR 1982:1:16)
pro postrestinta mensa evoluo (L) (IJR 1982:1:18)

mensog/ (PIV 685)

mensogi (r) (ntr): diri tion, pri kio oni scias, ke ĝi estas malvera, aŭ nei tion, pri kio oni scias, ke ĝi estas vera (PIV 685)
mensoga: bazita sur mensogo (PIV 685)
mensoga atestanto (PIV 685)
mensog-detektilo (IJR 1986:1:18)

mercer/ (PIV 685)

mercero (r): tiu speco de varoj necesaj al la kudrado, trikado, vestfarado ks. (PIV 685)
mercerejo: butiko, kie oni vendas merceron (ekzemple butonojn, fadenojn, pinglojn, kudrilojn ktp) (PIV 685)
merceristo: tiu, kiu vendas merceron (PIV 685)

met/ (PIV 687)

demeti sian antaŭan ŝtatanecon (IJR 1967:3(4):22)
en la unua grupo nur unu persono submetiĝas al la provo (IJR 1986:1:12)
formeti de si ĉian oficialan rolon (PIV 688)
formeti sian oficon (PIV 688)
formetu tiun antaŭjuĝon (Z) (PIV 687)
kondiĉe, ke la partioj libervole submetiĝu al ĝia juĝo (L) (IJR 1976:1:3)
konsideri la raportojn submetitajn de la administranta aŭtoritato (UN 19)
meti plendon ĉe la juĝisto (PIV 687)
meti sur iun la tutan respondecon, la kulpon (PIV 687)
meti ŝteliston en malliberejon (Z) (PIV 687)
persono kiu sukcese submetiĝis al speciala advokata aŭ juĝista ekzameno (L) (IJR 1967:4/5(5):

mezur/ (PIV 692)

decidi pri la mezuro de la sankcio (IJR 1968:2(7):5)

miks/ (PIV 695)

enmiksiĝo en internajn aferojn (Monato 1986:2:19)

mild/ (PIV 696)

la puno estas senlime mildigebla (IJR 1982:2:12)
la transpaso estis perpetrita sub speciale mildigaj cirkonstancoj (L) (IJR 1982:1:12)

milit/ (PIV 697)

militdifektoj: difektoj, kaŭzitaj de milito al domoj, bienoj, industrioj ktp. (PIV 697)
deklari militon al Turkio (Bulgario 25)
deviga militservo (Monato 1987:12:9), deviga soldatservo (IJR 1984:1:17), devo de militistara servo (IJR 1968:1(6):5)
devo de militistara servo (IJR 1968:1(6):5)
milita juro (IJR 1983:1:33)
milit-deklaro (IJR 1984:1:10)
militista juĝejo (IJR 1968:2(7):10)
militista tribunalo (IJR 1985:1:30)
militkrimulo (L) (IJR 1979:2:23), militaj krimuloj (IJR 1968:1(6):2)
milito de religioj (PIV 697)
proklami, deklari, fari, gajni, perdi la militon (PIV 697)
rifuzantoj de la plenumo de milita servo (IJR 1985:1:31)
starigo de militistaj bazoj sur sia teritorio (IJR

1969:1(9):9)

**militar/** (Ne en PIV)

militar-fakuloj (Monato 1986:6:5)

**minimum/** (PIV 699)

minimuma kvoto (IJR 1975:1:17)

proksimaj parencoj havas la rajton je minimuma kvanto (IJR 1975:1:6), "leĝoparto" (IJR 1975: 1:10)

**ministeri/** (PIV 699)

ministerio (r): ministerejo (PIV 699)

Eduka Ministerio de Latva SSR (Esperanto 1971: 5:82), edukministerio (Esperanto 1969:10:158), Ministerio de Edukado (Esperanto 1972:2:22), Ministerio pri Edukado (Esperanto 1983:1:18)

fakministerio (IJR 1981:2:39)

justicministerio (IJR 1967:1(2):14), ministerio por juraj aferoj (IJR 1969:1(9):4), ministerio pri Justico (IJR 1984:2:5)

la kultura sekcio de la eksterlanda departemento [ministerio] (Esperanto 1969:9:138)

Ministerio de defendo (Scienca Mondo 1983:1:2)

Ministerio de Eksterlandaj aferoj (Esperanto 1975:6:108), Ministerio de Eksterlandaj Aferoj (Nederlando 1980, p. 48), Ministerio Por Eksteraj Aferoj (IJR 1967:4/5(5):11), ministerio por eksterlandaj aferoj (Esperanto 1969:9:138), ministerio pri eksterlandaj aferoj (Aktualaj 36), Ministerio pri Ekstero (IJR 1981:1:33)

Ministerio de energetiko (Scienca Mondo 1983:1:3)

ministerio de instruado (Esperanto 1969:9:138)

ministerio de la eksteraj aferoj, popolklerigo, financoj, justeco, nacia defendo, agrikulturo, komuna mastrumado (Konst. Bul. 10)

Ministerio de Laboraferoj (IJR 1968:2(8):8)

Ministerio de Turismo (Esperanto 1970:10:146)

Ministerio por Klerigo kaj Superaj Lernejoj (Esperanto 1969:10:159)

ministerio por komunikado (Esperanto 1969:11:171)

ministerio por scienco kaj klerigado (Esperanto 1972:3:50)

Ministerio pri Financoj (IJR 1979:1:16)

Ministerio pri Trafiko (Esperanto 1986:2:37)

**ministr/** (PIV 699)

ministro (r): plej supera ĉefo, kiu, estante ano de ŝtata registaro, estras unu el la apecialaj administraj fakoj de la ŝtataj aferoj (PIV 699)

ĉefministro: la unua inter la ministroj, havanta super ili prestiĝan aŭ funkcian superecon (PIV 699), ĉefministro (ne ministroprezidanto) (Monato 1985:3:5)

justicministro (PIV 458), Ministro pri Justico (IJR 1968:1(6):7)

Komitato de Ministroj (L) (IJR 1981:2:3)

konsilantaro de Ministroj (Esperanto 1972:5:82)

la Federacia Ĉefministro (IJR 1980:1:23), la Premieroj de la Ŝtatoj (IJR 1980:1:23)

la intereskampo de la fakministrio (IJR 1981:2:39)

ministra letero (IJR 1977:2:53)

ministrejo de justico (Nederlando 1980, p. 10)

ministrejo pri internaj aferoj (enlandaj) (PIV 436)

ministro de Financoj (Nederlando 1980, p. 24)

ministro de la Aferoj Eksterlandaj (PIV 38 sub ambasad/), ministro por eksterlandaj aferoj (Fina Akto 16), ministro pri eksteraj aferoj (Monato 1989:5:20), ministro pri la eksterlandaj aferoj (Aktualaj 37)

ministro de popolklerigo de Estona SSR (Heroldo 1982:8:2)

Ministro por Kulturo (Esperanto 1969:11:170)

**minoritat/** (PIV 699)

minoritato (r): aĝo antaŭ la majoritato, 2) malplimulto (PIV 699)

minoritataj lingvoj (IJR 1985:2:35)

**misi/** (PIV 701)

misio (r): 1) grava komisio, oficiale donita de registaro al unu aŭ pluraj personoj, fari eksterlande traktadojn, observojn ktp. (PIV 701)

ĉefoj de diplomatiaj misioj (IJR 1969:1(9):20)

la agentoj de la ricevanta ŝtato ne rajtas iri en la lokalojn de la misio, krom se la ĉefo de la misio konsentas pri tio (IJR 1984:2:38)

**modif/** (PIV 704)

modifi (r) (tr): ŝanĝi la formon, unu el la ecoj de io, ne tuŝante la esencon (PIV 704)

amendo kaj modifo de traktatoj (IJR 1969:2(10): 27)

kvankam oni modifis la konstitucion kelkfoje, tuta ŝanĝo jam estas neevitebla (Monato 1989: 5:9)

la leĝmodifo de 1973 (IJR 1982:2:10)

la nuna modifo de la leĝo pri ekzekucio de la kriminalaj sankcioj, validiĝanta ekde la 1-a de julio de la kuranta jaro, ... (IJR 1969:1(9):14)

leĝoprojekto por modifo de la konstitucio (Konst. Bul. 21)

mi voĉdonigas nun la modifitan tekston (PIV 704)

modifi artikolon de la statuto (PIV 704)

modifi leĝprojekton (PIV 704)

se suferinto de la damaĝo ankaŭ mem estis kulpa, kompenso al li povas esti modifita (IJR 1976: 2:17)

**molest/** (PIV 706)

molesti (r) (tr): malamike aŭ insulte trakti (PIV 706)

la policisto molestis la arestiton (PIV 706)

**monogami/** (PIV 709)

monogamio (r): moro, aŭ leĝa sistemo, laŭ kiu viro ne povas havi pli ol unu edzinon samtempe, kaj inverse (PIV 709)

**mor/** (PIV 711)

moro (r): ĝenerala vivmaniero kaj kutima konduto de iu popolo, gento, provinco aŭ klaso (PIV 711)

la ago ne kontraŭas la bonajn morojn (IJR 1983: 1:37)

la moroj estas nenio alia, ol la kondiĉitaj refleksoj de unu societo (PIV 711)

moro kaj tradicio (Esperanto 1971:10:163)

**moral/** (PIV 711)

moralo (r): 1) parto de la filozofio, esploranta la principojn de homa konduto kaj instruanta pri la celinda bono kaj pri la devoj, 2) aro de la reguloj, kiuj validas interne de unu socio, societo, klaso aŭ partio, kaj laŭ kiuj la normala ano de tiuj homgrupoj distingas inter la bono kaj la malbono (PIV 711)

la priseksa moralo de la viroj (PIV 711)

propono, kiun la proponanto havas plenan rajton repreni (Z) (PIV 711)

**moratori/** (PIV 712)

moratorio (r): leĝa permeso al ŝuldantoj prokrasti siajn repagojn ĝis difinita tempo (PIV 712)

dum milito, la registaroj ordinare dekretas moratorion por la mobilizitoj (PIV 712)

**morganat/** (PIV 712)

morganata (r): kvalifikas la edziĝon inter princo aŭ reĝo kaj virino de malalta rango, kiu ne partoprenas en la titoloj kaj nobelaĵoj de sia edzo, kaj kies infanoj ne rajtas pretendi ilin (PIV 712)

**mort/** (PIV 713)

iu kriplulo estis kondamnita al morto (IJR 1979: 2:6)

konservo de la mortiga puno (IJR 1985:1:33)

memmortigo, sinmortigo: mortigo de si mem (PIV 714)

mortokaŭzo (IJR 1986:1:37)

mortpuno (IJR 1984:1:17), mortiga puno (IJR 1985:1:33), morta puno (PIV 887), mortopuno (Aktualaj 71)

perfortoj sekvitaj de morto (IJR 1982:1:27)

plurfoje mi savis ilin dum ilia memmortiga provado (Monato 1987:4:27)

recidiva hommortigo (IJR 1986:1:3)

**motiv/** (PIV 715)

motivo (r): 1) tio, kio igas personon agi, konduti tiel aŭ tiel (PIV 715)

motivaĵo: ĉiu el la motivoj de juĝa decido (PIV 715)

senmotiva: ne motivita, senkaŭza (PIV 715)

Ĉu estas motivita la apliko de tiu grava sankcio (IJR 1968:2(7):5)

estas evidente bona motivo akcepti, ke ... (Scienca Mondo 1985:4:18)

estas nenecese, ke la sumoj troviĝas en la juĝkonkludo, sufiĉas se oni povas trovi ilin en la juĝmotivoj (IJR 1976:2:37)

granda nombro da motivitaj kaj konvinkaj argumentoj pri la nelaŭleĝeco de la uzo de nuklea armilo (Scienca Mondo 1983:3:18)

la entreprenestro devas detale motivigi la neceson de kromhoraj laboroj (IJR 1976:1:20)

la impotenteco estas motivo por eksedziĝo (PIV 419 sub motiv/)

la juĝistaro devas prijuĝi, ĉu estas motivita la apliko de tiu grava sankcio (IJR 1968:2(7):5)

la juĝo devas esti motivigita (UN 32)

la peto estas malakceptata per motivita decido (IJR 1969:2(10):12)

li forestas senmotivite (IJR 1969:2(10):12)

li havis motivitan kaŭzon supozi tion (IJR 1982: 2:12)

liveri la juran motivigon pri cenzurado (Scienca Mondo 1985:4:17)

motivoj parolantaj kontraŭ la enkonduko de ... (Z) (PIV 560)

se la kondiĉoj ne estas plenumitaj, la peto estas malakceptata per motivita decido (IJR 1969:2(10):12)

senmotiva plendo, protesto (PIV 715)

**mov/** (PIV 715)

nemovebla: tia, ke oni ne povas ĝin movi (PIV 716)

investo en valoran nemoveblaĵon (Esperanto 1985: 1:1)

movebla havaĵo (IJR 1985:1:26)

movebla proprietaĵo (IJR 1977:1:36)

moveblaĵoj vendataj kiel akcesoraĵoj al bieno (IJR 1967:4/5(5):18)

nemovebla havaĵo (IJR 1977:1:35), nemovebla proprietaĵo (IJR 1977:1:36), nemoveblaĵo (IJR 1977:2:33)

starigo de hipoteko super nemovebla havaĵo (IJR 1975:1:9)

**mufti/** (PIV 717)

muftio (r): muzulmana doktoro, aŭtoritatigita de la famo aŭ de la ŝtato, por donadi doktrinajn, principajn respondojn pri religiaj kaj juraj demandoj (PIV 717)

**mult/** (PIV 717). Vidu ankaŭ: majoritat/

absoluta plejmulto (Monato 1986:5:8)
absoluta plimulto (IJR 1983:1:43)
al ties akcepto estas necese du trionoj de la voĉdonoj de la parlamentaj deputitoj (kvalifikita plimulto) (IJR 1976:1:14)
ĉiuj konkludoj estas farataj per simpla plimulto (Aktualaj 118)
decidi per simpla plimulto (Scienca Revuo 1974: 5/6:249)
diference de la Ligo de Nacioj, kies Asembleo devis akceptadi la grandegan plimulton de siaj decidoj per ĉiuj voĉoj, la Ĝenerala Asemblo de UN normale decidas per plimulto de voĉoj de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj. Nur pli la gravaj demandoj, menciitaj en la art. 18 de la Ĉarto, la Ĝenerala Asembleo decidas per du trionoj de voĉoj de la membroj ĉeestantaj kaj voĉdonantaj (Aktualaj 113)
en ĉiuj proceduraj demandoj estas necesa plimulto de 7 voĉoj de kiu ajn el la Konsiliaj membroj, por ke la konkludoj estu valida (Aktualaj 115)
frakase grandega plimulto (Z) (PIV 719)
la absoluta plimulto devas superi la duonon de la voĉoj (PIV 719)
la aliaj ŝtatoj povas fariĝi membroj, se ilin akceptas la Ĝenerala Konferenco per kvalifikita plimulto de du trionoj (Aktualaj 126)
la Konsilo [Konsilio] de Sekureco devas akcepti la rekomendon per plimulto de minimume sep siaj membroj (Aktualaj 110)
la Pakto preskribas, ke estas necesa dutriona plimulto de la ĉeestantaj membroj (Aktualaj 110)
la plejmulto el junuloj (Monato 1989:4:18)
la plimulto de la aktivuloj jam havas funkcion (Esperanto 1985:11:186)
la plimulto de la partoprenintoj estis en akordo pri tio, ke ... (IJR 1967:2(3):20)
la plimulto en la Komitato opiniis, ke tio estas superflua (Aktualaj 136)
la societo ĉesas, se ĝian ĉeson la ĝenerala kunsido decidas per 2/3 plimulto de voĉdonoj (IJR 1968:3(8):12)
lokigo de krucraketoj bezonas dutrionan plimulton (IJR 1984:1:15)
necesas plimulto de 7 membroj el 11 (nun 9 el 15) (L) (IJR 1976:1:8)
neniu el la 18 kandidatoj povis akiri la absolutan plimulton de voĉoj (Monato 1985:8:6)
ordinara plimulto de duono plus unu (IJR 1984: 1:16)
plimulto de du trionoj necesas (Scienca Revuo 1974:5/6:249)
por tiu decido estas necesa kvalifikita plimulto (Aktualaj 110)
relativa plimulto, t.e. la plej granda procentaĵo eĉ malpli granda ol 50% (Monato 1986:5:8)
ricevi absolutan plimulton (Aktualaj 60)
se la leĝo estas akceptita per simpla plimulto (Konstitucio 1937, p. 8)
se neniu propono ricevos plimulton, la nuna stato kaj la nuna konflikto daŭros (Monato 1985:5:19)
sistemo de plimulteco (IJR 1983:1:43)

## murd/ (PIV 720)

murdi (r) (tr): dole mortigi homon (PIV 720)
murdo: ago de tiu, kiu murdas (PIV 719)
murdinto, murdisto: tiu, kiu krimis murdon (PIV 719)

## mutual/ (PIV 721)

mutuala (r): (pp societo) karakterizita per tio, ke la anoj reciproke garantias sin per siaj kotizoj kontraŭ eventualaj danĝeroj, perdoj ktp. (PIV 721)
ekzistas mutualaj societoj pri helpo al malsanuloj, pri entombigo ktp. (PIV 721)

# N

## naci/ (PIV 723)

nacio (r): 1) popolo, akirinta konscion pri si mem kiel aparta socia komunaĵo kun distingaj trajtoj ŝuldataj plejofte al komuneco de lingvo, kutimoj, tradicioj, religio, vivmaniero, ekonomiaj interesoj, politikaj idealoj aŭ aspiroj, 2) jura persono, konsistanta el la tuto de la individuoj regataj de unu sama konstitucio, kaj distingita disde ili, 3) ŝtato, regno, 4) ... (PIV 723)
naciigi: transdoni al la nacio la proprieton de la produktorimedoj, posedital de kapitalistoj (PIV 723)
sennaciigi: senigi (civitanon) je lia nacieco (PIV 723)
naciigi la fervojojn, la minejojn, la asekurojn (PIV 723)
Unuiĝintaj Nacioj (UNO) (IJR 1981:1:11)

## naturaliz/ (PIV 728)

naturalizi (r) (tr): 1) doni al fremdulo la civitanajn rajtojn; regnanigi, 2) alpreni fremdan vorton, moron ks. (PIV 728)
naturalizo (IJR 1967:4/5(5):8)
peti pri naturalizado (PIV 728)
pro esceptaj kialoj naturalizo povas okazi se mankas iuj el la supre menciitaj antaŭkondiĉoj (IJR

1967:4/5(5):8)

**neces/** (PIV 731)

damaĝo kaŭzita en stato de necesa defendo ne rezultigas devon kompensi (L) (IJR 1976:2:21), damaĝo kaŭzita en stato de neceso (L) (IJR 1976:2:21)
eksceso de necesa defendo estas krimo (L) (IJR 1982:1:11)
en okazo de neceso (Esperanto 1976:3:52)
laŭnecese sekvas, ke ... (IJR 1969:2(10):18)
necesarango (IJR 1978:2:21)
necesbezono (IJR 1982:2:12)
praviga stato de neceseco (IJR 1981:2:26)
stato de neceso (IJR 1983:1:37, dif.)
urĝa neceso estiĝas ekzemple en kazo de mortdanĝero kaj ĉe tuja helpbezono (IJR 1969:2(10): 20)

**negativ/** (PIV 731)

negativa (r): 1) esprimanta aŭ koncernanta neadon, rifuzon, malpermeson (PIV 731)
negativa voĉdonrajto (rajto malpermesi aŭ prokrasti voĉdonitan projekton) (PIV 731)
negativa voĉo (ĉe baloto) (PIV 731)

**neglekt/** (PIV 732)

neglekti (r) (tr): lasi ne farita, ne atentata, ne zorgita (PIV 732)
neglektado: ago, konduto de tiu, kiu neglektas la aferojn (PIV 732)
ega neglekto (IJR 1982:1:22)
konscia neglekto (L) (IJR 1982:1:14)
krimo estas perpetrata neglekte, se la perpetrulo konscias, ke ... (L) (IJR 1982:1:14, kp.p. 8)
la damaĝo estas farita pro ekstrema neglekto (IJR 1976:2:30)
neekskuzebla neglekto (IJR 1982:2:6)
neglekto (IJR 1983:1:39, dif.)
oni ne rajtas redukti la kompenson, se la damaĝito agis nur iomete neglekte (IJR 1976:2:39)
precipe delikata estas la ekstreme grava distingo inter nerekta dolo kaj konscia neglekto (L) (IJR 1982:1:14)
redukti la kompenson, se la damaĝito agis nur iomete neglekte (IJR 1976:2:39)
se la damaĝo estas farita dole aŭ pro ekstrema neglekto (IJR 1976:2:30)
simpla neglekto (IJR 1976:2:30)
tiu, kiu pro troriska neglekto faris agon kiu, se ĝi estus malica, konstituus krimon (IJR 1982:2:6)
tre neglekte kaŭzi damaĝon (IJR 1976:2:39)

**negoc/** (PIV 732)

negoco (r): 1) afero (interŝanĝo, pritraktado, perado), kies celo estas monprofito, 2) komerca entrepreno (PIV 732)
negoci (ntr): interparoli, kontrakti, por plenumi negocon (PIV 732)
negocisto: homo, kiu faras negocojn (PIV 732)
ĉiu ajn negockapabla civitano povis esti ĉu akuzanto, ĉu defendanto antaŭ la kortumoj (L) (IJR 1967:4/5(5):2)
fari bonajn negocojn (PIV 732)
kontrakti pri negoco (PIV 732)
korporacia negoco (entreprenita de pluraj negocistoj komune) (PIV 732)
la loko, kie la vendisto havas loĝejon aŭ negocejon je la mendotempo (IJR 1967:4/5(5):16)
la sinjoroj grandnegocistoj (Z) (PIV 732)
negocisto pri vino (PIV 732)

**nekropsi/** (PIV 732)

nekropsio (r): ekzameno, esplora dissekco kaj priskribo de kadavro, kun la celo malkovri la kaŭzon de la morto (PIV 732)
nekropsii (tr): fari la nekropsion de (PIV 732)
ili neniam povas fari nekropsion aŭ elterigon (IJR 1968:2(7):6)

**noci/** (PIV 740). Vidu ankaŭ: koncept/

nocio (r): 1) ĉia elementa objekto de sciado, 2) abstrakta, klare difinebla ideo (PIV 740)
enmeti en la nocion de kultura genocido (Esperanto 1976:10:161)
la ĉefaj jurrilataj nocioj (Scienca Mondo 1986:1:3)
la nocio de krimo (IJR 1983:1:35)
la nocioj pri bono kaj malbono (PIV 740)
la nocion de "havaĵo" oni devas kompreni en jura senco (IJR 1967:1(2):2)
la scienco devas mem difini, kion ĝi volas kompreni sub la nocio "juro" (IJR 1984:2:23)

**nom/** (PIV 741)

baptonomo: kristana antaŭnomo (PIV 741)
familinomo: nomo komuna al ĉiuj membroj de unu familio (ekzemple Zamenhof) (PIV 741)
kaŝnomo: nomo, kiun oni uzas, por kaŝi sian veran (PIV 742)
en 1944 oni nomis lin kiel profesoron de la finnugra lingvoscienco en Nacia Universitato de Tartu (Esperanto 1984:11:182)
fari nomigon (IJR 1977:2:51)
ili nomas la juĝkomisionon kune (Esperanto 1985: 3:59)
la direktoro nomis kiel novan delegiton s-ron T.S. (Esperanto 1970:1:19)
la Ĝenerala Direktoro, kiun, laŭ la propono de la Plenumkomitato, nomas la Ĝenerala Konferenco (Aktualaj 125)
la koncernulo speciale nomumiĝas por traktadi (IJR 1981:1:33)
la reĝo nomumas la ministrojn (Nederlando 1980,

p. 7)
li nomumas la federacian registaron kaj povas ĝin eksigi (IJR 1980:1:29)
mi en plena konfido nomis lin mia reprezentanto (Z) (PIV 546 sub konfid/)
nomi la estraranojn (Esperanto 1969:9:139)
nomi la Ĝeneralan Sekretarion (UN 21)
nomigo (IJR 1977:2:51)
nomumi la federacian registaron (IJR 1980:1:29)
nomumi la prezidanton (IJR 1981:2:11)
nomumo de traktada delegacio (IJR 1981:1:34)
reprezentantoj nomitaj de ministroj por eksterlandaj aferoj (Fina Akto 16)
sciigo pri la nomumo (IJR 1981:1:35)

**norm/** (PIV 744)
normo (r): 2) jura preskribo aŭ regulo (PIV 744)
efektiva sistemo de pozitivaj devontigaj normoj (IJR 1984:2:24, dif.)
eraro pri juraj normoj (IJR 1981:2:27, 83:1:38)
fari tion, kion la leĝo normigas (IJR 1968:3(8):15)
fundamenta normo (IJR 1984:2:28, dif.)
ĝenerala konkreta normo (IJR 1984:2:27, dif.)
ĝenerala normo (IJR 1984:2:27, dif.)
individua abstrakta normo (IJR 1984:2:27, dif.)
individua normo (IJR 1984:2:27, dif.)
internacijuraj normoj (Scienca Mondo 1983:3:18)
interpretnormo (IJR 1985:1:11)
jura normo (IJR 1984:2:23)
jurnormaj materialoj (IJR 1983:2:3)
jurnormoj (IJR 1981:1:25)
jurokrea normo estas normo, kiu fiksas la kondiĵojn por la estiĝo de la juraj normoj (IJR 1984:2:26)
juroplenuma normo estas normo, kiu regulas la cirkonstancojn de la efektivigo de sankcioj (IJR 1984:2:26)
kaj la jurokreaj kaj la juroplenumaj normoj estas proceduraj normoj en pli vasta senco (IJR 1984:2:26)
komisiaj (delegaj) normoj (IJR 1984:2:27)
konstitutivaj kaj deklarativaj normoj (IJR 1984:2:31, dif.)
kriminaljura normo (L) (IJR 1983:2:8)
la kompenson normas la leĝo (Konst. Bul. 5)
la manieron de organizo de balotoj normas la leĝo (Konst. Bul. 4)
la normverko sur la kampo de kriminala juro estas ... (IJR 1982:1:19)
malpermesaj normoj (IJR 1984:2:27, dif.)
normhavaj juraj aktoj (leĝoj, dekretoj, ukazoj ktp.) (L) (IJR 1983:2:4)
normkrea efiko (IJR 1981:1:25)
ordonaj normoj (IJR 1984:2:27)
registaro de jurnormaj materialoj (L) (IJR 1983:2:3)
se en la sekvaj alineoj ne estas io alia normigita (IJR 1977:1:12)

**not/** (PIV 745)
memornotoj: dokumento, prezentanta neoficiale la staton de demando, la enhavon de kontrakto, la ĉefajn punktojn de komerca letero ktp. (PIV 745)
noto: 2) mallonga klarigo aŭ rimarko ĉe loko de libro, teksto ktp. (PIV 745)
interŝanĝo de notoj (IJR 1981:1:26)

**notari/** (PIV 745)
notario (r): oficiala aŭ ĵurligita oficisto, kies funkcioj estas iom diversaj laŭ la landoj, sed kiu ordinare estas leĝe rajtigita redakti, atesti, konservi kontraktojn kaj aktojn ks. (PIV 745)
notaria: rilata al notario (PIV 745)
notariejo: oficejo de notario (PIV 745)
notaria akto (PIV 745)
notaria oficejo (PIV 745)

**nul/** (PIV 748)
nuligi: deklari, fari ion senvaloro (PIV 749)
nuligo: (pp edziĝo) laŭleĝa deklaro, ke unu edziĝo ne estas valida, pro malobservo de unu el ties kondiĉoj, kaj ke ĝi estas leĝe rigardata kiel ne ekzistanta (PIV 749)
amasiĝis la postuloj nuligi ĉiajn ajn privilegiojn (Aktualaj 16)
ankaŭ kontraŭ-konstitucia leĝo ne estas nula, sed nur nuligebla (IJR 1981:2:17)
ĉe bona konduto dum certa tempo (1–3 jaroj) la puno estas nuligata (IJR 1969:1(9):12)
la leĝrompinto devas bonkonduti por atingi nuligon de la restanta puno (IJR 1968:1(6):11)
la nuleco de la geedziĝo devas esti konstantata pere de juĝista verdikto (IJR 1966:1:29)
la rajto fari kunvenojn estis nuligitaj (Bulgario 31)
malakcepto de oferto kaŭzas ĝian nuligon, eĉ se la tempo fiksita por akcepto ankoraŭ ne pasis (IJR 1967:1(2):20)
nuliga cirkonstanco (PIV 749)
nuligi (kasacii) reskripton (IJR 1980:2:22)
nuligi kontrakton (PIV 749)
nuligi la rezultojn de baloto pro kalkuleraro (PIV 749)
nuligi leĝojn kontraŭkonstituciajn (IJR 1980:1:33)
nuligo de interkonsento (IJR 1977:2:54)
post nuligo de tia dekreto aŭ leĝo la kortumo kasacias ankaŭ la koncernan reskripton (IJR 1981:2:20)
retiri nuligon (IJR 1977:2:54)
tempolimo por nuligo (IJR 1981:1:27)

testamento povas esti ŝanĝita aŭ parte nuligita, per aldono en la sama formo (IJR 1975:1:7)

**nunci/** (PIV 750)
nuncio (r): papa ambasadoro (PIV 750)
nunciejo: domo kaj administracio de la nuncio en unu lando (PIV 750)

# O

**objektiv/** (PIV 753)
objektiva respondeco (IJR 1976:2:35), senkulpa (objektiva) respondeco (IJR 1976:2:25)

**objĵet/** (PIV 753)
objĵeti (r) (tr): kontraŭmeti al iu refutan argumenton aŭ malfacilaĵon (PIV 753)
al tio ni povas objĵeti, ke temas pri du malsamaj okazoj (PIV 753)
forbalai ĉiujn objĵetojn (PIV 753)
interese estis aŭdi la objĵetojn kontraŭ la zono sen kemiaj armiloj (Scienca Mondo 1988:1:7)
konsciencaj objĵetantoj (Monato 1989:1:11)
konsciencobjĵetanto (Monato 1986:4:20)

**obligaci/** (PIV 753)
obligacio (r): 1) valorpapero, donata kiel signo de pruntedonita monsumo, naskanta fiksan rentumon kaj repagebla laŭ antaŭfiksitaj reguloj, 2) jura devo doni, fari aŭ ne fari ion. (PIV 753)
obligacia: rilata al obligacio(j) (PIV 753)
obligacii (tr): devontigi (PIV 753)
estas menciinde, ke la legacitoj akiras obligacian postulrajton ne kontraŭ la heredaĵon, sed kontraŭ la ŝarĝitan heredanton (L) (IJR 1976:1:28)
malobservo de la Konvencio (L) (IJR 1981:2:6)
obligacia juro (PIV 753)
obligaciaj kuponoj (PIV 753)
obligacii sin pagi la ŝuldojn de alia persono (PIV 753)
obligaciiĝi (sin devontigi) (L) (IJR 1984:2:7)
plenumi la obligaciojn, kiuj sekvos el la interkonsentoj (L) (IJR 1977:1:25)
pro siaj juraj obligacioj (L) (IJR 1979:1:10)

**observ/** (PIV 754)
observanto: 2) diplomato, kiun registaro sendas al konferenco, en kiu ĝi ne volas oficiale partopreni, sed pri kiu ĝi volas esti informita (PIV 754)
malobservo de la leĝo (IJR 1982:2:2)
observado de la regularo (PIV 754)

**odalisk/** (PIV 755)
odalisko (r): orienta sklavino aŭ konkubino, speciale en la haremo de la turka sultano (PIV 755)

**ofend/** (PIV 756)
ofendi (r) (tr): 1) kolerigi aŭ ĉagreni iun, malrespektante ties digno, 2) malrespekti (senton) (PIV 756)
gravaj ofendoj (IJR 1982:1:25)
jurofendo (IJR 1968:1(6):14)
kiu premas malriĉulon, tiu ofendas lian Kreinton (PIV 756)
la profunde ofendita virino respondis (Z) (PIV 756)
ofendi ies pudoron (PIV 756)

**ofert/** (PIV 756)
oferti (r) (tr): proponi (varon) al kliento (PIV 756)
ofertado: kvanto el unu varo aŭ servo, kiu povas esti vendata sur unu merkato je difinita prezo (PIV 756)
oferto: ago de iu, kiu ofertas (PIV 756)
fari allogajn ofertojn (PIV 756)
la leĝo pri ofertado kaj mendado (PIV 756)
malakcepto de oferto kaŭzas nuligon, eĉ se la tempo fiksita por akcepto ankoraŭ ne pasis (IJR 1967:1(2):20)
ni povas oferti je la plej bonaj kondiĉoj sur la merkato (PIV 756)
ofertanto povas ĉiam revoki sian oferton, se la revoko atingas la akceptonton antaŭ ties akcepto (IJR 1967:3(4):16)
ofertoricevanto (IJR 1967:3(4):16)
revoki oferton (IJR 1967:3(4):16)
se la akceptanto erare kredas, ke lia akcepto estos atinginta la ofertanton sufiĉe frue por esti efika, ... (IJR 1967:1(2):20)

**ofic/** (PIV 756)
enoficigi: komisii al iu oficon (PIV 757)
oficisto: homo, kiu profesie plenumas oficon (PIV 757)
la Bibliotekiston en- kaj el-oficigas la Estraro (Esperanto 1963:5:86)
la Supera Tribunalo estas elektataj kaj eksoficigataj de la Parlamento (Bulgario 40)
laŭofica plenrajto (IJR 1981:1:36)
li enoficigas la ĉefministron (IJR 1980:1:26)
oficperiodo (UN 26)
plenumado de ofica aŭ deĵora devo (IJR 1982:1:21)

**oficial/** (PIV 757). Vidu ankaŭ: publik/
oficiala (r): deklarita aŭ sankciita de kompetenta rajta aŭtoritato (PIV 757)
oficialeco: eco de io oficiala (PIV 757)
la angla anstataŭis la holandan kiel oficiala lingvo

(IJR 1985:1:10)
la Aŭstra Republiko oficiale komunikis tiun leĝan deklaron al la aliaj ŝtatoj (IJR 1969:1(9):10)
la oficialaj lingvoj de la Kortumo (UN 30)
la oficialeco de dokumento (PIV 757)
la societo estu oficiale registrita tie (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:1)
la socitribunala membro en sia agadsfero estas oficiala persono (IJR 1969:2(10):14)
laŭ la Oficiala Statistiko (IJR 1983:2:18)
misuzo de oficiala pozicio (IJR 1983:2:9)
oficiala akto, dokumento (PIV 757)
oficialaj lingvoj kaj laboraj lingvoj (L) (IJR 1977:1:47)
oficialulo (L) (IJR 1983:2:9)

**okaz/** (PIV 758). Vidu ankaŭ: kaz/
limokazo: okazo, troviĝanta ĉe la limo de la efikzono de unu forto, regulo, leĝo ktp, kiu sekve povas aŭ ne apliкiĝi al ĝi (PIV 758)
okazo: 4) kazo (PIV 758)
aliokaze la komisiono devas fari propran decidon pri la pretendo (IJR 1969:2(10):12)
decidi en ĉiu konkreta okazo, ĉu temas pri agreso aŭ ne (Aktualaj 70)
en ĉiu okazo la Konvencio estas serioza admono por ĉiuj, kiuj krimas aŭ inklinas krimi pri genocido (L) (IJR 1969:2(10):7)
en ĉiu okazo temas pri perforto (Aktualaj 20)
en mala okazo (IJR 1969:2(10):16)
en neniu okazo tiuj rajtoj povas esti uzataj en maniero kontraŭa al la celoj (Aktualaj 89)
en okazo de malkonsento (Konstitucio 1937, p. 8)
escepte en ekstremaj okazoj (IJR 1986:1:27)
estas konataj multaj okazoj, en kiuj ... (Scienca Mondo 1983:1:11)

**okupaci/** (PIV 761)
okupacio (r): uzurpa preno kaj tenado de loko, lando ktp. (PIV 761)

**omnicid/** (Ne en PIV)
omnicido, ekstermo de ĉiuj formoj de vivo (Scienca Mondo 1982:4:6)

**opci/** (PIV 766)
opcio (r): libera elekteblo; rajto pri prefero (PIV 766)
la banko havas opcion pri la resto de la prunto (PIV 766)

**opini/** (PIV 767)
ili ĉiuj estis jesopiniaj pri tio (PIV 767)
konsulta opinio: respondo al demando metita al Internacia Kortumo de organoj de la Unuiĝintaj Nacioj aŭ specialigitaj organizaĵoj, rajtigitaj tion fari (PIV 767)
libereco de opinio kaj opiniesprimado (L) (IJR 1981:2:3)
opiniesprimado (L) (IJR 1981:2:3)

**ord/** (PIV 770)
ordo (r): 4) reguloj de sintenado kaj procedo, akceptitaj de parlamento aŭ de publika kunveno kaj aplikataj de ĝia prezidanto (PIV 770)
tagordo: 1) listo de la demandoj pritraktotaj en iu kunveno; programo (PIV 770)
ĉi tiu tagorda ero tamen okazigis la plej akrajn interŝanĝojn de la tuta kunsido (Esperanto 1989:4:62)
jen la pruvo, ke lia propono devas esti entagordigota (Monato 1985:11:6)
jurordo (IJR 1967:4/5(5):16)
kompletigo de la Tagordo (L) (IJR 1982:1:47)
la celo de testamentaĵo ne povas esti kontraŭleĝa aŭ kontraŭ "publika politiko" (t.e. la politiko de la juro aŭ akceptite bonaj moroj) (IJR 1975:1:7)
la internacia leĝo estas supera al la interna jura ordo (Aktualaj 71)
la leĝoprojekto por modifo de la Konstitucio estas metata en tagordo ne pli frue ol unu semajno post la tago de ĝia propono (Konst. Bul. 21)
la unua tagorda punkto (Esperanto 1971:7/8:134)
levi demandon pri ordo (interrompi debaton, demandante, ĉu io ĵus farita aŭ dirita estas laŭ aŭ kontraŭ la ordo) (PIV 770)
malfermo kaj ev. kompletigo de la Tagordo (L) (IJR 1982:1:47)
mirige estas, ke tiuj ĉi demandoj neniam staras en la tagordo de la kunvenoj (Scienca Mondo 1986:1:9)
ni tie ĉi kuraĝe povus jam meti punkton kaj transiri al la taga ordo (Z) (= tagordo) (PIV 770)
ofendoj kontraŭ la publika bonordo (IJR 1982:1:25)
paca ordigo de konfliktoj (Fina Akto 15)
perturbo de la publika ordo (IJR 1982:2:2)
por konservado de komuna ordo kaj baro al misuzo de malbonvolaj geuloj (IJR 1968:3(8):9)
ŝtatordo (Bulgario 37)

**ordal/** (Ne en PIV)
akvoprovo (IJR 1986:1:9)
eŭkarista provo (IJR 1986:1:9)
fajroprovo (IJR 1986:1:8)
katafalka aŭ kadavra provo (IJR 1986:1:10)
krucprovo (IJR 1986:1:9)
lotado (IJR 1986:1:9)
manĝoprovo (IJR 1986:1:9)
rita batalo kaj juĝ-cela duelo (IJR 1986:1:10)
venen-ordalo (IJR 1986:1:10)

**ordon/** (PIV 771)
ordoni (r) (tr): estre esprimi al iu sian volon, ke li faru ion (PIV 771)
la Dek Ordonoj (PIV 771)
ni ne plenumis la ordonojn kaj la leĝojn kaj la decidojn, kiujn Vi ordonis al Moseo (Biblio. Neĥemja 1:7)
ordonaj normoj (IJR 1984:2:27)
ordoni konfiskon (PIV 546)
ordono, direktivo, instrukcio (IJR 1984:2:31)
timu Dion, kaj plenumu Liajn ordonojn (Biblio. Predikanto 12:13)

**organ/** (PIV 772)
ĉiuj justicaj organoj (t.e. la kortumoj) estas federaciaj (IJR 1977:1:10)
kolegia organo (IJR 1978:1:38)
leĝdonaj organoj (L) (IJR 1976:2:20)
subordigitaj organoj (IJR 1984:2:33)
ŝtatpotencaj organoj (IJR 1969:2(10):18)
UNO kaj ĝiaj specialigitaj organoj (Scienca Mondo 1982:4:26)

**organiz/** (PIV 772)
Afrika organizaĵo de sciencaj kaj teknologiaj institucioj (African Network of Scientific and Technological Institutions) (Scienca Mondo 1988:2:28)
Asocio pri karbo kaj ŝtalo (Scienca Mondo 1988:2:12)
Ekonomia kaj Sociala Konsilio (ECOSOC) (IJR 1981:1:11)
Eŭropa ekonomia komunaĵo (EEU) (Scienca Mondo 1989:2:27)
Infana fonduso de UNO (UNICEF) (Scienca Mondo 1982:4:7)
Internacia Asocio por la Defendo de Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (Monato 1986:4:17)
Internacia Astronaŭta Federacio (IJR 1967:3(4):7)
Internacia Atomenergiorganizaĵo (IAEO) (Scienca Mondo 1987:1:25)
Internacia Aŭtomobilista Federacio (FIA) (Bulgario 116)
Internacia Balena Komitato (Monato 1989:1:14)
Internacia Banko por la Rekonstruo kaj Progresigo (Aktualaj 126)
Internacia Instituto De Kosmo Spaco (IJR 1967:3(4):7)
Internacia Konsilio de Sciencaj Unuiĝoj (IJR 1967:3(4):7)
Internacia Labor-Organizaĵo (ILO) (Monato 1989:6:10), Internacia Organizaĵo de Laboro (ILO) (Aktualaj 124)
Internacia Organizaĵo Por civila Aviado (IJR 1967:3(4):7), Internacia Organizaĵo por la Civila Aviado (Aktualaj 126)
Internacia Organizaĵo por la Rifuĝintoj (I.R.O.) (Aktualaj 126)
Internacia Telekomunikada Unuiĝo (IJR 1967:3(4):7)
Internacia Valuta Fondaĵo (Aktualaj 126)
juristaj organizaĵoj, juristorganizaĵoj (IJR 1983:1:33)
Konsilio pri evoluo de la ekonomia kaj socia esploro en Afriko (Council for the Development of Economic and Social Research in Africa) (Scienca Mondo 1988:2:28)
la Monda San-Organizo (OMS) (Heroldo 1982:8:3)
Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) (Monato 1986:4:15)
Monda Poŝta Unio (Aktualaj 126)
Mondororganizaĵo Pri Meterologio (IJR 1967:3(4):7)
neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) (Scienca Mondo 1982:4:6), Ne-Registaraj Organizaĵoj (Scienca Mondo 1982:4:26)
Norvega instituto por esploro de atmosfero (Fina Akto 45)
Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (Aktualaj 121)
Organizaĵo por Afrika Unueco (OAU) (Monato 1987:3:9)
organizformoj (Aktualaj 111)
Organizo por Ekonomia Kunlabora kaj Evoluo (OEKE) (Monato 1986:8/9:11)
starigi organizaĵon (UN 3)
ŝtatoj-membroj kaj neregistaraj organizaĵoj (Monato 1986:4:18)
tutmonda Organizaĵo de la Sanprotekto (TOS) (Scienca Mondo 1982:4:7)
UNICEF: la Por-infana Fonduso (Heroldo 1982:8:3)

**original/** (PIV 773)
originala (r): 1) prezentanta la unuan primitivan formon de io, kontraste kun kopioj, tradukoj aŭ misformoj, kiujn oni devenigis de ĝi (PIV 773)
originalo: 1) la primitiva manuskripto, kontraste kun kopio, aŭ verko kontraste kun imitaĵoj, tradukoj ktp. (PIV 773)
kompari la kopion kun la originalo de la kontrakto (PIV 773)
la originala marksismo (L) (IJR 1984:1:2)
la originala teksto de libro (PIV 773)
originale, la pritraktata volumo estis doktoriĝa tezo (L) (IJR 1985:1:37)
originale verkita de (Z) (PIV 773)
tio estas nur kopio de la originala pentraĵo (PIV 773)
traduki verkon el la originala lingvo (PIV 773)

**ostaĝ/** (PIV 777)
ostaĝo (r): persono, liverita al alia persono, kiel garantio de plenumota promeso, kontraŭ insidoj ktp. (PIV 777)
ostaĝi (ntr): esti ostaĝo por iu aŭ io (PIV 777)
la ostaĝoj estis mortpafitaj (PIV 777)

**ostracism/** (PIV 777)
ostracismo (r): juĝo, per kiu la Atenanoj kondamnis al dekjara ekzilo civitanon, kiun ili opiniis danĝera pro lia riĉeco, potenco aŭ influo (PIV 777)
ĵeti ostracismon sur iun (PIV 777)

# P

**pag/** (PIV 780)
pagi (r) (tr): kvitigi sin de ŝulda per dono de mono aŭ valoraĵo al iu (PIV 780)
antaŭpagi (tr): pagi pli frue, ol la kutima aŭ la deviga pagodato (PIV 780)
ekpago: parta pago, farita kiel garantio de la pli malfrue pagota sumo (PIV 780)
nepagitaĵo: tio, kio restas por pagi, kaj kion oni ne pagis je la difinita pagdato (PIV 780)
pagdato: dato, je kiu bilo fariĝas pagenda (PIV 780)
pagenda: tia, ke ĝi devas esti pagita (PIV 780)
pagoŝarĝo: ŝarĝo, kiun la akceptanto de poŝtpaketo havas, pagi la valoron de la sendaĵo plus, eventuale, la sendokostojn (PIV 780)
postpagante: pagante nur post la liverado de la varo (PIV 780)
repagi (tr): 1) pagi al iu la sumojn, kiujn tiu jam pagis je ies konto (PIV 780)
retropagi (tr): pagi al iu sumon, kiun oni erare ricevis de tiu persono, aŭ kiu superis la ŝulditan (PIV 781)
fari ekpagon ĉe aĉetado de meblaro, ĉe lupreno de apartemento (PIV 780)
likvido de ŝuldo per pagakordiĝo inter ŝuldanto kaj liaj kreditoroj (IJR 1967:3(4):18)
pagkondiĉoj (Fina Akto 66)

**pakt/** (PIV 782)
pakto (r): aparte grava internacia kontrakto (PIV 782)
Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj (IJR 1979:2:21)
Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj, 1966 (IJR 1979:2:21)
la Pakto Briand-Kellog (1928) deklaris la militon eksterleĝa (L) (IJR 1976:1:4)
la pakto de la Ligo de Nacioj (PIV 782)
Pakto de Lokarno, 1925 (L) (IJR 1979:1:6)

**paliativ/** (PIV 783)
paliativo (r): 2) (f) duonefika kaj provizora rebonigilo (PIV 783)
en la plej krizaj situacioj oni trovis solvojn, almenaŭ provizorajn kaj paliativajn (L) (IJR 1976:1:12)
neniaj kompromisaj paliativoj donos pacon al la homaro (Z) (PIV 783)

**paper/** (PIV 787)
papero (r): 3) jura aŭ financa dokumento, skribita aŭ presita sur tia folio, 2) legitimiloj, pasporto ks. (PIV 787)
valorpapero: papero, per kiu estas konstatita ŝuldo aŭ kredito, kaj povanta cirkuli sen spezo de metala aŭ papera mono (PIV 788)
komercaj paperoj (PIV 787)
paro da kontraktaj paperoj (Z) (PIV 787)

**par/** (PIV 788)
parigisto: 2) persono, kiu kontraŭ pago rekontigas viron kaj virinon por sekskuniĝo (PIV 788)

**paraf/** (PIV 789)
parafo (r): 1) distingiga streko aldonita al subskribo, 2) mallongigita subskribo de la nomo de la skribinto (PIV 789)
parafi (tr): surmeti parafon al io (PIV 789)
parafado de la traktada plenrajtigilo (IJR 1981:1:36)
parafado de ratifikaj dokumentoj (IJR 1982:1:37)
parafi luprenan kontrakton (PIV 789)
la parafo de teksto valoras kiel subskribo de la traktado, kiam certiĝas, ke la intertraktintaj ŝtatoj tiel konsentis (IJR 1969:1(9):20)

**paragraf/** (PIV 789)
paragrafo (r): 1) ĉiu el la sekcioj de ĉapitro, en jura aŭ didaktika teksto, ordinare montritaj de aparta signo (ekzemple §) aŭ de cifero (PIV 789)
laŭ la paragrafo tria de nia regularo (PIV 789)
paragrafo povas enteni plurajn alineojn (PIV 789)

**parenc/** (PIV 791). Vidu ankaŭ: antaŭ/, apud/, post/
parenco (r): persono, havanta kun alia persono komunan antaŭulon (PIV 791)
boparenco: parenco per edziĝo (PIV 791)
parenca: 1) apartenanta al unu sama familio, kiel iu alia (PIV 791)
parencaro: tuto de la parencoj (PIV 791)
parenceco: rilato inter tiuj, kiuj estas parencoj (PIV 791)
parenciĝi: fariĝi parenca (per ies edziĝo) (PIV

791)
ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj (Z) (PIV 791)
descendaj parencoj (IJR 1969:1(9):18)
demalsupra parenco (IJR 1983:1:38)
desupra parenco (IJR 1983:1:38)
oni devas distingi la rektajn parencojn (avo, patro, filo, nepo) kaj la flankajn parencojn (onklo, frato, kuzo, nevo) (Monato 1985:5:19)
parenco desupra aŭ demalsupra (IJR 1983:1:38)
parencoj de suprenira linio (IJR 1967:1:3)
parencoj ĝis la dua ŝtudo de la flanka gentolinio (IJR 1967:1(2):13)
parencoj laŭ descenda originlinio (IJR 1975:1:14)
personoj starantaj en la sama linio de parenceco (Z) (PIV 791)
preskaŭ ĉiuj loĝantoj de la vilaĝeto estas parencaj inter si (PIV 791)
tiam sekvas la parencoj de suprenira linio (IJR 1967:1(2):3)

**parlament/** (PIV 792)
parlamento (r): reprezentantaro de la ŝtatanoj, kiu, en konstituciaj landoj, faras leĝojn kaj voĉdonas la budĝeton (PIV 792)
parlamentano: membro de parlamento (PIV 792)
parlamentismo: reĝimo de ŝtato, en kiu la ministroj estas respondecaj antaŭ la parlamento, kaj povas esti forsenditaj de ĝi (PIV 792)
balotoj al parlamento (Monato 1985:12:18), balotoj por parlamento (Bulgario 34)
kelkaj regnoj havas parlamenton, tute ne havante parlamentisman reĝimon (PIV 792)
kunvoki, forsendi, eksigi la parlamenton (PIV 792)
la federacia parlamento sole povas fari leĝojn pri ... (IJR 1981:1:3)
la mandato de la Parlamento daŭras kvar jarojn (Konst. Bul. 6), la mandato de la parlamento estas valida por kvar jaroj (IJR 1976:1:15)
la parlamenta tagordo (PIV 792)
levi la imunecon de parlamento (PIV 420)
malsupera ĉambro de la parlamento (Monato 1986:8/9:7)
parlamenta elektado (PIV 792)
parlamenta respubliko (PIV 919)
parlamentaj deputitoj (IJR 1976:1:14)
parlament-prezidanto (Monato 1989:5:12), parlamentprezidanto (Monato 1989:5:12)
stumpoparlamento (PIV 792)
unuĉambra, duĉambra parlamento (PIV 792)
unuĉambra, duĉambra parlamenta sistemo (PIV 150), unuĉambra kaj plurĉambra sistemoj (IJR 1969:2(10):18)

**parol/** (PIV 793)
la prezidanto demandis, ĉu iu petas la parolon (Heroldo 1985:15:1)

**part/** (PIV 794). Vidu ankaŭ: konsist/
parto (r): 2) io, kion iu rajtas postuli el tuto, kiun ono dividas inter pluraj personoj (PIV 794)
deviga parto de la heredaĵo (L) (IJR 1975:1:28), devigita parto (IJR 1967:1(2):5), laŭleĝa heredkvoto (IJR 1975:1:17), leĝa minimumo (IJR 1975:1:23), leĝoparto (IJR 1975:1:6), minimuma kvanto (IJR 1975:1:6), minimuma kvoto (IJR 1975:1:17), rezervita parto (IJR 1966:1:16)
dispartigo de la potencoj (IJR 1977:1:15)
dum la dispartigo de la heredaĵo (IJR 1979:1:15)
eklezijura parto de leĝo (IJR 1977:1:2)
ideala (frakcia) parto (IJR 1975:1:13)
la avantaĝoj, kiujn la postvivanta partnero havas dum la dispartigo (IJR 1979:1:15)
la justico estas apartigita del al administracio (IJR 1980:2:20)
leona parto (Scienca Mondo 1983:1:9)
partopaga aĉeto (IJR 1967:1(2):19)
proprieto pri idealaj partoj (IJR 1977:2:25)
rajto pluvivi kun nepartigita heredaĵo (IJR 1979:1:15)
speciala parto de la kriminala juro (IJR 1968:1(6):2)

**parti/** (PIV 795). Vidu ankaŭ: partner/
partio (r): 1) grupo da homoj, havantaj la samajn politikajn kaj socialajn opiniojn kaj aliĝintaj al difinita, disciplina organizaĵo, por ilin defendi, 2) ĉiu el la du personoj aŭ grupo da homoj, kiu kontraŭstaras al alia en milito, proceso, sporto aŭ ia alia batalo, 3) edziĝo, rigardata el la vidpunkto de sameco de rango, riĉeco ktp. (PIV 795)
senpartia: 1) (iu) montranta neniun favoron al tiu aŭ alia partio; juste juĝanta, ne konsiderante opiniojn aŭ personojn, 2) objektiva (PIV 795)
senpartieco: eco de iu, io senpartia (PIV 795)
ĉiu partio portas siajn proprajn elspezojn (UN 33)
damaĝita partio (L) (IJR 1981:2:6)
dupartiaj kaj plurpartiaj traktatoj (IJR 1981:1:26)
en ambaŭ kazoj partioj rajtas apelacii al la Tribunalo, kies decido estas definitiva (IJR 1969:2(10):23)
juĝisto devas aŭskulti ambaŭ partiojn (PIV 795)
kontraktantaj partioj (IJR 1981:1:27), kontraktpartioj (IJR 1967:4/5(5):18)
la partioj de la konflikto (Fina Akto 10)

montri nek partiecon nek antaŭjuĝon (PIV 795)
oni povas nur admiri la konstantan senpartiecon de liaj juĝdecidoj (PIV 795)
partia juĝisto (PIV 795)
plena egaleco de la partioj (Aktualaj 64)
plurpartiaj (multflankaj) kaj dupartiaj (duflankaj) interkonsentoj (IJR 1977:2:51), kp.: multflanka interkonsento (L) (IJR 1977:1:23)
procesaj partioj (IJR 1980:1:32), proceduraj partioj (IJR 1980:2:22)
senpartieca sinteno de ŝtato rilate ian internacian situacion (L) (IJR 1979:1:7)
senpartieco de la juĝistaro (Aktualaj 88)
traktato-partioj (IJR 1985:1:18), partio de traktato (L) (IJR 1979:2:36)
vera kaj falsa senpartiecoj de triaj ŝtatoj en kazo de milito (L) (IJR 1979:1:4)

**partner/** (PIV 796). Vidu ankaŭ: parti/
partnero (r): 1) persono asociiĝinta kun alia(j) en negoc-aferoj, en kies riskoj kaj profitoj li partoprenas (PIV 796)
ĉiu partnero forprenas sian propraĵon (IJR 1979:1:12)
ekkoni la starpunktojn, argumentojn de la alia partnero (Monato 1988:5:24)
kontraktpartneroj (Fina Akto 13)
la geedza partnero (IJR 1979:1:12)

**pas/** (PIV 796)
kondiĉe ke la limoj de la necesa defendo ne estu evidente transpasitaj (L) (IJR 1982:1:11)
transpasi la limojn de la leĝeco (PIV 796)

**patent/** (PIV 800)
patento (r): dokumento, per kiu ŝtato donas al inventinto monopolon (ordinare kun templimo), por ekspluati sian inventaĵon (PIV 800)
patentaĵo: io patentita (PIV 800)
patenti (tr): garantii per patento (PIV 800)
patentigi: atingi, ke la ŝtato patentu ion (PIV 800)
patentnomo: komuna nomo, elektita de inventisto kaj garantiita kvazaŭ propra nomo per la patento (PIV 800)
farmacia patentaĵo (PIV 800)
patentita aparato (PIV 800)
patentpeto (Monato 1985:8:7)

**patr/** (PIV 800)
baptopatro: 1) tiu, kiu tenas la baptaton dum la baptado kaj garantias ties kristanan edukiĝon (PIV 800)
bopatrino: patrino de edzino rilate al ŝia edzo, aŭ patrino de edzo rilate al lia edzino (PIV 800)
bopatro: patro de edzino rilate al ŝia edzo aŭ patro de edzo rilate al lia edzino (PIV 800)
duonpatrino: dua edzino de patro rilate al liaj infanoj de la unua edzino (PIV 800)
duonpatro: dua edzo de patrino rilate al ŝiaj infanoj de la unua edzo (PIV 800)
elpatrujigi: ekzili (PIV 800)
klopodoj pri patrujigado (Monato 1989:5:7)

**pedel/** (PIV 803)
pedelo (r): malsupera oficisto de preĝejo, universitato aŭ juĝejo, kiu zorgas pri malgravaj materiaj taskoj (PIV 803)

**pel/** (PIV 804)
elpeli (tr): elirigi, forigi (PIV 804)
ili estis elpelitaj el la lando (L) (IJR 1978:1:27)
iuj el la psikiatrie torturitaj personoj estis elpelitaj el (la lando) (L) (IJR 1978:1:27)
la elpelitojn de Izrael Li kolektas (PIV 804)

**pensi/** (PIV 809)
pensio (r): sumo, konstante kaj periode pagata al eksiĝinta oficisto, servisto, al neaktiviĝinta profesiulo aŭ metiisto, kiam tiu atingis difinitan aĝon kaj laboradis dum difinita nombro da jaroj (PIV 809)
pensii (tr): pagi pension al iu (PIV 809)
pensiiĝi: fariĝi pensiulo (PIV 809)
pensiulo: homo ricevanta pension (PIV 809)
aĝo de pensiiĝo (PIV 809)
aĝpensio (IJR 1979:1:20)
la ĝenerala limdato de pensiiĝo de la dungitoj estas 65 jaroj (IJR 1975:2:36)
pensia juro (L) (IJR 1983:2:6)
pensia kotizo (PIV 809)
pensio por invalidoj (IJR 1979:1:20)
pensirajtigito (L) (IJR 1983:2:7), pensirajtulo (IJR 1979:1:23)
personoj, kiujn la pensirajtigito vivtenas (L) (IJR 1983:2:7)
post sia pensiuliĝo (Scienca Mondo 1988:1:26)
postvivula pensio (IJR 1979:1:22)
viroj akiras pensian rajton je atingo de la 60-a vivjaro (L) (IJR 1983:2:6)

**per/** (PIV 810)
peranto: homo, per kies helpo oni traktas aferojn kun aliaj personoj (PIV 810)
peristo: 1) tiu, kiu profesie peradas (PIV 810)
senpera: aganta per si mem sen perado de aliaj (PIV 810)
la principoj de senpereco kaj publikeco (L) (IJR 1983:2:13)
negocperisto (PIV 810)
senpera kaŭzo (PIV 810)

**perfid/** (PIV 813)
ŝtatperfido: perfido, far ŝtatano, de la fideleco al

la suvereno aŭ al la plej gravaj interesoj de la ŝtato (PIV 813)
kontraŭŝtata perfido (IJR 1968:3(8):17)
la perfido al la patrolando estas plej grava krimo al la popolo kaj ĝi estas punata per la tuta severeco de la leĝo (Konst. Bul. 20)
regnoperfido (IJR 1982:1:20)

**permes/** (PIV 815)
restad-permeso (Monato 1987:9:6)
ricevi laborpermeson (Monato 1987:9:6)

**perpetr/** (Ne en PIV)
estu tamen menciita almenaŭ la ebleco liberigi la perpetrinton de kriminala respondeco (L) (IJR 1982:1:9)
krimago estas intence aŭ nezorgeme perpetrita ago (IJR 1982:2:11)
krimo estas perpetrata neglekte, se la perpetrulo konscias, ke ... (L) (IJR 1982:1:14, kp. p. 8)
la perpetrinto devas esti riproĉebla pro tiu konduto (IJR 1983:1:35)
perpetranto (L) (IJR 1982:1:8, dif.), perpetrulo (L) (IJR 1983:2:9)
se unu aŭ pluraj agoj de la perpetranto konkretigas plurajn krimagojn (IJR 1982:2:11)

**persekut/** (PIV 816)
persekuti (r) (tr): 1) kursekvi por atingi aŭ malamike trakti, 2) konstante turmentadi per severaj, maljustaj aŭ kruelaj malbonfaroj aŭ leĝoj, 3) voki antaŭ tribunalo, farante proceson, plendon ks. (PIV 816)
persekutado: ago de tiu, kiu persekutas (PIV 816)
persekutisto: oficisto, oficiale komisiita plenumi la decidojn de tribunalo (PIV 816)
kontraŭ ili povas esti entreprenata punpersekuto escepte pro gravaj krimoj (Konst. Bul. 5)
krimoj nur persekuteblaj per akuzo de la ofendito (IJR 1982:2:3)
la komunaj aĵoj ne povas esti persekutataj de persona kreditoro de unu de la geedzoj (IJR 1966:1:30)
la krimulo estis persekutata kaj kaptita (PIV 816)
la polico jure persekutis neniun el ili (Monato 1987:10:8)
persekuti debitoron (PIV 816)
persekuto pro politikaj kaŭzoj (Aktualaj 70)
privata punpersekutado (IJR 1983:1:35)
publika persekutisto (L) (IJR 1983:2:30)
publika punpersekutado (IJR 1983:1:35)
religia persekutado al la herezuloj (PIV 816)
tiu vidpunkto estas unuflanka karcerariga kaj kondukas al senkiala persekuto kontraŭ honestaj sportistoj (Monato 1988:2:4)

**person/** (PIV 816)
2) grupo da individuoj, posedanta juran ekziston, kaj havanta rajtojn kaj devojn aparte de la rajtoj kaj devoj de ĝiaj unuopaj membroj (PIV 816)
personecigi: variigi laŭ la koncernataj personoj (PIV 816)
fizika persono (IJR 1978:1:29)
jura persono (IJR 1984:2:15)
la romia juro estas principe kontraŭa al la personecigo de la punoj (PIV 816)
la sekcio povas havi juran personecon en sia lando (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto, p. 2)
personecigi la aŭtomobilajn asekurpagojn (PIV 816)
personjuro (IJR 1983:1:33)
se A, aŭ kiu ajn tria persono, estas proprianto de la dokumento, B ne rajtas ĝin postuli laŭ la Juro (IJR 1969:1(9):7)
tria persono (IJR 1967:4/5(5):13), krompersono (IJR 1966:1:13)

**pet/** (PIV 819)
aliĝpeto al EEK (Esperanto 1971:9:141)

**petici/** (PIV 819)
peticio (r): petskribo (PIV 819)
peticii (tr): peti ion per peticio (PIV 819)
peticiulo (IJR 1967:4/5(5):11)
rajto de peticio-plendo (L) (IJR 1981:2:9)

**pilori/** (PIV 825)
pilorio (r): koloneto, al kiu oni iam ligis krimulojn por elmontri ilin al la popolamaso; = kolono de malhonoro (PIV 825)

**plas/** (PIV 833)
plasi (r) (tr): ŝparloki (PIV 833)
plasi monon en minakciojn (PIV 833)

**pleb/** (PIV 835)
plebo (r): 1) en Romo, la plej grandnombra kaj malalta klaso, kontraste kun la kavaliroj kaj la patricioj, 2) la pli malaltranga parto el popolo, el socio ks. (PIV 835)
plebano: ano de plebo (PIV 835)
en la komencaj tempoj la plebo havis neniajn civitanajn rajtojn (PIV 835)

**plebiscit/** (PIV 835)
plebiscito (r): decido de loĝantaro per voĉdono pri la demando de ĝia aŭtonomio aŭ de ĝia parteno al tiu aŭ alia ŝtato (PIV 835)

**pled/** (PIV 835)
pledi (r) (ntr): paroli antaŭ juĝisto, por defendi sian propran aferon aŭ tiun de sia kliento (PIV 835)
pledi antaŭ kortumo (IJR 1967:3(4):8)

vi ne trovos advokaton por pledi en tia afero (PIV 835)

**plen/** (PIV 836)

malplenumi (tr): ne fari tion, kion oni devus (PIV 836)
plenumi: fari plene tion, kion oni devas fari, aŭ kion oni entreprenis (PIV 836)
antaŭ la plenumiĝo de la 14-a jaro de la infano (L) (IJR 1968:2(7):3)
dum la punplenumado la punitoj laboras en brigadoj (IJR 1969:1(9):12)
en la plenkunsidaj renkontoj raportis ... (Scienca Mondo 1983:3:30)
estas planata la 1-a regula plenkunveno de la tuta organizaĵo (L) (IJR 1983:1:48)
esti juĝata "en pleno" (Aktualaj 61)
ĝi ĝenerale ĉiam juĝas kiel pleno de ĉiuj membroj (IJR 1981:2:12)
heredaĵplenumanto (IJR 1975:1:1)
kunsido de la pleno (Aktualaj 106)
la 3 povoj (leĝdona, plenuma kaj juĝa) (Aktualaj 76)
la plej supera plenumanta organo (Konstitucio 1937, p. 12)
la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco (Heroldo 1986:1:1)
la Simpozio finiĝis per plenkunsido, dum kiu ... (Esperanto 1983:1:3)
laŭofica plenrajto (IJR 1981:1:36)
li estis konscia pri lia ago kaj volis ĝian plenumiĝon (L) (IJR 1982:1:13)
malplenumi sian promeson, devon (PIV 836)
oni laboris en plenaj kunsidoj kaj en komisonoj (Scienca Mondo 1986:1:22)
plenkunveno (L) (IJR 1983:1:48), pleno (IJR 1981:2:12), plena kunsido (PIV 836 sub: plen/)
plennombre (Monato 1985:9:11)
plenrajta dokumento (IJR 1981:2:33)
plenuma funkcio (Aktualaj 42)
Plenuma Komitato (L) (IJR 1983:1:47)
plenumi devon, leĝon, ordonon, ŝuldon (Z) (PIV 836)
plenumi verdikton (Aktualaj 62)
plenumloko (IJR 1967:4/5(5):16)
postuli monkompenson pro neplenumo (IJR 1975: 1:4)
se ili jam plenumis la 14-an vivojaron (IJR 1968: 2(7):9)
tiu, kiu libervole plenumas krimon, respondecos kriminale (IJR 1982:2:7)
traktadplenrajtigilo (IJR 1981:1:36)

**plend/** (PIV 837)

plendi (r) (ntr): 3) klopodi ĉe juĝa instanco, por akiri kontentigon pro suferita malagrablaĵo, malbontraktado ks. (PIV 837)
aparta kortumo por trakti plendojn pro malobervo de la homaj rajtoj (L) (IJR 1981:2:7)
doni la rajton de peticio-plendo ankaŭ al unuopuloj (L) (IJR 1981:2:9)
fari plendon ĉe la polickomisaro (PIV 837)
ili aljuĝis monkompenson al la plendanto (PIV 837)
konstitucia plendo (germane: Verfassungsbeschwerde) (IJR 1984:1:22)
la lingvo de la plendito (defendanto) (L) (IJR 1977:2:15)
la plendantoj ne prezentis sufiĉe da atestaĵo por kulpigi ilin (Monato 1989:6:12)
la plendo devas esti prezentita en tempolimo de 3 monatoj post la momento, kiam (L) (IJR 1981:2:8)
la proceduran lingvon elektas la plendanto laŭ sia bontrovo (L) (IJR 1977:2:15)
laŭ peto de la plendanto (IJR 1981:2:21)
meti plendon kontraŭ iu ĉe la tribunalo (PIV 837)
plendi ĉe la tribunalo (PIV 837)
plendi kontraŭ ordonon de supera instanco (IJR 1978:1:40)
plendito (defendanto) (L) (IJR 1977:2:15)
Plendito, kion vi povas diri por via pravigo? (PIV 837)
rajto de peticio-plendo (L) (IJR 1981:2:9)
rajto je individua plendo (L) (IJR 1981:2:7)
tiuj organizaĵoj povas esti plendantoj kaj defendantoj antaŭ kortumoj (L) (IJR 1984:2:8)

**pogrom/** (PIV 842)

pogromo (r): registare instigita aŭ aprobita amasbuĉo kaj elrabado de judoj, aŭ, pli ĝenerale, de rasaj aŭ naciaj malplimultoj (PIV 842)

**poliandri/** (PIV 843)

poliandrio (r): 1) stato de virino havanta plurajn edzojn samtempe, 2) simila stato de femalo, havanta samtempe plurajn masklojn (PIV 843)

**polic/** (PIV 843)

polico (r): 1) ŝtata aŭ urba administracio, komisiita gardi la publikan ordon kaj sekurecon, 2) tuto de la oficistoj de tia administracio (PIV 843)
kaŝisto: policisto sen uniformo (PIV 843)
policejo: loko, kie deĵoras certa nombro da policanoj, sub la komando de superpolicano aŭ de komisaro (PIV 843)
policestro: la ĉefo de la polico en urbo aŭ regiono (PIV 843)
policoficisto: oficisto, kiu administracie laboras

en la polico (PIV 843)
denunci iun al la polico (PIV 844)
federacia polico (PIV 273)
federala polico (PIV 273)
kriminala polico (PIV 843)
polica detenejo (Monato 1987:9:12)
polica enketo (PIV 843)
polica inspektoro (IJR 1977:2:39)
polica prefekto (PIV 843)
policaj perfortaĵoj (PIV 844)
policano, policisto: membro de la polico (PIV 843)
trafika polico (PIV 843)

**poligami/** (PIV 844)
poligamio (r): 1) stato de viro, havanta plurajn edzinojn samtempe, 2) stato de masklo, havanta samtempe plurajn inojn (PIV 844)
la poligamio estas leĝe persekutata en Eŭropo, permesata en multaj Aziaj landoj (PIV 844)

**polis/** (PIV 845). Vidu ankaŭ: asekur/
poliso (r): dokumento, atestanta pri asekuro kaj entenanta ĉiujn kondiĉojn de la kontrakto (PIV 845)
krompoliso: aldonaĵo al jam ekzistanta poliso (PIV 845)

**porci/** (PIV 850)
minimumaj porcioj tute ne ekzistas en la angla juro (IJR 1975:1:3)
postuli alproprigon de la loĝdomo al sia laŭleĝa porcio (IJR 1977:1:32)

**posed/** (PIV 852). Vidu ankaŭ: propr/, propriet/
posedi (r) (tr): 1) havi rajton aŭ eblon ekskluzive uzadi ion, 2) havi je sia dispono ion abstraktan, 3) = havi (PIV 852)
kunposedanto: tiu, kiu dividas kun alia la posedon de io (PIV 852)
posedanto: persono, kiu posedas (PIV 852)
posedrajto = proprieto (PIV 852)
senposedigi: senigi iun je lia posedaĵo (PIV 852)
daŭra posedado dum laŭleĝa tempo (IJR 1977:2:33)
kun sia tuta posedo kaj heredo (Z) (PIV 852)
la posedanto de domo, de bieno (PIV 852)
oni enkondukis la principon de la posedkomuneco de la geedzoj pri la havaĵo akirita dum la periodo de la geedzeco (IJR 1969:1(9):17)
posedi bienon, plurajn domojn en la urbo (PIV 852)
ter-posedanto (Monato 1985:9:12)

**post/** (PIV 853)
iliaj posteuloj (L) (IJR 1966:1:24)
lia leĝa posteularo (PIV 624)
pagi certan sumon resp. renton al la postrestintaj familianoj (IJR 1976:2:13)
postvivanto (IJR 1976:1:46)
testamenti pri 1/3 de siaj postlasaĵoj (IJR 1979:1:15)

**posten/** (PIV 853)
homoj reagas al senposteniĝo diverse (Monato 1989:5:21)
senpostenigato (Monato 1989:5:21)

**postul/** (PIV 854)
postuli (r) (tr): 1) (iu): firme esprimi sian volon, ke iu donu aŭ faru ion, kion oni rajtas havi (PIV 853)
depostuli (tr): postuli tion, kio apartenas al ni kaj je kio ne estas senigitaj (PIV 853)
kontraŭpostulo: postulo, formita de defendanto kontraŭ tiu, kiu la unua faris postulon kontraŭ li ĉe la sama jurisdikcio (PIV 853)
nepostulema: inklina ne tro postuli, akcepti kompromisojn (PIV 853)
repostuli (tr): postuli, ke oni redonu tion, kion oni prunte ricevis (PIV 853)
apogi siajn postulojn sur la kutimo (PIV 59 sub apog/)
esti ekzekutita je la postulo de la publiko (IJR 1986:1:3)
havi solidan juran bazon por siaj postuloj (IJR 1981:1:32)
jura postulo (IJR 1975:1:18)
la damaĝito devas pruvi la kaŭzon, sur kiun li bazas sian postulon al kompensago (IJR 1976:2:25)
la Kortumo juĝas nur pri la asertoj kaj postuloj de la partioj (Aktualaj 64)
la postuloj de la leĝo (IJR 1969:1(9):18)
por la ekesto de postulrajto pri rekompenco de la domaĝo sufiĉas ... (IJR 1975:2:45)
postuli de iu pri io (PIV 853)
postuli sian parton de heredaĵo (PIV 853)

**potenc/** (PIV 855). Vidu ankaŭ: pov/
potenco (r): 3) jura aŭ politika povo plenumigi siajn ordonojn, dekretojn ks. (PIV 855)
funkci-disiga principo (IJR 1977:1:9), dispartigo de la potencoj (IJR 1977:1:15)
la principo de disdivido de la ŝtataj potencoj (IJR 1984:1:24); la principo pri divido de la potenco (IJR 1968:2(7):14); divido de povoj (IJR 1980:1:21)
la starpunktoj de la leĝdona potenco (IJR 1984:2:15)
la tuta regpotenco devenas de la popolo (Konst. Bul. 3)
perdi la registaran potencon (Esperanto 1988:1:14)
plenumada potenco (IJR 1967:4/5(5):24)

ŝtatpotencaj organoj (IJR 1969:2(10):18)
ŝtatpotenco (Konstitucio 1937, p. 7)

**pov/** (PIV 856). Vidu ankaŭ: potenc/

povo: 1) kapablo ion fari, pro forto, lerto aŭ rajto (PIV 856)
havi ekskluzivan povon fari leĝojn (IJR 1980:1:21)
jura agpovo (IJR 1967:4/5(5):18)
la 3 povoj (leĝdona, plenuma kaj juĝa) (Aktualaj 76)
la leĝdona povo (PIV 624)
la leĝo ne koncernas demandon pri la jura agpovo (IJR 1967:4/5(5):18)
plenpovigilo (IJR 1969:1(9):19, dif.)
plenpovo por reprezenti la Ŝtaton en la kontraktado de traktatoj (IJR 1969:1(9):19)
protekti la popolon kontraŭ la kruelaĵoj de la ŝtata povo (Bulgario 21)
supernaciaj povoj (Esperanto 1973:1:1)

**pozici/** (PIV 856). Vidu ankaŭ: stat/, status/

jura personeco povas havi la saman juran pozicion kiel iu privata persono (IJR 1981:2:13)
kvankam ili [la urboj] havis apartajn socian rolon kaj juran pozicion (Aktualaj 12)
la jura pozicio de la Komitato estas tiu de teknika-konsila organo (Aktualaj 115)

**praktik/** (PIV 857)

en la praktiko la nocioj ... (IJR 1984:2:30)
juĝista praktiko (IJR 1976:2:25), kortuma praktiko (IJR 1982:2:3)
jurpraktiko (IJR 1967:4/5(5):14), la praktikado de juro (PIV 857)
kortuma praktiko (IJR 1982:2:3), juĝista praktiko (IJR 1976:2:25)
longdaŭra praktiko (IJR 1967:3(4):4)
praktikadi tiujn rajtojn tradicie (IJR 1980:2:35)
religipraktikado (IJR 1978:2:19)
temas pri longdaŭra praktikado de iu regulo (Aktualaj 32)

**prav/** (PIV 858)

prava (r): 1) havanta opinion konforman al la vero, 2) (pp opinio) konforma al la vero (PIV 858)
Ĉu tiu havigo estis jure pravigebla (ekz. pago por farita laboro)? (L) (IJR 1983:2:9)
havi leĝpravigon por nei redukton (IJR 1979:1:19)
la laborjuro de GDR agnoskas nur tri pravigojn por maldungo (IJR 1976:1:21)
la striko ne havis "akcepteblan pravigon" (IJR 1975:2:5)
laŭregule tuja eksigo estas nur pravigebla, post kiam antaŭaj pruvoj de eduko kaj disciplinigo restis senrezultaj (IJR 1976:1:22)
leĝa pravigo (IJR 1977:2:54)
li estas prava en sia proceso (Z) (PIV 858)
li senkulpigis sin per la plej pravaj motivoj (PIV 858)
montri la senpravecon de tiuj ĉi iluzioj (Scienca Mondo 1985:3:13)
nesciado de leĝo neniun pravigas (Z) (PIV 858)
oni povas ŝanĝi la enhavon de la kontrakto, se novaj cirkonstancoj pravigas tion (IJR 19?3:1:48)
pravigaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
ruinigoj, kiuj ne estas pravigeblaj per la bezonoj de la milito (Aktualaj 70)
se oni ne havas rektan leĝpravigon por nei (IJR 1979:1:19)
tiu starpunkto estas pravigata per la aserto, ke ... (L) (IJR 1976:2:23)

**preamble/** (Ne en PIV)

la supre citita preamblo [preambleo] (Fina Akto 23)

**preambul/**. Vidu: preambl/

**precedenc/** (PIV 858). Vidu ankaŭ: precedent/

precedenco (r) = precedento (PIV 858)
krimo senprecedenca en la homa historio (Monato 1985:12:4)

**precedent/** (PIV 858). Vidu ankaŭ: precedenc/

precedento (r): pasinta fakto, kiu pravigas analogan okazan fakton (PIV 858)

**precip/** (PIV 858)

precipe grave estas, ke ... (Aktualaj 42)
precipe se temas pri (Aktualaj 45)

**preciz/** (PIV 858)

al la Konvencio estas aldonita unu rezolucio kaj 3 protokoloj kun diversaj precizigoj (L) (IJR 1967:2(3):14)
precizeco de leĝo (PIV 858)
precizigi la sencon de vorto (PIV 858)
precizigo de la rolo de la Centra oficejo (PIV 858)

**prefekt/** (PIV 859)

prefekto (r): ŝtata funkciulo, administranta plimalpli grandan distrikton (PIV 859)

**prejudic/** (Ne en PIV)

prejudico (L) (IJR 1976:2:41, dif.)

**prem/** (PIV 860)

premdevigi iun krimi (IJR 1982:1:21)

**premier/** (PIV 861)

premiero (r) (n): 12) la unua ministro (PIV 861)

**premis/** (PIV 861)

premiso (r): ĉiu el la du unuaj frazoj (maĵora kaj minora) de silogismo, el kiuj oni tiras konkludon (PIV 861)
premisi (tr) (pp io) antaŭkondiĉi, antaŭneprigi, postuli kiel antaŭan kondiĉon (PIV 861)
en okazo de ekzisto de leĝaj premisoj (IJR 1969: 2(10):16)

internacia lingvo estas necesa premiso (kondiĉo, bazo) de internacia solidareco (PIV 861)
internaciaj pacaj rilatoj premisas ĝeneralan malarmadon (PIV 861)
la premiso, por ke li havu ... (Esperanto 1972,7/8: 127)
la unua demando estas kiel nur vivi, kio ja fariĝis premiso por vivi virte (Scienca Mondo 1982:4:6)
ni traktos nur sub tiuj premisoj (PIV 861)
tio tamen premisas multe da antaŭscio (Monato 1986:6:28)

premium/ (PIV 861)
premiumo (r): monsumo, difinita en la poliso kaj periode pagenda de la asekurito al la asekuranto (PIV 861)
premiuma asekuro (PIV 861)

pren/ (PIV 861)
alpreni (tr): akcepti por si (PIV 861)
transpreni (tr): preni en posedon el la manoj de la posedinto (PIV 861)
alpreni novan regulon, statuton (PIV 861)
ĉiu ĝisgrada alpreno de la angla juro realiĝis parte rekte per normdonaj aktoj, parte per pli kaŝitaj tamen ne malpli efikaj mekanismoj (IJR 1985:1: 10)
mi prenas vin kiel atestanton (PIV 861)
ni konsentas preni lin por reĝo, kiel reĝon (PIV 861)
preni de iu garantiaĵon (PIV 861)
preni iun kiel sklavon (Z) (PIV 861)
preni subaĉeton (PIV 961)
transpreni ies heredaĵon (PIV 861)

prepar/ (PIV 862)
prepari (r) (tr): 2) fari ĉion necesan, por ke io povu poste esti utiligata (PIV 862)
la problemo ne estas pritraktata en la preparaj laboroj de la konvencio (IJR 1967:4/5(5):16)
la preparlaboroj por la Universala Deklaracio daŭris preskaŭ tri jarojn (L) (IJR 1968:3(8):2)
oni ne devas serĉi la helpon de la preparlaboroj (Aktualaj 140)
por la unua kongreso mi preparis du tre gravajn projektojn (Z) (PIV 862)
prepara laboro de la traktado (IJR 1969:2(10):26)
preparkunsido (Esperanto 1976:1:2)
turni sin al la prepara laboro de la traktado (IJR 1969:2(10):26)

prerogativ/ (PIV 863)
prerogativo (r): 1) rajto voĉdoni la unua, kaj tiel influi sekvantajn, 2) privilegio apartenanta al reĝo, aŭ al registaro, estraro ks. (PIV 863)

preskrib/ (PIV 864)
preskribi (r) (tr): 1) formale kaj aŭtoritate ordoni (PIV 864)
preskribo 1) detala aŭtoritata ordono (PIV 864)
kiel estas skribite en la libro de Moseo (PIV 864)
la Leĝo preskribas senaktivecon dum la sabato (PIV 864)
li pekis kontraŭ Viaj preskriboj (PIV 864)
transiraj preskriboj (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:4)

preskript/ (PIV 864)
preskripto (r): 1) perdo de rajto, post paso de difinita tempo, 2) ĉeso de punebleco, post paso de difinita tempo (PIV 864)
preskriptiĝi: fariĝi ne plu postulebla aŭ ne plu punebla pro la paso de la limtempo (PIV 864)
akira preskripto (L) (IJR 1978:2:13, dif.), akirpreskripto = uzukapo (PIV 864)
je la fino de la tempodaŭro preskriptiga (IJR 1967:3(4):19)
la jura postulo preskriptiĝas post kvin jaroj de kiam oni efektivigis la testamentajn disponojn (IJR 1975:1:18)
la rajto pretendi kompenspagon preskriptiĝas ĉe krima ago en la tempolimo de preskriptiĝo de la krimo (IJR 1976:2:26)
li pagos sian ŝuldon - ĉu postuleblan, ĉu preskriptitan (IJR 1967:3(4):18)
nepunebleco pro preskripto post preterpaso de sufiĉa tempo (IJR 1983:1:39)
preskriptita ŝuldo (IJR 1967:3(4):18)

pretend/ (PIV 864)
pretendi (r) (tr): 1) postuli ion, pri kio oni asertas, ke oni havas rajton super ĝi (PIV 864)
pretendo: 1) aserto, ke oni havas rajton pri io, kion oni postulas (PIV 864)
la inventinto povas pretendi pri perdokompenso (Scienca Mondo 1985:4:18)
la juĝpretendo estas prezentita laŭ ĉiuj postuloj de la leĝo (IJR 1969:1(9):18)
la persono suferinta damaĝon povas prezenti juĝpretendon pri kompenso (IJR 1976:1:38)
maljusta pretendo (PIV 458)
por kovri sian monpretendon (IJR 1966:1:30)
pravigi siajn pretendojn (PIV 864)
pretendi reĝecon pro hereda rajto (PIV 864)
pretendulo pri la heredaĵo (IJR 1967:1(2):7)
se ekzistas nur unu persono, kiel pretendulo pri la heredaĵo (IJR 1967:1(2):7)
tronpretendanto (IJR 1978:2:31)

preter/ (PIV 865)
ne nur iu leĝe difinita ago aŭ preterlaso agi (faro aŭ nefaro, se la kriminala leĝo preskribas faron) estu rigardata kiel krimo, sed ĉiu "socie danĝera" ago (faro aŭ nefaro) (IJR 1982:2:5)

**pretor/** (PIV 865)
pretoro (r): ĉe la Romanoj, ĉiu neelektita altranga oficisto, kiu helpis la konsulojn, precipe en la administrado de la juĝado (PIV 865)
la pretora juro (PIV 865)

**prevent/** (PIV 865)
la celo de la puno estas ankaŭ speciala kaj ĝenerala prevento (IJR 1982:1:4)

**prez/** (PIV 865)
aĉetoprezo (IJR 1977:1:39)
la luprezo de tia domo estas relative granda (IJR 1977:1:31)
vendoprezo (IJR 1977:1:35)

**prezent/** (PIV 865)
prezenti (r) (tr): 1) meti ion antaŭ iu, por ke tiu ĝin prenu, vidu aŭ juĝu (PIV 865)
esplorado de la prezentitaj dokumentoj (Aktualaj 63)
la rezultoj estos prezentitaj al registaroj (Fina Akto 16)
oni povis prezenti al tiuj sociaj tribunaloj aferojn, kiuj ... (IJR 1969:2(10):13)
prezenti al la komitato rajtigan leteron (Z) (PIV 865)
prezenti buĝeton (Nederlando 1980, p. 24)
prezenti kambion al banko (PIV 865)
prezenti la demandon pri nuligo al la Parlamento (IJR 1982:2:30)
prezento antaŭ Ministraro kaj Parlamento de interkonsentoj (IJR 1977:2:53)
tio estas simpla misprezento de la faktoj (PIV 865)

**prezid/** (PIV 866)
prezidi (r) (ntr): konduki en ordo la diskutojn (PIV 866)
prezidanto: 1) tiu, kiu prezidas en kunveno, kunsido, 2) tiu, kiu gvidas kiel ĉefo, la laboradon kaj administradon de organizo, societo, 3) respublikestro (PIV 866)
la prezidanto de la Germana Respubliko (PIV 866)
la vicprezidanto de Usono aŭtomate fariĝas prezidanto, kiam tiu ĉi mortis (PIV 866)
ministroprezidanto (IJR 1980:2:19)
prezidi en kunsido, en tribunalo, en parlamento (PIV 866)

**prezident/** (PIV 866)
prezidento (r): estro de respubliko; = prezidanto 3 (PIV 866)

**prezidi/** (PIV 866)
prezidio (r): 1) en Sovet-Unio kaj en kelkaj aliaj ŝtatoj kun simila ŝtata strukturo, la supera plenuma organo, ekvivalenta al la ŝtatestro en alitipaj ŝtatoj, kaj elektita de la Supera Soveto aŭ de ekvivalenta supera ŝtata organo 2) plenuma organo, malpli vasta ol plenuma komitato, de gravaj organizaĵoj en samaj landoj (PIV 866)

**princip/** (PIV 868)
principo (r): 3) ĝenerala regulo, rigardata kiel gvidilo de konduto (PIV 868)
ĝeneralaj juraj principoj (L) (IJR 1978:2:7), ĝeneralaj jurprincipoj (IJR 1967:3(4):4)
ĝia superrega principo estas, ke ... (IJR 1977:2:5)
juro-principo (IJR 1978:2:40)
la fundamenta ideo por la konstitucia justico estas la legitimeca principo (IJR 1981:2:10)
laŭprincipe (IJR 1977:2:53)
oni estis atinginta principan interkonsenton (Aktualaj 105)
principa interkonsento (PIV 868)
respekto al la principo de egalaj rajtoj de la popoloj (UN 4)
tiu fundamenta principo de restrikta interpretado en internacia juro (L) (IJR 1977:2:14)

**prioritat/** (PIV 868)
prioritato (r) (N): rajto, starigita de reglamento, fari aŭ akiri ion antaŭ la aliaj (PIV 868)
havi prioritaton de paso (diplomatie; trafike)
perdi sian prioritaton de aĉeto (IJR 1977:1:40)
se la komunumo decidis uzi sian prioritaton aĉeti la venditan prioritataĵon, ... (IJR 1977:1:40)
uzi sian prioritaton aĉeti (IJR 1977:1:39)

**privat/** (PIV 868)
privata juro (IJR 1980:1:28), privatjuro (IJR 1983:1:33)

**privilegi/** (PIV 868)
privilegio (r): aparta rajto aŭ favoro, koncesiita al iu ekster la komuna rajto (PIV 868)
privilegiulo: tiu, kiu ĝuas privilegion (PIV 868), privilegiito (IJR 1979:1:24)
kelkaj privilegiitaj individuoj (Esperanto 1984:2:28)
li estas nomumita kiel privilegiito (IJR 1979:1:24)
nerevokebla privilegiito (IJR 1979:1:24)
privilegia rajto (PIV 868)
privilegiaj akcioj (PIV 868)
privilegioj rezervitaj al la reĝeco (PIV 911)
starigo de rektaj aŭ malrektaj privilegioj (Konstitucio 1937, p. 20)

**prizon/** (PIV 869). Vidu ankaŭ:: karcer/. liber/
prizono (r): konstruaĵo, en kiu oni tenas la personojn kondamnitajn al malliberiga puno aŭ atendantajn sian juĝojn (PIV 869)
enprizonita (L) (IJR 1978:1:28)
esti punenda per juĝo de 2 jara aŭ pli longa enprizonigo (IJR 1982:2:13)

kondamnita al prizona puno dum unu jaro (IJR 1980:1:21)
krimago punenda per juĝo de 2 jara aŭ pli longa enprizonigo (IJR 1982:2:13)
li devus kalkuli je prizono ĝis 2 jaroj kaj monpuno de 1000000 dolaroj (Scienca Mondo 1985: 4:18)
post ilia elprizonigo (IJR 1985:1:25)
prizona puno (IJR 1980:1:21)
prizona sistemo (PIV 869)
prizonkunuloj (L) (IJR 1978:1:21)
prizorgado de eksprizonuloj (IJR 1982:2:11)

**proced/** (PIV 869)
procedi (r) (ntr): uzi difinitajn rimedojn por efektivigi ion (PIV 869)
procedo: 1) agmaniero, aplikota por atingi difinitan rezulton, kaj speciale farmetodo sekvata por fabriki, presi, foto ktp, 2) = proceso 2 (PIV 869)
en la jurprocedo partoprenas ankaŭ asesoroj (Konst. Bul. 14)
iniciati kontraŭ li kriminal-procedon (IJR 1969: 2(10):15)
iniciati kriminal-procedojn kontraŭ iu (IJR 1969: 2(10):15)
ni procedu laŭstatute pri la registrado de la voĉoj (PIV 869)
nekontraŭdira procedo (L) (IJR 1967:4/5(5):4)

**procedur/** (PIV 870)
proceduro (r): maniero, en kiu estas kondukataj la aferoj konforme kun la kutimo, statuto, reglamento aŭ leĝo (PIV 870)
proceduri (ntr): sekvi proceduron (PIV 870)
proceduristo: en kelkaj landoj jura oficisto, kiu ŝarĝas sin pri la proceduro de proceso, sed ne pledas (PIV 870)
ankaŭ tiuokaze komenciĝas kriminaljura proceduro nur post la privata iniciato de la ofendito (IJR 1969:2(10):22)
civila proceduro (L) (IJR 1983:2:5)
civilprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
enketi pri la proceduroj de voĉdonado en la diversaj landoj (PIV 870)
iniciati labordisputan proceduron (IJR 1983:2:29)
kaj la jurokreaj kaj la juroplenumaj normoj estas proceduraj normoj en pli vasta senco (IJR 1984:2:26)
kodo de kriminala proceduro (PIV 870)
komenci kriminalproceduron kontraŭ iu (IJR 1968:2(7):12)
kondiĉe ke ĉiuj proceduraj reguloj estis observitaj (IJR 1980:2:24)
kriminala proceda kodo (IJR 1968:3(4):17), kriminala proceskodo (IJR 1969:1(9):11), kriminalprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), Punprocedura Kodo (IJR 1967:3(4):14), pun-procesa kodo (IJR 1977:2:211)
kriminala proceduro (L) (IJR 1983:2:5)
kriminalprocedura juro (L) (IJR 1982:1:4)
kun la escepto de decidoj koncerne procedurajn demandojn (L) (IJR 1976:1:8)
la konstitucie fiksita proceduro por la donado de konstituciaj leĝoj (IJR 1980:1:30)
la kortuma proceduro pri pruvado (IJR 1986:1:8)
la proceduran lingvon elektas la plendanto laŭ sia bontrovo (L) (IJR 1977:2:15)
la proceduro por elmeti leĝprojekton antaŭ la parlamento estas jena ... (PIV 870)
la teksto akceptiĝas laŭ reguloj fiksitaj en la procedura regularo de la konferenco (IJR 1981:1:37)
oficialaj lingvoj de la Kortumo (L) (IJR 1977:2:15)
personoj povos esti la objekto de krimpersekutada proceduro pro falsigado de pruvdokumentoj (Monato 1987:9:7)
por ĉiuj aliaj konkludoj, do por tiuj, kiuj ne rilatas al la proceduro, sed al la esenco mem de la diskutata demando, estas necesa plimulto de 7 voĉoj (Aktualaj 115)
procedura lingvo (L) (IJR 1977:2:15)
procedura regularo (IJR 1981:1:37)
proceduraj demandoj (IJR 1976:1:8)
proceduraj partioj (IJR 1980:2:22), procesaj partioj (IJR 1980:1:32)
proceduraj reguloj (Fina Akto 81)
proceduri kontraŭ iu (PIV 870)
punprocedura kodo (IJR 1967:3(4):14), pun-procesa kodo (IJR 1977:2:21)
se la partioj interkonsentas, ke la proceduro okazu en la franca, la juĝo estos proklamata en la franca (UN 30)
se temas pri aferoj proceduraj (UN 2)
skriba proceduro (UN 29)

**proces/** (PIV 870)
proceso (r): 1) juĝafero, jure submetita al tribunalo (PIV 870)
procesi (ntr): juĝe persekuti (PIV 870)
administracia proceso (IJR 1977:1:14)
ambaŭ procesantoj devas prezenti siajn atestojn (IJR 1986:1:6)
apelacia proceso (IJR 1977:2:23)
ĉiam devas okazi tribunala proceso pri la heredaĵo (IJR 1977:2:26)
ĉiuj aktoj de la pun-proceso (IJR 1977:2:21)
ĉiuj procesaj datlimoj komenciĝas de la dato, en kiu formale komunikas la tradukton (IJR 1977:2:22)

direktado de la proceso (L) (IJR 1977:2:15)
en edzprocesoj la asignita partio havas advokaton (IJR 1967:1(2):13)
esti prava en sia proceso (Z) (PIV 870)
fari juĝan proceson kontraŭ iu (PIV 560)
fariĝis ankaŭ ŝanĝoj en la procesa stato de la domaĝito [damaĝito] (IJR 1968:2(7):6)
gajni, perdi sian proceson (Z) (PIV 870)
iniciati proceson kontraŭ iu (Esperanto 1974:1:11)
jam antaŭ la komenciĝo de la proceso (L) (IJR 1978:1:25)
komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso (Z) (PIV 870)
kontraŭ li ne estas iniciatita kriminala proceso pro krimo (L) (IJR 1968:2(7):3)
kriminala proceda kodo (IJR 1968:3(4):17), kriminala proceskodo (IJR 1969:1(9):11), kriminalprocedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), Punprocedura Kodo (IJR 1967:3(4):14), pun-procesa kodo (IJR 1977:2:21)
kriminala proceso (PIV 582)
la kulpulo estas procesata nur sekve de plendo de la ofendito (IJR 1966:1:21)
la maldungito devas komencigi jurproceson por pledi siajn rajtojn (IJR 1976:1:26)
la procesaj partioj (IJR 1980:1:32)
la validigo de priheredaj pretendoj okazas en la heredaĵa proceso (IJR 1967:1(2):7)
Nurnbera Proceso (Monato 1985:5:12), la proceso de Nürnberg (Aktualaj 99)
proceduraj partioj (IJR 1980:2:22), procesaj partioj (IJR 1980:1:32)
procesa juro (IJR 1977:2:34)
procesaj agadoj (IJR 1968:2(7):6)
procesaj datlimoj (IJR 1977:2:22)
procesi kontraŭ iu (PIV 870)
procesi pri kompenso de la perdoj (PIV 870)
proceskostoj (IJR 1967:3(4):14)
procesrezulto (IJR 1967:4/5(5):15)
senprocesaj ekzekutoj (IJR 1985:1:33)
solvo, kiu ne dependigis la procesrezulton de en kiu lando oni komencas la proceson (IJR 1967:4/5(5):15)
sorĉistinaj procesaj (Monato 1985:10:20)
tribunala proceso pri la heredaĵo (IJR 1977:2:26)

**profesi/** (PIV 871)
profesio (r): ĉiu okupo, per kiu oni akiras vivrimedojn (PIV 871)
kompensi la laborakcidentojn kaj la profesiajn malsanojn (IJR 1976:2:15)
kun aparta akcento je profesiaj malsanoj (Fina Akto 76)
la profesia imuneco de deputitoj (IJR 1981:2:25)
praktiki la profesion de advokato (Z) (PIV 871)
profesia juĝisto (IJR 1968:2(7):11)
profesia malpermeso (berufsverboten) (Scienca Mondo 1989:2:3)
profesia malsano 76:2:27, profesi-malsanoj 76:1:33
sendependaj profesiuloj (advokatoj, kuracistoj, arkitektoj) (IJR 1968:3(8):11)

**progresiv/** (PIV 873)
progresiva (r): iom post iom regule pligrandiĝanta (PIV 873)
altprocenta progresiveco de limdepago (PIV 873)
progresiva imposto super la rentoj (PIV 873)

**prohib/** (PIV 873)
prohibi (r) (tr) (N): = malpermesi (PIV 873)

**prohibici/** (PIV 873)
prohibicio (r): leĝa aŭ dekreta malpermeso importi aŭ eksporti tiujn aŭ aliajn varojn, fari tiun aŭ alian komercon aŭ industrion (speciale tiujn de la alkoholaĵo (PIV 873)

**projekt/** (PIV 874)
projekto (r): 2) plano, proponata por efektivigi tiun ideon (PIV 874)
ellabori projekton de statuto por tia organizaĵo (L) (IJR 1985:2:3)
prezenti siajn projektojn de deklaracioj (Aktualaj 84)
projekto de leĝo (PIV 874)

**prokonsul/** (PIV 874)
prokonsulo (r): ekskonsulo, kiu, principe dum unu jaro, administris unu provincon de la Roma imperio (PIV 874)

**prokrast/** (PIV 874)
prokrasti (r) (tr): transmeti al pli malfrua tempo agon, kies tujan plenumon oni rezignas (PIV 874)
la advokato konsentis pri la prokrasto de la proceso (PIV 874)
la regno prokrastis subskribi la traktaton (PIV 874)
prokrasti la elektojn ĝis la fino de la jaro (PIV 874)
prokrasto, prokrastado: transmeto de la plenumo de ago al alia tempo (PIV 874)
tiu afero prokraston ne toleras (PIV 874)

**prokur/** (PIV 875)
prokuro (r): laŭleĝa povo aŭ rajtigo donita de iu firmo aŭ persono al alia por agi en ĝia nomo (PIV 875)
prokuristo: oficisto, kiu havas la rajtigon reprezenti laŭleĝe firmon aŭ entreprenon kaj subskribadi en ĝia nomo (PIV 875)
prokuristo de banko (PIV 875)

**prokurator/** (PIV 875)

prokuratoro (r): 1) romana administranto de la fisko, 2) guberniestro de imperia provinco, 3) magnistratano en iaj Italaj civitoj (PIV 875)
Pilato estis prokuratoro de Judujo (PIV 875)

**prokuror/** (PIV 875)
prokuroro (r): supera juĝa oficisto, akuzanta en la nomo de la ŝtato (PIV 875)
estas la devo de prokuroro pruvi kulpon, ne la devo de akuzito pruvi nekulpon (Monato 1988: 12:10)
la prokuroro pruvu la kulpecon de la akuzito (Aktualaj 70)

**promes/** (PIV 876)
promesi (r) (tr): 1) (iu) certigi, ke oni faros aŭ donos, 2) (io) doni motivon por esperi, ke io fariĝos, okazos (PIV 876)
ĵurpromeso: voto (PIV 876)
promeso: ago kaj vortoj de tiu, kiu promesas (PIV 876)
dana juro principe baziĝas sur la promesa teorio, sed usona juro sur la interkonsenta teorio (IJR 1967:3(4):19)
disdoni (Z), fari (Z), plenumi (Z), teni (Z), repreni (Z) promesojon (PIV 876)
dupromesaj kontraktoj (IJR 1967:3(4):17, dif.)
ĝis ĝia akcepto nura promeso ne estas plenumenda de la promesanto (IJR 1967:3(4):16)
ili ligis sin per ĵura promeso, ke ili sekvos la instruon (PIV 876)
ili perfidis sian promeson unuigi sin kontraŭ la regantoj (Monato 1988:2:8)
liberigi la promesanton de lia promeso (IJR 1967: 1(2):20)
mi promesas observi, kion leĝo ordonas (PIV 876)
promeso sen kontraŭvaloro (IJR 1967:3(4):16)
promesricevanto (IJR 1967:3(4):17)

**promulg/** (PIV 876)
promulgi (r) (tr): oficiale konstati la ekziston de leĝo akceptita de la leĝdona aŭtoritato (kutime, la parlamento), kaj ordoni ĝian plenumon (PIV 876)
promulgo: ago, per kiu la ĉefo de la ŝtato promulgas leĝon (PIV 876)
la leĝo estis promulgita la 8-an de decembro 1951 (L) (IJR 1984:2:8)
leĝoj estas promulgataj per edikto, dekreto aŭ ukazo (PIV 876)

**propon/** (PIV 877)
la ĝenerala sekretario de UNO proponas, ke estu organizita esploro pri ... (Scienca Mondo 1983:3:4)
mi proponas, ke oni efektivigu konferencon pri ... (Scienca Mondo 1982:4:26)
projekto, kiun oni devas proponi al la Konsilio antaŭ la 1-a de septembro (Heroldo 1981:12:3)

**proporci/** (PIV 877)
al ĉiu homa estaĵo oni devas doni kvanton da rajtoj kaj rimedoj precize proporcian al la kvanto da devoj kaj respondeco (Z) (PIV 877)
devas esti severa proporcio inter la kulpoj kaj la punoj (PIV 877)
la edzo devas zorgi pri la necesaĵoj de la edzino proporcie al siaj havaĵoj (IJR 1966:1:21)
la nombro de la delegitoj devas esti proporcia al la alteco de la kotizo (Z) (PIV 877)

**propr/** (PIV 877). Vidu ankaŭ: posed/, propriet/
propra (r): 1) apartenanta ekskluzive al iu aŭ al io, 2) apartenanta ekskluzive al la subjekto de la propozicio (PIV 877)
propraĵo: 1) aparta karakteriza trajto, 2) proprietaĵo (PIV 877)
proprulo: proprietulo (PIV 877)
alproprigo (Scienca Revuo 1974:5/6:248)
aparteni propre al iu (PIV 877)
disponrajto pri komuna propraĵo (IJR 1976:1:45)
en 1933 Hitler alproprigis Aŭstrion (L) (IJR 1976: 1:3)
en la j. 1938 Germanio alproprigis Aŭstrion (Aktualaj 96)
komuna propraĵo (IJR 1976:1:43)
konfisko kaj ŝtatproprigo de la havaĵo de jura persono (IJR 1984:2:19)
la saĝulo portas kun si sian tutan propraĵon (PIV 877)
neniu tia alproprigo estos agnoskita kiel laŭleĝa (Fina Akto 9)
ofendo kontraŭ la privata propraĵo (IJR 1982:2:9)
vi estas nun la sola kaj plena proprulo de la libera posedaĵo, kiun vi ĝis nun havis en farmo (Z) (PIV 877)

**propriet/** (PIV 877). Vidu ankaŭ: posed/, propr/
proprieto (r): rajto plene uzadi, disponi kaj eĉ detrui aĵon, en la limoj de la ekzistantaj leĝoj (PIV 877)
eksproprietigi: senigi iun je lia proprietaĵo, laŭ leĝa proceduro kaj kun kompenso (PIV 877)
proprietaĵo: objekto de proprieto (PIV 877)
proprieti (tr): ĝui la proprieton de io (PIV 877)
proprietulo: tiu, kiu havas proprecon super io (PIV 877)
dividi la proprieton (IJR 1977:2:34)
eksproprietigo por publika bezono (IJR 1977:1:36), eksproprietigo pro publika utileco (PIV 877)
en la proprietaj interrilatoj de la geedzoj regas la principo de la apartigiteco (IJR 1966:1:12)
en la sudo (de Vjet-Namo), same kiel antaŭe en

la nordo, marksistoj ĝisfunde elradikigis kapitalismon, elproprietigante privatajn posedantojn kaj enkondukante socialisman, ordondistribuan mastrumadon (Monato 1989:11:7)
formoj de proprieto (IJR 1977:1:33)
individua, kolektiva, komerca, literatura proprieto (PIV 877)
komuna proprieto (IJR 1979:1:12)
kun la pliiĝo de produktiveco kune evoluas la privata proprietaĵo (IJR 1966:1:4)
kunproprieto (IJR 1977:1:33)
kunproprietulo (IJR 1977:1:33)
movebla kaj nemovebla proprietaĵo (IJR 1977:1:36)
ne ĉiu posedanto havas la proprieton de sia posedaĵo (PIV 877)
privata proprieto (L) (IJR 1980:1:6)
proprietaj rilatoj inter geedzoj (IJR 1976:1:43)
proprietjuro (IJR 1982:2:6)
proprieto pri idealaj partoj (IJR 1977:2:25)
sekurigo de la terenproprietanto kontraŭ malplivalorigo de la ĉiujara monpago (IJR 1977:2:28)
skriba kontrakto pri translaso de proprieto de domo (IJR 1977:1:35)
terenproprietanto (IJR 1977:2:28)
tiu ĉi tereno estis privata kaj eksproprietigita por konstruaj celoj (IJR 1977:1:33)

**proskrib/** (PIV 878)
proskribi (r) (tr): senjuĝe ekzili, en tempo de ekstera aŭ interna milito (PIV 878)
proskriba: senrajta kondamno al ekzilo (PIV 878)

**proskripci/** (PIV 878)
proskripcio (Z) (r) = proskribo (PIV 878)

**protekt/** (PIV 879)
laborprotekto laŭ la juro de Germana DR (IJR 1976:1:19)
leĝa protekto (Esperanto 1984:12:208)
leĝo pri laborsekureco (IJR 1975:2:34), leĝo pri laborprotekto (IJR 1975:2:39)
naturprotekto (Scienca Mondo 1982:4:30), protekto de la naturo (Scienca Mondo 1982:4:30)
protekto de la medio (Scienca Mondo 1982:4:8)

**protektorat/** (PIV 879)
protektorato (r): speco de koloniado, per kiu regno pli potenca protektas la interesojn sed respektas la internan aŭtonomion de alia, malpli potenca lando (PIV 879)

**protest/** (PIV 879)
protesti (r) (ntr): fari formalan deklaron kontraŭ io, kion oni opinias nejusta aŭ nevera (PIV 879)
protesto: 1) ago aŭ vortoj de tiu, kiu protestas, 2) laŭleĝa konstato de nepagiteco de kambio (PIV 879)
la protesto devas esti deklarata antaŭ la fino de du semajnoj, post kiam la protestonto ricevis la decidon de la tribunalo (IJR 1969:2(10):12)
sekvo de neprotestado (IJR 1982:1:43)

**protokol/** (PIV 879)
protokolo (r): oficiala raporto, per kiu rajtigita aŭ kompetenta persono konstatas, kion li faris, vidis, aŭskultis (PIV 879)
protokoli (ntr): fari protokolon pri (PIV 879)
protokolisto: tiu, kiu estas komisiita protokoli aŭ okaze aŭ konstante, en unu asocio ks. (PIV 879)
fari protokolon pri ŝtelado, arestado (PIV 879)
finprotokolo (IJR 1981:1:38)
la fakultativa protokolo ligita al unu el la traktatoj (IJR 1976:1:11)
legi, akcepti la protokolon de la antaŭa kunsido (PIV 879)
ratifika protokolo (IJR 1981:2:32)
tio kaŭzis skandalon, pri kiu oni protokolis (PIV 879)

**prov/** (PIV 880)
estas du specoj da akvoprovo, unu per bolanta akvo, la alia per malvarma akvo (IJR 1986:1:9)
fajroprovo (IJR 1986:1:8)
la registaro akuzis lin pri provo de ŝtatperfido (Monato 1989:5:13)
prova krimo (IJR 1982:2:4)
provtempo (IJR 1967:3(4):9)
provtempulo (IJR 1967:3(4):9)

**provizi/** (PIV 881)
provizio: ĝenerala termino por ĉia salajro aŭ rekompenco, pagata pro perado (PIV 881)
la provizio de komerca vojaĝisto, de banko ktp. (PIV 881)

**provizor/** (PIV 881)
provizora (r): destinita por nelongdaŭra uzo, sed anstataŭota de definitiva (PIV 881)
li estis komisiita provizore pri tiu posteno (PIV 881)
provizora statuto (Esperanto 1984:3:42)
provizoraj rimedoj devas esti aplikataj (UN 30)

**provok/** (PIV 881)
provoki (r) (tr): 1) (iun) inciti al batalo, disputo ks, montrante sin atakema, 2) (ion) estigi, elvoki (PIV 881)
provoko: ago de tiu, kiu provokas (PIV 881)
ĉu la edzino estis agresema aŭ alimaniere provoka antaŭ la fatala evento (L) (IJR 1983:2:12)
provoki ribelon (PIV 881)

**provos/** (PIV 881)
provoso (Z) (r): gardisto de malliberejo (PIV 881)

**prunt/** (PIV 882)
prunte (r): kun la kondiĉo de redono post plimalpli difinita tempo (PIV 882)
alprunti (tr): doni prunte (PIV 882)
deprunti (tr): preni prunte (PIV 882)
deprunto: aranĝo aŭ kontrakto, per kiu firmo aŭ administracio ricevas de la publiko monon kontraŭ difinita interezo (PIV 882)
pruntedoni (tr): prunti 1) (PIV 882)
pruntepreni: prunti 2) (PIV 882)
prunti (tr): 1) doni prunte, 2) preni prunte (PIV 882)
prunto: 1) ago de tiu, kiu pruntas, 2) mono, objekto pruntita (PIV 882)
Ĉe vi ne havas iom da mono por pruntedoni al mi? (Z) (PIV 882)
Ĉu vi ne povas doni al mi prunte tricent rublojn (Z) (PIV 882)
kiu prunteprenas, tiu estas la sklavo de la pruntedoninto (PIV 882)
la malriĉa knabo pruntis al si konfirmacian surtuton (Z) (PIV 882)
mi petis, ke ŝi pruntu al mi iom (Z) (PIV 882)
ne prenu prunte kaj ne prunte donu (Z) (PIV 882)
peti de iu pruntedonon (Z) (PIV 882)
pruntedoni kontraŭ garantiaĵo (PIV 882)
redoni, returni prunton (PIV 882)
repagi deprunton (PIV 882)
ŝtata deprunto (PIV 882)

**pruv/** (PIV 883)
pruvi (r) (tr): 1) (iu) montri por rezonado aŭ per faktoj, ke io estas vera, 2) (io) esti la pruvo de io (PIV 883)
pruvo: argumento aŭ fakto, per kiu oni povas montri la verecon de io (PIV 883)
pruvobjekto: objekto, per kiu la ŝtata akuzisto intencas pruvi la kulpecon de la akuzito (PIV 883)
akumuli la pruvojn kontraŭ la akuzito (PIV 25)
alporti la pruvon de io (PIV 883)
falsigado de pruvdokumentoj (Monato 1987:9:7)
fari ĉiujn aranĝojn necesajn por la prezentado de pruvoj (UN 31)
kontraŭpruvo (L) (IJR 1983:2:12)
la kortuma proceduro pri pruvado (IJR 1986:1:8)
la pruva ŝarĝo troviĝas ĉe la dunganto (Monato 1989:12:6), ŝarĝo de pruvo (Monato 1988:12:12)
la sama preskribo estas aplikata kiam temas pri havigo de pruvo surloke (UN 31)
mankis sufiĉa atestaĵo kaj certa pruvo (Monato 1989:6:12)
mi dubas pri la solideco de viaj pruvoj (PIV 1010 sub solid/)
ne plu ekzistas absolvo pro manko da pruvoj (IJR 1969:1(9):12)
nekonstebla pruvo (PIV 558)
nigro sur blanko (skrivaĵo) pruvas sen manko (Z) (PIV 883)
nun lia krimo estas pruvita (PIV 883)
objekto de pruvo (L) (IJR 1983:2:4)
prezentado de pruvoj (UN 31)
pritaksado de pruvoj en ĉiuj stadioj de kriminala proceduro (L) (IJR 1983:2:13)
proponi novajn pruvrimedojn (IJR 1968:2(7):6)
pruvdevo (IJR 1976:2:24)
pruvi sian senkulpecon (PIV 883)
pruvoj kaj kontraŭpruvoj (L) (IJR 1983:2:12)
pruvrimedoj (IJR 1968:2(7):6), rimedo de pruvado (L) (IJR 1983:2:13)
senpruve akuzi iun (PIV 883)
suspekto la pruvon ne egalas (Z) (PIV 883)
teorio de pruvoj (L) (IJR 1983:2:13)

**publik/** (PIV 884). Vidu ankaŭ: oficial/
aranĝado de fakaj kunvenoj kaj publikaj kulturaj kaj sociaj aranĝoj (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:1)
malpublike: sen ĉeesto de publiko (PIV 885)
publikulino (Z): prostituitino (PIV 885)
ebrieco en publikaj lokoj (Monato 1987:9:11)
eksproprietigo por publika bezono (IJR 1977:1:36), eksproprietigo pro publika utileco (PIV 877)
esti ekzekutita je la postulo de la publiko (IJR 1986:1:3)
fari sian decidon en nepublika interkonsiliĝo (IJR 1969:2(10): 15)
interna publikado (IJR 1977:2:54)
juĝi seksan krimon malpublike (PIV 885)
la diferenco inter privata juro kaj publika juro (IJR 1980:1:28)
la kunsidoj estas publikaj, krom se la Kortumo decidas alimaniere (UN 31)
la principoj de senpereco kaj publikeco (L) (IJR 1983:2:13)
la socia tribunalo faras sian decidon en nepublika interkonsiliĝo per voĉplimulto (IJR 1969:2(10):15)
la vendo okazas per publika aŭkcio (IJR 1977:1:39)
ofendoj kontraŭ la publika bonordo (IJR 1982:1:25)
perturbo de la publika ordo (IJR 1982:2:2)
publika akuzisto (PIV 885)
publika bonordo (IJR 1982:1:25)
publika juro (IJR 1980:1:28), publik-juro (IJR 1981:2:13)
publika persekutisto (L) (IJR 1983:2:30)
publika punpersekutado (IJR 1983:1:35)
publika testamento (IJR 1975:1:5)

publikigi dekreton, leĝon, la rezulton de la balotado (PIV 885)
publikjura rajto pri pensio (IJR 1976:2:9), publik-jura (IJR 1981:2:13)
ricevi la subvencion de la publikaj instancoj (IJR 1968:3(8):10)

## puĉ/ (PIV 885)

puĉo (r): subita perforta provo renversi ŝtatan reĝimon (PIV 885)

## pull/ (PIV 886)

pullo (r): 1) okaza aranĝo inter sendepandaj entreprenoj, por praktike trudi kontigenton ĉe difinita merkato kaj konservi altajn profitojn, dividotajn inter la partoprenantoj, 2) internacia organismo, komisiita aranĝi komunan merkaton por la aliĝintaj landoj (PIV 886)

## pun/ (PIV 887)

puni (r) (tr): kaŭzi al iu suferon kompense de ties malbonfaro aŭ kulpo (PIV 887)
mortpuno: puno, konsistanta en la senigo je la vivo (PIV 887)
puniĝi: fariĝi punita (PIV 887)
puno: sufero kaŭzita pro malpermesita faro, kun la celo, ke oni ne faru tion plu (PIV 887)
punskribo: lerneja puno, konsistanta en la kopiado de difinita nombro da linioj aŭ versoj (PIV 1003 sub skrib/)
senpuna: ne suferanta punon (PIV 887)
adulto estas punanta per morto (Monato 1986:3:10)
aldonitaj aŭ komplementaj punoj kiel ekz. la ellandigo de fremduloj, la senigo je civilaj rajtoj (IJR 1984:2:35)
aljuĝado de punsankcioj (IJR 1983:1:35)
apliko de korpa puno kiel disciplina rimedo (L) (IJR 1982:2:35)
alproprigo de ŝtata proprieto estos punita per malliberigo dum ne pli ol kvar jaroj (L) (IJR 1983:2:9)
apliko de korpa puno kiel disciplina rimedo (L) (IJR 1982:2:35)
Aristotelo disvolvis jurpunan teorion (IJR 1979:2:2)
bonkonduti por atingi nuligon de la restanta puno (IJR 1968:1(6):11)
cirkonstancoj, kiuj ekskludas la puneblecon de ago (IJR 1981:2:25)
ĉe bona konduto dum certa tempo (1–3 jaroj) la puno estas nuligata (IJR 1969:1(9):12)
ĉe nova samspeca delikto minacas la plenumo de la restpuno (Monato 1988:2:6)
ĉiuj aktoj de la pun-proceso (IJR 1977:2:21)
decidi pri la kulpeco kaj la aplikota puno (IJR 1982:2:15)
disciplinaj punoj (IJR 1985:1:32)
dum la punplenumado la punitoj laboras en brigadoj (IJR 1969:1(9):12)
dum la unua franca revolucio la akaparistoj estis punataj je morto (PIV 19 sub akapar/)
eduki la leĝrompintojn kaj zorgi pri la reensociigo de punitoj post la punfino (IJR 1968:1(6):11)
en 1963 li estas kondamnita je ĝismorta malliberpuno (Monato 1985:12:12)
fiksi la punojn (L) (IJR 1983:2:4)
fiksi pagendan punmonon de 5,- ĝis 50,- M. (IJR 1969:2(10):12)
fikso de la puno (IJR 1977:2:49)
grava juĝpuno (PIV 355)
gravega krimo, por kiu eĉ la mortpuno povas esti aplikita (L) (IJR 1969:1(9):2)
havi senpunan antaŭan vivon (IJR 1968:2(7):10)
ili devas esti konsiderataj kiel krimuloj, kontraŭ kiuj la plej severaj punoj estas aplikendaj (L) (IJR 1969:2(10):6)
ili estis kondamnitaj al severaj punoj de malliberigo ĝis 7 jaroj kaj aldona relegacio de 2–5 jaroj (L) (IJR 1982:1:10)
individuoj, kiuj estas submetitaj al punaj sankcioj (IJR 1984:2:35)
kondamnita al prizona puno dum unu jaro (IJR 1980:1:21)
konservo de la mortiga puno (IJR 1985:1:33)
kontraŭ ili ne povas esti entreprenata punpersekuto escepte pro gravaj krimoj (Konst. Bul. 8)
kriminala proceda kodo (IJR 1968:3(4):17), kriminala proceskodo (IJR 1969:1(9):11), kriminal-procedura kodo (L) (IJR 1983:2:5), Punprocedura Kodo (IJR 1967:3(4):14), pun-procesa kodo (IJR 1977:2:21)
kriminaljura sankcio (L) (IJR 1982:1:4), kriminala sankcio (IJR 1976:1:14), puna sankcio (IJR 1983:1:35), punsankcio (IJR 1983:1:35)
krimo punebla per enkarcerigo por periodo ĝis 5 jaroj (L) (IJR 1969:1(9):2)
krimo punita de la leĝoj per korpaj kaj malhonorigaj punoj (IJR 1982:2:15)
kun la plenumo de la 14-a vivojaro estiĝas la persona punebleco (IJR 1981:2:27)
la aŭtomobilisto povas esti kriminale punita ĝis 10 jaroj de malliberigo laŭ art, 211 de la kriminala Kodo (L) (IJR 1976:2:23)
la celo de la punapliko (IJR 1979:2:4)
la farinto de la krimo devas esti punita (Aktualaj 72)
la homa digno ankaŭ dum la punplenumo devas esti atentata (IJR 1969:1(9):12)
la inspektoroj pri laborprotekto povas surmeti monpunon al la responsaj [respondecaj] gvi-

dantoj de la entreprenoj (IJR 1975:2:43)
la juĝista instanco povas pligrandigi la punon, tamen ne superpaŝi 25 jarojn (IJR 1968:3(8):17)
la justeco postulas, ke la krimuloj estu punitaj (Aktualaj 72)
la komisionoj povas fiksi pagendan punmonon de 5,- ĝis 30,- M. (IJR 1969:2(10):12)
la krimoj estas punindaj laŭ diversaj gradoj (IJR 1982:2:4)
la leĝo, kiu anticipe konstatas, kia krimago estas punenda per juĝo de 2 jara aŭ pli longa enprizonigo (IJR 1982:2:13)
la leĝrompinto devas bonkonduti por atingi nuligon de la restanta puno (IJR 1968:1(6):11)
la malobservo de la striktaj reguloj rilate religiajn societojn estas krimo punebla per enkarcerigo por periodo ĝis 5 jaroj (L) (IJR 1969:1(9):2)
la nova pun-leĝaro draste pligrandigas la punojn eĉ por deliktoj ordinare pritraktendaj sufiĉe milde kaj indulge (Monato 1985:9:19)
la punindaj agoj dividiĝas en krimoj kaj deliktoj (IJR 1982:2:10)
la puno daŭras de 6 monatoj ĝis 5 jaroj (IJR 1969:2(10):21)
la puno estas enlime mildigebla (IJR 1982:2:12)
la puno estis transformita al dumviva malliberigo (Monato 1987:9:18)
la puno ne povas esti pli granda ol 10 jaroj da malliberigo (L) (IJR 1982:1:16)
la puno por tiaj fiagoj estas dek jaroj en malliberejo (Monato 1989:11:12)
la punoj ĉe malobeo sumiĝas je 1 000 000 dolaroj aŭ 20 jarojn da prizono laŭ verdikto de DOE (Scienca Mondo 1985:4:19)
la punoj estas personaj kaj konformaj al al krimoj (Konst. Bul. 19)
laboruloj kun senpuna antaŭa vivo (IJR 1969: 2(10):14)
leĝo por punplenumigo kaj resociigo de la kondamnitoj en la socian vivon (IJR 1969:1(9):11)
leĝoj, kiuj servis la punigon de la militaj krimuloj (IJR 1968:1(6):2)
li devus kalkuli je prizono ĝis 2 jaroj kaj monpuno de 1 000 000 dolaroj (Scienca Mondo 1985:4:18)
li estis denove izolita kaj punsubmetita al perforta kuracado per haloperidolo kaj triftanio (L) (IJR 1978:1:21)
li estis kondamnita al 10-jara malliberigo en punkampo (L) (IJR 1978:1:20)
li estis kondamnita al monpuno de 60 mil liroj (IJR 1977:2:23)
li estis kondamnita je puno de karcero (L) (IJR 1968:2(7):3)
li estis kondamnita kaj ricevis kiel punon tri jarojn da malliberejo (kondiĉa) kaj devis pagi altan monsumon (Monato 1989:4:12)
maksimumaj punoj (L) (IJR 1984:1:17)
malgranda eksceso aŭ ekscitiĝo pro la karaktero de la atako, mildigas la punon, aŭ eĉ liberigas de puno (L) (IJR 1982:1:11)
malhonorigaj punoj (IJR 1982:2:15)
maljusta puno (PIV 458)
malliberejа puno (IJR 1968:1(6):11), prizona puno (IJR 1980:1:21)
mona puno (PIV 887), monpuno: puno, konsistanta en la pago de la monsumo (PIV 887)
monpuno ne plu povas esti ŝanĝita en malliberej-punon (IJR 1968:3(8):17)
mortpuno (IJR 1984:1:17), mortiga puno (IJR 1985:1:35), morta puno (PIV 887), mortopuno (Aktualaj 71)
neniu povas esti punita krom surbaze de leĝo, akceptita kaj publikigita antaŭ la faro de la krima aŭ delikta ago (Aktualaj 76)
nepuneblas, kiu en la tempo de la krimago ankoraŭ ne kompletigis la aĝon de 14 jaroj (IJR 1982:2:12)
nepunebleco pro preskipto post preterpaso de sufiĉa tempo (IJR 1983:1:39)
normo, kiu fiksas certan punon (IJR 1984:2:28)
oni riskas pun-pagon, se oni ne uzas sekurrimedon (Monato 1985:12:6)
pago de monpunoj surmetitaj al jura persono (IJR 1985:1:7)
plej grava estas la zorgo, ke plenuminte la punon, la kondamnitoj estu rekondukataj en la normalan socian vivon (IJR 1969:1(9):12)
por 311 kaptitoj, kondamnitaj je vivdaŭra aresto, la puno mallongiĝis al 15jara malliberеco (Monato 1988:2:6)
porti la punon por io (Z) (PIV 887)
pritrakti punaferojn (IJR 1978:2:34)
privata elfarado de vodko estu severe punata (Monato 1985:9:19)
privata punpersekutado (IJR 1983:1:35)
pro la drinko de alkoholaĵoj oni ricevas punon de kelkjara malliberejo (Monato 1986:3:10)
pro mia stulto mi puniĝas juste (PIV 887)
pruvi sian nescion pri la punebleco de la ago (IJR 1982:1:22)
publika punpersekutado (IJR 1983:1:35)
puna juro (IJR 1977:2:34), punjuro (IJR 1983:1:33)
puna kortumo (IJR 1978:2:32)
punaj metodoj (PIV 887)
punaljuĝado (IJR 1979:2:5)
punebla ago (IJR 1981:2:24)

punebleco de la ago (IJR 1982:1:22)
pun-ekskludaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:35)
punendaj aferoj (IJR 1968:3(8):17)
punformo pro ŝtelo (IJR 1979:2:13)
puni ŝteliston je malliberiĝo (PIV 887)
punito (IJR 1979:2:4)
punkampo (L) (IJR 1978:1:20)
punkolonio (L) (IJR 1982:1:16)
punlaboro (IJR 1984:2:35)
punpersekutado (IJR 1983:1:35)
punpolitiko (IJR 1979:2:2)
punproceso (IJR 1978:2:32), pun-proceso (IJR 1977:2:21)
punsankcio (IJR 1979:2:3)
punspecialisto (IJR 1979:2:5), punologo (IJR 1979:2:5)
reensociigo de punitoj post la punfino (IJR 1968: 1(6):11)
respondeci pune pri ..., (Konst. Bul. 8)
se ŝi tion farus, ŝi estus punata pro bigamio (Monato 1986:3:11)
specialaj laŭ-aferaj aŭ laŭ-personaj pun-ekskludaj cirkonstancoj (IJR 1981:2:25)
spionado estas punata per la tuta severeco de la leĝo, kiel la plej peza krimo (Konstitucio 1937, p. 22)
starigi la koncernajn punojn (IJR 1968:3(8):16)
surmeti punon; surmeto de puno (IJR 1982:2:10)
tiaj kondiĉoj estas, ekzemple, ŝtataneco kaj nepuniteco (L) (IJR 1967:4/5(5):3)
tiu krimo estas punata per la tuta severeco de la leĝo (Konst. Bul. 20)
vi punis lin per ekzilo (PIV 228)

**punologi/** (Ne en PIV)
punologio (IJR 1984:2:34, dif.)

# R

**rab/** (PIV 892)
rabi (r) (tr): 1) per forto aŭ per minaco forpreni al si ies posedaĵon (PIV 892)
rabaĵo: io akirita per rabo (PIV 892)
rabo: ago de tiu, kiu rabas (PIV 892)

**raben/** (PIV 892)
rabeno (r): 1) honortitolo de hebreaj, poste de judaj leĝistoj, 2) kultestro de juda komunumo (PIV 892)

**rajt/** (PIV 898)
rajto (r): povo, pravigita de la leĝoj, statutoj aŭ moroj, plenumi agon, disponi kaj uzi aĵon aŭ postuli ion de aliuloj (PIV 898)
aŭtorrajto: ekskluziva rajto, donita de la leĝo, por difinita nombro da jaroj, al aŭtoro, desegnisto, ktp, presi, publikigi kaj vendi reproduktojn de sia originala verko (PIV 898)
balotrajto: rajto partopreni en ia baloto (PIV 898)
egalrajta: havanta rajton egalan al rajto de aliulo (PIV 898)
egalrajteco: stato, en kiu ĉiu havas la samajn rajtojn, kiel la aliaj (PIV 898)
kopirajto: aŭtorrajto (PIV 898)
nerajta: kontraŭa al la rajto (PIV 898)
pasrajto: rajto de veturilo, alvenanta en vojkruciĝon, pasi antaŭ tiuj, kiuj venas de alia difinita direkto aŭ de alia vojspeco (PIV 898)
plenrajta: guanta plenajn rajtojn (PIV 898)
rajta: konforma al rajto (PIV 898)
rajtigilo: dokumento, kiu atestas pri rajtigo (PIV 898)
respondrajto: rajto de civitano respondi en iu gazeto aŭ radiodissenco al atako tie farita kontraŭ li persone kaj nome (PIV 898)
senrajta: 1) havanta neniun rajton, 2) bazita sur nenia rajto (PIV 898)
senrajtigi: senigi iun je difinita rajto (PIV 898)
absoluta rajto (L) (IJR 1978:2:13, dif.)
agoj kontraŭ la havaĵaj rajtoj (IJR 1983:2:21)
akiri rajton kontraŭ la majstro pri kompenso (IJR 1976:2:9)
aroganta malrespekto de la homaj rajtoj (Scienca Mondo 1982:4:25)
aŭtora rajto (IJR 1967:2(3):3)
aŭtorrajta juro aŭ, mallonge, aŭtora juro (L) (IJR 1967:2(3):4, dif. p. 5)
bankiera rajtigito (PIV 898)
ĉiu aĝulo havas la rajton je korpa imuneco (IJR 1981:1:16)
egalrajtaj civitanoj (PIV 898)
ekzerciĝi kiel advokata rajtigito (IJR 1977:2:39)
ekzerciĝi kiel juĝista rajtigito (IJR 1977:2:39)
en la Francujo de la 19a jc balotrajton ne havis la oficiroj, la virinoj kaj la frenezuloj (PIV 898)
fundamentaj rajtoj kaj devoj (Bulgario 37)
ĝui la rajton de azilio (Konst. Bul. 19)
ĝui plenajn membrorajtojn (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:2)
havi rajton je korpa imuneco (IJR 1981:1:16)
havi rajton je libereco de pacema kunvenado (L) (IJR 1977:1:28), rajto de kunvenado (L) (IJR 1977:1:28)
havi rajton je pensio surbaze de la pagitaj premiumoj (Nederlando 1980, p. 31)
havi rajton por laboro (Konstitucio 1937, p. 19)

havi regresrajton kontraŭ la damaĝinto (IJR 1976:2:38)
havi senliman rajton elekti la personojn, kiuj ... (IJR 1975:1:8)
heredorajto (IJR 1977:1:34), rajto al heredo (Monato 1985:5:19), rajto pri heredo (IJR 1967:1(2):2)
homaj rajtoj (IJR 1983:1:32)
inkluzive la rajton krei siajn proprajn leĝojn (Fina Akto 13)
iu ajn rekta aŭ malrekta rajtlimigo ... (Konstitucio 1937, p. 20)
kontrakto, kiun subskribas la partioj aŭ aliaj rajtigitoj (IJR 1977:1:31)
kontrolrajtoj super la uniaj respublokoj (L) (IJR 1980:1:14)
kopi-rajto (Monato 1988:2:3)
la civitanaj rajtoj estas la rajtoj je propraĵo, egaleco antaŭ la leĝo, partopreno en la leĝdona funkcio, principa alireblo al ĉiuj publikaj oficoj (Aktualaj 76)
la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj (PIV 898)
la Eŭropa Konvencio donis la rajton de peticio-plendo ankaŭ al unuopuloj (L) (IJR 1981:2:9)
la firmo sendu al mi rajtigon eldoni la broŝureton, kie mi volos (Z) (PIV 898)
la Ĝenerala Asemblo estas rajtigita studadi la demandojn pri senarmigo (Aktualaj 112)
la Ministro pri Ekstero aŭ tiu, al kiu li donas plenrajton, subskribas ĉiujn traktadajn plenrajtigilojn (IJR 1981:1:36)
la partioj aŭ iliaj rajtigitoj (IJR 1977:1:31)
la plimulto de tiaj proprietuloj donis hipotekrajton por sekurigi la kreditoron (IJR 1977:1:31)
la principo de egalrajteco de seksoj (IJR 1966:1:8)
la rajtantoj bonvolu enskribiĝi ĉe la notario (PIV 898)
la rajto de la nacioj pri memdetermino (Scienca Mondo 1982:4:25)
la virinoj celis al la egalrajteco (PIV 898)
laŭofica plenrajto (IJR 1981:1:36)
leĝo pri aŭtorrajto (L) (IJR 1967:2(3):10)
li akiras absolutan rajton je preno de brita ŝtataneco (IJR 1967:2(3):19)
li havas la rajton por tio (Z) (PIV 898)
mi havas rajtojn sur la danan tronon (Z) (PIV 898)
mi rajtigas vin voĉdoni en mia nomo (PIV 898)
mi sendas al vi rajtigan leteron, por ke vi povu trakti en mia nomo (Z) (PIV 898)
misuzo de rajtoj (L) (IJR 1978:2:13, dif.)
nerajta decido de la estraro (PIV 898)
patro havas la rajton puni siajn infanojn (PIV 898)
personoj senigitaj per verdikto de politikaj rajtoj (Konst. Bul. 3)
plenrajta dokumento (IJR 1981:2:33)
plenrajtigito delegito, diplomato, al kiu oni donis la rajton decidi kaj trakti, sen konsulti lia(j)n komisiint(j)n (PIV 898)
posteno, por kiu lia deveno donis al li la rajton (Z) (PIV 898)
prezenti al la komitato rajtigan leteron (Z) (PIV 865)
prezenti la plenrajtigilon (IJR 1981:1:36)
pro laŭrajta defendo de si mem aŭ de aliaj (IJR 1976:2:33)
protekto de aŭtoraj rajtoj (L) (IJR 1967:2(3):3)
rajta postulo (PIV 898)
rajto al egala kompenso por egala laboro (L) (IJR 1968:3(8):3)
rajto de kunveno kaj organiziĝo (IJR 1968:3(8):12)
rajto de la nacioj pri memdetermino (Scienca Mondo 1982:4:25)
rajto de peticio-plendo (L) (IJR 1981:2:9)
rajto de popolo pri memdispono (PIV 898)
rajto de sindefendo (PIV 898)
rajto formi organizaĵojn, fari kunvenojn (Bulgario 31)
rajto je integreco de la intelekta produkto (L) (IJR 1967:2(3):9)
rajto je jura egalrajteco (Fina Akto 8)
rajto je kompenso en okazo de misuzo de justico (L) (IJR 1985:1:39)
rajto je komunikado (Esperanto 1984:2:22)
rajto je memdefendo (Scienca Mondo 1983:3:18)
rajto je mem-determino (Esperanto 1978:2:22)
rajto je periodaj forpermesoj (UN 27)
rajto je petskribo (Aktualaj 75)
rajto je sama salajro por sama laborplenumo (IJR 1975:2:47)
rajto je sanprotekto (IJR 1975:2:41)
rajto pri laboro (IJR 1975:2:2)
rajto pri pensio kaj sociala asekuro en okazo de malsano, akcidento, invalideco kaj maljuna aĝo (Bulgario 42)
rajto pri unuiĝo (Bulgario 43)
rajto sin organizi kaj membri en societoj (Bulgario 34)
rajtoj de aŭtoreco (Z) (PIV 898)
raporti antaŭ siaj rajtigantoj (PIV 898)
rekoni la rajton je individua plendo al la Komisiono kaj Kortumo (L) (IJR 1982:1:27)
rekono de apartaj rajtoj al virinoj havantaj malgrandajn infanojn (Aktualaj 78)
Sed kiurajte oni faras tion? (Monato 1986:4:13),

Kiarajte ili disipas niajn naturajn trezorojn? (Monato 1986:4:13)
senigi ties (malgrandlingvaj kulturoj) anojn de la rajto je propra kulturo (Esperanto 1981:9:149)
senigo je civilaj rajtoj (IJR 1984:2:35)
senrajta plendo (PIV 898)
senrajtigi deputiton (pro miselektiĝo, krimo ktp.) (PIV 898)
starigi limojn je la rajto strikti (IJR 1975:2:6)
subskriba plenrajtigilo (IJR 1981:1:36)
subteno de bazaj rajtoj (Fina Akto 6)
subtenrajtulo (IJR 1979:1:19)
testamenta dispon-rajto (IJR 1975:1:20)
tiun akirkapablon havas ĉiu homo kaj jura persono, se ĝi havas rajtkapablon (IJR 1967:1(2):3)
traktada plenrajtigilo (IJR 1981:1:35), traktadrajtigilo (IJR 1981:1:33)
vi rajtas ricevi kompenson pro la damaĝo (PIV 898)

**ratif/**. Vidu ankaŭ: ratifik/
formala aneksagon, antaŭe aprobita aŭ poste ratifita de la registaro (IJR 1968:1(6):7)
la Konvencio ekvalidis la 12-an de januaro 1951, 90 tagojn post la depono de la 20-a instrumento pri ratifo [ratifiko] (L) (IJR 1969:2(10):4)
la konvencio ricevis sufiĉe da ratifoj por ekvalidiĝi (Scienca Revuo 1974:5/6:236)
la ratifiloj devas esti deponitaj ĉe la Registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko (UN 23)
la UN-konvencio pri la rajtoj de rifuĝintoj el la jari 1951 momente estas ratifita de 105 ŝtatoj (Monato 1989:5:7)
post la depono de la 20-a instrumento pri ratifo (L) (IJR 1969:2(10):4)
ratifo kaj subskribo (UN 23)
subskribado, ratifikado kaj aliĝado (L) (IJR 1969: 2(10):5)

**ratifik/** (PIV 904). Vidu ankaŭ: ratif/
ratifiki (r) (tr): konfirmi internacian traktaton aŭ konvencion, kontraktitan, en la nomo de la ŝtato, de ŝtataj rajtigitoj (PIV 904)
interŝanĝo de ratifikaj dokumentoj (IJR 1981:2:32)
konsento de la Parlamento pri ratifiko (IJR 1981:2:34)
la ratifiko estis atingita nur je malgranda plimulto (PIV 904)
la Versajla traktato neniam estis ratifikita de la usona parlamento (PIV 904)
parafado de ratifikaj dokumentoj (IJR 1982:1:37)
preni apartan ratifikrezervon (IJR 1981:1:40)
preni rezervon pri ratifiko (IJR 1981:1:40)
ratifika protokolo (IJR 1981:2:32)
ratifika tago (IJR 1981:2:31)
ratifiki la Konvencion (L) (IJR 1981:2:7)
ratifiko de nerekonitaj ŝtatoj (IJR 1982:1:37)
ratifiko de traktatoj (IJR 1981:2:31)
ratifikrezervo (IJR 1981:1:40)

**real/** (PIV 905)
reala (r): 3) koncernanta aĵon (kontraste kun: persona) (PIV 905)
realigi: fari ion reala (PIV 905)
antaŭ ol ili komencas la realigon de siaj projektoj, ili ... (Z) (PIV 905)
hipoteko donas realan rajton super konstruaĵo, bieno ks. (PIV 905)
kiom da kandidatoj realigis sian programon, kiam ili estis elektitaj ? (PIV 905)
la decidoj de la sociaj tribunaloj povas esti realigitaj per rimedoj de la ŝtata potenco (IJR 1969:2(10):12)
per objektivaj analizoj kaj realecaj pritraktoj de la perspektivoj (L) (IJR 1976:1:1)
raportoj rilate la entreprenitajn paŝojn por realigi la rajtojn rekonitajn en la Pakto (L) (IJR 1968:3(8):5)
realecaj pritraktoj de la perspektivoj (L) (IJR 1976:1:1)
se necese, la decidoj de la sociaj tribunaloj povas esti realigitaj per rimedoj de la ŝtata potenco (IJR 1969:2(10):12)

**recidiv/** (PIV 906)
recidivo (r): 2) refalo en la saman delikton aŭ krimon post plenumo de la aljuĝita puno (PIV 906)
recidivulo: tiu, kiu prezentas recidivon (PIV 906)
recidiva hommortigo (IJR 1986:1:3)
recidivisto (refoje kulpulo, kiu jam estis kondamnita) (IJR 1967:2(3):24), recidivulo (IJR 1969:2(10):13), rekulpiĝintoj (IJR 1983:2:22)

**refer/** (PIV 907)
referi (r) (ntr): fari, antaŭ kunveno de scienculoj, komunikaĵon, raporton aŭ priskribon pri scienca problemo, malkovro, esploro ks. (PIV 907)
komunreferaĵo (IJR 1981:1:26)

**referenc/** (PIV 907)
referenco (r): 2) atesto, donita de pli-malpli aŭtoritata persono, por rekomendi kandidaton al posteno, servado ks. (PIV 907)
mi referencas al la antaŭe dirita (IJR 1983:1:36)

**referend/**, vidu: referendum/

**referendari/** (PIV 907)
referendario (r): administracia ŝtatoficisto, havanta rangon kaj funkciojn tre diversajn laŭ la landoj (PIV 907)

**referendum/** (PIV 907)
referendumo (r): rekta voĉdonado de la civitanoj,

kiujn la registaro petas aŭ ratifiki decidon jam voĉdonitan de la parlamento, aŭ decidi mem per jes aŭ ne pri la al ili proponita demando (PIV 907)
esti submetita al popola referendumo (IJR 1981:2:16)
foriga referendumo (Monato 1988:5:8)
la leĝo devas esti submetita al referendumo (IJR 1980:1:24)
la leĝo estis submetita al popola referendumo (IJR 1981:2:16)
per popola referendo (Konst. Bul. 3)
post du sed antaŭ ses monatoj poste la leĝo devas esti submetita al referendumo (IJR 1980:1:24)
propona referendumo (Monato 1988:5:8)
referendumo (tutpopola voĉdonado) (Konstitucio 1937, p. 9)

**refut/** (PIV 908)
refuti (r) (tr): venke rebati per trafaj argumentoj (PIV 908)
refuto: ago kaj vortoj de tiu, kiu refutas (PIV 908)
nerefutebla: tia, kia ne povas esti refutita (PIV 908)
la koncepto de la usona administraro, ke la kontraktoj estas senutilaj pro neperfekteco de la kontrolrimedoj, estas refutata per la argumentoj, prezentitaj en la monografio (Scienco Mondo 1989:1:30)
la nerefuteblaj leĝoj de la logiko (Z) (PIV 908)
montri per faktoj nerefuteblaj (Z) (PIV 908)

**reg/** (PIV 908)
regado: ago de iu aŭ io reganta (PIV 909)
ĉiu popolo havas la rajton elekti la formon de regado, en kiu ĝi deziras vivi (L) (IJR 1985:2:2)
faligi la registaron (Monato 1989:5:12)
fondita de la Romanoj en la tempo de ilia regado en la Rejnaj regionoj (Z) (PIV 909)
formo de regado (Aktualaj 21)
ĝia superrega principo estas, ke ... (IJR 1977:2:5)
havi la superregadon de la maroj (PIV 909)
kiam la regpotenco transiris en la manojn de la laborista klaso (IJR 1975:2:1)
la posta traktato regas iliajn reciprokajn rajtojn kaj devojn (IJR 1969:2(10):26)
la regado apartenas al la plenumkomitato (PIV 909)
ne-registaraj organizaĵoj (Esperanto 1979:5:87)

**regent/** (PIV 909)
regento (r): provizora regnestro, kiu regas dum neplenaĝo aŭ foresto de la reĝo (PIV 909)

**regi/** (PIV 909)
regio (r): ŝtata administrado de bieno, industria entrepreno, monopolo ktp kun respondeco al supera aŭtoritato (PIV 909)

**registr/** (PIV 910)
registrigi: fari, ke iu, io estu registrita (PIV 910)
katastro, terenregistro (IJR 1977:1:37)
neniu partio de traktato povas alvoki tiun traktaton antaŭ kiu ajn organo de UN, se la traktato ne estas registrita (L) (IJR 1977:1:22)
programi la juran informon kaj registri ĝin sur magnetajn bendojn (L) (IJR 1983:2:5)
registrigi sin sur la liston de la elektontoj (PIV 910)
registrita geedziĝo (IJR 1978:2:15), neregistrita geedzeco (IJR 1979:1:11)

**reglament/** (PIV 910)
reglamenti (r) (tr): submeti al regularo (PIV 910)
reglamento: regularo, precipe administra aŭ ŝtata (PIV 910)
la Kodo reglamentas unuece la tutan materialon de la kriminala juro (IJR 1982:2:10)
la Reglamento de Ĝenevo (IJR 1985:2:8)
reguloj, kiuj reglamentas la heredon de havaĵo de la mortinto (IJR 1967:1(2):2)

**regn/** (PIV 910)
regno (r): 1) ĝenerala nomo de ĉiu el la suverenaj politikaj unuoj en la internacia vivo. Rim.: ne estas jura diferenco inter regno kaj ŝtato, krom ke regno estas pli pompa nomo, kutime uzata por pli potencaj ŝtatoj, 2) (arkaike) ŝtato, 3) ... (PIV 910)
regnano: ŝtatano (PIV 910)
regnestro: estro de regno (reĝo, imperiestro ks) (PIV 910)
la atompovaj regnoj (PIV 910)

**regres/** (PIV 911)
regresi (r) (ntr): 1) iri en direkto kontraŭa al la celo, sed ne turnante al ĝi la dorson (PIV 911)
havi regresrajton kontraŭ la damaĝinto (IJR 1976:2:38), la ŝtato havas regresan rajton kontraŭ la labordonanto (IJR 1976:2:19)

**regul/** (PIV 911)
regulo (r): 1) tio, kio estas difinita por gvidi la agadon, konduton, studon, verkadon ks.; tio, kio diras, kion oni faru en difinita okazo (PIV 911)
laŭregula: obeanta la regulojn (PIV 911)
malregula, neregula: 1) ne konforma al regulo(j) (PIV 911)
regularo: tuto de la reguloj de organizaĵo aŭ societo (PIV 911)
reguleco: 1) konformeco al la regulo(j) (PIV 911)
reguligi: 1) konformigi al ia regulo, 2) submeti al

regulo aŭ regularo, 3) ... (PIV 911)
diference de Arkto, la reĝimo de Antarkto ankoraŭ ne estas reguligita (L) (IJR 1968:1(6):7)
fikso de la agadreguloj de la parlamento (IJR 1969:2(10):19)
hodiaŭ tiu tuta sfero estas reguligita unuavice per internaj leĝoj (IJR 1967:2(3):6)
la ĉefregulo de la leĝo estas, ke ... (IJR 1967:4/5(5):14)
la funkciado estas kondiĉita de la reguloj de Artikoloj 11 kaj 12 (UN 10)
la Komitato ellaboras por si detalan regularon (Z) (PIV 911)
la nun valida leĝa reguligo (IJR 1981:2:12)
la reguloj pri respondeco pro la damaĝo estas bazita sur kutimjuro (IJR 1976:2:24)
la speciala regulo superas la ĝeneralan (Aktualaj 33)
ne ekzistas regulo sen escepto (Z) (PIV 911)
neregula voĉdono (PIV 911)
oni ne povas kontesti la regulecon de tia proceduro (PIV 911)
reguligi eksvalidiĝintan pasporton (PIV 911)
se la propono estas farita en maniero laŭorda kaj laŭregula (Z) (PIV 911)

**reĝ/** (PIV 911)

reĝo (r): 1) dumviva, ordinare hereda regnestro, kies insignoj estas krono kaj sceptro kaj kies titolo estas malpli altranga, ol tiu de imperiestro (PIV 91)
eksreĝiĝi: abdiki (PIV 911)
reĝado: stato kaj regado de reĝo (PIV 911)
reĝeco: eco, titolo kaj rango de reĝo (PIV 911)
reĝejo, reĝlando: lando regata de reĝo (PIV 911)
reĝinedzo: edzo de reĝanta virino, ne partoprenanta en ŝia reĝado (PIV 911)
reĝino: 1) virino, kiu regas, 2) virino, kun kiu reĝo edziĝis en oficiala maniero (PIV 911)
vicreĝo: registo, havanta la reĝan povon en granda kolonio, provinco ks (PIV 911)
la Reĝlando Nederlando (Nederlando 1980, p. 6)
la vicreĝo de Hindujo (PIV 911)
privilegioj rezervitaj al la reĝeco (PIV 911)
sub la reĝado de ... (PIV 911)

**rehabilit/** (PIV, suplemento, 1987, p. 36)

rehabiliti (r) (tr): redoni al iu maljuste kondamnita liajn rajtojn aŭ honoron (PIV, suplemento, 1987, p. 36)
rehabiliti (IJR 1987:2:3-8)

**reklam/** (PIV 912)

reklamo (r): alvoko al la publiko per ĉiuspecaj rimedoj por laŭdi kaj rekomendi komercaĵon, entreprenon aŭ ian aferon (PIV 912)
reklamaĵo, reklamilo: ĉiu el la konkretajn rimedoj por reklami (PIV 912)
reklami (tr): anonci, rekomendi per reklamo (PIV 912)
dissendi al ĉiuj klientoj reklamilon por rabata vendado (PIV 912)

**reklamaci/** (PIV 913)

reklamacii (r) (ntr): turni sin al oficisto ktp, postulante, ke la ŝuldata servo estu plenumita; plende depostuli ion, kion oni rajtas ricevi (PIV 913)
reklamacio: ago kaj vortoj de tiu, kiu reklamacias (PIV 913)

**rekompenc/** (PIV 913)

rekompenci (r): 3) (arkaike) kompensi (PIV 913)
la devo de la civitano rekompenci [kompensi] la damaĝon, ĉu nature, ĉu per mono (IJR 1969:2(10):11)

**rekon/**, vidu sub kon/

**rekvizici/** (PIV 914)

rekvizicii (r) (tr): postuli per rekvizicio (PIV 914)
rekvizicio: ordono de iu publika aŭtoritato, ke oni disponigu al ĝi personojn aŭ aĵojn por ia publika servo (PIV 914)
lia aŭtomobilo estis rekviziciita de la armeo (PIV 914)

**relegaci/** (PIV 915). Vidu ankaŭ: rileg/

relegacio (r): puno, konsistanta en ekzilo en unu difinitan lokon (PIV 915)
ili estis kondamnitaj al severaj punoj de malliberigo ĝis 7 jaroj kaj aldona relegacio de 2–5 jaroj (L) (IJR 1982:1:10)
la akuzitoj estis kondamitaj al severaj punoj de malliberigo ĝis 7 jaroj kun aldona relegacio de 2–5 jaroj (L) (IJR 1982:1:10)
relegacio (malpermeso rezidi en difinita loko) (L) (IJR 1980:1:40)

**religi/** (PIV 915)

religia persekutado al la herezuloj (PIV 816)
religipraktikado (IJR 1978:2:19)
ŝtatreligio (IJR 1978:2:19)

**rent/** (PIV 917)

rento (r): 1) perioda enspezo de proprietulo, kiun li ricevas de farmanto por la uzado de la grundo, domo kaj maŝinaro, 2) jara profito de investita kapitalo (PIV 917)
rentulo: tiu, kiu havas de rento (PIV 917)
rentumo: interezo (PIV 917)
ĉiujara rento (PIV 917)
la bankiero likvidis la aferojn kaj vivas nun de la rento (PIV 917)
rento per naturaĵoj (PIV 917)

vivsubtena rento (IJR 1976:2:19)

**reparaci/** (PIV 918)

reparacio (r): 1) mona kompenso, aljuĝita de tribunalo al tiu, kiu suferis moleston, difekton, perdon, 2) liverado de monsumoj aŭ de industria materialo, trudita de venkinta ŝtato al la venkita, kompense por la damaĝoj suferitaj dum la milito (PIV 918)

**replik/** (PIV 918)

repliko (r): 1) respondo al tio, kion alia asertis aŭ postulis en diskutado (PIV 918)

repliki (tr): fari replikon (PIV 918)

unue la memorando de la plendanto, poste la kontraŭmemorando de la kontraŭulo, ankoraŭ pli poste la repliko de la unua kaj, fine, la dupliko de la dua (Aktualaj 63)

**reprezali/** (PIV 918)

reprezalio (r): ago, en si mem jure malpermesita, per kiu unu ŝtato respondas al kontraŭjura ago de alia ŝtato (PIV 918)

reprezalie forbruli vilaĝon (PIV 918)

**reprezent/** (PIV 918)

reprezenti (r) (tr): 1) laŭkomisie anstataŭi iun en la plenumado de ties taskoj aŭ rajtoj, 2) vojaĝi kaj komerci en la nomo de iu firmo (PIV 918)

reprezentado: 1) ago de tiu, kiu reprezentas, 2) maniero, kiel iu estas reprezentata (PIV 918)

reprezentigi: fari, ke iu reprezentu alian personon (PIV 918)

ambasadoro reprezentas sian regnon, kaj deputito siajn elektintojn (PIV 818)

komerca reprezentanto (PIV 918)

la nacia reprezentado en la internacia kortumo (PIV 918)

la leĝo reprezentigis sin per sia ĉefministro (PIV 918)

li reprezentas firmon Hachette (PIV 918)

preni sur sin la reprezentadon de heredantoj (PIV 918)

proporcia reprezentado (IJR 1978:1:41)

reprezenta reĝimo (PIV 918)

ricevi senpagan reprezentanton (L) (IJR 1967: 4/5(5):4)

se unu persono povas reprezenti multajn, tiam la voĉdonado fariĝos tro komplika (Z) (PIV 918)

sistemo de majoritata, de proporcia reprezentado (PIV 918)

**repudi/** (PIV 918)

repudii (r) (tr): forsendi (edzinon), nuligante la edzinecon per repudio (PIV 918)

repudio: jura rompo de geedzeco, atingebla per unuflanka decido de la edzo, sen interveno de jura instanco (PIV 918)

la repudio estis la sola formo de eksedziĝo ĉe la Hebreoj (PIV 918)

**reputaci/** (PIV 918)

reputacio (r): opinio de la publiko pri la valoro de persono aŭ firmo (PIV 918)

agoj kontraŭ la reputacio (IJR 1983:2:21)

ofendoj kontraŭ la persono kaj reputacio (IJR 1982:1:25)

sankcioj kiuj tuŝas la reputacion de jura persono (IJR 1984:2:19)

se lia konduto estas tia, kiu ofendas la reputacion de la juĝejo (IJR 1968:2(7):11)

**reskript/** (PIV 918)

reskripto (r): 1) skriba respondo de la Romia imperiestro al demandoj faritaj de guberniestroj ks pri jura malfacilaĵo, 2) skriba decido de la papo pri difinita afero (PIV 918)

**respond/** (PIV 919)

respondi (r) (ntr): antaŭdevigi sin porti la sekvojn de propra aŭ aliula ago (PIV 919)

prirespondi (ntr): respondi 4) (PIV 919)

responda: 3) portanta la sekvojn de sia aŭ aliula ago (PIV 919)

respondeca: responda 3) (PIV 919)

respondeco: 2) sindevontigo porti la rezultojn de ago aŭ faro (PIV 919)

respondumo: respondeco (PIV 919)

absoluta respondeco (L) (IJR 1978:2:13, dif.)

Art. 13 de la Fundamentaj Principoj kaj la respondaj artikoloj de la 15 sovetiaj KK-oj (L) (IJR 1982:1:11)

ĉefo devas konduki la armeon je sia propra respondeco (PIV 919)

ĉiuj nombritaj respondeculoj respondecas solidare (IJR 1976:2:31)

eksterkontrakta respondeco (IJR 1976:1:35)

ekzistas kriminala respondeco por ago (faro aŭ nefaro) (L) (IJR 1982:1:7)

esti kriminale respondeca (L) (IJR 1982:1:16)

esti respondeca pri sia subulo sen sia propra kulpo (IJR 1976:2:17)

fari respondan frapon eĉ post la plenskala unua frapo (Scienca Mondo 1983:3:18)

ili ne povis esti konsiderataj kiel kriminale respondecaj (L) (IJR 1969:2(10):2)

ili ne povas esti kriminale respondecaj (L) (IJR 1982:1:16)

juraj personoj devas juĝataj kriminale respondecaj (IJR 1984:2:15)

kriminala respondeco pro kontraŭjuraj agoj (L) (IJR 1969:2(10):2)

kriminaljura respondeco (IJR 1969:2(10):25)

la ĉefo respondas pri la subuloj (PIV 919)

la gazeto de respondas pri la enhavo de la reklamoj (PIV 919)
la geedzoj respondecas solidare (IJR 1966:1:13)
la kriminaljura respondeco komenciĝas per kompletiĝo de la 14-a jaro (L) (IJR 1982:1:16)
la krimulo respondecas kriminale (IJR 1982:2:4)
la reguloj pri respondeco pro la damaĝo estas bazitaj sur kutimjuro (IJR 1976:2:24)
la respondeculo pro damaĝo (IJR 1976:2:28)
liberigita de ĉia respondeco (Z) (PIV 632)
mensa malsano estas la alia bazo por ekskludo de respondeco (L) (IJR 1982:1:17)
mi estas priresponda prizorgantino de mia familio (Z) (PIV 919)
objektiva respondeco (IJR 1976:2:35), senkulpa (objektiva) respondeco (IJR 1976:2:25)
povas esti konsiderataj kiel kriminale respondecaj (Aktualaj 66)
preskribi kriminalan respondecon por malasidueco (L) (IJR 1980:2:6)
pro ĉiuj maljustaĵoj la registaro estas responda antaŭ Tut-Eŭropa Tribunalo (Z) (PIV 919)
respondeco pro nepermesata damaĝigo (IJR 1976: 1:35)
strikta respondeco (IJR 1982:1:26)
surbaze de specialaj cirkonstancoj la juĝisto rajtas malpliigi respondecon de la kaŭzinto (IJR 1976:2:28)

**respublik/** (PIV 919)
respubliko (r): 1) reĝimo, en kiu la suvereneco apartenas al la popolkunveno aŭ al senato, kaj en kiu la ekzekutiva povo ne estas hereda, 2) politika reĝimo, en kiu la regpovo apartenas, senpere aŭ ne, al la reprezentantoj de la popolo, 3) (ordinare majuskle) ŝtato kun tia reĝimo (PIV 919)
respublikano: ano de iu respubliko (PIV 919)
respublikestro: prezidento (PIV 919)
federacia respubliko (PIV 919)
la Franca Tria Respubliko (PIV 919)
la Roma Respubliko (PIV 919)
oni distingas aristokratiajn respublikojn, kiel en Venecio, kaj demokratiajn respublikojn, kiel en Ateno (PIV 919)
parlamenta respubliko (PIV 919)

**restitu/** (PIV 920)
restitui (r) (tr): 1) redoni al la antaŭa posedinto ion, kion oni nejuste prenis de li (PIV 920)
li estis kondamnita je la restituado de la uzurpita kampo (PIV 920)
restitui tropagon (PIV 920)

**restrikt/**, vidu: interpret/, strikt/

**retro/** (PIV 922)
retro: neoficiala prefikso, signifanta movon aŭ agon faratan kontraŭe al la normala direkto (PIV 922)
ĉiu alia jura regulo ... devas retromontri al la leĝo (IJR 1968:3(8):6)
doni al la leĝoj retroaktivan forton (IJR 1968: 1(6):4)
la ordono estis publikigita je 31.9.1982 kaj ekvalidiĝis retroage ekde 1.8 (Scienca Mondo 1985:4:17)
neretroaktiveco de la traktatoj (IJR 1969:2(10): 26)
retroaktiva leĝo (IJR 1982:2:3)
retroaktiva pago (PIV 922)
retroefiki (PIV 922)

**rezerv/** (PIV 923)
ĉiuj rajtoj (de reprodukto) rezervitaj (PIV 923)
en internacia juro "rezervo" signifas, ke ... (L) (IJR 1969:2(10):6, dif.)
fari rezervojn (IJR 1977:2:53)
formuli rezervon (IJR 1969:1(9):21)
krom se la traktato alimaniere preskribas, rezervo povas esti retirita iam ajn (IJR 1969:1(9):21)
mi ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco (Z) (PIV 923)
mi rezervas al mi la rajton ŝanĝi mian intencon (Z) (PIV 923)
preni apartan ratifikrezervon (IJR 1981:1:40)
preni rezervon pri ratifiko (IJR 1981:1:40)
ratifikrezervo (IJR 1981:1:40)
rezervado de rajto (PIV 923)
rezervi al si la rajton agi kiel ili juĝos konvene (Kontrakto 1917)
rezervi al si la rajton decidi pri ... (Esperanto 1972:10:166)
rezervitaj posedaĵoj (kiujn homo ne rajtas forpreni de siaj heredontoj) (PIV 923), rezervitaj heredaĵ-kvotoj (IJR 1975:1:20)
rezervo (L) (IJR 1969:2(10):6, dif.)
ŝtato rajtas formuli rezervon, krom se la rezervo estas malpermesita de la traktato (IJR 1969:1(9):21)
tempa rezervo, t.e. nur por difinita tempo (L) (IJR 1981:2:7)

**rezidu/** (PIV 924)
reziduo (r): 1) tio, kio restas el heredaĵo, post la pagado de la ŝuldoj, impostoj, testamentaĵoj (PIV 924)

**rezignaci/** (PIV 924)
rezignacio (r): stato de iu, kiu akceptas sen protesto tion, kio ne povas esti ŝanĝita, kaj kiu submetas sin sen plua plendo al la neeviteblaĵo (PIV 924)

suferi rezignacie maljustan kondamnon (PIV 924)

**rezoluci/** (PIV 925)

rezolucio (r): formala opiniesprimo de voĉdonrajta organismo aŭ de simpla publika kunveno (PIV 925)

proponi, voĉdoni, forĵeti rezolucion (PIV 925)

reĝa rezolucio (IJR 1978:1:2). Eble pli bone: reĝa dekreto, kp. IJR 1978:2:43

**rezolut/** (PIV 925)

rezoluta (r) (N): firma en siaj projektoj; senhezita en la plenumado de siaj decidoj (PIV 925)

esti rezoluta; plena de decidemo (L) (IJR 1979:2:36)

la ŝtato-partoprenantoj deklaras sin "rezolutaj" entrepreni agojn ... (L) (IJR 1977:1:22, kp. 1976:2:41, dif.)

montri rezolutan antifaŝismon (IJR 1980:1:34)

rezolute apliki agitplanon (PIV 925)

**rezult/** (PIV 925). Vidu ankaŭ: rezultat/

rezulti (r) (ntr): esti la logika, natura, fakta sekvo de (PIV 925)

doni vere kontentigajn rezultojn (Aktualaj 130)

devligoj, kiuj rezultas el normoj de internacia juro (Fina Akto 13)

el tiu principo rezultas, ke ... (PIV 925)

la rezult-konsiderado povas esti forprenita per la efektivecoprincipo (IJR 1985:1:17)

la rezultoj de ĉi tiu kunveno (Fina Akto 16)

la rezultoj de la konferenco (Fina Akto 3)

la totala karaktero de la mondmilito rezultigis, ke la postmilita dividiĝo de Eŭropo... (Eŭropa Dokumento 1976:11:5)

procesrezulto (IJR 1967:4/5(5):15)

rajtoj, kiuj rezultas el ĝia suvereneco (Fina Akto 11)

rezulte de tio li ... (IJR 1985:2:25)

tiu ĉi lasta estas rezulto de pluraj faktoroj (Aktualaj 12)

tiu juĝo rezultis el proceso iniciatita de ... kontraŭ (Esperanto 1974:1:11)

traktada rezulto (IJR 1981:1:37), traktadrezulto (IJR 1981:1:38)

**rezultat/** (PIV 925). Vidu ankaŭ: rezult/

rezultato (r): rezulto (PIV 925)

ni kunvenis, por priparoli tre gravan aferon, sed ni ne povis atingi ian rezultaton (Z) (PIV 925)

**ricel/** (PIV 926)

riceli (r) (tr): konscie helpi ŝteliston aŭ rabiston, ricevante la ŝtelitaĵojn por ĝin konservi, kaŝi aŭ memprofite vendi (PIV 926)

ricelisto (PIV 926)

**rifuĝ/** (PIV 928)

la du ĉambroj de l'parlamento akceptis novan politikon pri rifuĝintoj kaj azilserĉantoj (Monato 1988:5:11)

**rigard/** (PIV 928)

esti rigardata kiel ŝtatano (UN 24)

**rikvest/** (Ne en PIV)

en kazoj difinitaj en la leĝo la krimago estas punebla nur je privata rikvesto de la ofendito (IJR 1982:2:13)

la individua rikvesto ne estas retirebla (IJR 1982:2:

privata rikvesto de la ofendito (IJR 1982:2:13)

**rileg/** (PIV 931)

rilegi (r) = relegacii (PIV 931)

rilego (elpelo kun deviga loĝigo en alia loko) (L) (IJR 1980:1:40)

**rimark/** (PIV 931)

ĉu iu havas rimarkon? "Do, akceptita!" (Esperanto 1985:12:204)

tamen, estas necese rimarkigi (Aktualaj 19)

**rimes/** (PIV 932)

rimeso (r): speco de kambio, kiun ŝuldanto sendas al sia kreditoro, por tiel pagi la pli malfrue pagotan ŝuldon (PIV 932)

**risk/** (PIV 934)

ĉiuriska: (pp asekuro) kovranto ĉiujn eblajn riskojn (PIV 934)

risko: 2) ĉiu el la eventualaj damaĝoj, kontraŭ kiuj asekurkompanio garantias ĉe pagado de responda premiumo (PIV 934)

**ristorn/** (PIV 935)

ristorno (r): 1) valoraĵo (kredito, mono, ĉeko ks), kiun banko, asekurkompanio ks prenis aŭ ricevis provizore kiel garantiaĵon por kovri ian riskon, kaj kiun ĝi redonas tute aŭ parte al la kliento, kiam la risko malaperis, 2) tiu parto de la profitoj, kiu en kooperativo, en mutuala asekursocieto aŭ en iu analoga entrepreno estas repagita al la societanoj ĉe la fino de ĉiu aktivperiodo, 3) ĉia sumo repagita al kliento el ia ajn kaŭzo (eraro de kalkulo, rabato ktp) (PIV 935)

**rom/** (PIV 937)

romania: rilata al Romanio (PIV 937)

romaniano: ano aŭ loĝanto de Romanio (PIV 937)

romanigi: trudi la Romajn, vivmanierojn, civilizon, juron, lingvon (PIV 937)

romanio: ano aŭ loĝanto de Romanio (PIV 937)

Romanio: la Romana imperio, starigita de Aŭgusto en 27 a.K., poste dividita de Teodozio en Orientan kaj Okcidentan Romanion; la Okcidenta estis provizore restarigita de Karolo la Granda en 800 (PIV 937)

romanismo: civilizo kaj mondkoncepto de la Romanoj (PIV 937)
Rom-Germana: nomepiteto de la imperio, fondita en 962 kaj malaperinta en 1806, kiu entenis italajn kaj germanajn landojn, plejofte sub nominala aŭtoritato; ekde 1254, ĝi estis kvalifikita kiel "sankta" (PIV 937)
Romio: Romanio (PIV 937)
en romiaj kolonioj (Scienca Revuo 1975:4/5:126)
intelektaj rajtoj ne estis konataj al la romia juro (L) (IJR 1967:2(3):5)
la greka-romia genio (Eŭropa Dokumento 1978: 18:3)
la Roma Imperio (Scienca Revuo 1975:4/5:126), la Romana Imperio (= Romanio) (PIV 937), la iama Romia Imperio (Aktualaj 98)
la romania kodo, civilizo, arto (PIV 937)
pli malfrue la urbo estis okupita de la romianoj, kiuj nomis ĝin Trimontium (Bulgario 8)
rom-civilaj juraj principoj (IJR 1967:1(2):18)
romĝermana imperiestro (Esperanto 1978:2:37)
romia juro (IJR 1977:2:34), Romia juro (IJR 1968:1(6):13), romana juro (PIV 457)
Saul-Paŭlo estis romaniano (PIV 937)

**romi/**, vidu: rom/

**romp/** (PIV 938)
rompi (r) (tr): 4) fari, ke io ne plu havu efikon (PIV 939)
enrompi (tr): rompi, por enigi, penetri (PIV 938)
havi juĝan proceson pri rompo de sia vorto (Z) (PIV 938)
li estis kondamnita kiel enrompisto (PIV 938)
rompanto de la internacia jura ordo (Aktualaj 86)
rompi la leĝon (PIV 938)
rompi sian ĵuron de fideleco je la Konstitucio (IJR 1984:1:16)
rompi sian promeson (Z), sian vorton, kontrakton, negocon (PIV 938)
rompi strikon kaj interrompi strikon (PIV 938)
rompo de la leĝo (Z) (PIV 624)
rompo de la paco (UN 4)
strikrompanto: laboristo, kiu laboras malgraŭ la striko (PIV 1038)

# S

**sankci/** (PIV 957)
sankcio (r): 1) oficiala konfirmo fare de supera aŭtoritato, 2) puno aŭ rekompenco sekvanta ian moralan aŭ socian agon (PIV 957)
sankcii (tr): doni sankcion al io (PIV 957)
decidi pri la mezuro de la sankcio (IJR 1968:2(7):5)
decidoj de la Komitato sankciitaj de la Kongreso (Z) (PIV 957)
difini jurajn sankciojn en konkretaj individuaj kazoj (L) (IJR 1983:2:4)
diversaj disciplinaj sankcioj (L) (IJR 1982:1:17)
en la venonta jaro aperos kun parlamenta sankcio la unua "leĝo pri la porlabora sendanĝerigo" (Monato 1989:6:10)
esti minacata per kriminalaj sankcioj (IJR 1968: 3(8):15)
individuigita sankcio (IJR 1979:2:5)
individuoj, kiuj estas submetitaj al punaj sankcioj (IJR 1984:2:35)
kriminaljura sankcio (L) (IJR 1982:1:4), kriminala sankcio (IJR 1976:1:14), puna sankcio (IJR 1983:1:35), punsankcio (IJR 1983:1:35)
la nova kriminala kodo limigas la kampon, en kiu estas plikata la perforto pere de punsankcioj (IJR 1968:3(8):17)
ricevi definitivan sankcion (PIV 957)
sankcio de interkonsento (IJR 1977:2:53)
tia moralo havas nek devigon nek sankcion (PIV 957)

**satrap/** (PIV 961)
satrapo (r): 1) en la antikva Persujo, guberniestro kun tre granda sendependeco (PIV 961)
satrapio: provinco, regata de satrapo (PIV 961)

**secesi/** (PIV 965)
secesio (r): (pp grupo, societo, ŝtato) apartiĝo disde socia korpo, al kiu oni apartenis, ekz. eklezio, federacio, ŝtatunuiĝo, por fariĝi sendependa (PIV 965)
fari secesion (PIV 965)
la Milito de Secesio (en Usono, kaŭzita de la secesio de dekunu ŝtatoj pro la abolicio de la sklaveco, 1861–65) (PIV 965)

**sekci/** (PIV 967)
sekcio (r): 2) dividaĵo aŭ subdividaĵo de io materia, verko, ktp. (PIV 967)
la kodo dividiĝas en kvin ĉefaj sekcioj (PIV 967)
pri tio pli detale en la sekvantaj sekcioj (L) (IJR 1982:1:6)

**sekretari/** (PIV 968)
ĉiu kabineto povas enoficigi ŝtatsekretarion (Nederlando 1980, p. 7)
Ĝenerala Sekretario de UN (L) (IJR 1976:1:13)
konstanta Sekretario (Kontrakto 7)

**seks/** (PIV 968). Vidu ankaŭ: perfort/
seksatenco: leĝe punata provo sekse kuniĝi kun virino aŭ virgulino perforte kaj kontraŭ ŝia volo (PIV 968)

la principo de egalrajteco de seksoj (IJR 1966:1:8)
ofendoj kontraŭ seksa morala (IJR 1982:1:25)
seksa perforto (L) (IJR 1982:1:16), seksperforto (IJR 1982:1:20)

**sekur/** (PIV 969)
la kvin konstantaj membroj de la UN-sekurkomitato (Scienca Mondo 1986:1:12)

**sekv/** (PIV 969)
sekvi (r): 5) rezulti el, esti motivita aŭ kaŭzita de (PIV 969)
el la dirita regulo sekvas, ke ni povas ĉiam uzi... (Z) (PIV 969)
el tiel konfuzaj debatoj sekvis nenia decido (PIV 969)
la postsekvoj de maldungo de personaro (Scienca Mondo 1984:2:17)
li sekvigis la suspektindulon per policisto (PIV 969)
neantaŭviditaj sekvoj (Scienca Mondo 1984:2:14)

**sekvestr/** (PIV 970)
sekvestri (r) (tr): depone konfidi disputatan propraĵon al krompersono, kiu devas gardi ĝis definitiva juĝa decido (PIV 970)
sekvestro: io, kion oni rekvestris (PIV 970)

**senc/** (PIV 973). Vidu ankaŭ: signif/
krimo en pli vasta senco (IJR 1981:2:24)
leĝo en formala senco (IJR 1984:2:29)
leĝo en materia senco (IJR 1984:2:29)

**senjor/** (PIV 974)
senjoro (r): 1) en Francujo, nobelo, kiu havis bientenantajn vasalojn, 2) en Italujo, ĉ. la 14 jc, magistratano, kiu prenis sur sin la plenuman povon en la civito (PIV 974)
senjoreco: funkcio kaj rango de senjoro (PIV 974)
la senjoreco entenis la bienon, la feŭdon kaj la jurisdikcion (PIV 974)

**separ/** (PIV 976)
separi (r) (tr): decidi separon inter edzoj (PIV 976)
separo: laŭleĝa, tempa aŭ dumviva, disigo de geedzoj, sen nuligo de la edzeco (PIV 976)

**serĉ/** (PIV 977)
priserĉi (tr): esplori lokon, por malkovri ion, kio povas tie troviĝi, aŭ kies ĉeesto tie estas suspektata (PIV 977)
traserĉi (tr): 1) priserĉi, 2) laŭ juĝa ordono, priserĉi ies loĝejon, oficejon ktp, por tie trovi kaj garantie transdoni al la juĝisto dokumentojn utilajn al la difino de la vero (PIV 977)
fari traŝercon laŭ traserĉa letero, mandato (PIV 977)
la doganistoj priserĉis ŝiajn vestojn kaj kofrojn (PIV 977)
traserĉado de la domo (IJR 1967:3(4):24)
traserĉi la loĝejon de politika krimulo (PIV 977)

**serv/** (PIV 980)
servodaŭro: jarkiomo de ies servado, laŭ kiu oni kalkulas emeritan pension (PIV 980)
la kompenso dependas de la longeco de la servotempo (IJR 1976:1:25)

**servitud/** (PIV 981)
servitudo (r): devo, kiu trafas bienon profite al alia bieno aŭ al la publiko (PIV 981)
reciprokaj servitudoj (IJR 1977:1:31)
servitudo pri vido, de trapaso, de akvofluigo (PIV 981)

**servut/** (PIV 981)
servuto (r): laboro, kiun kamparano ŝuldas senpage al la mastrosinjoro aŭ al la ŝtato (PIV 981)
servuta: rilata al servuto (PIV 981)
servuteco: duonsklaveca stato de kamparano, nehavanta la rajton transmigri sen la konsento de la senjoro el la bieno, kies ĉiama hereda farmanto li estas kaj devanta plie senpage kulturi la senjoran bienon (PIV 981)
servuti (ntr): fari servuton (PIV 981)
servutulo: homo, submetita al servuto (PIV 981)
ekskludo de sklaveco kaj servuteco (L) (IJR 1981:2:3)
kiam la servuteco jam komencis cedi al kapitalismo (Esperanto 1984:11:191)
servuta bieno (PIV 981)

**sesi/** (PIV 981)
sesio (r): kunsida periodo de parlamento, asembleo aŭ juĝa instanco (PIV 981)
je la unua speciala sesio pri malarmado (Scienca Mondo 1983:3:26)
ordinara, eksterordinara sesio (PIV 981)

**sid/** (PIV 984)
kunsido: komuna diskutado kaj konsiliĝado de membroj de societo, juĝantaro ks. (PIV 984)
sidejo: loko, kie iu aŭ io sidas (PIV 984)
la asocia sidejo (Esperanto 1985:1:1)
la jura sidejo estos en Uppsala (Esperanto 1986:5:83)
la sidejo de UEA estas en Rotterdam (PIV 984)
la societo havas sian sidejon en Paderborn (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:1)

**sigel/** (PIV 985)
sigelo (r): 1) distinga signo, stampita sur moligita substanco, por garantii la aŭtentikecon de dokumento, 4) signo, stampita sur moligita substanco, kaj almetita al koverto, skatolo, pordo ks, por certigi la sekreton, malhelpi la malfermon sen la scio de la posedanto ktp (PIV 985)

justicaj sigeloj (PIV 985)
la asiriaj kaj babilonaj sigeliloj estis cilindretoj kave gravuritaj (PIV 985)
sigeli kontrakton (PIV 985)

**sign/** (PIV 986)
kontraŭsignas la federacia kanceliero (IJR 1980: 2:18)

**signatur/** (PIV 987)
signaturo (r): 1) skribo de nomo aŭ distinga signo sube de dokumento, por stesti, ke la entenantaj asertoj aŭ sendevigoj estas veraj kaj fidindaj (PIV 987)
kontrasignaturo (IJR 1982:1:37)

**signif/** (PIV 987). Vidu ankaŭ: senc/
esti rigardata kiel soleca prizorganto en impostjura signifo (IJR 1979:1:21)
jura signifo (L) (IJR 1979:1:7)
la nova Konstitucio estis grandsignifa al la jura evoluo de la novtipa ŝtato (IJR 1968:1(6):2)

**silent/** (PIV 988)
prisilenti faktojn, kiuj estus malebligintaj la donon de la ŝtataneco (IJR 1968:2(7):9)

**sindik/** (PIV 993)
sindiko (r): 1) persono rajtigita zorgi pri la aferoj de korporacio, kies membroj ĝi estas, 2) persono, elektita de komerca tribunalo, por administri bankrotintan entreprenon ĝis fina aranĝo de la afero (PIV 993)

**sindikat/** (PIV 993)
sindikato (r): asocio de personoj aŭ societoj, por defendi kaj progresigi ekonomiajn komunajn interesojn (PIV 993)
laborsindikato: sindikato el laboristoj (PIV 993)
sindikatano: ano de unu sindikato (PIV 993)
sindikatismo: 1) socipolitika sistemo, laŭ kiu la laboristoj sindikate organizitaj kaj per revolucia striko akirintaj posedon de la produktiloj kaj sociaj riĉaĵoj, organizus kaj mastrumus socialisme la tutan socian vivon, 2) movado al la realigo de tia sistemo (PIV 993)
sindikatisto: partiano de sindikatismo (PIV 993)

**skaben/** (PIV 997)
skabeno (r): en malnova Francujo, en nuna Belgio kaj Nederlando, alta funkciulo, helpanta la urbestron (PIV 997)
en GDR la skabenoj estas tute samrangaj al la profesiaj juĝistoj kun jurista instruiteco (IJR 1976:1:31)
la skabenoj estas kiel profesiaj juĝistoj samrajtaj (IJR 1968:1(6):11)
la skabenoj kunagas kun la profesiaj juĝistoj ne nur ĉe la konsilado pri punjuĝo, sed ankaŭ ĉe aliaj juĝistaj decidoj (IJR 1969:1(9):12)

**sklav/** (PIV 1001)
sklavo (r): 1) homo, sen personaj aŭ civilaj rajtoj, apartenanta kiel objekto al alia homo, kiu lin aĉetis aŭ kaptis en milito (PIV 1001)
la popoloj estos sklavigitaj (Aktualaj 100)
lia sinjoro starigu lin apud la pordo kaj trapiku lian orelon per aleno, kaj li estu lia sklavo por ĉiam (PIV 1001)
liberigi iun el sklaveco (Z) (PIV 632)
malpermeso de sklaveco (Aktualaj 87)

**skol/** (PIV 1001)
aliaj teoriistoj dividiĝas je du ĉefaj skoloj (Aktualaj 29)
Pozitiva Skolo (IJR 1979:2:5)
Viena Jurteoria Skolo (IJR 1980:1:28)

**skrib/** (PIV 1003)
skribi (r) (tr): 6) formaligi, registri, skribante (PIV 1003)
skribisto: 1) homo, kies profesio estas skribi por la aliaj, 2) leĝisto (PIV 1003)
subskribi (tr): 2) subskribi sian nomon sub io por montri sian aŭtorecon aŭ sian aprobon (PIV 1003)
subskribo: nomo, skribita sube de dokumento, por pruvi la aŭtorecon aŭ aprobon (PIV 1003)
antaŭ la fino de la fiksita tempolino por subskribo (IJR 1981:1:39)
la konsento de Ŝtato esti ligita de traktato estas esprimita per la subskribo de ĝia reprezentanto (IJR 1969:1(9):20)
legitimi ies subskribon (PIV 624)
loko de subskribo (IJR 1981:1:27), loko por subskribo (IJR 1981:1:39)
skriba kontrakto (IJR 1977:1:31)
skribosciuloj kaj farizeoj (IJR 1978:1:39)
subskribi ĉekon, traton (PIV 1003)
ve al tiuj, kiuj skribas maljustajn verdiktojn (PIV 1003)

**skrutini/** (PIV 1005)
skrutinio (r): oficiala ekzameno de la voĉdonoj, por kontroli ties valideco kaj la ekzakteco de ties kalkulo kaj registrado (PIV 1005)
skrutinii (ntr): fari skrutinion (PIV 1005)
oni tuj elektis du skrutiniantojn por la elekto de la estraro (PIV 1005)

**soci/** (PIV 1007)
socio (r): 1) tuto da homoj, kunvivantaj pro komunaj interesoj kaj havantaj komunajn kutimojn kaj komunajn leĝojn (PIV 1007)
socia: 1) koncernanta la socion, 2) vivanta en socio, 3) = sociala (PIV 1007)
la alkutimigo de la malliberigitoj al la normala socia vivado (IJR 1985:1:25)

la "soçia kontrakto" de la 18a-jc-aj filozofoj (PIV 1007)

**social/** (PIV 1007)

sociala (r): koncernanta la komunajn ekonomikajn interesojn de la socio, kontraste kun la politikaj (PIV 1007)

kriminalogiaj kaj alispecaj socialaj-juraj statistikaj informoj (L) (IJR 1983:2:3)

sociala asekuro (asekuro, en kiu partoprenas la ŝtato, la mastroj kaj la dungitoj, celanta kovri la ekonomikajn kaj fizikajn riskojn) (PIV 1007)

socialaj reformoj (Z) (PIV 1007)

socialaj servoj (IJR 1983:1:33)

socialoficejo (IJR 1979:1:29)

**sociolog/** (PIV 1007)

sociologo: specialisto pri sociologio (PIV 1007)

**sociologi/** (PIV 1007)

sociologio: scienco, studanta la fenomenojn kaj leĝojn de la socia vivo (PIV 1007)

**soldat/** (PIV 1009)

deviga soldatservo (L) (IJR 1984:1:17)

**solidar/** (PIV 1011)

solidara (r): 1) prenanta sur sin la respondecon pri la agoj de aliaj personoj, 2) akceptinta respondecon pri la ŝuldoj de aliaj personoj (PIV 1011)

solidareco: 1) reciproka dependeco, komuneco de interesoj, sentoj kaj agoj, 2) interdependa respondeco pri ŝuldoj, mondevoj ktp (PIV 1011)

la edzo estas solidara kun sia edzino (PIV 1011)

la geedzoj respondecas solidare (IJR 1966:1:13)

la solidareco de la heredintoj (PIV 1011)

striko de solidareco (PIV 1011)

**solvent/** (PIV 1011)

solventa (r): pagokapabla (PIV 1011)

insolventa: ne solventa (PIV 431)

solventeco: eco de iu, io solventa (PIV 1011)

enketi pri la solventeco de negocisto (PIV 1011)

nesolventa debitoro (PIV 1011)

solventa firmo (PIV 1011)

**soveti/** (PIV 1016)

sovetia juro (L) (IJR 1983:1:41)

**sovĥoz/** (PIV 1016)

sovĥozo (r): en Sovetio, ŝtata agrikultura kampara mastruma organizaĵo (PIV 1016)

**special/** (PIV 1018). Vidu ankaŭ: apart/

ekzistas specialaj kaŭzoj por la koncesio de la ŝtataneco (IJR 1967:3(4):22)

esti regulita per speciala leĝo el la jaro 1955 (IJR 1967:1(2):15)

ĝeneralaj kaj specialaj kortumoj (IJR 1977:2:36)

krimagoj kontraŭ speciala kriminala leĝo (IJR 1983:2:20)

la teksto estis prezentita por subskribo en speciala kunveno (IJR 1985:2:6)

la Unua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UNO (Scienca Mondo 1982:4:26)

pristudi la jurajn aspektojn de la kosmouzo kun speciala atento al la eventuala disvastiĝo de la vetarmado en la kosmo (Scienca Mondo 1986:1:3)

se ekzistas specialaj kaŭzoj (IJR 1967:3(4):22)

se ne estas specialaj cirkonstancoj (IJR 1985:2:21)

speciala formo de tiu ĉi kontrakta speco estas la donaco okaze de morto (IJR 1967:1(2):5)

speciala parto de la kriminala juro (IJR 1968: 1(6):2)

specialaj kriminalaj leĝoj (IJR 1983:1:36)

specialisto pri Eŭropa Komunuma Juro (IJR 1983:1:46)

specialigitaj institucioj (IJR 1981:1:11)

trovi specialan kaŭzon por nei al la venkinta partio kompenspostulon koncerne la kostojn (IJR 1967:1(2):14)

**specif/** (PIV 1018)

specifi (tr): nome esprimi; detale difini; precize mencii (PIV 1018)

konsiderante la specifajn kondiĉojn de nia lando (IJR 1968:3(8):16)

la leĝo ne povas specifi ĉiujn specojn de delikto (PIV 1018)

specifaj doganpagoj (postulataj laŭ la speco, ne laŭ la valoro) (PIV 1018)

specifi la reciprokajn rajtojn en kontrakto (PIV 1018)

unu el la specifaj karakterizoj de la bulgara familia juro (IJR 1966:1:14)

**spert/** (PIV 1019)

spertulo (Aktualaj 63)

**spirit/** (PIV 1022)

havi la bezonatan spiritkapablon por kompreni la kontraŭjurecon de la ago (IJR 1983:1:38)

**spoz/** (Ne en PIV)

spozo signifas unu el la geedzaj partneroj (L) (IJR 1979:1:11)

**star/** (PIV 1028)

starigi: 2) fari, ke iu staru ie, 3) havigi ian konstantan funkcion, oficon, 4) estigi, establi, fondi (PIV 1028)

la aliancanoj restarigis la demokratian Aŭstran Respublikon (IJR 1969:1(9):10)

mi povas starigi atestantojn pri tio (Z) (PIV 1028)

oni klopodis harmoniigi la starpunktojn (L) (IJR 1977:1:20)

solstara patrino (IJR 1966:1:8)

starigi komitaton (PIV 1028)
starigi kurson, lernejon, instituton, fabrikon (PIV 1028)
starigo de laborgrupo por pristudi la jurajn aspektojn de la kosmouzo (Scienca Mondo 1986: 1:3)
starpunkto (Aktualaj 17)

**stat/** (PIV 1029). Vidu ankaŭ: pozici/, status/
plibonigi la socialan staton de la hindaj virinoj (Scienca Mondo 1987:1:18)
postuli ŝanĝon de la stato de la virinoj en la socio (Scienca Mondo 1987:1:19)
ŝanĝi la jurstaton de la advokatoj (IJR 1968:2(7):7)

**status/** (PIV 1030). Vidu ankaŭ: pozici/, stat/
statuso (r): leĝa stato de persono (PIV 1030)
civitana, familia statuso (PIV 1030)
havi statuson de fremdulo (PIV 1030)

**statut/** (PIV 1030)
statuto (r): fundamenta regularo de asocio, societo aŭ alia organizaĵo (PIV 1030)
kontraŭ la statuto (PIV 1030)
la Akademio agas laŭ statuto (Scienca Mondo 1983:1:27)
laŭ la statuto (PIV 1030)
modifi statuton (PIV 1030)
statutaj preskriboj (PIV 1030)
Statuto de la Internacia Milittribunalo (L) (IJR 1969:2(10):3)
statutŝanĝo (Eŭropa Dokumento 1983:3:45), statut-ŝanĝo (Eŭropa Dokumento 1983:3:45)
voĉdoni statuton (PIV 1030)

**strik/** (PIV 1038)
striko (r): interkonsentita ĉesigo de laboro celanta devigi la mastron kontentigi la postulojn de la salajruloj (PIV 1038)
strikestraro: aro de la gvidantoj de striko, ordinare elektitaj de siaj kamaradoj (PIV 1038)
strikposteni: grupo de laboristoj, starantaj ĉe la pordo de fabriko, por malhelpi la nestrikantojn veni labori (PIV 1038)
strikrajto: rajto fari strikon, plejofte provizita per leĝa procedaro (PIV 1038)
strikrompanto: laboristo, kiu laboras malgraŭ la striko (PIV 1038)
abolicio de la krimo de striko (IJR 1975:2:5)
komuna striko (Scienca Mondo 1983:3:26)
lanteca striko (dum kiu la laboristoj laboras kun plej granda malrapideco, aplikanta ĉiujn detaletajn preskribojn) (PIV 1038)
loktena striko (dum kiu la laboristoj restadas sur la laborlokoj) (PIV 1038)
nesindikata (sovaĝa) striko (PIV 1038)
striko de solidareco (PIV 1011)

**strikt/** (PIV 1039)
strikta interpreto (IJR 1985:1:17)
strikta respondeco (IJR 1982:1:26)

**stupr/** (PIV 1040)
stupro (r): malvirgigo (PIV 1040)

**sub/** (PIV 1041)
difino de tio, kion la Konstitucio komprenas sub "demokratio" (IJR 1980:1:34)

**subjekt/** (PIV 1041)
subjektoj de la Internacia Juro (IJR 1969:2(10):8)

**subvenci/** (PIV 1043)
subvencio (r): publika monhelpo, donita de ŝtato, urbo, societo aŭ mecenato al unu persono, movado, lernejo ktp (PIV 1043)
subvencii: doni subvencion al (PIV 1043)
industrio subvenciata de la ŝtato (PIV 1043)
la urbo subvencias tri teatrojn (PIV 1043)
tiu regulo ne suferas esceptojn (PIV 1043)

**suicid/** (PIV 1045)
suicido (r): ago, per kiu mortigas sin tiu memkonscia homo, kiu, povante elekti la vivon, elektas tamen la morton, sen ia ajn morala deviĝo (PIV 1045)

**super/** (PIV 1048)
apelacii kontraŭ tiaj decidoj al supera instanco (IJR 1985:1:4)
la internacia leĝo estas supera al la interna jura ordo (Aktualaj 71)
la Plej Supera Kortumo (IJR 1977:2:31)
la superaj organoj (IJR 1980:2:19)
ministro: plej supera ĉefo, kiu, estante ano de ŝtata registaro, estras unu el la specialaj administraj fakoj de la ŝtataj aferoj (PIV 699)
supera forto (vis major) (IJR 1976:2:26)
supera juĝinstanco (IJR 1978:2:35)

**supoz/** (PIV 1049)
supozi (r) (tr): 1) esti inklina pensi, manke de pruvoj certaj; akcepti kiel probabla, ne havante pri ĝi efektivan scion (PIV 1049)
antaŭ supozi (Esperanto 1974:11:187)
li faris sian promeson surbaze de certaj antaŭsupozoj (IJR 1967:1(2):20)

**supr/** (PIV 1049)
la supredirito ĵetas lumon sur la ĉefa kaŭzo por ... (Scienca Mondo 1983:1:5)

**suspekt/** (PIV 1052)
suspekti (r) (tr): 1) sen pruvo certa inklini akuzi pri io (PIV 1052)
kun la arestita suspektito la advokato povas libere kontakti skribe aŭ persone (IJR 1967:1(2):17)
suspekti iun pri ŝtelo (Z) (PIV 1052)
suspekto pruvon ne egalas (Z) (PIV 1052)

**suspend/** (PIV 1052)

suspendi (r): 1) provizore deteni iun de la plenumado de lia funkcio, oficio, aŭ senigi je lia privilegio, rajto ks, 2) provizore lasi sendecida aŭ senefika (PIV 1052)
suspendo: ago de iu, kiu suspendas iun aŭ ion (PIV 1052)
suspendi la aplikon de iu leĝo (PIV 1052)
suspendi policiston (PIV 1052)
suspendo de la funkcioj de jura persono dum certa tempo (IJR 1984:2:19)

**suveren/** (PIV 1052)
Bulgario estas suverena socialista ŝtato (Bulgario 37)

**svat/** (PIV 1053)
svati (r) (tr): en kvalito de pli-malpli profesia edziĝproponanto, proponi iun por edziĝo kaj klopodi por aranĝi tiun edziĝon (PIV 1053)
svatanto: persono, kiu neprofesie ludas la rolon de svatisto (PIV 1053)
svatiĝi: esti proponita al iu, kiel edzo aŭ edzino (PIV 1053)
svatisto: homo, kies profesio aŭ okupo estas proponi aliulojn por edziĝo (PIV 1053)
en la modernaj civilizoj la perado de svatisto estas necesa, por aranĝi edzigon (PIV 1053)
svati Jozefon al Maria (PIV 1053)

# Ŝ

**ŝakr/** (PIV 1056)
ŝakri (r) (tr): komercaĉi laŭ hazarda aŭ neleĝa maniero (PIV 1056)
ŝakristo: homo, kies vivrimedo estas ŝakrado (PIV 1056)

**ŝarĝ/** (PIV 1059)
la kunveno unuanime senŝarĝigis la Estraron rilate ĝian laboron (IJR 1968:3(8):22)
malŝarĝo de la Estraro pro la financa gvidano (Esperanto 1971:7/8:125)
senŝarĝigo de la Plenuma Komitato (L) (IJR 1983:1:47)

**ŝarif/** (PIV 1060)
ŝarifo (r): 1) araba princo, devenanta de Mahometo per Fatima, kaj havanta la rajton porti turbanon aŭ vualon verdan, 2) ĉefoficisto en Mekko (PIV 1060)

**ŝerif/** (PIV 1062)
ŝerifo (r): 1) ĉefa regna administranto en angla distrikto, 2) ĉefa policoficisto en usona distrikto (PIV 1062)

**ŝlos/** (PIV 1065)
kontraŭleĝa enŝlosigo de persono (IJR 1982:1:27)
portempa enŝloso (IJR 1982:2:15)

**ŝtat/** (PIV 1070)
deŝtatigi (tr): fari, ke io ne plu apartenu al la ŝtato aŭ ne plu estu administrata de ĝi (PIV 1070)
ŝtatigi: fari, ke io apartenu al la ŝato aŭ estu administrata de ĝi (PIV 1070)
administracia forpreno de la ŝtataneco (IJR 1967: 3(4):22)
akiri la germanan ŝtatanecon (Monato 1989:4:14)
alŝtatigo de la plimulto de la produktiloj (IJR 1968:1(6):13)
demeti sian antaŭan ŝtatanecon (IJR 1967:3(4):22)
esti submetita al norvega ŝtatsuvereneco (IJR 1978:1:2)
federacia ŝtato (IJR 1978:1:28)
forpreno de la ŝtataneco (IJR 1967:3(4):22)
interŝtata juro (IJR 1977:2:34)
konfisko kaj ŝtatproprigo de la havaĵo de jura persono (IJR 1984:2:19)
kontraŭŝtata perfido (IJR 1968:3(8):17)
la flandra partoŝtato (Monato 1989:1:4)
la Konstitucio de 1946 enkondukis la disiĝon de la stato kaj eklezio (IJR 1966:1:22), efektivigi la konstitucian principon de la disigo de ŝtato kaj eklezio (IJR 1966:1:19)
la plej superaj ŝtatpotencaj organoj (IJR 1969: 2(10):18)
la repreno de donita ŝtataneco estas allasebla (IJR 1968:2(7):9)
la ŝtataneco povas esti koncesiata al fremdulo, se ... (IJR 1967:3(4):22)
la ŝtato ekestis kiel rezulto de interkonsento inter la personoj, kiuj ĝin formas (Aktualaj 19)
leĝoj, kiuj leĝigis la alŝtatigon de la produktiloj (IJR 1968:1(6):2)
nerekonita ŝtato (IJR 1982:1:37); ne-rekonita ŝtato (IJR 1977:2:52)
rajto je ŝtataneco kaj la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon (Aktualaj 88)
supranaciaj ŝtatokunigo (IJR 1984:2:33)
ŝtata administracio (IJR 1985:1:6)
ŝtatadministrada juro (IJR 1968:1(6):3)
ŝtataneco (IJR 1967:2(3):19)
ŝtatformiĝo (IJR 1978:2:18)
ŝtatjura teorio (IJR 1981:1:30)
ŝtatoformoj (Aktualaj 19)
Ŝtatoj-Membroj (L) (IJR 1976:1:1)
ŝtatoj-partoprenantoj (L) (IJR 1977:1:22)
ŝtatoj-subskribintoj (IJR 1977:1:23)
ŝtatojuraj garantioj (IJR 1968:3(8):6)
ŝtatordo (Bulgario 37)

ŝtatpotencaj organoj (IJR 1969:2(10):18)
ŝtatreligio (IJR 1978:2:19)
ŝtatsukcesio (IJR 1982:2:32)
urboŝtato (IJR 1984:2:36)

**ŝtel/** (PIV 1070)
ŝteli (r) (tr): kontraŭjure forpreni kaj proprigi al si posedaĵon de alia persono (PIV 1070)
infanŝteli (ntr): ŝteli infanon, plejofte por postuli de la gepatroj elaĉetmonon (PIV 1070)
poŝoŝtelisto: ŝtelisto, kiu havas la lertecon ŝteli el la poŝoj de sengarduloj (PIV 1070)
ŝtelaĵo: tio, kion oni ŝtelis (PIV 1070)
ŝtelaĵokaŝisto: ricelisto (PIV 1070)
ŝteleti (tr): ŝteli malgrandajn, ne tre valorajn aĵojn (PIV 1070)
ŝtelisto: homo, kiu serĉas siajn vivrimedojn en ŝtelado (PIV 1070)
ŝtelo: ago de tiu, kiu ŝtelas (PIV 1070)
aŭtoŝteloj (IJR 1982:1:27), ŝtelo de aŭtoj (IJR 1983:2:22)
elaŭtaj ŝteloj (IJR 1982:1:27)
infanŝtelo estas en Usono federala krimo (PIV 1070)
negrava ŝtelo (IJR 1982:2:4)
rabista ŝtelo (IJR 1983:2:22)

**ŝuld/** (PIV 1074)
ŝuldi (r) (tr): 1) laŭleĝe aŭ laŭmore devi pagi al iu per mono aŭ naturaĵoj, 4) laŭjure devi fari aŭ nefari ion (PIV 1074)
ŝulda: havanta ŝuldon (PIV 1074)
ŝuldanto: tiu, kiu ŝuldas iun sumon al aliulo (PIV 1074)
ŝuldatesto: dokumento, per kiu iu persono deklaras sin ŝulda al iu je io (PIV 1074)
ŝuldo: 1) mono, kiun oni ŝuldas (PIV 1074)
liberigita je siaj ŝuldoj (PIV 632)
preskriptita ŝuldo (IJR 1967:3(4):18)
sin senŝuldigi per trisemestraj partopagoj (PIV 1135 sub trisemestr/)

# T

**taks/** (PIV 1081)
taksi (r) (tr): 2) fari al si opinion pri la valoro de ia ago, ideo ks, 3) sen la helpo de sciencaj procedoj, difini la kvantan, monan ktp valoron de objekto, 4) oficiale difini la maksimuman vendoprezon de varo aŭ servo, 5) meti specialan imposton super varo aŭ iu servo (PIV 1081)
taksado: 1) determino de la valoro de iu aŭ io, 2) ago de tiu, kiu taksas 5; impostado (PIV 1081)
takso: 1) vendoprezo de iu varo aŭ servo, oficiale fiksita de la registaro, 2) depago, kiun la uzanto de publika servo ŝuldas, kiel kompenson pro tiu oportunaĵo (PIV 1081)
aperas laŭtakse 4000 revuoj (Nederlando 1980, p. 42)
en afero de takso (IJR 1981:1:28)
en multaj landoj la benzino estas taksita, iafoje tre alte (PIV 1081)
estas afero de takso kiomgrande oni apliku alternadon (IJR 1981:1:28)
la bieno estis taksita je 10 000 frankoj (PIV 1081)
la impostoj estas ŝuldataj de ĉiuj civitanoj, la taksoj nur de tiuj, kiuj profitas de la responda servo (PIV 1081)
la tribunalo taksis la juĝokostojn je dek dolaroj (PIV 1081)
laŭ mia takso (Esperanto 1963:5:92)
laŭ sia pritakso de la situacio (Aktualaj 114)
peti de spertulo la taksadon de vendota domo (PIV 1081)
prezenti konvinkigajn pritaksojn (Scienca Mondo 1987:1:31)
pritaksado de pruvoj en ĉiuj stadioj de kriminala proceduro (L) (IJR 1983:2:13)
pro timo de inflacio, la registaro taksis la ĉefajn nutrovarojn (PIV 1081)
takso por la forpreno de la hejmaj ruboj (PIV 1081)

**talveg/** (PIV 1083)
talvego (r): tiu linio, kiu kunigas la plej malaltajn punktojn de fundo de valo (PIV 1083, Kp. IJR 1985:2:26, 30, 31, dif.)

**temp/** (PIV 1093)
limtempo: tiu tempo, kiu finiĝas per ia antaŭfiksita limo (PIV 1095)
antaŭ definita limtempo liberiĝi el fremda ŝtataneco (IJR 1967:4/5(5):6)
antaŭ la fino de la fiksita tempolimo por subskribo (IJR 1981:1:39)
antaŭ la tempolimo fiksitaj tiucele (UN 32)
certa limtempo estas fiksita por la subskribo (IJR 1982:1:38)
dekreto donita por difinita tempodaŭro (IJR 1981:2:15)
en la tempospaco de kvin jaroj post la dono de la ŝtataneco (IJR 1968:2(7):9)
en limtempo de 4 semajnoj (IJR 1980:2:16)
en tempodaŭro de ne pli ol 3 tagoj (L) (IJR 1982:1:16)
fiksado de limtempo por la validiĝo de la nuligo (IJR 1981:2:17)
forigo de la mankoj en taŭga templimo (IJR

1977:1:14)
ĝis la fino de fiksita tempospaco (IJR 1981:1:39)
je pli posta tempopunkto (IJR 1981:1:39)
kun fiksita tempolimo por respondo (IJR 1967: 4/5(5):13)
kunventempo (IJR 1981:1:35)
la dekreto estis donita nur por difinita tempodaŭro (IJR 1981:2:15)
la federacio povas ordoni al la landestro la forigon de la mankoj en taŭga limtempo (IJR 1981:2:23)
la Kongreso fiksis mallongan tempolimon (ĝis 1987), en kiu oni devas decidi pri la malarmado (Scienca Mondo 1985:4:5)
la limtempo por maldungo estas dek kvar tagoj (IJR 1976:1:21)
la plendo devas esti prezentita en tempolimo de 3 monatoj post la momento, kiam ... (L) (IJR 1981:2:8)
la subskribo estas farata je pli posta tempopunkto (IJR 1981:1:39)
la templimo inter la du balotoj estas du semajnoj (IJR 1978:1:42)
la limtempo de valideco de tiu bileto estas du monatoj (PIV 1095)
li povas starigi kondiĉojn aŭ tempolimojn (IJR 1975:1:23)
limdatoj por livero kaj akcepto (L) (IJR 1984:2:9)
livertemplimo (Fina Akto 66)
malobeo de la limtempo por subskribo (IJR 1977: 2:52)
ofte traktatoj preskribas ke validiĝo ne okazu antaŭ difinitaj tempolimoj (IJR 1981:2:31)
periodoj de portempa labora malkapablo (L) (IJR 1983:2:7)
portempa enŝloso (IJR 1982:2:15)
se li antaŭ difinita limtempo akiris ŝtatanecon de fremda ŝtato (IJR 1967:4/5(5):6)
sekvo de neprotestado antaŭ la forpaso de la limtempo estas, ke ... (IJR 1982:1:43)
sendo de la neplenaĝulo en edukan institucion en tempodaŭro de ne pli ol 3 jaroj (L) (IJR 1982:1:16)
sessemajna limtempo por la kompensago (IJR 1975:2:45)
vi devas fini la konstruaĵon en la difinita limtempo (PIV 1095)

**ten/** (PIV 1095)
polica detenejo (Monato 1987:9:12)
zorgi pri la vivtenado de si mem kaj de sia familio (IJR 1967:4/5(5):6)

**ter/** (PIV 1101)
elspezoj por enterigo (IJR 1976:2:31)
fari elterigon (IJR 1968:2(7):6)
sur la kampo de terjuro (L) (IJR 1978:1:46)

**teren/** (PIV 1103)
katastro, terenregistro (IJR 1977:1:37)
sur la tereno de internacia juro (IJR 1967:1(2):9)
terenproprietanto (IJR 1977:2:28)

**teritori/** (PIV 1103)
teritorio (r): parto de lando, regiono, sub la jurisdikcio de suvereno, ŝtato, civito ks (PIV 1103)
eksterteritoria: ne submetita al la leĝoj de la koncerna teritorio (PIV 1103)
ambasadorejoj estas eksterteritoriaj rilate al la lando, en kiu ili troviĝas, kaj laŭ la internacia juro estas parto de la lando reprezentata (PIV 1103)
ili ne celas teritoriajn pligrandigojn (L) (IJR 1985:2:2)
la ambasadorejoj havas rajton de eksterteritorieco (PIV 38 sub ambasador/)
posedo de la roko ankaŭ signifus plilarĝiĝon de la teritoriaj marlimoj de la posedanta lando (Monato 1989:1:11)
rajto pri eksterteritoreco (PIV 1103)

**terminologi/** (PIV 1103)
terminologio: aro de la terminoj, uzataj en unu scienco aŭ tekniko (PIV 1103)
bona, kompleta terminologio estas nepra kondiĉo de progreso (PIV 1103)
jura terminologio (IJR 1982:1:3)

**testament/** (PIV 1105). Vidu ankaŭ: holograf/, legac/
testamento (r): 1) deklaro, subigita al jure difinita formo, kutime skriba, per kiu iu persono esprimas sian lastan volon rilate sian proprieton, nomante universalan heredonton kaj farante eventuale aliajn disponojn (PIV 1105)
testamenti (tr): 1) asigni aŭ ordoni ion al iu per testamento (PIV 1105)
ankaŭ la testamentatestantoj devas havi pli ol 18 jarojn (IJR 1975:1:25)
buŝa testamento (IJR 1975:1:22)
ĉiuj juroj havas eksterordinarajn testamentoformojn por eksterordinaraj cirkonstancoj (IJR 1975:1:1)
deklaro de la atestantoj pri la subskribo de la testamento (IJR 1975:1:3)
dum marvojaĝo oni povas fari t.n. surmaran testamenton (IJR 1975:1:17)
en reciproka testamento la geedzoj deklaras, ke ... (IJR 1975:1:9)
fari sian testamenton (PIV 1105)
fari testamenton favore al ... (Esperanto 1973:12: 216)
juĝista testamento (IJR 1975:1:1)

kasacii testamenton (PIV 494)
komuna geedza testamento (IJR 1975:1:18)
krome ekzistas eksterordinaraj testamentoj por vojaĝantoj sur ŝipo (IJR 1975:1:5)
kunaj testamentintoj (IJR 1975:1:4)
la testamenta dispono povas esti submetata al solvigaj aŭ prokrastigaj kondiĉoj (IJR 1975:1:20)
la testamentanto rajtas fari legacon deklarante, ke ... (IJR 1975:1:9)
legitimi testamenton ĉe la tribunalo (PIV 624)
li povas dispozicii per testamento pri sia tuta havaĵo (IJR 1975:1:13)
li testamentis grandajn sumojn al la universitato de sia naskiĝurbo (PIV 1105)
neniigo de la testamento (IJR 1975:1:18)
notaria testamento (IJR 1975:1:1)
notarie protokolita testamento (IJR 1975:1:17)
postlasi validan testamenton (IJR 1977:1:32)
propramana testamento (IJR 1975:1:1), memskribita testamento (IJR 1975:1:18)
publika testamento povas esti farata ĉe juĝejo aŭ ĉe notario (IJR 1975:1:5)
revoki testamenton (IJR 1975:1:18)
sekreta testamento (IJR 1975:1:18)
skriba testamento (IJR 1975:1:21)
testamenta agokapablo (IJR 1975:1:16)
testamenta dispon-rajto (IJR 1975:1:20)
testamenta dispozicio (IJR 1975:1:16)
testamenta formo (IJR 1975:1:1), testamento-formo (IJR 1975:1:1)
testamenta heredanto (IJR 1975:1:6)
testamenta interpretado (PIV 1105)
testamenta juro (IJR 1975:1:1)
testamenta ordono (IJR 1975:1:22)
testamenta postlasaĵo (PIV 618)
testamentanto devas mem konformi ke la dokumento enhavas lian lastan volon (IJR 1975:1:5)
testamentatestanto (IJR 1975:1:25)
testamente disponi pri siaj havaĵoj (PIV 196)
testamenti pri 1/3 de siaj postlasaĵoj (IJR 1979:1:15)
testamento farita antaŭ atestantoj (IJR 1975:1:1)
testamento farita en la formo kaj sub la kondiĉoj kiujn preskribas leĝo (IJR 1975:1:21)
testamento povas esti ŝanĝita aŭ parte nuligita, per aldono en la sama formo (IJR 1975:1:7)
testamento subskribita persone de la testamentanto kaj legalizita de notario (L) (IJR 1975:1:27)
testamentplenumanto, ekzekutoro (IJR 1975:1:1)

**tetrark/** (PIV 1106)
tetrarko (r): reganto aŭ guberniestro de tetrarkejo (PIV 1106)
tetrarkejo: ĉiu el la kvar dividoj de lando, regiono, ks, regata de aparta tetrarko (PIV 1106)
tetrarkio: sistemo de regado, iniciatita de Diokleciano, laŭ kiu Romanio estis regata de kvar imperiestroj (PIV 1106)
la tetrarko Herodo (PIV 1106)

**ting/** (Ne en PIV)
tingo, mitingo (IJR 1975:2:31)

**tiran/** (PIV 1115)
tirano (r): 1) en la antikva Grekujo, homo, kiu uzurpis la absolutan regpovon en iu civito, kaj kies aŭtoritato posedis nenian religian karakteron, 2) absoluta, kruela regnestro (PIV 1115)

**trad/** (PIV 1124)
tradi (r) (tr): laŭofice forpreni la havaĵon de ŝuldanto, kaj doni ĝin al kreditoro en posedon (PIV 1124)

**trakt/** (PIV 1126)
trakti (r) (tr): 1) diskuti pri la kondiĉoj de iu afero, por finveni al interkonsento, 2) tia- aŭ alimaniere agi, konduti kontraŭ iu aŭ io, 3) metode esplori, disvolvi kaj klarigi temon (PIV 1126)
intertrakti (ntr): trakti inter pluraj personoj aŭ partioj (PIV 1126)
pritrakti (tr): trakti 3) (PIV 1126)
fiksi per traktadoj (IJR 1981:1:31)
la aktivecon de la traktoj pri la problemoj de malarmado (Scienca Mondo 1983:3:17)
la START-intertraktoj pri redukto de la strategia armado (Scienca Mondo 1983:1:1)
la sukceso de la intertraktoj pri malarmado (Scienca Mondo 1984:2:9)
la temo estis jam plurfoje pritraktita (PIV 1126)
li estis sendita, por trakti pri la aĉeto (Z) (PIV 1126)
malfermi intertraktadojn (Esperanto 1972:1:8)
nomumo de traktada delegacio (IJR 1981:1:34)
nur malofte la Lordoĉambro resendas kazon suben por plua traktado (IJR 1978:2:35)
per objektivaj analizoj kaj realecaj pritraktoj de la perspektivoj (L) (IJR 1976:1:1)
pritrakto de la afero (IJR 1977:2:53)
tiun problemon oni povas trakti en diversaj manieroj (PIV 1126)
traktada delegacio (IJR 1981:1:34)
traktada plenrajtigilo (IJR 1981:1:35), traktadrajtigilo (IJR 1981:1:33)
traktada rezulto (IJR 1981:1:37), traktadrezulto (IJR 1981:1:38)
traktado, mediacio kaj konciliacio (L) (IJR 1976:1:2)
traktanto (IJR 1977:2:52)
trakti iun kiel krimulon (PIV 1126)

trakti kun la venkinto pri la paco (PIV 1126)

**traktat/** (PIV 1126). Vidu ankaŭ: paraf/, ratifik/, konsent/(interkonsento), kontrakt/, konvenci/

traktato (r): 1) skribita interkonsento inter du ŝtatoj (PIV 1126)
traktato (L) (IJR 1976:2:35–36. Kp. IJR 1981:1:26, dif.)
buŝaj traktatoj (IJR 1981:1:31)
dupartiaj kaj plurpartiaj traktatoj (IJR 1981:1:26)
fari traktaton (PIV 1126)
faritaj en interŝtataj traktatoj de GDR kun aliaj ŝtatoj (IJR 1968:2(7):9)
faro de traktato (IJR 1969:1(9):19)
jurkreaj traktatoj (IJR 1981:1:25)
juro de traktatoj (L) (IJR 1976:1:12), traktata juro (IJR 1981:1:40), traktatjuro (IJR 1983:1:34)
komerca traktato inter Germanujo kaj Sovetio (PIV 1126)
kontraktaj traktatoj (IJR 1981:1:25)
la deviga forto de la traktato (IJR 1981:1:27)
la dispozicio de traktatoj varias de kazo al kazo (IJR 1981:1:27)
la Londona Traktato de la 15-a de novembro 1831 (L) (IJR 1979:1:6)
la paca traktato etis subskribita, sed ankoraŭ ne subskribita (PIV 1126)
la Pactraktato de Versailles (L) (IJR 1969:2(10):2)
la Pariza Traktato de 1951 pri la fondo de la Eŭropa Komunaĵo pri Ŝtalo kaj Karbo (L) (IJR 1978:2:4)
la Roma Traktato de 1957 (L) (IJR 1978:2:4), la Traktato de Romo (1957) (L) (IJR 1977:2:13)
la Traktato de Bruselo, 1972 (L) (IJR 1977:2:13)
la Traktato de Londono de la 19-a de aprilo 1839 (L) (IJR 1979:1:6)
la uson-japana traktato de sekureco (Monato 1989:1:10)
la Versaja Traktato (L) (IJR 1976:1:3)
multflanka (multpartia) traktato (Scienca Revuo 1974:5/6:235)
plurpartia traktato (IJR 1981:1:26)
prepara laboro de la traktato (IJR 1969:2(10):26)
skribaj traktatoj (IJR 1981:11:31)
traktato de la Eŭropa Ekonomia Komununo (Esperanto 1972:2:21)
Traktato pri Limigo de Strategiaj Ofensivaj Armiloj, 1979 (L) (IJR 1979:2:35)
traktato pri reciproka neatakado (L) (IJR 1976:1:4)
traktato-partioj (IJR 1985:1:18)

**transakci/** (PIV 1129)

transakcio (r): tuto de la konvencioj, kiuj okazas inter komercistoj, borsistoj ks pri unu negoco, operacio ks (PIV 1129)
komercaj transakcioj (Fina Akto 33)
partpreno en civiljuraj transakcioj (L) (IJR 1984:2:7)

**trat/** (PIV 1130)

trato (r): speco de kambio, per kiu iu persono, nomata tratanto, devigas alian personon, nomatan tratato, pagi ĉe difinita tago ian monsumon, aŭ al la tie nomita prenanto (profitanto), aŭ al la persono, montrita per la ĝiro, aŭ al nenomita prezentonto (PIV 1130)
ĉevida trato (PIV 1130)
konsentita trato, estas trato, kiu surhavas, krom la subskribo de la tratanto, ankaŭ tiun de la tratato, kiu tiel agnoskas sian ŝuldon kaj ligas sin por la difinitaj tempo kaj sumo de la pago (PIV 1130)

**tribunal/** (PIV 1134). Vidu ankaŭ: juĝ/, kort/

tribunalo (r): 1) justica organo, konsistanta el unu juĝisto aŭ el pluraj, samtempe juĝantaj, juĝistoj, 2) loko, kie kunsidas la juĝisto(j) de tribunalo, 3) ... (PIV 1134)
administracia tribunalo (IJR 1981:2:10)
aperi antaŭ la tribunalo (PIV 1134)
arbitracia tribunalo (IJR 1968:1(6):3)
civila, administracia, komerca tribunalo (PIV 1134)
ĉefjuĝisto de la plej alta tribunalo (IJR 1980:1:26)
duainstanca tribunalo (IJR 1968:3(8):21)
eksedziga tribunalo (IJR 1976:1:41)
interkonsentita arbitracia tribunalo (L) (IJR 1984:2:8)
konfliktoj inter la labordonanto kaj la lernanto estas pritraktataj antaŭ speciala tribunalo (IJR 1967:1:14)
kontraŭ ĉiu unuainstanca juĝo krom tiu de la Plej Supera Tribunalo ekzistas speciala apelacia rajto (IJR 1969:1(9):12)
krei specialajn tribunalojn (Konst. Bul. 14)
kriminala tribunalo (IJR 1981:2:24, krimtribunalo (IJR 1967: 3(4):12)
la aŭstralia Alta (Supera) Tribunalo (IJR 1980:1:19)
la decido de la suba tribunalo estas valida (IJR 1978:2:33)
la internacia tribunalo en Njurnbergo (Scienca Mondo 1983:3:18)
la plej alta tribunalo (IJR 1980:1:26), la Plej Supera Tribunalo (IJR 1969:1(9):12)
la socitribunalaj membroj elektas el inter si la prezidanton de la tribunalo (IJR 1969:2(10):14)
labortribunalo por konfliktoj inter labordonantoj kaj laborprenantoj (IJR 1967:1(2):16)

li devas esti metita antaŭ tribunalon (L) (IJR 1969:2(10):2)
malsupera krimtribunalo (IJR 1967:3(4):12)
militista tribunalo (IJR 1985:1:30)
minacante per procezo [proceso] antaŭ milita tribunalo kaj enkarcerigo (Scienca Mondo 1982:4:6)
speciala asekura tribunalo (IJR 1976:2:19)
specialaj tribunaloj por juĝado de specifaj specoj de konfliktoj kaj krimoj povas esti kreataj nur per leĝo (Konst. Bul. 14)
statuto de la Internacia Milittribunalo (L) (IJR 1969:2(10):3)
Supera Tribunalo (Bulgario 39)
tribunala decido (IJR 1984:2:32)
tribunala proceso pri la heredaĵo (IJR 1977:2:26)
tribunalo de apelacia instanco (PIV 431)
tribunalo de unua instanco (PIV 431)
tribunalo pri la ekleziaj, la militaj, la maraj aferoj (PIV 1134)

**tribunus/** (PIV 1134)
tribunuso (r): 1) ĉiu el la du (origine) ĝis dek (lastatempe) Romaj oficistoj, elektitaj de la plebo, por defendi ties rajton kaj liberecon kontraŭ la senato kaj la konsuloj (= pleba tribunuso), 2) alta oficiro (= milita tribunuso) (PIV 1134)
la tribunusa povo (de nearestebleco) fariĝis la bazo de la imperiestra aŭtoritato (PIV 1134)

**tribut/** (PIV 1134)
tributo (r): 1) sumo da mono aŭ kvanto da valoraĵoj, periode pagata de unu princo, tribo, ŝtato ks, kiel signo de dependeco, aŭ kompenso pro protekto, aŭ sekve de traktato (PIV 1134)
ĉu konvenas doni la tributon al Cezaro aŭ ne? (PIV 1134)
submeti iun popolon al tributo (PIV 1134)

**triumvir/** (PIV 1137)
triumviro (r): ĉiu el la tri membroj de triumviro (PIV 1137)
triumviraro: 1) triopo da ŝtat-oficistoj en Romo, 2) koalicio inter tri estroj (PIV 1137)
la unua triumviraro (en 60 a.K., inter Pompeo, Cezaro kaj Krasso), la dua triumviraro (en 43 a.K., inter Mark-Antonio, Oktavio kaj Lepido) (PIV 1137)

**trov/** (PIV 1140). Vidu ankaŭ: juĝ/
bontrovo: libera, neinfluanta opinio, ĉu io estas bona aŭ ne (PIV 1140)
dependi de la bontrova de la supera instanco (IJR 1978:1:39)
esti decidita laŭ la "bontrovo" de la administracia organo (IJR 1980:2:24)
la proceduran lingvon elektas la plendanto laŭ sia bontrovo (L) (IJR 1977:2:15)

**trud/** (PIV 1141)
trudi (r) (tr): devigi iun kontraŭ lia volo al io malagrabla, devige akceptigi ion al iu (PIV 1141)
altrudi (tr): akcenta formo de trudi (PIV 1141)
eltrudi (tr): per trudo akiri ion (PIV 1141)
altrudi al iu sian volon (PIV 1141)
Asirio jam trudas al ni traktatojn (PIV 1141)
eltrudi monon de iu per minacoj de skandalo (PIV 1141)
mi ne penos altrudi al vi tiun projekton (Z) (PIV 1141)
oni altrudas al mi edzinon (Z) (PIV 1141)
trudi severajn kondiĉojn al la venkito (PIV 1141)

**tutel/** (Ne en PIV)
esti infano dum tutelo de prizorga instituto (IJR 1967:4/5(5):10)

# U

**ukaz/** (PIV 1152)
ukazo (r): 1) edikto de la rusa caro, 2) edikto de la Prezidio en Soveta Unio kaj en kelkaj aliaj landoj kun simila sistemo de ŝtata organizo, 3) (f) ĉia arbitra ordono, dekreto (PIV 1152)

**ultimat/** (PIV 1153)
ultimato (r): definitivaj kondiĉoj de interkonsento, kiujn regno prezentas al alia kun averto, ke ilia malakcepto kaŭzus rompon de la traktado kaj komencon de la batalo, milito ks. (PIV 1153)

**uni/** (PIV 1154)
unio (r): politika unuiĝo de ŝtatoj, kiuj konsentas pri la komunigo de iaj partoj de sia regpovo (PIV 1154)
Ĝenerala Poŝta Unio, fondita en 1847 (L) (IJR 1976:1:2)
Internacia Telegrafa Unio, establita en 1865 (L) (IJR 1976:1:2)
la Unio de Litvo kun Polujo okazis en 1386 (PIV 1154)

**urĝ/** (PIV 1158)
urĝa: ne plu prokrastebla (PIV 1158)
en kazo de urĝeco (IJR 1980:1:29)
li havas urĝan bezonon da mono (PIV 1158)
li povas doni - en kazoj de urĝeco - dekretojn kun provizore leĝa karaktero (IJR 1980:1:29)
urĝa operacio (PIV 1158)

**uz/** (PIV 1161)
fruktuzo: leĝa rajto, laŭ kiu iu povas utiligi aferon,

posedaĵon, heredaĵon, prenante por sia profito nur la produktaĵojn aŭ rentojn, sed ne tuŝante la bienon aŭ la kapitalon (PIV 1161)

uzanc/ (PIV 1161)

uzanco (r): ĉiu el la metodoj aŭ agmanieroj, fiksitaj de la kutimo (PIV 1161)

en la borso oni komercas laŭ diversaj uzancoj (PIV 1161)

uzukap/ (PIV 1162)

uzukapi (r) (tr): akiri, laŭ leĝa rajto, propraĵon per sufiĉe longe ne interrompita posedo (PIV 1162)

uzukapo: la leĝa rajto akiri la propraĵon de bieno, teritorio ks per seninterrompa kaj nekontestata okupado dum prudente longa periodo (PIV 1162)

ŝtelaĵoj ne estas uzukapeblaj (PIV 1162)

uzukapo, seninterrompa posedo en daŭro de 10 jaroj sur jura bazo (IJR 1977:1:33)

uzur/ (PIV 1162)

uzuro (r): delikto de iu, kiu pruntedonas monon kun interezo pli granda je duono al la interezo kutima, aŭ pli granda ol la leĝe permesebla (PIV 1162)

uzuristo: tiu, kiu uzuras (PIV 1162)

uzurp/ (PIV 1162)

uzurpi (r) (tr): senrajte proprigi al si bienon, povon aŭ titolon (PIV 1162)

uzurpo, uzurpado: ago de iu, kiu uzurpas (PIV 1162)

ni publike protestas kontraŭ tiu uzurpado de niaj rajtoj (PIV 1162)

uzurpi la tronon, la rajtojn de iu (PIV 1162)

uzurpi teritorion (Fina Akto 9)

uzurpator/ (PIV 1162)

uzurpatoro (r): tiu, kiu uzurpis (PIV 1162)

la reĝistoj nomis Napoleonon la uzurpatoro (PIV 1162)

# V

valid/ (PIV 1165)

valida (r): prezentanta la formon, formulojn aŭ kondiĉojn, postulantajn de la leĝo, por ke dokumento regule efiku (PIV 1165)

eksvalidiĝi: perdi sian validecon (PIV 1165)

validigi: fari ion valida (PIV 1165)

validiĝi: farigi valida (PIV 1165)

ekvalidiĝo (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:4)

envalidigo de internacia juro (Fina Akto 44)

esti nevalidaj el jura vidpunkto (Aktualaj 17)

interkonsento pri la aktivado de la ŝtatoj sur la luno kaj la aliaj ĉielaj korpoj adoptita en 1979 kaj ekvalidiĝinta la 11-an de julio 1984 (Scienca Mondo 1986:1:13)

kelkajn monatojn poste la Ĉarto ekvalidis (L) (IJR 1976:1:1)

kiu trastrekas la tutan slipon aŭ surskribas "ne" aŭ "kontraŭ", senvalidigas la balotilon (Monato 1989:6:7)

kontrakto ekvalidinta la 10an de oktobro 1963 (Scienca Mondo 1986:1:12)

kontrakto pri nedisvastigo de la nuklea armilo, validanta ek de 1970 (Scienca Mondo 1987:1:31)

kun ekvalido la 31-an de aŭgusto 1965 (UN 2)

la artikolo rilatas al la momento de validiĝo kaj al periodo de valideco de la Konvencio (L) (IJR 1969:2(10):5)

la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj ekvalidis la 24-an de oktobro 1945 (L) (IJR 1976:1:1)

la japana Konstitucio estis proklamita la 3-an de novembro 1946 kaj validigita ekde la 3-a de majo 1947 (IJR 1980:1:25)

la konstitucio de GDR validanta ekde la 8-a de aprilo 1968, entenas ... (IJR 1969:2(10):10)

la kontrakto definitive validiĝos la 1-an de Julio (PIV 1165)

la Konvencio ekvalidis la 12-an de januaro 1951, 90 tagojn post la depono de la 20-a instrumento pri ratifo [ratifiko] (L) (IJR 1969:2(10):4)

la leĝo ekvalidas tri tagojn post ĝia publikigo, escepte se en la leĝo mem ne estas difinita alia limtempo (Bulgario 7)

la leĝo ekvalidis la 1-an de junio 1968 (IJR 1969: 2(10):10)

la leĝo por modifo de la Konstitucio validas ekde la tago de ĝia publikigo en "Ŝtata ĵurnalo" (Konst. Bul. 21)

la leĝo validiĝis la 5an de majo 1987 (Monato 1987:9:6)

la mandato de la parlamento estas valida por kvar jaroj (IJR 1976:1:15)

la nun valida leĝa reguligo (IJR 1981:2:12)

la nun validanta Kriminala Kodo (IJR 1981:2:24)

la samaj konsideroj validas ankaŭ pri ... (Esperanto 1974:3:45)

la samo validas por ... (Esperanto 1972:10:176)

la validtempo de valideco de tiu bileto estas du monatoj (PIV 1095)

laŭ la valida leĝaro (Scienca Mondo 1986:1:21)

momento de validiĝo (L) (IJR 1969:2(10):5)

periodo de valideco de la Konvencio (L) (IJR 1969:2(10):5)

pro manko de aliaj formalaĵoj iu ajn interesulo

rajtas nevalidigi la testamenton (IJR 1975:1:18)
revoko de malakcepto ekvalidas kiam ricevita laŭ la regulo en § 7 (IJR 1967:1(2):20)
se evidentiĝos enhavaj diferencoj inter la diverslingvaj versioj de jam valida dokomento, tiam la internacia teksto supervalidas (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:4)
solena protokolo pri la ekvalidiĝo de la Ĉarto (Aktualaj 107)
tiu ĉi leĝo validiĝos de la tempopunkto kiun la Reĝo decidas (IJR 1967:4/5(5):19)
tiu ĉi statute validas ekde la 15-a de novembro 1974 (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:4)
translokigi la laborulon kun tuja valido (IJR 1969:2(10):16)
valida akto, kontrakto, testamento, pasporto, fervoja bileto (PIV 1165)
validigi akton, testamenton (PIV 1165)
validperiodo (IJR 1981:1:27)

**valor/** (PIV 1165)
valori (r) (tr): 5) valori (PIV 1165)
ĉe civiljuraj disputoj pri disputvaloro ĝis 500 markoj (IJR 1968:1(6):11)
la pasporto valoras nur por la daŭro de unu monato (Z) (PIV 1165)
vendo de valorpaperoj (IJR 1967:4/5(5):18)

**ven/** (PIV 1175)
interveni (ntr): 1) elpaŝi inter du partioj, kiel peranto aŭ partoprenanto (PIV 1175)
interveno: ago de iu, efiko de io intervenanta (PIV 1175)
armita interveno (Fina Akto 10)
interveni en la proceso (UN 33)
kunvenloko (IJR 1981:1:35)
kunventempo (IJR 1981:1:35)
la Konfidinto neniel rajtas interveni en la afero, krom en la kazo, se ... (IJR 1969:1(9):8)
lia interveno en la diskuton klarigis ĉion (PIV 1175)
membrokunveno povas esti kunvokata de la prezidanto, se li opinias tion oportuna aŭ se du estraranoj aŭ du sekcioj postulas tion (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)
oni petis la ambasadoron interveni kiel paciganto (PIV 1175)
"pinta" kunveno (Monato 1987:12:6)
plenkunveno (L) (IJR 1983:1:48), pleno (IJR 1981:2:12)

**vend/** (PIV 1176)
vendi (r) (tr): 1) cedi la proprieton de objekto, besto aŭ sklavo kontraŭ difinita prezo, 2) teni stokon da artikloj por la klientoj, 3) ... (PIV 1176)
ĉiovendejo: granda magazeno, en kiu oni povas aĉeti ĉiaspecajn artiklojn (PIV 1176)
disvendi, elvendi (tr): vendi ĝis la lasta specimeno (PIV 1176)
nevendebla: tia, ke ĝi ne povas esti vendata, pro iaj juraj malfaciloj, aŭ pro ĝia malbona stato aŭ neuzebleco (PIV 1176)
vendanto: tiu, kiu okaze ion vendas (PIV 1176)
vendisto: tiu, kiu metie vendadas (PIV 1176)
vendo: ago de iu, kiu vendas (PIV 1176)
Art. 5 havas apartan regulon por tiu kazo ke la vendoobjekto devas esti ekspertizata (IJR 1967:4/5(5):18)
atesto pri la vendoprezo de la havaĵoj (IJR 1977:1:35)
aŭkcia vendo (IJR 1977:1:33)
ili vendis Jozefon al la Iŝmaelidoj por dudek arĝentaj moneroj (PIV 1176)
kontanta, kredita vendo (PIV 1176)
la tuta stoko estas jam elvendita (PIV 1176)
mi disvendis ĉion por plej bagatelaj prezoj (Z) (PIV 1176)
nevendebla hereda bieno (PIV 1176)
personoj, kiuj okupiĝas pri vendado de komercaĵoj (Z) (PIV 1176)
plenumi vendon (PIV 1176)
subskriba, sigelita vendakto (IJR 1977:1:31)
vaganta vendisto (Z) (PIV 1176)
vende proponi ion (PIV 1176)
vendi pogrande, pomalgrande (PIV 1176)
vendokontrakto (IJR 1967:4/5(5):15)
vendoobjekto (IJR 1967:4/5(5):18)
vendoprezo (IJR 1977:1:35)
vendorajto (Fina Akto 67)

**verdikt/** (PIV 1181). Vidu ankaŭ: juĝ/
verdikto (r): 1) decido de tribunalo pri la kulpeco de akuzito kaj pri la graveco de la puno, 2) decido de juĝantaro pri konkurantoj (PIV 1181)
verdikti (ntr): eldiri verdikton (PIV 1181)
anticipe devigi sin plenumi la eldirotan verdikton (Aktualaj 56)
en la verdikto pri disedziĝo (IJR 1966:1:28)
ili proklamas siajn verdiktojn en la nomo de la popolo (Konst. Bul. 14)
kasacii verdikton (PIV 494)
kondamna verdikto (IJR 1984:2:35)
la nuleco de la geedziĝo devas esti konstatata pere de juĝista verdikto (IJR 1966:1:29)
la plej alta verdikto (25 jaroj) trafis kolonelon Pietruszka (Monato 1985:3:6)
mi eldiros Mian verdikton pri ili (Biblio. Jeremia 1:16)
per verdikto la testamento povas esti nuligata,

se ĝi ne estas farita en laŭlega formo (IJR 1975:1:11)
tribunalo prononcas verdikton (Esperanto 1987: 11:201)
verdiktoj kaj decidoj (IJR 1984:2:32, dif.)

verg/ (PIV 1181)
vergo (r): 2) punrimedo, konsistanta el unu aŭ precipe pluraj kunligitaj vergoj (PIV 1181)
pugvergi (tr): vergi ies nudigitan postaĵon (PIV 1181)
vergaĵo: fasko da vergoj, ĵus detranĉitaj de la arbo (PIV 1181)
vergi (tr): puni, frapante per vergo(j) ies korporparton (PIV 1181)
en la jezuitaj lernejoj frato estis komisiita pugvergi la kulpintajn lernantojn (PIV 1181)
iam oni vergis la knabojn en la lernejoj (PIV 1181)
kondamni al vergoj sub la malhonora kolono (Z) (PIV 1181)
la police tiel min regalis per vergoj, ke mi du tagojn ne povis sidi (Z) (PIV 1181)
pugvergado estas ofte formo de seksa perverseco (PIV 1181)

veto/ (PIV 1186)
vetoo (r): konstitucia rajto de ŝtatestro, de supera kortumo, de regno-ligano ktp, forĵeti provizore aŭ definitive decidon de parlamento, asembleo aŭ alia organismo (PIV 1186)
vetoi (tr): uzi tiun rajton, nuligante aŭ prokrastante ion (PIV 1186)
absoluta, prokrasta vetoo (PIV 1186)
eviti, ke unu organizaĵo havu veto-rajton super la plimulto (Heroldo 1983:12:3)
la rajto vetoi estis abunde uzata kaj tro ofte misuzata (L) (IJR 1976:1:12)
vetoi leĝon (PIV 1186)
vetoorajto (IJR 1984:1:16)

vir/ (PIV 1193)
virin-juro (IJR 1975:2:3), virinjuro (IJR 1980:2:39)

voĉ/ (PIV 1199)
voĉo (r): 4) esprimo de la opinio de ĉiu pri demando, decido aŭ elekto (PIV 1199)
unuvoĉa: tia, ke ĝi kolektas ĉies voĉojn (PIV 1199)
voĉdonado: ago de tiuj, kiuj voĉdonas (PIV 1199)
voĉdoni (ntr): voĉi (PIV 1199)
voĉdonrajto: ies rajto partopreni en voĉdonado (PIV 1199)
voĉi (ntr): esprimi sian opinion pri diskutata demando (PIV 1199)
al ties akcepto estas necese du trionoj de la voĉdonoj de la parlamentaj deputitoj (kvalifikita plimulto) (IJR 1976:1:14)
amendoj ekvalidos kiam ili estos akceptitaj per voĉdono de plimulto de du trionoj el la membroj (UN 22)
aprobaj voĉoj, kontraŭaj, sindetenaj (Esperanto 1973:2:22)
aranĝi regulan voĉdonadon (Z) (PIV 1199)
ĉe voĉegaleco decidas la voĉo de la prezidanto (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)
ĉeesto de minimume la duono de la deputitoj de la Nacia Konsilantaro (prezenca kvorumo) kaj plimulto de du trionoj de la donitaj voĉoj (konsenta kvorumo) (IJR 1980:1:30)
ĉies voĉdono estas egalvalora (IJR 1969:1(9):15)
ĉiu civitano havas unu balotvoĉon (Konstitucio 1937, p. 22)
ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupoj, kiujn li reprezentas (Z) (PIV 1199)
ĉiu el la materiaj, precize kalkuleblaj objektoj (globetoj, kartoj, paperetoj ks), kiun voĉdonantoj uzas, por esprimi sian opinion (PIV 91)
ĉiu lando rajtas havi unu voĉon sendepende de la nombro de siaj reprezentantoj (Scienca Mondo 1986:1:24)
ĉiu membro havas voĉdonrajton en tiu kunveno (Eŭropa Dokumento 1983:3:47)
ĉiu membro rajtas transdoni sian voĉdonrajton al alia membro (Eŭropa Dokumento 1983:3:47)
ĉiu posedanto de akcioj rajtas je unu voĉo en la direktado de la asociaj aferoj (Esperanto 1982:4:67)
ĉiuj voĉoj estas same valoraj (IJR 1976:1:9)
decidoj bezonas jesan voĉon de naŭ membroj (UN 2)
decidoj pri gravaj demandoj estas farataj per plimulto de du trionoj el la membroj kiuj ĉeestas kaj voĉdonas (UN 7)
deteni sin de la voĉdono (Aktualaj 115), sin deteni de la voĉdono (Aktualaj 84)
dum deko da referendumoj la voĉdonantoj daŭre aprobis kaj la konstitucion kaj la pakton (Monato 1988:10:7)
egaleco de voĉoj (UN 32), voĉ-egaleco (IJR 1978: 1:42)
en 1977 okazis elektoj por la parlamentoj, ĉe kiuj pli ol 8 300 000 rajtigitoj, t.e. 87,5% da prezentiĝo, voĉdonis (Nederlando 1980, p. 7)
en kazo de voĉ-egaleco la pliaĝa kandidato venkas (IJR 1978:1:42)
en la Ĝenerala Asembleo ĉiu Ŝtato-Membro havas unu voĉon kaj ĉiuj voĉoj estas same valoraj (L) (IJR 1976:1:9)

en la Konsilio ĉiu membro havas unu voĉon (Aktualaj 117)
en la referendumo la leĝo devas ricevi la jesajn votojn de la plimulto de la voĉdonintoj en la plimulto de la ŝtatoj (IJR 1980:1:24)
enketi pri la proceduroj de voĉdonado en la diversaj landoj (PIV 870)
esprimitaj voĉoj (IJR 1978:1:42)
estas konsiderataj kiel elektitaj tiuj kandidatoj kiuj ricevas absolutan plimulton de voĉoj en la Ĝenerala Asembleo (UN 25)
esti elektita per 25 voĉoj kontraŭ 19 (PIV 1199)
estrarano povas transdoni sian voĉdonrajton al alia voĉdonrajta estrarano, sed nur per skriba atesto (Eŭropa Dokumento 1983:3, Statuto:3)
ĝenerala, egala kaj rekta balorajto per sekreta voĉdonado (Konstitucio 1937, p. 22)
havi konsilan voĉon (Nederlando 1980, p. 7)
havi la ĉefan, la ecidan voĉon (Z) (PIV 1199)
kalkulado kaj kontrolado de la nombro de voĉoj (PIV 1199)
komuna voĉdonado estos farata pur pri tiuj demandoj, kiuj havas gravecon principan (PIV 868 sub princip/)
kondiĉo de la demokrata elektrosistemo estas la sekreteco de la voĉdono (IJR 1969:1(9):15)
kvalifikita plimulto (Al ties akcepto estas necese du trionoj de la voĉdonoj de la parlamentaj deputitoj) (IJR 1976:1:14)
la decidoj pri proceduraj demandoj estas farataj per jesa voĉo de naŭ membroj (UN 8)
la fina ĉiuvoĉa akcepto de la projekto (Aktualaj 85)
la kandidato devus resti neforstreikta de pli ol duono de l'voĉdonantoj (Monato 1985:12:18)
la kandidatoj estas elektitaj nur se ili akiris la absolutan plimulton, t.e. la duonon plus unu el la esprimitaj voĉoj (IJR 1978:1:42)
la kultura genocido estis forjetita per 25 voĉoj kontraŭ 16 favoraj (L) (IJR 1969:2(10):5)
la membroj havis malsamajn vidpunktojn koncerne la voĉdonadon (L) (IJR 1976:1:7)
la parlamento voĉdonis la leĝon (IJR 1968:1(6):2)
la prezidanto akiris 752 voĉojn el 977 voĉdonantoj, 78 pli ol la necesa kvanto por atingi la kvorumon de du trionoj, postulatan de la itala konstitucio (Monato 1985:8:13)
la prezidanto komencis voĉdonigi la diversajn rezoluciojn (Esperanto 1985:12:204)
la projekto estis akceptita per granda plimulto de la voĉoj (PIV 1199)
la socia tribunalo faras sian decidon en nepublika interkonsiliĝo per voĉplimulto (IJR 1969:2(10):15)
la teksto estis voĉdonita post longegaj marĉandoj (PIV 670)
la voĉdona rajto devas esti universala kaj egala por ĉiuj (L) (IJR 1968:3(8):2)
la voĉdona rajto estas universala kaj egala por ĉiuj (Aktualaj 88)
la voĉdonado okazos sen distingo inter konstantaj kaj nekonstantaj membroj de la Sekureca Konsilio (UN 25)
negativa voĉdonrajto (rajto malpermesi aŭ prokrasti voĉdonitan projekton) (PIV 731)
negativa voĉo (ĉe baloto) (PIV 731)
nerevokebla privilegiito (IJR 1979:1:24)
nombro de voĉdonantoj (Z) (PIV 1199)
okazi je dato kaj en loko fiksotaj per la voĉoj de du trionoj de la membroj (UN 2)
okazigi tutpopolan voĉdonadon pri iu demando (Monato 1989:12:7)
per skriba voĉdono la membroj unuanime akceptis la decidojn (L) (IJR 1985:1:47)
perletera voĉdonado (Esperanto 1985:11:186)
post diskuto la Komitato akceptis la novan aĝlimon, kun tiusenca kongresa modifo, per 26 poraj kaj 8 kontraŭaj voĉoj kun 14 sindetenoj (Esperanto 1989:9:150)
poste ĝi estos diskutata kaj nur poste ĝi estos regule voĉdonata (Z) (PIV 1199)
prezenti al voĉdonado (Z) (PIV 1199)
prezenti proponon al ripetita voĉdonado (Z) (PIV 933 sub ripet/)
propono unuvoĉe akceptita (PIV 1199)
ricevi relativan plimulton, t.e. la plej grandan nombron da voĉoj (IJR 1978:1:42)
se la voĉoj inter la juĝistoj estas egalaj, la voĉo de la plej aĝa juĝisto decidas (UN 25)
se pli ol unu ŝtatano de la sama regno ricevas absolutan plimulton de voĉoj ... nur la plej aĝa estas konsiderata kiel elektita (UN 25)
simpla plimulto de la donitaj voĉoj (IJR 1980:2:17)
sufiĉis pli ol 50 procentoj de favoraj voĉdonoj (Monato 1985:12:18)
unuvoĉa decido (PIV 1199)
voĉdonado per aplaŭdoj, per sido-staro, per kartolevo, per manlevo, per koloraj globoj (blanka = por, nigra = kontraŭ, ruĝa = sindeteno), per sekretaj balotiloj (PIV 1199)
voĉdoni por aŭ kontraŭ (Z) (PIV 560)
voĉdoni sindetene (Esperanto 1979:11:182)
voĉdoni statuton (PIV 1030)
voĉdonilo (Esperanto 1971:9:160)
voĉdonrajtulo (Monato 1985:3:10)

vol/ (PIV 1202)
- libervola: aganta aŭ okazanta sen ia ekstera truddevigo (PIV 1202)
- dolo estas donita, se la farinto agis kun scio kaj volo (IJR 1981:2:26)
- edziĝo kontraŭvola (PIV 1202)
- fakultativa (libervola) jurisdikcio (IJR 1981:2:19)
- konscia volo (IJR 1976:2:34)
- kulpa volo (IJR 1976:2:33)
- laŭvola aŭ pretervola forkonduko (IJR 1983:2:19)

vot/ (PIV 1207)
- voto (r): 1) promeso farita al Dio plenumi meritan agon, se li konsentas ian peton; sanktpromeso, 2) religia promeso de pastro aŭ monaĥo sin dediĉi al la dia servo (PIV 1207)
- voti (tr): promesi per voto (PIV 1207)

# Z

zorg/ (PIV 1211)
- zorganto: persono, kiu zorgas pri iu, precipe pri neplenaĝa orfo (PIV 1211)
- zorgato: persono, pri kiu oni zorgas, precipe neplenaĝa infano (PIV 1211)
- akcepti infanon sub sian zorgon (PIV 1211)
- Dio, kiu zorgas pri justeco por orfo kaj vidvino (PIV 1211)
- esti infano dum tutelo de prizorga instituto [instit (IJR 1967:4/5(5):10)
- fakta prizorgado (IJR 1979:1:20)
- kapabli zorgi pri la vivtenado de si mem kaj de sia familio (IJR 1967:4/5(5):6)
- la prizorganto havas prizorgantan subtenon (IJR 1979:1:19)
- prizorgado de eksprizonuloj (IJR 1982:2:11)
- prizorgantsubteno (IJR 1979:1:19)

Db1

Universitetsbiblioteket i Oslo 1990

UBO SKRIFTER : 21

# JURAJ VORTOJ KAJ ESPRIMOJ

Redaktoro: Tom Arbo Høeg

NBR
Depotbiblioteket
99sd 31 662